

LINGVO * LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo, Budapeŝt IX, Mes-
ter-utca 53. V. 5. Hungarujo.
Aparte aĉetebla. Unu numero
kostas 0,20 sv. fr. aŭ egalvaloron.
Tri numeroj kune ekspedataj
kostas nur 0,30 svisaj frankoj
aŭ proksimuman egalvaloron.

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

Aperas kvinonjare • Nro 1. 1936

ECCERNI!*

— F. SZILÁGYI —

Kabe sendube estis skeptika figuro de la esperantista historio kaj lia malapero el nia movado estis atendebla, kvankam tre bedaŭrinda okazaĵo. Estus interese foje iom analizi la historion de tiu malapero, ĉar la aŭtoro de la Vortaro, la klasika tradukinto de la Faraono ne povas esti indiferenta persono al ni, kiuj lernis de li. Kabe iomgrade reprezentas tipon, kiu ŝanceliĝas inter la pesimismo kaj optimismo, sed kiu neniam en sia vivo povas esti feliĉa, ĉu la pesimismo, ĉu la optimismo venkas en lia animo. Tro granda estas la kvanto de la venkita kvalito.

Sed oni povas lerni multe de tiuj Kabe-uloj. Oni povas ĉerpi pozitivan valoron el iliaj negativajtoj, Oni devas konsideri la agojn de la Kabeoj, ĉar ni ne rajtas esti blindaj, sinadoraj kaj ni devas rigardi al alia direkto kaj pli malproksimen ol nia umbiliko.

Guste Kabe estis tiu, kiu foje sur la ferdeko de iu kongresa ŝipo, kiu optimisme velis sub la optimisma ĉielo de la unuaj kongresjaroj, diris ion tre pripensindan, ion tre konsiderindan. Sur la ŝipo ĉiu ŝvebis en la serena ĝojo; oni antaŭvidis la plej rapidan venkon; oni parolis pri la kuracistoj, inĝenieroj, komercistoj, kiuj baldaŭ lernos Esperanton, ĉar nature la tuta mondo devas baldaŭ lerni nian lingvon. Tio estas la bezono de nia epoko. Ĉiu devas lerni Esperanton! — estis la konkludo sur la ŝipo, la svisaj montegoj ja kaŝis la nubojn, kiuj jam tiutempe kolektiĝis super la mondo. Jes, ĉiuj devas lerni Esperanton, oni konkludis kaj ĉiu ĝojis, homoj, lago, ĉielo, birdoj kaj suno. La harmonia volo ŝajnis kunligi ĉiun kaj ĉion: Ĉiu devas lerni Esperanton! — Kaj tiam ekparolis la sola pensema ombro de tiu ĉi sunplena tago. Kabe estis, li diris: »Unue la Esperantistoj devas lerni Esperanton!«

Oni ne povas forgesi tiujn vortojn kaj oni ne rajtas nei, ke Kabe pravis. Ni ne povas plendi. Eĉ en la krizaj ŝtatoj relative granda amaso lernas la lingvon de Zamenhof, ni havas geniajn pedagogojn, kiuj scias la manieron logi la homojn al la serĉe facila lingvo. Ni havas lertajn reklamistojn, kies voĉo kelkfoje estas eĉ pli laŭta ol necese; kaj la rezulto

estas, ke konsiderinde multaj viciĝas sub la sankta signo de l' espero. Sed kion ni vidas post la bonege gviditaj, a muzplenaj, mallongaj kursoj? 99 procentoj da perdo, kiel mi foje legis en la bonege redaktita »Suda Stelo«.

Kiu estas do kulpa? Ĉu la instruisto, kiu gvidis kun eminenta pedagogia sento la kurson? (Mi parolas nur pri la vere unuarange gviditaj kursoj.) En si mem, certe ne la instruisto estas kulpa. Sed ĉu eventuale la lernanto? Certe ne, oni ja lernas sindone ĝis la fino de la kurso. (Mi parolas denove nur pri la bona lernanto.) Sed tiam eble la lingvo estas kulpa? Ho ne, la lingvo ankaŭ nun estas la sama, kiu ĝi estis pli frue, kaj la ideo de la internacia lingvo ne malmalmoderniĝis, malgraŭ la nove kreitaj muroj.

Kie do ni devas serĉi la mankon? Kio estas la kaŭzo, ke ni ne povas konservi eĉ aron proporcie respondan al la propagande konkeritaj amaso?

Laŭ mia kredo, la kaŭzo estas: ke eĉ niaj plej bonaj pedagogiaj sistemoj havas tro mallongan spiron. Oni kredigas al la amaso, ke tre baldaŭ, post semajnoj oni setos la lingvon kaj per tiu metodo ni kreas aron de elreviĝintoj, kiuj post kelka tempo estas multe pli malproksime de nia movado, ol tiuj, kiuj neniam konatiĝis kun ĝi. Ni scias, ke nia lingvo estas vere la plej facila el ĉiuj lingvoj, sed ĝenerale la komencanto post la antaŭa propagando atendas miraklon. Kaj post la komenca kurso apenaŭ oni trovas signon de penso pri metode, lerte, pedagogie elpensita daŭriga kurso, pri tia kurso, kiu estus inda al la eksterordinare bonaj komenckursaj metodoj. Mi mem vidis multe da instruistoj, kiuj brile gvidas komencan kurson, kaj tuj bankrotas, se temas pri la gvido de daŭriga kurso. Jes, ja mankas la metodo. Sed tio estas la plej grava problemo de nia movado. Ne estas sufiĉa la amaso, kiu komencas la lernadon, ne estas sufiĉe lerni la lingvon, sed ellerni, ellerni! La »bonan tagon«-esperantistoj nenion valoras.

Kabe pravis: La Esperantistoj ellernu Esperanton!

Kaj pravis Hodler, kiu en la postmilitaj jaroj unue anoncis la titolon de ĉi tiu mia artikolo: ELLERNI!

* Antaŭparolo al aperonta daŭriga kurso.

Pri la „Plena Gramatiko“

La aŭtoroj de la Plena Gramatiko, s-roj Kalocsay kaj Waringhien, proponis al la Akademio, ke la Akademianoj kaj L. K.-anoj esploru la verkon kaj faru pri ĝi siajn rimarkojn. S-ro Rollet de l' Isle, la Prezidanto de la Akademio, afable akceptis ĉi tiun proponon kaj en cirkulero alvokis la anojn de niaj lingvaj institucioj, ke ili partoprenu en ĉi tiu enketo.

Laŭ interkonsento, la kritikaj artikoloj estos publikigitaj en *Lingvo Libro*.

Ĝis nun nia redakcio ricevis tiajn kontribuojn de s-roj Leo Belmont, William Bailey, Vicente Inglada, krome sendis kelkajn rimarkojn s-roj Pierre Corret, E. Drezen kaj A. Stamatiadis. Aliaj promesis sendi siajn kritikojn post pli malpli longa tempo.

En la nuna numero ni komencas la publikigon de tiuj kritikoj per la verkaĵoj de Lidja Zamenhof: Leo Belmont kaj William Bailey, donante samtempe ankaŭ la respondon de s-ro Kalocsay. La aliaj verkaĵoj sekvos.

Ni esperas, ke la diskuto, kiu tiamaniere disvolviĝos sur niaj paĝoj, estos utila kaj fruktodona.

Lingvo Libro.

I.

K. KALOCSAY & G. WARINGHIEN:

PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO.

»La unua sento, kiu versajne atakos la leganton ĉe la ekrigardo al tiu ĉi libro, estos la timo, kaj lia unua penso — amara bedaŭro pri la lilipluta 16 regula gramatiketo de 1888. Li konsoligu pensante, ke ankaŭ li mem ne povus survesti siajn unuajaran pantaloneton...« — tiel komencas la aŭtoroj la antaŭparolon de la Plena Gramatiko.

Kaj vere, oni ne povas nei pravecon de iliaj vortoj. La 16 reguloj prezentas kvazaŭ kadran leĝon kaj lasas multe da loko, kiun plenigi devas la lingva evoluo, tute ne ofendante per tio la fundamentan gramatikon. Same ŝtata konstitucio ne povas enteni ĉiujn regantajn leĝojn. Ĝi nur fiksas ilian ĉeflinion, kaj laŭ tiu ĉeflinio kaj leĝoj kreiĝas kaj evoluas, kondiĉe nur, ke ili ne kontraŭu la konstitucion.

Krom la ektimo kaj bedaŭro, la Plena Gramatiko vekas ankaŭ respekton al la aŭtoroj pro ilia granda laboro. Oni eĉ povus nomi ĝin »formika laboro«, tiom da detalaj pritraktoj, reguloj, reguletoj kaj konsiloj ĝi entenas.

La verko estas dividita en 2 ĉefpartojn: I. LA VORTO (fonetiko, vortfarado, morfologio kaj sinetio) kaj II. LA FRAZO (vortsintakso, propozicio-sintakso, frazsintakso, vortordo, interpunkcio). Ĉe la fino troviĝas indekso.

En la Fonetiko la aŭtoroj penas starigi regulojn pri la longeco kaj vasteco de la vokaloj, kaj rilate al la lasta, bazas sin eĉ sur diskoj (?), kiuj konservas la voĉon de Zamenhof. Mi konas nur unu tian diskon, tute malbonan, kie meze de malagrablaj bruoj apenaŭ aŭdiĝas la nere-konebla voĉo de Z. Tiu ĉi disko povas ja servi kiel nenia pruvo. Mi opinias, ke oni devas celi al la laŭeble egala elparolado de la vokaloj, kaj sekve estus preferinde deteni sin de reguloj, kiuj nur povus sugesti la disan elparoladon. La aŭtoroj traktas tamen la problemon kun granda zorgo, donante komparojn kun nacilingvaj elparoloj.

En la ĉapitro pri Vortfarado atentindaj estas la kategorio divido, laŭ kiu la kategorion de la vorto (subst. adj. aŭ verbo) difinas ĝia nacilingva traduko en la oficialaj vortaroj, kaj la principo de Necesito kaj Sufiĉo. Tiuj

ĉi aferoj tre gravas por la vortkunmetado kaj vortanalizo, al kiuj la aŭtoroj dediĉas multe da atento.

En la ĉapitro pri la sufiksoidoj (sufiksoj uzablaj memstare kaj funkciantaj kiel radikoj), kvazaŭsufiksoidoj (radikoj ofte uzataj kvazaŭ sufiksoj), pseŭdosufiksoidoj (elementoj ripetigantaj kun certa reguleco ĉe la fino de la vortoj), prefiksoidoj, pseŭdoprefiksoidoj, sufiksoj, prefiksoj kaj pseŭdoprefiksoj — la aŭtoroj prezentas zorge kolektitan kaj kategorie dividitan liston de tiuj elementoj, tiel gravaj en Esperanto kaj decidaj por ĝia fleksebleco kaj riĉeco. La studanto, kutimanta aŭdi ĝenerale nur pri radikoj, prefiksoj kaj sufiksoj, estos eble konsternita per tiu diverseco de kategorioj. Li trovos tamen riĉan materialon, kompletan liston de afiksoj oficialaj kaj neoficialaj, jam konatajn en la lingva uzo aŭ tute fremdajn por multaj oretoj, kiel ekz. *cis-*. Li trovos detalan, praktikan kaj teoriaran konsilon pri la uzado de la afiksoj, kaj ne povos deteni sin de miro, legante ekz.; ke en la familiara lingvo oni proponis por la virinaj vestoj tiajn formojn, kiel ĉemizino, ĉapelino. Li iom dubos, ĉu en la regula uzado »-ido« povas signifi efektive indigenon de lando, kiel en la vorto »landido«. Li ridetas pri la sprita, ŝerca »boamiko«, pri »gevido« kaj »gebanado«, sed li pensos certe, ke se li volus iam malamike demonstracii en Esperanto, li krius »sendube ne »eks!« sed »for!« Kaj tiu »for!« certe ŝiros sin el lia buŝo, kiam li vidos la liston de neologismoj, per kiuj oni proponas anstataŭi la mal-vortojn, ekz. moroza, kurta, orgojla, poltrona, turpa, dorsaŭ (malantaŭ), olda, ktp., ktp.

Li trovos eble, ke mankas precizigoj pri la sufikso »-ero«, ke estus dezirinde klarigi, kion propre signifas »monero« — ĉu ĉiun monpecon, ĉu, ekz. en Francujo, 1 frankon, 1 centimon, aŭ 1 soldon? Kaj eble li trovos sin kvazaŭ antaŭ enigma sfinkso, legante la plendon, ke »mankas sufiksoido de enteco por anstataŭi la elfalantan o-finajon.« Ĝenerale tamen li trovos multege da bonaj, helpaj konsiloj kaj difinoj. Rigardu nur la klarigojn pri »ajo« »ulo« ktp.

Ĉe la in-vortoj kaj aliloke la aŭtoroj okupas sin pri la problemo de la virinaj nomoj kaj proponas uzadi ilin en la adjektiva formo: Johana, Emilia, Jozefa, Ifigenia ktp. Pro la fonetiko tiuj formoj estas eble preferindaj, ol la pli pezaj in-formoj, sed ŝajnas tute strange, kaj eĉ negramatike, trakti la virajn nomojn kiel substantivojn, kaj la virinajn kiel iliajn adjektivojn. Kelkrilate la lingvo eĉ akceptis jam certajn kutimojn, kaj la formo »Mario« kiel virina nomo estas multe pli ĝenerala, ol »Maria«. Se Z. mem uzis la a-finajon, kiel en »Marta«, tio ne estis pro adjektivigo de la nomo, sed simple pro tio, ke li tute ĝin ne esperantigis, sed transprenis en la originala formo. Alifoje li esperantigadis la nomojn, ekz. »Ifigenio«, ne »Ifigenia«. Tamen la demando pri la virinaj nomoj estas ankoraŭ nerespondita komplete, interese do estas aŭdi ĉiajn opiniojn, antaŭ ol la lingvaj institucioj kaj uzado starigos fiksaĵajn regulojn.

Kun la nomformoj kaj ties esperantigo ligas sin la demando pri ilia transskribo. La aŭtoroj sekvas la vojon de la originala transskribado de la neesperantigitaj nomoj, se ili devenas el la latinalfabetaj lingvoj, kaj de la fonetika transskribado, se la neasimilitaj nomoj devenas el lingvoj antikvaj, aŭ se la nomoj devenas el lingvoj modernaj, ne uzantaj la latinan alfabeton. Tio ĉi estas sistemo uzata preskaŭ ĝenerale, krom en la laborista esp. movado. La decida vorto apartenas al la lingvaj institucioj, same kiel findecido pri la uzado de majuskloj, kiun K. & W.

rekomendas ankaŭ ĉe la adjektivoj kaj adverboj, devenantaj de la propraj nomoj. Persone mi preferus skribi pri »herakla laboro«, ol pri »Herakla«. Kaj sur la p. 125 mi trovis nekonservencan *zamenhafa* »krucumi« kaj *Kabea* »palisumi«. Mi preferus ankaŭ skribi pri *eŭropaj* kutimoj, ol pri la *Eŭropaj*.

La morfologio kaj sintetio estas tiuj aferoj, pri kiuj plej multe zorgis la fundamenta gramatiko. Ĝi starigis certajn netuŝeblajn kadrojn, kiujn la lingva evoluado ne rajtas malrespekti. Tiel ekz. ĝi diras, ke la substantivo havas la finaĵon o, kaj la adjektivo — a. Do, la substantivecon difinas o, la adjektivecon — a. Tio estas la esencaj kondiĉoj por tiuj ĉi vortspecoj. Sekve la vortoj: iu, tiu, ĉiu, neniu ne devus esti kalkulataj kiel adjektivoj, kiel ni trovas en la Plena Gramatiko. Ili restu prefere, laŭ la pli malmoderna divido, inter la pronomoj. Simile, en la § 158 la aŭtoroj parolas pri vortoj, »kiuj ludas la rolon de substantivoj« (ne estante tamen substantivoj) ekz. ĉiu li havas sian Sl. Fakte tamen tie prezentigas nur la subjekta kaj objekta karakteroj de la pronomoj, kaj tute ne ŝajnas ĝuste paroli pri la substantiva rolo.

La aŭtoroj distingas entute 4 kazojn: nominativon, genitivon (la es-pronomoj), akuzativon kaj prepozitivon, t. e. nominativon post prepozicio. Speciale la genitivo aspektas al mi strange konceptita, ĉar se la lingvo havas iun kazon, ĝi devus esti aplikebla al ĉiuj deklinaciaj formoj. Dume neniu diros, ke ĉar la finaĵo es indikas genitivecon, oni povas analogie al la pronomoj aliformi la substantivojn kaj diri ekz. »patres«. Koncerne la prepozitivon, ni povus diserigi ĝin en tiom da subkazojn, kiom da prepozicioj ni havas. Tiam la esperanta gramatiko atingus rekordon de kaznombrecol! La Ekzercaro prezentas, vere, la formojn: »leono estas besto, la dentoj de leono... al leono... leonon, ... pri leono, ... sur leono.« Tio ne estas tamen, por krei multajn kazojn, sed simple por instrui la uzadon de la prepozicioj, kiam en aliaj lingvoj oni aplikas deklinacion.

Ĉe la deklinacio de la propraj nomoj la aŭtoroj diras: »por akuzativo oni uzas simple n, kiam ili finiĝas per prononcata vokalo. Oni uzas -on, kiam ili finiĝas per prononcata konsonanto«. Ekzemploj: Eliŝan, Tolstoĵn, Athenajn... Tamen la -j en Tolstoĵn estas konsonanto. Se oni diras: Tolsto-i, oni povus deklinacii: Tolsto-in. Sed: Tolstoĵ — Tolstoĵon. »Athenajn« sonas malpli malbone pro tio, ke tiu ĉi urbonomo havas pluralan karakteron, do la -ajn la orelo akceptas kiel la esperantan pluralakuzativon... kaj tiuokaze ĝi preferus aŭdi: Atenojn.

La plej grava vortospeco estas la verbo. La aŭtoroj dediĉas al ĝi multe da loko kaj pritraktas ĝin ankaŭ en la lumo de diversaj teoriaj konsideroj. Tiel do oni parolas, por la poezia uzo kaj stila malpezeco, pri la formoj kiel »Laŭdatu Jesu-Kristo« kaj »Macjek, simplul' malriĉa, is plej estimata« (Grabowski). Mi memoras tamen, el interparolo kun Grabowski, kiom li baraktis, antaŭ ol li estis fine devigita fiksi surpapere la frazon: »Mi as Jacek Soplica! Mi rajtas do supozi, ke nur kontraŭvole, sub la tiraneco de ritmo, li uzis tiujn tonditajn formojn, kaj certe ne volus fari el tio regilon. La aŭtoroj mem cetere akcentis, ke tiuj ĉi formoj ne akceptiĝis, kaj se mi priparolos tion, estas nur por tiuj, kiuj, legante la koncernan paragrafon, emus eble bedaŭri, ke la ekzemplo de Grabowski ne akceptiĝis. Same ili ne priploru la neenradikigitan teorion pri la kondiĉ. part. -unta. Ne estas ja la celo de Esperanto surprizi la mondon per formoj, fremdaj al la naturaj lingvoj. Ankaŭ, ĉar en la naturaj lingvoj la pasiva voĉo estas kombinita, mi ne povas partopreni la bedaŭreton de la aŭtoroj pri la kombiniteco

TAKTO

S. Grenkamp-Kornfeld en »Nia Gazeto« tre severe kritikis la Plenan Gramatikon de Kalocsay kaj Waringhien kaj diras ĝin neklasika, nepraktika, entute nerekomendinda.

Tio al mi ne plaĉas.

Ne pro tio, ke tiu Gramatiko estas bona. Tion mi ne povas prijuĝi: foje mi jam diris, ke pri la gramatiko mi estas kompleta anserino. (Kvankam, malgraŭ mia tuta naiveco, ŝajnas al mi suspektinde, ke s-ro Grenkamp-Kornfeld tiel rigore kondamnas la pritrakton de la teknikaj sufiksoj -oz, -iv kaj -oid, kiujn li mem pritraktas en la teknika parto de la Plena Vortaro.)

Nek pro tio, ke s-ro Grenkamp-Kornfeld estas revizinto de la Vortfarado kaj Sintakso de Fruictier. Tio ja montras nur lian kompetentecon pri gramatikaj demandoj. (Kvankam eble montrus plian kompetentecon, se li mem estus memstare verkinta libron gramatikan.)

Sed ja pro tio, ke la eldoninto kaj vendanto de tiu Fruictier-reviziaĵo estas s-ro S. J. Grenkamp-Kornfeld en la propra persono.

Estas evidente, ke se iu fabrikas kaj vendas razoklingon »Barbmorto«, li povas anonci pri ĝi, ke ĝi estas bonega, ke ĝi estas la plej bona razoklingo en la mondo. Sed li pekus kontraŭ la plej elementaj reguloj de la komerca takto, se li anoncus, ke la nova rivala razoklingo »Razplezuro« estas malakra, neuzebla, ne rekomendinda.

Ĉiu rajtas esprimi pri la Plena Gramatiko de Kalocsay kaj Waringhien la plej malbonan, plej kondamnan opinion buŝe kaj skribe, sole al s-ro Grenkamp-Kornfeld ne estas konsilinde tion fari, ĉar li tiras al si per tio suspekton pri nelojala konkurenco.

Mi havas kompreneman animon kaj bone povas imagi la konsumajn animluktojn, kiuj tempestis en s-ro Grenkamp-Kornfeld. Kiel volonte li estus laŭdinta la Gramatikon per la plej entuziasmaj vortoj, por montri sian lojalecon! Kiel dolore estis al li, ke li devas ĝin kondamni! Vere, ĉies kompato devas sin turni al li en lia baraktado. Kaj oni eĉ ne povas al li riproĉi, ke inter tiaj grandaj emocioj li ne povis klare vidi la irotan vojon kaj malbone elektis.

Malfrua konsilo — ombrelo post pluvo. Tamen, mi donos al li konsilon, eble li utiligos ĝin iam poste.

Konsilo simpla: silenti kaj skribigi la recenzon per alia kompetenta persono.

Sed eble s-ro Grenkamp-Kornfeld sin rigardas la sola kompetenta persono en tiu ĉi afero. Nu, eĉ tiel li estus povinta procedi pli lerte. Jes, eble iom ruze, iom ne tre aprobinde, iomete ne tre morale, sed nepre pli lerte: verki la recenzon mem kaj subskribi fremdan nomon. Jen, ekzemple, mi estus volonte metinta mian nomon je lia dispono — por bagatelaj 200 svisaj frankoj.

S-ro Grenkamp-Kornfeld eble diras, ke la tuta afero ne valoras al li 200 svisajn frankojn.

Nu, tio estas afero de gusto. Mi ne estas tiel fama pioniro kiel s-ro Grenkamp-Kornfeld, kaj tamen mi preferu perdis 200 frankojn ol suferi la suspekton pri nelojala konkurenco.

M. Alice Pik.

de la esp. pasivo kaj deziri ekz. tiajn frazojn, kiel »la libro legatas« aŭ »vidatas bela pejzaĝo«.

La uzado de l' tempoj kaj modoj estas vaste priparolita. La studanto trovas tie multajn utilaĵojn. Sed eble al tiuj, kies nacia lingvo ne konas akuzativon kun infinitivo, malbone sonos »mi aŭdis lin fermi la pordon«. Tiu ĉi konstruo ne estas tre ĝenerala. Multaj prefere evitas ĝin.

Interesa estas la paragrafo pri interjekcioj. Tie la aŭtoroj kolektis kaj klarigis plej diversajn interjekciojn, uzatajn de la esperantaj verkistoj. Sed ekz. »nu« estas traktita iom mallonge. Ĝi estas ja uzata ne nur por ĉesigi la interparolon, sed ankaŭ por komenci ĝin, kaj alimaniere. Sur p. 281 oni diras, ke »nu« estas uzebla por

akcenti la frazon. »Tpr!« taŭgas ne nur por stimuli, sed ankaŭ por haltigi ĉevalojn. »Stop!« krom por la maŝinoj kaj en marista lingvo, povas signifi haltigon alispecan, ekz. en sporto.

La plej komplikita parto de la gramatiko estas la sintakso. En la verko de K. & W. ĝi okupas proksimume 125 paĝojn. Detale la aŭtoroj pritraktas unue la vortsintakson, poste la propoziciosintakson, fine la frazsintakson. En la unua (suplementoj) la studento trovos bonajn regulojn pri interligado de la vortoj, pri plej diversa uzado de prepozicioj, detalriĉan paragrafon pri »da«. Tamen tre duba estas al mi la defendata de la aŭtoroj frazo de Kabe: »ne ĉiujn specojn da fiŝoj povas konservi tiamaniere«. La demando »kiom?«, la esenca kondiĉo por la uzo de »da«, neniel aplikigas. La aŭtoroj ankaŭ multe okupas sin pri esprimo de rilato inter la subjekta kaj objekta suplementoj de agsubstantivo. Tiel do, farante substantivan vortgrupon el »la kato mangas la raton«, ili prezentas la malprecizajojn de »de«, (la mangado de la rato de la kato? la mangado la raton de la kato?) kaj fine prezentas kiel solvon la pli klaran, kvankam pli longan: »la mangado de la rato fare de la kato«.

En la propozicio-sintakso specialan atenton meritas la uzado de la refleksivo; tiu ĉi problemo, estas ofte fonto de multaj eraroj, speciale por tiuj, kies nacia lingvo ne konas la refleksivon. Interesa estas ankaŭ la paragrafo pri »atribua ec-propozicio«, kie la aŭtoroj okupas sin per distingo inter la objekta predikativo (nominativo!) kaj objekta epiteto (akuzativo!). Ili prezentas tiun diferencon, ke la epiteto esprimas konstantan econ, dum la predikativo — econ, kiun donas nia atribuada, kaj prezentas, kiel praktikan distingilon, la enkondukon de »ke«. Ekz.: Mi trovis la vinon bona — mi trovis, ke la vino estas bona — predikativo, do nominativo.

Rilate al la prepozicioj, uzataj ĉe nereakta objekto, la aŭtoroj rimarkigas, ke la prep. »pri«, pure abstrakta, sen loka signifo, estas esperanta specialaĵo. Tio ĉi ne estas gusta. En la pola lingvo tute saman abstraktan rolon ludas »o«.

Profundigante en la frazsintakson, la studento eble spertos la senton de iu, kiu enirus arbaron kaj, trovinte, ke la vojo disbranĉigas en mil vojetojn, ekveus sin perdita en »arbareg' obskura«. Kunorditaj propozicioj, kopulaj, alternativaj, adversaj, konkludaj, klarigaj, pseudopropozicioj, subpropozicioj kompletivaj, epitetaj, adjektaj (kaj ĉiu el tiuj kategorioj ankoraŭ disbranĉigas) jen materialo, postulanta de la studento grandan atenton. Sed eĉ, se la teoriaj dividoj timigas la studenton, nekutimantan al tiu komplika gramatika gimnastiko, li trovos sur tiuj paĝoj valorajn konsilojn rilate al plej diversaj demandoj, ĉefe pri uzado de tempoj, prepozicioj kaj subjunkcioj.

Grava cirkonstanco, kiun oni ne devas forgesi, studente la Plenan Gramatikon, estas, ke la aŭtoroj okupas sin sur la esperanta kampo ne nur pri la gramatiko. El tio sekvas unuflanke, ke ilia studo ne ŝtonigas kaj abstraktigas en nuraj teorioj, aliflanke — ke, havante certajn lingvaj kaj stilajn tendencojn, ili donas al tiuj tendencoj esprimon en la Plena Gramatiko. Tie kaj ie kvazaŭ preparigas vojoj por la poezia licenco. Ekzemple la zamenhofan »mia kara, mia belo (anst. belulo) estis juna forta dano«, formon, diktitan de la bezono de l' verso, oni emas trakti kiel ion regulan. Simile, estis sendube ĉefe la poeziaj konsideroj, kiuj diktis la longan liston de novaj vortoj, proponataj por anstataŭi la mal-vortojn.

Ofte la aŭtoroj prenis sur sin la rolon kvazaŭ de registristoj; tra la tuta verko oni trovas notojn pri plej diversaj, kelkafoje strangaj esprimoj, proponitaj iam, ie, de iu. Tiu ĉi detala registra laboro vidigas ekz. en la

afiksoj kaj afiksoidoj. Neniu el ili, ŝajnas, estas preferlasita. Ni trovas ankaŭ notojn pri tiaj malmulte konataj proponoj, kiel enkonduko de »nam« (ĉar, nome) de »ajne« (konj. esprimanta laŭplaĉan elekton) de »olim« (preterita »iam«), de »iŝi« (pluralo de »ŝi«) ktp.

Oni trovas ankaŭ konstruojn strangajn por la orelo, ekz. »li agis la plej lerte«. Vere, eĉ en la Fundamenta Krestomatio oni trovas »la« antaŭ adverbo, tamen iom post iom la lingva uzo forlasis tiun formon. Oni trovas »unun« (akuz. de unu). Strange sonas: »tio apartenas min«, »vi fiaskis pro ke vi ne obeis mian konsilon«, »misa infano« (malbona inf.). Nekutima estas »post ol« anst. »post kiam«, peza »apenaŭ kiam li ellitiĝis« anst. »apenaŭ li ellitiĝis«. Ankaŭ tia frazo kiel: »ni ne foriros, dum oni nin ne eljetos«, defendata kaj preferata de la aŭtoroj ol »ni ne foriros, ĝis oni nin eljetos«, estas iom mallerta.

Iafoje la juĝo de la aŭtoroj ŝajnas arbitra. Ekz. p. 311: »Post la vorto deziro, sekvas u-modo, se la deziranto deziras agon de iu alia. Us-modon oni uzu, se la deziranto deziras agi mem«. Do, »via deziro, ke vi irus tien...« sed: »via deziro, ke mi iru tien«. Diferenco iom duba. Ankaŭ sur la p. 201 rimarko tekstas: »Ce DEVI kaj POVI... la indikativa preterito signifas, ke oni obeis la devon aŭ uzis la povon: mi devis labori (kaj mi laboris), mi povis fari multe (kaj mi faris). Tamen en la cititaj frazoj la DEVIS kaj POVIS estus bonege kompreneblaj ankaŭ kiel nura konstato pri la devo aŭ povo, sendepende de ilia plenumo. Oni devas memori, ke Esperanto, kvankam artefarita, estas lingvo, destinita por vivaj homoj. Tiuj homoj ne kutimas al lingvo tro matematika, kaj kiel longe ilia pens-kaj esprimmaniero ne kontrastas tro draste al logiko, ni permesu al ili iri la vojon de la kutima esprimado«.

Parolante pri vortfarado kaj akcentado de frazelementoj, la aŭtoroj diras, ke la ordon inversan (subjekto post predikato) oni uzas ĉiam en la intermetitaj aŭ postmetitaj frazoj citantaj, krom kiam la subjekto (oni erare presis: predikato) estas persona pronomo. Kial? Oni povas bonege diri ankaŭ: »Venu — diris li — mi montros al vi...«

En la tuta verko vidigas tiom da zorgemo kaj detalemo, ke oni estas surprizita, trovante sur la lasta paĝo mallongan noton, ke »citolojn, krampojn, parentezojn kaj steletojn oni uzas en Esp. same kiel en ĉiuj naciaj lingvoj. Persa esperantisto, kies nacia lingvo ne konas interpunkcion, estus eble embarasita per tiu konsilo. Ankaŭ, speciale por tiuj, kies nacia lingvo ne uzas la latinan alfabeton, utile estus doni ĉe la komenco modelojn de literoj skribitaj, tiel majuskulaj, kiel minuskulaj. Cetere, eĉ la latinalfabetanoj ne ĉiam konsentas inter si. La minusklan r diversaj lingvanoj skribas en du diversaj manieroj«.

Fine, kelkajn vortojn pri la terminaro. Kompreneble, en verko tiel detala la aŭtoroj ne povis uzi nur la ĝisnunaĵajn terminojn kaj ofte devis krei novajn. Plejparte tiuj novaj terminoj ne prezentas al la studento malfacilaĵojn, kvankam iafoje ili estas haosaj. Ni renkontas ekz.: nei, negi, negacio, negativa, anstataŭ »entjera« nombro oni povus diri: tuteca. Anstataŭ »ekspika objektpropozicio« oni povus diri »klariga«. Cu »adversa« estas nepre pli bona, ol »kontraŭa« aŭ »kontrasta«? Iafoje la aŭtoroj penas enfermi iun difinon en unu vorto. Tiam naskigas ekz. »Interogativo« »indefinito« kaj »demonstrativo«. La naciaj gramatikoj ne timas du-vortecon, kaj, imitante ilin, ni povus paroli pri demandaj »medifinaj kaj montraj pronomoj. Koncizeco ne ĉiam signifas klarecon. Iafoje okazas kontraŭe.

Jen, en malmultaj vortoj kelkaj rimarkoj pri la

Plena Gramatiko. Ĝiaj 370 paĝoj, sur kiuj la aŭtoroj klopodas respondi al ĉiaspecaj lingvaj demandetoj, atestas potencon evoluon de Esperanto. Kaj kiam oni konsciigas al si, ke ĉio tio naskiĝis sur la bazo de tiu »liliputa 16 regula gramatiketo«, oni devas pensi pri tiu lasta kiel pri semo, en kiu potencie kaŝas sin granda arbo. Kaj oni devas tiom pli admiri tiun semon, kiu, kreita en la labor-ejo de l' homa cerbo, dotita estas per tio, kion bezonas ĉiu organismo: vivo, kresko, evoluo.

La libro estos sendube valorega helpilo por serioza studento, kiu penus trapenetri ĉiujn sekretojn de la lingvo. Sed ne metu ĝin en la manojn de »ekesperantisto«, ĉar tiu dika volumo, neniel cedanta al la volumoj de alilingvaj gramatikoj, povus facile igi lin »ekesperantisto«. Montru ĝin al lingvaj profesoroj, kiuj amas kaj respektas la gramatikegojn. Kaj ankoraŭ — ne montru ĝin al tiuj, kiujn vi konvinkas, ke Esperanto estas la plej simpla lingvo en la mondo. Ili eble dubus tiam la verecon de via aserto.

Krom la aŭtoroj, kiuj metis en sian verkon tiom da granda laboro, dankon meritas ankaŭ Literatura Mondo, kiu ĝin eldonis kun sia kutima zorgemo.

Cidja Zamenhof

Sinceran dankon mi esprimas al la aŭtorino pro la objektiva tono, kiun ŝi uzas en sia artikolo kaj ankaŭ pro ŝiaj konsiloj kaj rimarkoj, el kiuj plurajn ni danke konsideros en la dua eldono. Tamen, ŝi permesu al mi respondon pri kelkaj punktoj.

1. *Virin-nomoj*. Tre povas esti, ke la nomon »Marta« Z. ne esperantigis, sed simple uzis en la originala pola formo. Sed, aliflanke, estas sendube, ke ĉi tiun nomon, tiom oftan, oni ne povas esperantigi per la kutima metodo. Kaj same estas pri »Maria«, kiam ekzemple en itala romano rolas ankaŭ *Mario* (viro).

Ni kredas, ke la a-finaĵaj formoj donas ne nur naturajn, plaĉajn, internacie rekoneblajn virin-nomojn, sed eĉ la solajn eblajn formojn por pluraj virin-nomoj.

La regulo, ke la virin-nomoj estas esprimataj adjektive (per la subkompreno de »ino«) ŝajnas al ni oportuna, ĉar tiel oni povas formi virin-nomojn per -a, ne rompante tamen la Fundamentan regulon, ke ĉiu substantivo finiĝas per -o. Estas granda avantaĝo, se oni povas solvi problemon per reformo sen reformo.

La sola malavantaĝo de ĉi tiu solvo estas, ke oni ne povas uzi baptonomojn en adjektiva formo. Sed la rezigno pri ĉi tiuj tute escepte uzataj formoj estas certe elportebla (oni ĉiam povas ja uzi *mano* de *Johano* anstataŭ *Johana mano*). En la hungara lingvo la adjektivigo de baptonomoj estas ebla, sed neniam estas uzata kaj sonus tute strange.

Ĉi tiu solvo, cetere, brile eltenis la provon en la *Cezaro* de *Jeluŝiĉ*, tradukita de *Rotkviĉ*. Tie ĝi ebligis facilan kaj plaĉan esperantigon de ĉiuj virin-nomoj.

2. *Mia kara, mia belo estis juna forta dano*. Mi koncedas, ke la formon de *belo* (anst. *belulo*) diktis la verso. Sed estas sendube, ke Z. trovis tiun formon *ebla*, eĉ se ne ĝenerale uzinda. Se ekzemple la rimvorto *persisto* diktus la formon *belisto*, Z. certe ne estus ĝin akceptinta, sed estus serĉinta alian solvon.

3. *Devis kaj povis*. Mi kredas, ke ĉiuj lingvoj havas rimedon distingi inter la du signifoj:

devi kaj fari laŭ devo, devi kaj ne fari laŭ devo
povi kaj uzi la povon, povi kaj ne uzi la povon,
Tiuj signifoj estas tiom diferencaj, ke ili ne povas esti esprimataj per la samaj formoj.

Se mi legas: »*li devis tien iri*« kaj poste, eble post

Por etkvanta monsumeto
Pleniĝanta librobreto!
A E L A !

Pionireco

S-ro Grenkamp-Kornfeld, recenzante la Plenan Gramatikon en »*Nia Gazeto*«, citas de Collinson, el ties recenzo pri la sama verko en *Lingvo-Libro*, la jenon:

»Ĝi ŝuldas multe al la laŭdinda reviziaĵo de la Esperanta verko de Fruictier, farita de Grenkamp-Kornfeld, pionira verko...«

Poste li riproĉas, ke la aŭtoroj, malgraŭ sia ŝuldo, nenie mencias en sia verko tiun pioniran verkon.

Mi vere indignis pro tiu ĉi maljusto kaj nur mal-facile mi decidiĝis aĉeti la Plenan Gramatikon, tiom da malŝato mi sentis al ties aŭtoroj.

Sed jen, sur la pĝ. 7, mi legas:

»Ni deklaras... grandegan ŝuldon... speciale al...

Paul Fruictier (Esperanta Vortfarado kaj Esperanta Sintakso)«.

Hm. — mi pensis — s-ro Grenkamp-Kornfeld eble pretervidis tion.

Sed poste, fulme, venis en mian kapon, ke s-ro Grenkamp-Kornfeld tamen ne pretervidis tion. Kaj, laŭ lia opinio, ne Fruictier verkis tiun pioniran verkon, sed li mem, same kiel li verkis la »*Vortojn* de Prof. Cart« kaj la »*Modernan Arton*« de Brzekowski.

Mi devas lin senrevigi. »*Pionira verko*« rilatas ne al »*laŭdinda reviziaĵo*«, sed al »*Esperanta verko* de Fruictier«. Gramatike eble oni povas tion miskompreni, sed sence kaj logike certe ne. *Reviziaĵo* povas esti laŭdinda, perfekta, bonega, eĉ admirinda; solan epiteton ĝi ne povas havi: ĝi ne povas esti, neniam povas esti *pionira*. La pioniro iras sur virga tero kaj rompas al si vojon. La revizi-anto iras sur la bone preparita vojo, kiun faris la verkinto, kaj tie kaj tie ĉi li glatigas (aŭ eble malglatigas) ion.

Sed — oni povus diri — eble troviĝas en tiu reviziaĵo aldonoj, kiuj pritraktas neniam pritraktitajn demandojn. Do, se la nova verko ne estas pionira en sia tuto, ĝi povas esti pionira en kelkaj detaloj.

Nu, la reviziaĵo de s-ro Grenkamp-Kornfeld vere havas tiajn partojn: la pritrakton de la refleksiva pronomo kaj de la adjektivoj atributa kaj predikata. Sed, bedaŭrinde, ĉi tiujn ambaŭ verkis Walter Lippmann.

Kaj jen, ĉe la dank-esprimoj mi legas sur la pĝ. 7: »*Walter Lippmann* (dr. Zamenhofs Sprachliche Gutachten, Raportoj pri la Sekcio de Gramatiko...)«

Nun do mi demandas humile: se la aŭtoroj deklaras sian ŝuldon al Fruictier pro la Fruictier-a parto kaj al Lippmann pro la Lippmann-a parto — pro kio do ili deklaru sian ŝuldon al s-ro Grenkamp-Kornfeld?

Kio estus ekzemple, se ili deklarus, ke ili tute ne legis la reviziaĵon de s-ro Grenkamp-Kornfeld, sed ĉerpis el la originaj fontoj?

Denove mi devas doni malfruan konsilon: oni deklaru sin pioniro nur, se oni povas marŝi sur la propraj piedoj. Tio estas la minimuma postulato. *M. Alice Pirk.*

kelkaj linioj, mi sciigas el la teksto, ke li efektive *ne iris* tien, mi ĉiam haltas en la lego, reiras kaj serĉas, ĉu mi legis malbone.

Male, se oni legas: »*li estus devinta*«, estas sendube, ke li ne obeis la devon. Kial ne distingi, se tio estas ebla?

(La »*matematika*« formo estus: »*li estis devunta*«. Vere, »*li estus devinta*« povas signifi ankaŭ, ke li ne havis la devon: »*se mi estus devinta, mi estus povinta*«. Sed inter tiuj du signifoj ĉiam distingas la tuja kunteksto, do miskompreno ne estas ebla, kiel ĉe la uzo de simpla *devis*.)

4. Certe, oni povas diri: »*Venu — diris li — mi montros...*« Sed tio estas malpli plaĉa, ol *li diris*, ĉar per la postmeto la persona pronomo ricevas fortan akcenton, kiu al ĝi ne konvenas ĉi-okaze.

Eble tio estas malgrava nuanco. Sed ni diras ja, ke en E. la vortordo estas libera. En nia ĉapitro Vortordo do temas ne pri reguloj, sed pri konsiloj.

K. Kalocsay.

II.
OMAGO AL SINJOROJ KALOCSAY
KAJ WARINGHIEN AUTOROJ DE »PLENA
GRAMATIKO DE ESPERANTO«

I.

Antaŭ ol komenci la deziratan de la redakcio kritikan artikolon pri la ĵus eldonita »Plena Gramatiko de Esperanto«, mi volus esprimi miajn unuajn impresojn ĉe rigardo al tiu fenomenata verko, ekkrii el la koro ravita mian dankan omaĝon — en la nomo de l' esperantistaro al la satindaj aŭtoroj, K. Kalocsay kaj G. Waringhien.

Mi staras, profunde tuŝita, kun humila kapklino antaŭ ĉi tiu — pardonu la ŝajne trograndigan metaforon — piramido de laboro benediktana kaj la subtile-preciza pripensado de ĉiuj enigmoj de regularo, vortaro kaj frazaro en la artefarita lingvo Esperanto.

Tiun ĉi laŭ ŝajna aspekto sekan kaj teknikan verkon, enhavantan preskaŭ 400 paĝojn, oni tralegas kun kreskanta admiro kvazaŭ romanon — nature ĉe unu kondiĉo, ke oni iom konas la sekretojn de Esperanto kaj interesigas pri la demandoj de la filozofio lingva.

Unu rimarko: mi iomete timas, ke profanoj, ekrigardinte tiel vastegan gramatikon, povas pensi, ke ili estas trompigitaj de ni ĉiuj, kriaŭtaj jam preskaŭ kvindek jarojn pri la miriga facileco kaj rekteco de la lingvo Esperanto kun ties kelkaj klaraj, mallarĝaj, logikaj, momente lerneblaj reguletoj. Oni do eble devus, jam per ŝanĝita titolo, klarigi, ke ĉi tiu »plena gramatiko« estas pli ol oni imagas — estas vera »Filozofio de gramatiko kaj sintakso Esperanta«; aŭ oni devus en la antaŭparolo forte substreki, ke la eteta gramatiko Zamenhofs tute sensange konserviĝis en sia valoro praktike. Eble oni devus aldoni, ke ankaŭ kun ĉiuj pligrandigoj kaj klarigoj de la plena gramatiko, koncerne la enigmojn de la vortkreado, la lingvo Esperanto konservas tamen sian plej grandan facilecon kaj naturan simplecon de arto logika inter la familio de la lingvoj homaj.

Kaj nun mia unua klopodo: kiel mi kuraĝus entrepreni la kritikon de ĉi tiu granda kaj tra jaroj precize pripensita laboro? Mi tute ne volas diri, ke ĉiu vorto en la »Plena Gramatiko« de Sinjoroj K. kaj W. estas por mi, senkritika entuziasmulo, eklezia kanono, ke mi ne havis ĉe tralegado certajn dubojn, ke ĉio estas al mi perfekte kaj fine solvita per du niaj scienculoj, ke mi ne estus tentita ion elstreki, ion aldoni, ion korekti en iliaj teorioj. Sed ĉe tiuj tentoj de rebonigo ĉiam superfalis min aliformaj duboj — la penso, kiu al la saĝe — modesta Draper, skribanta pri la filozofio de Gotama (Buddha) diktis la singardemajn vortojn: »Mi ne estas certa, ke mi precize ekkaptis la propran sencon de liaj meditoj; se oni vidas la superordinaran potencon, kiun li disvolvis en sia pensokuro, estas pli kredinde, ke mi mem eraris, ol ke li ne estis kapabla solvi eble plej lerte sian taskon.«

Vere! mi estis eble unu de la unuaj, kiuj, en la komencaj tempoj de nia disvolviganta lingvo, provis klarigi kaj solvi malfacilajn problemojn filozofiajn de tekniko kaj konstruado de Esperanto. Mi skribis multon en la unuaj jarkolektoj de »Lingvo Internacia« pri »ig« kaj »iĝ«, »et« kaj »eg«, pri »a« k. t. p. Kaj nun mi vidas, ke, certege sendepende, niaj kreintoj de »Plena Gramatiko« iris mian vojon, aŭ — se ili elektis vojon alian — mi havas la impreson, ke ilia solvo ne estas malpli trafa, aŭ estas same ebela. Pri multaj iliaj solvoj mi devas sincere juĝi: »se ĝi ne estas tiel, kiel mi pensas pri la donitaj problemoj, do ĝi estas kvazaŭ tiel, kiel oni volas dubajn »aĵojn« precizigi per sia propra metodo.«

Pro tio mi ne volas en ĉi tiu artikolo malpaceti kun

la aŭtoroj, tuŝi apartajn punktojn, kiujn solvos eble pli fortunate la praktika disvolvado de nia lingvo en la estonto; mi volus precipe desegni la ĉefajn liniojn de tio, kion mi nomas »filozofio de la lingvo arta Esperanto«.

2.

La genio de Zamenhof konsistis en tio, ke li ne estis pura teoriulo, pedanta matematika logikulo. Li bone komprenis, ke en la lingva sistemo kaŝiĝas granda elemento de senkonscia kreado, de nedifinebleco, de necerteco, ĉiam herede devigantaj kreanton de lingvo artefarita — io, kio estas, ĉar ĝi estas, estas kaj devas esti senkaŭze, senklarige. Pro tio li estis mem geniulo de volo — multokaze li ne malsupreniris en la neatingeblajn profundaĵojn de l' enigma lingvo-naskiĝo, li simple ordonis: mi volas, ke tio estu tiel kaj ne estu alie kaj vi, dezirantaj havi lingvon internacian, devas kunvoli kun mia ordono. Li tute pravis — se li estus irinta per alia vojo, li ne estus kreinto de lingvo Esperanta, sed estus haltinta por eterne sur ŝtupo de Leibnitz, aŭtoro de la verko: »De arte combinatoria«, kiu volis doni al ni lingvon perfekte logikan, sed sian deziron neniam povis plenumi, ĉar li volis neatingeblon!

Niaj saĝaj aŭtoroj, sekvantaj la vojon de l' Zamenhof, konstatas, ke li elektis, kvazaŭ *primum movens*, certajn elementojn vortajn, havantajn per sia natura ideo signifon aŭ substantivo, (kiel »homo«), aŭ de adjektivo (kiel »bela«), aŭ de verbo, (kiel »kuri«). Li provizas tiujn elementojn per apostrofo, sed signas ilian naturan ideocon per analogaj vortoj kun gramatikaj finaĵoj en sia vortaro sur flanko dekstra, t. e. en lingvoj fremdaj. Ĉe tiu pensmetodo la finaĵoj gramatikaj suplemente, kvazaŭ pleonasme, substantivigas substantivajn de naturo vortojn per »o«, adjektivigas natura adjektivajn per »a«, verbigas ideo verbajn per »i« (ekz. hom'o, bel'a, kur'i). Eble ili pravas, eble estas tiel, eble... estas nur kvazaŭ tiel.

Per tiu pensmetodo — laŭ niaj aŭtoroj — estas ĉiam eble malkovri, kiam oni devas ĉe plua vortfarado aldoni sufiksojn, kiam ekzistas »neceseco« de nova sufikso aldona (ekz. »ig«, »iĝ«, »ad«), kiam inverse, ekzistas »sufiĉeco« de la sama finaĵo, bezonataj estas necese du, tri sufiksoj, aŭ sufiĉas nur unu, elektita precize. (Komp. la teorion de »neceseco kaj sufiĉeco« de René de Saussure, kiun akceptis la Lingva Komitato). Ĉu tiu metodo neniam estas trompanta? — malfacila demando!

Mi diris supre: »estas nur kvazaŭ tiel«. Ĉar jen niaj duboj. Ĉu estas eble dividi la vorton vortan je ideoj nature substantivaj, adjektivaj, verbaj? Jam niaj aŭtoroj mem ŝanceliĝas ĉe la radiko »flor«: ĉu la primitiva ideo estas la realaĵo: floro? ĉu ĝi ne estas derivita el la ago ideo: flori?

Se ekzistus nur substantivoj-konkretaĵoj, tiam la principo de la aŭtoro estus plej konforma. Sed kion fari pri abstraktaĵoj? Ĉu »konstruo« ne estas ideo substantiva kun sama pezo, kiel ideo »konstrui« — ideo verba?

Eble kontraŭ tradukoj en lingvojn fremdajn per vortoj gramatike difinitaj — (tio ŝajne pravas la pensmetodo de niaj aŭtoroj) — ekzistas, el vidpunkto filozofia, netraireble profunda abismo inter la dekstra kaj malddekstra flanko de la vortaro de l' lingvo artefarita. Kun volo scianta, aŭ kontraŭ volo nesciema de Zamenhof, liaj vortradikoj pendigis en la aero sendifine en senco gramatika, nek substantivoj, nek adjektivoj, nek verboj aŭ adverboj — ĉiam pretaj alpreni ĉian finaĵon gramatikan, ĉian sufikson kaj prefikson, por precizigi gramatike kaj ideo-sence... ĉiam, se la kunmeto kun la partetoj finantaj kaj afiksaj ne estigos sensencaĵon? »Kant« en la vortaro estas egale »kanto« kaj »kanti«, nur laŭ la fino de la vorto. Ne ekzistas pleonasmo, ĉar »kant« egala al »kanto«

Verda stelo kaj verda ŝtelo

Etan kriminalromanon mi prezentas al niaj afablaj legantoj en kelkaj ĉapitroj.

I.

Firmo en Sanhajo reproduktas kelkajn gravajn Esperantajn librojn: la Plenan Vortaron, la romanon Viktimoj. Post la sukceso ĝi energie paŝas plu sur tiu ĉi multpromesa vojo.

II.

Japana librovendejo (Tokio-Do) ĝojas pri la malkara prezo de tiuj ĉi libroj kaj vaste vendas ilin. Japana Esperanto-Instituto petas rajtigon procesi kontraŭ tia agado. La rajtigon ĝi ricevas.

III.

S-ro Grenkamp-Kornfeld en »Nia Gazeto« fruntartikole tondras kontraŭ tiaj »rabistoj« kaj »friponoj«, kiuj ŝtelas la fruktojn de multjara penado de verkistoj kaj eldonejoj.

IV.

Japana gazeto »Tempo« pledas por la Sanhaja firmo kaj kondamnas Japanan Esperanto-Instituton pro ties profitemo. Laŭ ĝi, tiu firmo vendas la librojn pli malkare, do ĝi utilas al la plimulto (al la esperantistoj), kaj malutilas nur al malmultaj, malgravaj personoj (aŭtoroj kaj eldonistoj).

V.

Ĝis nun ni rakontis pasintajn okazaĵojn. Nun, per kuraĝa salto, ni paŝu en la estontecon, por vidi: Kio estos morgaŭ?

VI.

La eldonistoj eldonos, kiel ĝis nun, librojn sukcesajn kaj malsukcesajn. Ili faros lerte, kiel ĝis nun, siajn kalkulojn, konsiderante la aŭtorajn kaj tradukistajn honorariojn, la kostojn de reklamo, la riskon ktp. La Sanhaja firmo diligente, por komuna utilo, reproduktos la sukcesajn librojn, kaj vendos ilin multe pli malkare, ĉar »ĝi ne konas la Bernan konvencion«, kaj honorariojn, reklamojn, riskojn portas anstataŭ ili la naivaj eldonejoj.

VII.

La eldonejoj ne vendos la malsukcesajn librojn, ĉar tiuj estas malsukcesaj. Kaj ili ne vendos la sukcesajn librojn, ĉar ili ne povas, kompreneble, konkurenci kun la Sanhaja firmo. Ili do silente kaj pacience bankrotos.

La aŭtoroj estas tiel neglektemblaj personoj, ke pri ili eĉ ne indas paroli.

VIII.

La legantaro ekscios, ke ĝia komuna utilo konsistas en tio, ke ne aperos plu novaj libroj en Esperanto.

M. Alice Pik.

havas nur ellasan regule finajn, montratan per apostrofo, ebla nur por substantivo. Simile »bel« estas belo, bela, beli, bele nur post aldono kaj laŭ aldono de finaĵo gramatika. Nenio ekzistas pli malfacila ol la difinado de »substantivo«; estas klare nur, ke substantivon oni povas klarigi kaj difini nur per negativo: »ĝi ne estas adjektivo, nek verbo« (se oni klarigis pli frue ambaŭ lastajn). Ĉar kio estas la difino aŭtora: »substantivo estas nomo de ideo«. Ĉu »agi« ne estas nomo de l'ideo: »agi«? Aŭ »bela« ĉu ne estas nomo de ideo »bela«? Aliflanke, ĉu en la vorto »bato« aŭ »batado« perdiĝis la ideo de »bati«? Kiom da malfacilaĵoj sur la vojo filozofia, ĉe la pripensado, kiel la kvalito »bela«, komuna al multaj objektoj, fariĝas substantiva abstraktaĵo »la belo« — ĉirkaŭanta ĉion belan kvalite en la mondo, eble ankaŭ substantiva konkretajo en »la belo de m-lle Nina«? (Ĉi lastan diferencon komprenas ankaŭ la aŭtoroj).

Se nia iom kontraŭa pensmaniero pri la ideo signifo de la radikoj Esperantaj montrás, ke la aŭtoro metodo ne plenumos definitive la bezonojn de la vortfarado Esperanta, ĉar la plena diferencado de la gramatikaj ideoj de l'radikoj ne estas ebla kaj ne solvas ĉiujn problemojn de la vortkunmeto, — ni tamen ne volas nei, ke la pensmetodo de s-roj Kalocsay kaj Waringhien estas tre uzebla antaŭ ol la praktika vivo enkondukos per la potenco de »usus« sencon de dubaj vortoj konsente kun ili aŭ okaze kontraŭkonsente kun ilia teorio. Nun ni povas kaj devas alte ŝati ilian provon teoriantan, tamen memorante, ke, laŭ Goethe, »ĉia teorio estas griza kaj verdas nur la ora arbo de l'vivo«. La graveco de la teorio ne falas pro tio: ĝi montrás al ni la vojon eble malproksime — ian direkton en nebula aero antaŭ tagiĝo de venka praktiko, kiun ĝi mem ofte efikas.

3.

Ni estas plenaj de admiro, renkontante en la »Plena gramatiko« tiujn multajn novajn terminojn, kiuj estis necesaj por difini la originalaĵojn kaj novaĵojn de la lingvo arta. Sur ĉiu paŝo ni vidas, kiel la volo de l'kreinto de la lingvo, eldonanta ordonojn-regulojn, poste mem obeis al siaj ordonoj, kiel disvolvigis la konsekvencojn de la ordonitaj reguloj, nun malkovritaj kaj unufoje klarigitaj en sia teoria potenco, dank' al niaj pensuloj esperantistaj.

Trovante ĉe ili fadenon Ariadnan en labirinto, ni ne povas bedaŭri kaj koleri, ke eble kelkfoje ilia vojo estas tro komplikita, tro longa, loke ĉirkaŭiranta senbezone, ĉar sen fadeno ĉiokaze estus pli malfacile eliri el la labirinto. Eĉ iliaj eblaj eraroj havas valoron, servante al iniciativo por novaj serĉadoj, por nova pripensado de la dilemoj kaj problemoj montritaj per ilia laboro.

Post tiu ĉi rimarko estu permesite al ni iom dubi, ĉu estas feliĉa la divido aŭtoro je veraj, »diafanaj« sufiksoj, (et, eg, eĉ kaj un) kaj »sufiksoidoj« (la resto). Por mi ne ekzistas valora diferenco teoria ekzemple inter »et« aŭ »eg« kaj aliflanke »em« aŭ »an«. Ni ne vidas realan utilecon en la delikataj esploradoj, ĉu ŝanĝigis la gramatika kaŝfakto de la radio per la aldono de »et« (domy eto = eta domo) kaj ne ŝanĝigis per la aldono de »em«. Ĉu en la vortoj »sciemo« kaj »sciema« ne ekzistas ŝango analoga al tiu, kiu ekzistas en »infaneto« kaj »infaneta«, »rideti« kaj »ploregi«. Tiuj subtilaĵoj gramatikaj ŝajnas al ni ne fruktodonaĵoj.

Koncerne »et« kaj »eg« pli grave, laŭ nia opinio, estus montri en senco simbola, kiel neeble estas difini la limojn de la ideoj vortaj (aŭ sufiksaj): ekz. »ŝtonego« ne estas simple »granda ŝtono«, sed tiel granda, ke ĝi elkreskas je kvazaŭ nova ideo. Simile »vagonaro« ne estas

»aro de vagonoj«, sed aro de vagonoj ordita kaj kunligita laŭrekte. El tio rezultas, ke oni devas ofte trastudi, ĉu iu kunmeto de radiko kun sufikso jam havas senco difinitan per volo Zamenhofa; en tiu okazo la sufikso ne povas plenumi sian kutiman funkcion. Sur tiu vojo eble klarigis la lokoj plenumitaj per vortoj Zamenhofaj kaj la aliaj, mankaj kaj plenumotaj per novaj vortoj aŭ sinonimoj kun iom diversa senco. Tiel inter plej ofta: *igi* = *igi anta* kaj *igi* = *igi ata* ekzistas lokoj mankaj; »fini« = *igi ata* (finata), »finiĝi« = *igi anta*; jen estas loko manka por »igi anta« — finiĝi do signifas: *igi iun finanta*. Ne volante tiun temon tro vastigi, mi rimarkas, ke verŝajne estas neeble eviti en Esperanto (simile, kiel en lingvoj naturaj) ĉiujn neklarecojn kaj dusencecojn: ni rajtas en multaj okazoj — severa nepreco — kalkuli, ke nur la plena frazo evitigas la divers-sencecon kaj malkomprenon, klarigante la penson de la parolanto.

Mi ne kuragas tamen aserti, ke ĉio tio ne estas travidita kaj komprenita de niaj mirindaj aŭtoroj de la Plena Gramatiko, kiuj tiun laboron enportis en siajn studojn, celante kompreni la veran animon de la lingvo Esperanto!

4.

Mia artikolo iĝas tro vasta; ĝi estus vastega, se mi volus tuŝi multajn specialajn demandojn. Krom tio, momente, kiam mi skribas ĉi tion, mankas al mi libera tempo. Eble mi revenos poste al la sama temo. La libro, kiu estas kunligita majstre per unu metodo, per harmonia komuna penso de du aŭtoroj, ne elportas korektojn kaj tralaborojn el alia vidpunkto. Krom tio la aferoj dubaj kaj neplene solvitaj povas ankoraŭ atendi por eklumiĝi en la praktiko; precipe ili estas negravaĵoj; kio gravis, estas sufiĉe klarigita kaj starigita per manoj fortaj kaj scioplenaj.

Pro tio, mi volas, antaŭ la dua eldono, montri nur kelkajn okaze rimarkitajn preserarojn, facile ŝangeblajn:

Paĝo 7. s. 4.: *okagze*, devas esti *okaze*;

» 23. s. 19.: *povas* (dufoje uzita);

» 39. ms. 16.: *neoficialaj* d. e. *neoficialaj*;

» 87. ms. 87.: demando: ĉu »Esperantujo estas nur eŭropa-azia lando?

Al paĝo 142. ms. 17. kial: »ne kapojn«? — »kapon« estas bone (Zamenhofa), sed »kapojn« estas same bone.

Paĝo 142. ms. 20.: *militaro* d. e. *militistaro*;

» 142. ms. 18.: *Hohencolroj* d. e. *Hohencolernoj*;

» 182. s. 12.: *vninta* d. e. *veninta*.

En la fino mi volas promesi al vi artikolon pri ŝajna reformo de stilo Esperanta. Niaj teoriistoj parolas, komune kun la praktiko, pri la ebleco de apostrofo nur en poezio. Mi volas substreki, ke mi tute ne vidas, kial la apostrofo ne povus esti uzata en prozo. La akcento sur la antaŭlasta silabo aldonas al nia proza stilo certan monotonecon, sekecon, senfortecon. Vere, la lingvo pola havas la saman konstantan akcenton, sed ĝi havas kune multajn unusilabajn vortojn (do akcentitajn per si mem): Esperanto havas unusilabajn preskaŭ sensignifajn. Nia prozo revivigos, ricevos novajn nuancojn kaj antaŭ ĉio fortajn akcentojn, ofte necesajn en la fino de frazo, la per apostrofitaj substantivoj, simile al poezio. Kial tio, kio estas regulo de gramatiko, kio permesita estas en poezio, estus malpermesita en prozo? Eklumu fulm', ekbatu tondr' — naskiĝu nova prozo kun apostrof' — kaj benu ĝin la bona Di! Ĉu ĝi estas malbone skribita, nekomprenebla? ... Naskiĝu nova proz' kun granda fort'! **Leo Belmont**

*

Antaŭ ĉio mi esprimas mian plej koran dankon al la ŝatata aŭtoro pro liaj belaj kaj entuziasmaj laŭdvortoj, per kiuj li honoris mian Plenan Gramatikon. Estis plezuro al mi legi, ke en multaj punktoj niaj opinioj estas konformaj al la liaj.

Vere, mi estas tiel kortuŝita, ke apenaŭ mi povas min decidigi, ke mi kontraŭdiru al li. Tamen, ĉar mi kredas, ke la celo de ĉi tiuj artikoloj estas diskuto, per kiu oni eble povas klarigi dubojn, forigi miskomprenojn, glatigi opinio-diferencojn, mi respondas pri kelkaj punktoj kaj klopodos pravigi aferojn, kiuj al la aŭtoro ŝajnas ne pravaj aŭ dubaj.

La teorion de Saussure, kiu estas la bazo de nia vortfara teorio, mi esploras dum longaj jaroj, elprovis ĝin el plej diversaj vidpunktoj kaj trovis ĝin perfekte taŭga kaj ankaŭ perfekte konforma al la lingvuzo. Kaj mi kredas, ke tiuj kontraŭargumentoj, kiujn la aŭtoro metis en sia artikolo, ne povas ĝin ŝanceli. Tion mi volas demonstri en la sekvantaj linioj:

Ke en E-o ĉiu radikoj povas alpreni ĉian finaĵon (se la tiel estiganta vorto entute havas sencon), tio ne refutas

la teorion de radik-karakteroj, ĉar tiu teorio nenie neas tion. Ĝi asertas nur, ke ĉiu radikoj jam en si mem havas fiksitajn karakterojn kaj tiu karaktero neniam perdiĝas ĉe la finaĵa pluformado.

Se la radikoj estus nur vort-stumpoj »pendantaj en la aero« kaj se al ili la karakteroj donus nur la finaĵo, estas evidente, ke la sencformigo ĉe la finaĵa pluformado devus iri paralele ĉe ĉiuj radikoj. Do, el similencaj radikoj per la sama finaĵo oni devus ricevi similencajn vortojn.

Ni rigardu tri tiajn similencajn radikojn:

reg', *reg'*, *majest'*

alkroĉante al ili la a-finaĵojn oni vidas, ke

rega demando estas »demando pri rego«;

rega demando povas esti »demando pri rego« (regado); sed

majesta demando ne povas esti »demando pri majestato«; ĝi estas nur »demando majesta«.

Same: *proviant'*, *nutr'*, *sat'*.

provianta komitato estas »komitato pri provianto«;

nutra komitato estas »komitato pri nutro«; sed

sata komitato ne estas »komitato pri sato«; ĝi estas nur »komitato sata«.

Majesta kaj *sata* do evidente diferencas de la aliaj radikoj per tio, ke ĉe ili la a-finaĵo havas ĉiam la signifon *-kvalita*, dum ĉe la aliaj ĝi povas signifi ankaŭ *-rilata*. Estas do evidente, ke el la vidpunkto de la a-finaĵa pluformado la radikojn *majest* kaj *sat* (kaj la simile konduktantaj radikojn) oni devas apartigi de la ceteraj.

La radikoj *reg* kaj *reg*, *proviant'* kaj *nutr'* kondukas sammaniere ĉe la a-finaĵa pluformado. Sed nun, ni esploru ilin plu alkroĉante la o-finaĵojn.

Reg-o signifas personon; la nomon de la ago *regi* oni esprimas per »regado«. *Reg-o* signifas agon; la personon, kiu regas, oni devas signi per »reg-anto«.

Provianto esprimas aĵon; la nomon de la ago »provianta« oni devas signi per »proviantado«. *Nutro* esprimas agon; la aĵon, per kiu oni nutras, oni esprimas per »nutrado«.

Do, se ni eliras el la vortoj *regi* kaj *regi*, *provianta* kaj *nutri*, preskaŭ samsignifaj, ni ricevas per la sama o-finaĵo vortojn kun diferencaj sencoj; aliparte, por ricevi el ili vortojn samsencajn, oni devas uzi malsamajn pluformilojn: jen la simplan o-finaĵon, jen la sufiksoidon *-ad*, aŭ *-aj*. (Oni povas, sed ne nepre devas diri: *regado*, *nutrado*; dum oni nepre devas diri *regado*, *proviantado*, por signi agon.)

Estas do evidente, ke *reg* kaj *proviant* kaj la simile konduktantaj radikoj, el la vidpunkto de la pluformado, devas esti distingitaj disde la radikoj *reg* kaj *nutr* kaj la radikoj samkarakteraj. Oni do havas du apartajn kategoriojn, al kiuj venas, kiel tria, la radikoj de la tipo *majest'*, kies apartecon ni montris supre. Tiu distingo eĉ ne estas teoria aŭ lingvo-filozofia; ĝi estas pure praktika, induktita el spertoj observitaj ĉe pluformado.

Cetere, oni povas pruvi, ke ankaŭ Z. mem konsciis pri la karakter-diverseco de la radikoj; vidu en ĉi tiu numero mian noton pri la artikolo de Sinjoro Bailey.

La ŝatata aŭtoro parolas pri tio, ke la »usus« povas enkonduki sencon de vortoj kontraŭkonsente kun la teorio de la radik-karakteroj. Nu, tio estas ebla. Sed tio tute ne tuŝas la teorion mem. El tio rezultas nur, ke kelkaj radikoj transvoviĝas el unu kategorio en la alian, ĉar la praktiko montris, ke tia nova klasado estas pli oportuna. Tiel montris ekzemple la praktiko, ke *floro-florado*, *planto-plantado* estas pli oportunaj formoj, ol *floraĵo-floro*, *plantaĵo-planto* (la unua formo montras konkret-agon, la dua agon). La samo okazas evidente pri *kant'*, kiu praktike perdis sian verban karakteron (*kanto-kantado*).

Kelkaj malmultaj vortoj do povas ŝanĝi sian lokon inter la kadroj de la vortteorio, sed la kadroj mem restas netuŝitaj.

Ankoraŭ ion. Mi kredas, malgraŭ la duboj de l'

aŭtoro, ke inter la sufikso *-et* kaj ekz. *-e* *-an* ekzistas konsiderinda diferenco.

urbeto estas *eta* urbo kaj ne *eto* de urbo

urbano estas ne *ana* urbo, sed *ano* de urbo.

Same ni trovas diferencon inter *-em* kaj *-et*:

faleta estas *ete* *fala* kaj ne *eta* je *falo*;

falema ne estas *eme* *fala* sed *ema* je *falo*.

Fine ni rigardu vortojn kun verba finaĵo:

krieti estas *ete* *krii* kaj ne *eti* *kri(ant)a*;

kriigi ne estas *ige* *krii* sed *igi* *kri(ant)a*.

Kiel ni vidas el la supraj ekzemploj, *-et* tute ne ŝanĝas la karakteron de la radikoj, al kiu ĝi gluiĝas: *urbeto* restas *urbo*, *faleta* restas *fala*, *krieti* restas *krii*, nur oni devas aldoni la malgrandigan sencmodifon (*eta*, *ete*).

Male, la aliaj sufiks(oid)oj estas la ĉefelementoj en la vortkunmeto: *falema* estas *ema* (je *falo*); *urbano* estas *ano* (de *urbo*); *kriigi* estas *igi* (*krianta*) kaj la maldekstra elemento, kiu ĉe la *et*-kunmetoj estis la ekskluziva portanto de la ideo, ĉi tie havas nur klarigan, komplementan signifon, gravan, sed ne ĉefan.

Ni kredas, ke tiel grandan diferencon oni ne povas neglekti, kiam oni volas fiksi la regulojn de la vortfarado.

Mi petas la eminentan aŭtoron, ke li pardonu al mi ĉi tiujn kontraŭdirojn. Ili ne venis el kontraŭparolemo, sed el la sincera deziro klarigi dubajn punktojn kaj kontribui al la definitiva solvo de la problemoj, malfacilaj sed solveblaj kaj solvendaj.

K. Kalocsay.

III.

POR LA ZAMENHOFA LINGVO.

La senditan ekzempleron de la »Plena Gramatiko« mi bone ricevis antaŭ kvin semajnoj. Mi tre forte bedaŭras, ke la aŭtoroj ne petis mian helpon kaj konsilon antaŭ ol la verko iris al la presejo. Se mi entreprenos detalan kritikon de tiu 370 paĝa libro, la laboro postulos tre longan tempon, kaj la ŝanĝoj, kiujn mi konsilos, estos tiel multaj kaj tiel radikalaj, ke la aŭtoroj ne akceptos ilin, kaj la tempo, dediĉita al tiu tasko, estos perdita senefike.

Eĉ la antaŭparolo ne estas konforma al la Zamenhofa sistemo, kiun la aŭtoroj celas pritrakti: p. 5. l. 2. *tiu ĉi* malgraŭ la L. Resp. 52 (p. 54 en la Plena Kolekto); l. 11. *je* anstataŭ *ĉe*; l. 24. komo inter *rigardataj* kaj *kiel*; l. 26. *kialo* anstataŭ la Zamenhofa *motivo*; l. 31. *tiuj ĉiuj* anstataŭ *ĉiuj tiuj*; (kp. F. Krest. 213/3; 256/25; 260/8; 262/24; 269/9; 271/11; 290/30; 297/24, 29.) p. 6. l. 12. *plu* ne anstataŭ *jam* ne aŭ *ne plu*; l. 19. *tiun ĉi*; l. 21. *ktp.* (tra la tuta libro) anstataŭ *l. t. p.* ne sole Zamenhofa, sed ankaŭ fundamenta, vidu Ekzercaro § 30 kaj § 42; l. 28. *eŭropaj* (unu el tiuj »provoj, kiujn Z poste forlasis«; vidu *Egipta*, *Hebrea* k. c. en la Malnova Testamento.); l. 30. *rekonis* anstataŭ *konstatis* aŭ *trovis*; l. 38. *estus eble povinta* anstataŭ *eble povus*; p. 7. l. 12. *hungara, franca* anstataŭ *Hungara, Franca*; l. 20. *estus povintaj* anstataŭ *povus*; l. 21. *tie ĉi*; l. 22. *esp* anstataŭ *Esp*; lasta linio *tiu ĉi*. (Sur tiu sama paĝo devas esti *okaze* (l. 4) kaj *Fruictier* (l. 25); supozeble la kompostisto estas kulpa.)

Kompreneble, oni povas respondi, ke tio ĉi tio estas bagateloj; sed bagateloj faras perfektecon, kaj perfekteco ne estas bagatelo. Sen atento al tiaj bagateloj ni ne povas plenumi la konsilon, donitan en la Deklaracio de Boulogne, la dokumento, kiu oficiale sankciis la Fundamenton de Esperanto:

»Pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj Esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.«

Kompreneble, Zamenhof iafaĵe faris erarojn, li tion volonte konfesis, kaj ni devas eviti liajn erarojn, kiel ankaŭ la erarojn de aliaj personoj; tamen ni ne devas kondamni Zamenhofajn formojn nur pro tio, ke ili ne estas konformaj al kelkaj arbitraj kvazaŭ-reguloj, faritaj ne de Zamenhof, sed de aliaj personoj, kaj ne obeitaj de li. Unu el ĉi tiuj kvazaŭ-reguloj koncernas la uzadon de adverboj en sensubjektaj propozicioj. Sub la influo de ĉi tiu kvazaŭ-regulo la aŭtoroj de la Plena Gramatiko skribis sur p. 10: »Sajnis oportune kunigi tiun branĉon.«, kaj la leganto ne komprenas, al kiu verbo apartenas la adverbo. Laŭ la Zamenhofa sistemo la elekto de adjektivo aŭ adverbo estas *tute libera*, dum tiuj personoj, kiuj sin katenas per la kvazaŭ-regulo, devas sen bezono krei *escepton* en tiuj frazoj, kie adverbo donas duban sencen. Mi povus citi tre grandan nombron da konvinkaj ekzemploj el la verkoj de Zamenhof.

Koncerne la refleksivajn pronomojn la aŭtoroj de la Plena Gramatiko sekvas la malgustajn principojn, formulitajn de Beaufront en la frua tempo de la lingvo, kiam ankoraŭ ne ekzistis literatura materialo sufiĉa, por fermi bazon por fidindaj reguloj. Kiel ĉe la sensubjektaj propozicioj, tiel same la Zamenhofa literaturo konvinkas montras la nefidindecon de la Beaufrontaj »reguloj.« D-ro Lippmann, sin kateninte per ĉi tiuj »reguloj«, devis en sia kongresa raporto konduki siajn legantojn en teruran marĉon de esceptoj, konfuzaj, kaj komplikaj.

P. 11. Mi tute ne konsentas, ke *ŭ* estas »escepto« aŭ »duonvokalo«; kun *a* ĝi formas unu silabon tiel same, kiel aliaj konsonantoj en *da, la, ja, la*. Simile, la Angla lingvo nomas *w* konsonanto en *way*, ĝuste kiel aliaj konsonantoj en *bay, day, fay, gay, hay, jay, lay, may, nay, pay, ray, say*.

P. 18. l. 8. Ĉi tiu diro estas vera rilate *parton* de mia lando en mia loko de naskiĝo (Manchester) kaj multaj aliaj lokoj ne ekzistas tiu tendenco.

En la Lingvaj Respondoj (p. 40 en la Plena Kolekto) Zamenhof konsilis uzi post *po* la nominativon. En la Dua Libro (p. 18. l. 20) li uzis la akuzativon post *po*, sed poste li ĉiam uzis la nominativon konforme al la supre nomita konsilo. La aŭtoroj de la Plena Gramatiko malguste prezentas lian kutimon (p. 278 (3) RIM.), kaj ĉe p. 176. l. 2. ili skribas: »ili ricevis po tri *pomojn*« malgraŭ ke Zamenhof ĉe p. 74 de la Lingvaj Respondoj skribis: »ili ricevis po kvin *pomoj*.«

De kie oni prenis la supozon, ke la radikoj en la Universala Vortaro estas substantivoj, verboj, adjektivoj k. c. ? Kompreneble, la nacilingvaj difinoj havas tiujn karakterojn, ĉar neŭtralaj difinoj ne ekzistas. Tamen la radikoj estas neŭtralaj. Se *genu* sen gramatika finiĝo estas genuo, la vorto *genuigi* ne povas signifi ion alian ol *igi genuo*; ĉe Zamenhof kontraŭe *genuigi* signifas *stariĝi, surgenui, meti sin en surgenuan pozicion*. Tiel same *frostigi* ne signifas *igi frosto*, kvankam la radikoj *frost* havas substantivajn difinojn. Kion diris Zamenhof? »Stamp« povas esti *egale bone tradukita per verbo (stampi) kaj per substantivo (stampo)*. (Letero, represita en la Originala Verkaro, p. 538.)

Jen estas kelke da detalaj eraroj, kiujn ni okaze rimarkis: p. 249, l. 11. legu *temas* ne anstataŭ *ne temas*; p. 273, l. 24, 25. legu *ne pli malfrue ol* anstataŭ *plej malfrue en*; l. 30. legu *agon, kies rezulto daŭras ĉiam aŭ eterne* anstataŭ *daŭron*; tian daŭron Zamenhof preskaŭ ĉiam esprimis per *ĉiam, eterne* sen *por*. Rigardu ekzemple en Marta, p. 18, l. 30: *li forlasis sin por ĉiam*; p. 209, l. 24: *por ĉiam ŝi disiĝas de la sola homo*. Daŭras ne la forlaso, la disiĝo, sed iliaj rezultoj. P. 213, l. 9. legu *kvivit* anstataŭ *kvitit*; komparu Fabeloj I. 29/1; 30/20;

31/22; 33/9; 36/16; II. 115/14; III. 18/18. *Kvintit* ĉe Fabeloj III. 28/20 supozeble estas kompostista eraro; vidu ankaŭ *kvivito* ĉe Fabeloj I. 29/4. P. 209, l. 17 ms, forigu superfluan *de* (de de). P. 181. RIM. v. legu *ne plu* triloke anstataŭ *plu ne*. P. 177, l. 5, legu *monatnomon* anstataŭ *monatmonon*. Pri *en eraro* sur p. 173 jam atentigis s-ro M. C. Butler en *The British Esperantist*.

Sur la verda folio: 43 (s. 19); 51 (ms. 16); 260 (ms. 11); 312; 181 en ambaŭ kolumnoj.

Tamen la plej grava malhelpo kuŝas multe pli profunde. La aŭtoroj de la Plena Gramatiko prenis la flekseblan lingvon de Zamenhof kaj rigidigis ĝin, streĉante ĝin sur la vastan kadron de la Latina gramatiko, malgraŭ la ofte ripetitaj avertoj de Zamenhof: »ni ne devas kateni nin« kaj »ni ne devas peni, ke nia lingvo estu tro preciza«. La nova prezento eble plaĉas al kelkaj »instruitaj lingvistoj«, kiuj »en tia afero, kiel lingvo internacia, ludas la lastan rolon« (I. Krest. p. 311.), sed ĝi ne respondas al la koncepto de la aŭtoro de Esperanto.

El ĉio supre skribita vi povos formi opinion pri la ebleco de interkonsento inter mi, Zamenhofa Esperantisto, kaj la aŭtoroj de la Plena Gramatiko. Jam de la unua tempo de la lingvo Rundstedt, de Wahl, Meier, Grabowski, Trompeter, de Saussure, Rodet, Sentis, Conturat, de Beaufront, k. c. ŝiris la lingvon laŭ sia bontrovo; estas jam tempo iri returne al la fonto!

William Bailey.

*

Ce la tuta respekto, kiun mi sentas al la eminenta zamenhofologo, mi devas kontraŭdiri liajn opiniojn.

Li demandas, de kie ni prenis la supozon, ke la radikoj en la Oficiala Vortaro havas gramatikan karakteron. Nu, de Zamenhof mem. Estas konate, ke li plene aprobis la teorion de Antido, kiu teorio baziĝas sur la gramatika karakteriziteco de la radikoj. Jen, li skribis al li: »La lastan verkon (La construction logique des mots en Esperanto) mi legis kun granda intereso; mi trovas ĝin bonega. Laŭ mia opinio estus tre utile, se vi eldonus ĝin ankaŭ en Esperanto, por ke ĉiu esperantisto, precipe la verkantoj, atentigis ĝin tra legu kaj por ke ili penu observi tiujn principojn, kiujn vi bonege esploris kaj klarigis. Mi ne dubas, ke la Akademio tre volonte donos al via propono sian oficialan aprobon... Via verko povas servi kiel bona modelo de efektive gravaj kaj utilaj Akademijaj laboroj« (Originala Verkaro, pĝ. 455.).

Estas sendube, ke ĉi tiu letero esprimas ne nur banalajn ĝentilajojn, sed plenan konsenton.

Alia pruvo troviĝas ĝuste en tiu letero de Z. al Th. Cart, kiun sinjoro Bailey miskomprenas citas.

Vere, tie Z. skribas: »stamp« povas esti egale bone tradukita per verbo (stampi) kaj per substantivo (stampo). Sed Z. evidente parolas pri nacilingva traduko kaj li volas esprimi, ke por la verba *stamp* oni povas uzi same tradukon per verbo (angla: *to stamp*), kiel tradukon per substantivo devenigita el verbo (angla: *stamping*). La esprimon »substantivo devenigita el verbo« li ne uzas, sed, ke tion li intencas diri, provas la tuj sekvanta teksto: »la ago estas: *stampi*, la rezultato: *stampo*; la instrumento: *stampilo*«. Kaj ankoraŭ pli okulvideble ĝin provas la sekvanta alineo, kie oni povas legi pri *stuki*:

»Ankaŭ por tiu ĉi vorto (kiel por *stamp*) mi intencis doni al la radikoj signifon *verban*«.

Jen frazo, kiu, laŭ mia opinio, devas silentigi ĉian kontraŭdiron. En ĝi Z. klare diras, ke li intencis doni al radikoj (atentu, al radikoj) signifon *verban*. Ĉu, oni povas do aserti, ke laŭ Z. la radikoj estas neŭtralaj?

La ekzemploj de S-ro Bailey nenion refutas. Se la vorto *ĝenuigi* (laŭ nia teorio: *igi ĝenua*) ne konformas al la sistemo, tio ne provas, ke la sistemo estas malbona, sed ke pri la vorto oni devas decidi, ĉu oni uzu alian vorton (surgenuigi: *igi surgenua*) aŭ oni atribuu al *ĝenuigi* (*igi ĝenua*: *igi* karakterizata de *ĝenuo*) sencon fiksitajn de konvencio (kio estas ĉiam ebla en lingvo).

Mi ne scias, kial S-ro Bailey kondamnas la uzon de

adverbo en sensubjektaj propozicioj. Ĉu la frazo »resti kun leono estas danĝere« ne estas Fundamenta? Cetere, ĝuste ni malaprobis la uzon de adverbo ĉe objekta predikativo, citante zamenhofajn ekzemplojn (*Oni trovas ebla, kion oni deziras*). Vd. parag. 301. RIM. b. Laŭ ni adverbo estas uzenda nur ĉe ESTAS, kaj ĉe la vortoj, en kiuj kaŝe enestas ESTAS: *igi* (*igi esti*), *ŝajni* (*ŝajni esti*). En tiaj okazoj neniam povas esti miskompreno.

Alia afero nekomprenebla. S-ro Bailey diras: Koncerne la reflektivajn pronomojn la aŭtoroj de la Plena Gramatiko sekvas la malĝustajn principojn... de Beaufront. Nu, tute ne. Ni sekvas nur la zamenhofan sistemon. Tion tre facile estas pruvi. Neniam ni formulas regulon, ne apogante ĝin per zamenhofa ekzemplo. Bonvolu pririgardi.

Kelkajn rimarkojn pri pli malpli bagatelaj eraroj ni danke utiligos en la dua eldono.

Sed laste mi devas pritrakti la plej grayan demandon. Ĉu vere ni rigidigis la flekseblan lingvon de Zamenhof? Nu, se oni senpartie legas nian verkon, oni devas konstati, ke la fleksebleco de la lingvo tute ne malaperis inter la gramatik-sciencaj kadroj. Ne la lingvon ni prezentis tro preciza, sed la kadrojn: ni intencis fari ĝin supernacian gramatikon, kiu montras la esencajn partojn, la skeleton de la homa Lingvo, ĝenerale. La karno de Esperanto, kiun ni metis sur tiun ĉi skeleton, restis elasta kaj fleksebla, movebla laŭ cent direktoj. Cetere, se oni volas akuzi iun pri rigidigo, tiun akuzon plie oni povas ekdiri kontraŭ S-ro Bailey, kiu ne permesas uzi laŭvole *tiu ĉi* kaj *ĉi tiu*, kaj elekti la formon laŭ ritmosento kaj belsoneco; kiu ne permesas la vorton *kialo*; ktp. ktp.

Neniu respektas la zamenhofan lingvuzon pli ol ni; tion provas la abunde uzataj zamenhofaj ekzemploj en nia verko. Sed la nuna Esp-o certe ne estas ekskluzive verko de Z. Tiu longa listo de aŭtoroj, kiun S-ro Bailey mencias ĉe la fino de sia artikolo, certe kunlaboris en ĝia evoluigo. Ilia efiko ne perdiĝis, eĉ se multo el iliaj proponoj restis neatentata. Eĉ en la verkaro de Z. mem oni povus elmontri ilian influon. Dum Z. vivis, oni povis havi la vidpunkton, ke oni akceptas nur tion, kion Z. sankcias el tiuj ĉi influoj. Sed, de kiam Z. ne vivas plu, tiu vidpunkto ne estas tenebla. Neniu scias, kion sankcius Z., se li vivus. Aliflanke, la lingvo vivas, staras antaŭ ĉiam novaj taskoj, evoluas, riĉiĝas, pli kaj pli potencigas. Ĉu oni povas postuli, ke ĝi restu eterne en la stato, en kiu li estis en la momento de la morto de la Majstro?

Sed se nin ne helpas plu la aŭtoritato kaj lingva instinkto de Z., al kiu ni turnu nin pri solvo de lingvaj demandoj? Certe al la gramatika logiko, al la ĉiam validaj reguloj de la homa pensado.

Tio nin gvidis en nia verkado. Kion sankcius Z. kaj la tradicio, tion ni lasis netuŝita. Sed kie mem Z. dubis, aŭ pri kio li ne decidis, ne havante por tio okazon, tie ni penis montri la vojon per la gramatika logiko.

Ni kredas, ke pli grandan propagandon al la zamenhofa lingvuzo, ol ni faris per nia verko, oni vere ne povas fari. Ni prezentis la tutan gramatikon baze de liaj lingvokutimoj. Eĉ kie (ĉe 3-4 ne gravaj punktoj) ni ne aprobis tiujn kutimojn, ni mencias ilin. Ĉiu, havante dubon pri ia demando, tuj povas trovi per la indekso pri tio z-an ekzemplon.

Ni estas firme konvinkitaj, ke Z. ĝojus pri nia verko. Estas tre bedaŭrinde, ke la plaĉon de lia plej fidela adepto ni ne povis akiri.

Kalocsay.

Nova Biografio de Zamenhof de G. Waringhien

Parto el la Enciklopedio de Esperanto kaj aliaj interesaj legaĵoj (entute 52 paĝoj)

Prezo du resp. kuponoj Hungara Heroldo, Budapeŝt, Parlamento.

»VERKOJ DE FeZ« — ELFOSITA TREZORO

(»Plena verkaro de d-ro Felikso Zamenhof« — por preso ordigis Edvardo Wiesenfeld L. K. Eldonis »Literatura Mondo«. Budapeŝt 1935. XLIX. libro eldon. de »Literatura Mondo« kaj 4-a volumo de la lit. serio de AELA 1935).

Pendanta sur nuboj de l' ideo, ekpendinta super multaj landoj realaj, la tre abstrakta Esperantolando havas tamen ian teron. Ĉar ĝi havas nekomprenoblajn subterajojn. Ĉar jen, el sub la tero de nia amata Esperantujo antaŭ niaj mirigitaj de miraklo okuloj elfosita estas vera trezoro — verkoj de Fez.

Bonega estis la penso de S-ro Wiesenfeld zorge kaj pene kolekti la heredajon post Felikso Zamenhof, disjetitan en multaj presorganoj esperantaj, ankaŭ en manuskriptoj, kaj ordigi ĝin trafmaniere. Plenmerita estas la intenco de »Literatura Mondo« redoni ĉi tiun trezorejon en la manojn de l' esperantistaro.

Nun staras antaŭ ni, en plena kresko kaj neatendita brilo, senlaca pioniro de la lingvo Esperanta; brava kunlaboranto de la Majstro-frato en la disvastigado de lia ideo; ĉarma poeto, preskaŭ la unua — post la modelaj provoj de la fraŭdo-kreinto — la unua, kiu fleksis la novan lingvon al ritmo kaj rimo, instigis artajn vortojn soni en melodiazaj kantoj; kaj samtempe interesa, fantaziplena novelisto. Nur nun montrigas al ni lia nobla animo homa, en grandigo de la tuta vivo oferema kaj modesta en sia valora kunlaborado sur la kampo de »Lingvo internacia«. Ĉar verdire, multaj, tre multaj el ni, se ne ĉiuj, apenaŭ vidis en li dumvive pli multe ol rebrilon de l' suno-Majstro, ol malgrandan akompanantan planedon, ol fraton de Ludoviko, kiam li estis figuro individua, sendepende kreanta sur vojo frata... estis Felikso Zamenhof!

Sed »Weltgeschichte ist das Weltgericht«: post la eldono de lia kolektita verkaro, Fez ricevas kvazaŭ per juĝo de historio, sian bone merititan, rangdignan, memore daŭran lokon en la disvolvo de la lingvo Esperanta, en ĝia literaturo — li mem fariĝis signifa peco de historio Esperanta.

En ĉi tiu artikolo mi ne intencas skribi pri la vivo de nia aŭtoro; lian biografion trovos la leganto en aldono al la libro. Kaj mi ne parolos ankaŭ pri la vigla pioniro; elokvente parolas pri tio la redaktinto de l' antaŭparolo, S-ro E. W.; atestas ĝin multaj artikoloj propagandaj de Fez, almetitaj al la libro en la fino. Ĉi tiu parto de lia laborado estas lumigita ankaŭ per aligitaj paroladoj de aliaj esperantistoj.

Mi volus nur iomete priparoli Fez-on, literaturiston, antaŭ ĉio poeton. La poemoj de nia aŭtoro okupas neplenan centon da paĝoj, preskaŭ la triono de la libro. Ne estas kaŝinde, ke ne ĉiuj verketoj havas saman valoron — inter ili estas malpli signifaj, sed estas ankaŭ tiaj, kiuj restos vivantaj, kiel klasaj, neforgesindaj.

Multe impresas nin, ke en jaro 1889, kiam nia poeto estis ankoraŭ ne plenaĝa — li havis tiam nur dudek jarojn — li skribis »Marŝon de maristoj«; ĉi tiu versaĵo troviĝas sur la unua paĝo de la libro. Kaj jam en tiu verko la juna poeto konis la sekreton trafte adapti al enhavo la formon ritman, uzis energiajn tonojn de vera marŝo:

Kuraĝe ni puŝu nin for de la bordo,
Milvoce eksonu la kanto,
Milehe resonu potenca akordo
De l' kant' nia pri Esperanto.

En tri strofojn li scipovis enpremi fortajn riĉajn imagojn, kopvenajn al mara vojaĝo.

Bruventoj minacas kaj kruacas la vojon,
Sed mokas danĝeron remanto,
Kaj kantas l' esperon, kaj kantas la ĝojon
La kant' nia pri Esperanto.

Ĝi estas vere himno triumfa de l' espero. En vigla ritmo batas koroj homaj, energiaj, fieraj, ĝojaj — certaj pri venko.

Kaj tranĉas marondojn kuraĝe ŝipeto,
Al cel difinita naganta,
Ĝin gvidas, inspiras ĝin verda steleto
Kaj kant' nia pri Esperanto!

Kia lerteco majstra de juna plumo en ĉi tiu trifoja ripetado de unu rimo, uzita en fino: Esperanto! Kia muziko aŭdebla ĉe tralegado!

Eble plej granda donaco, kiun Fez ricevis de naturo, estis lia muzika orelo. Li la unua trovis novajn ritmojn, aŭ la unua aplikis certajn fremdlingvajjn ritmojn al versfarado en lingvo arta. Tio ne estis facila. Sub liaj fingroj naskiĝis nekonataj melodioj jam en tiu epoko, kiam la opinio ankoraŭ mokis pri la ebleco de lingvo arta, aŭ la antaŭjuĝo afable malfermadis al la »seka« prozo de Esperanto pardon de interrilatoj ekskluzive komercaj; — sed kontraŭ moko kaj antaŭjuĝoj de malkredo sonis obstine kaj memfide la harpo de Fez. Sur liaj kordoj ludis funebre aŭtuna vento:

Rondas, bruas, arbojn skuas
Bruemulo vento...

rememorigante la ritmojn de la Puŝkina »Vespero vintra«; ekparolis petole ironio de ŝangebla amo fraŭlina en versaĵo kun mire mallargaj strofoj:

Lin vidis en ĝardeno
Ekplaĉis li al ŝi
Si nomis sin Heleno
Anton' sin nomis li...

trairis al ni, esperantistoj, el la poezio de Goethe la koraŝiranta motivo de »Gretchen« — freneza patrino, mortiganta propran infanon, en nekutime malfacila formo artistista — kun duopaj rimoj (internaj):

La juna belo, vizaĝ' angela
Senkulpa k'el infano,
Ĉe la patrino ŝi, solfilino
La helpa dekstra mano,

Unue najtingaloj lernadis kanti esperante:

Kion ŝi faras? — Fji... fji... fji...
Ektrilis la birdeto.

Eksonis per novaj vortoj flua kanto ritme-popola, ekludis majesta tono de maljuna legendo, aŭ ekploris plendo de vana ofero (en »milita rememoro de »veterano«).

Kompreneble mi ne kuraĝus difini la datojn de la disvolviganta prozodio Esperanta. Eble samtempe uzis la samajn ritmojn la mirinda talento de la granda Grabovski — sed li donis plej ofte tradukojn. Fez provis originalaĵojn. Sendube unu el la plej fortaj talentoj, S. Braun, faris miraklojn en siaj sonetoj, pli riĉaj je temoj kaj metaforoj; potence pliriĉigis nian poezion per diversaj ritmaj kaj pli larĝa enhavo; per suĉaj koloroj kaj interesaj ideoj Baghy, Kalocsay, Grau Casas k. t. p. Sed unueco, iniciativo, incito al novaj saltoj sur nia Parnaso apartenas en granda parto al Felikso Zamenhof.

Jam antaŭ tridek jaroj li skribis »Malfacilan songon: Maj — printempo venas...« Laŭ mia opinio ĝi estas perlo de poezio, kiu ne perdis ĝisnune sian brilon; tiu brilo ne estingiĝos en estontaj jaroj.

Enhavo simpla — interparolas patro kun filo, sola filo. Estas ĉarma mateno printempa. Naturo reviviĝis. La tero vestiĝis feste. Ĉio ĉirkaŭe kantas: birdoj kaj varmaj ventetoj. Sed la patro estas malgaja. La filo demandas: »Kial?»

Jen ĉiu estas esperanta
Vi sola restas en malgaj'...
Vi sola estas nur — dubanta
Je ĝoja Maj'?

Kaj la patro respondas:

Ho, kara fil', mi ĝojis ĉiam
Je la viviga Maja ven'...
Mi havis songvidojn iam
Kaj mi malĝoja estas jen...

Nun sekvas rakonto pri songo terura. La patro songis pri estonta milito. »Faladas kapo... dua, tria...« »Denove celas mortigil'... Denove glavo jen levigas... Ho, mia fil'!«

Kaj sekvas krio de koro patra, koro morte vundita.

Ho, fil'! ĉe tiu ĉi ekcelo
Mi vekigadis tuj kun kri'!
Falegis kapo — Via bela,
Ho, solinfano!... falis Vil...
Kaj jen min premas nune ĉiam
Malĝoj' senlima kaj malĝaj'
Ne ĝojas patra kor' de tiam
Je l' ven' de Maj'...

Nenio plu... Sed kia harmonio en kontrastoj: kantanta ĉarmo de Maja tago kaj terura songo pri falanta kapo de solinfano sur kampo de milito... Se filoj devas eterne fali per »glora morto« — patroj rajtas plori en sia senespera doloro eterna... Sed ĉu la malpaco de l' homoj povas esti eterna? — ŝajnas demandi la poeto... Ĉu ĉiam ripetos sin eksplodoj de malamo inter nacioj — ĉu ĉiam Kainoj mortigos siajn fratojn?...

La poezio de Fez estas ŝajne nerica — estas dutona aŭ kvartona. Car unuflanke li parolas al ni pri amo interseksa; duaflanke — kaj ĉi tiu estas sur lia liro pli grava, pli ofta, pli potenca — li songas pri amo internacia, amo frata, interhoma, pri bela songo de Esperantujo. Kaj ĉiu el tiuj du tonoj disrompiĝas — ĉiu je du tonoj.

La unuan parton de ĉi tiu poezio ni konas bone el Heine: Koro, feliĉigita per amo, dolĉe revanta, entuziasme gaja kaj jen... frapita per sago de Amoro, vundita per malfideleco, senespera, maldolĉe ridanta, mokanta sin mem. Fez transportas tiujn du tonojn lerte en Esperanton — eble ne unu versaĵo tuŝas iluziojn kaj trompigon de propra juneco, facilajn vundojn, poste kuracitajn per la vivo, per pli feliĉa elekto. Kiel interese li scipovas plendi per buŝo de fraŭlino:

Ne dieto, ne trankvilo,
Ne, doktoro!
Mi malsanas pro pikilo
De l' Amoro!

Kiel kante rakontas pri junaj konkludoj de koro pikita de malfeliĉa amo:

False fluas vivo-ondo,
Falsa — proksimula rondo,
Falsa, falsa — tuta mondo
Falsa estas am'!

Fez la ironiisto instruas nin, ke niaj idealoj lumas bele elmalproksime — sed paliĝas ofte ĉe pli proksima kono. (Komp. »Vizito de la steloj sur la tero«).

Sed pli grava estas la dua temo de lia poezio: l' amo inter popoloj... Eble malamo?... Car nia poeto ŝanceliĝas inter du sentoj: forta, entuziasma kredo kaj espero kaj ĉiam returniĝanta senkredo kaj malespero. Observado de realeco, de faktoj vivaj, terura prozo de sangaj konfliktoj vekas revulon. Kontraŭ ĉielarkaj songoj iras monstro-grandegulo kun glavo en mano kaj krias rauke: »Mortigu, buĉu vin reciproke!«

Kiu venkas en la animo de Fez? ... Ĉu la songulo-optimismo, aŭ la pesimisto-observanto? Tiu, kiu entuziasme alvokas pacon, aŭ tiu, kiu maldolĉe ridas kaj dolore pentras siajn elreviĝojn. Mi havas la impreson, ke Feliks Zamenhof »esperas kontraŭ malespero«. Sed en tiu dutoneco: songo pri venko de l' ideo kaj malbeno al la malamikeco en vivo, estas la senco interna, forto kaj belo de lia Muzo.

Ankoraŭ unu vorton en ĉi tiu afero, indan, ke pri ĝi estu skribita tuta traktato. Ludoviko Zamenhof parolis

pri »nova sento«, veninta en la mondon. Ĉu li pravis? La ideo de l' amo frata en la homaro ne estas io nova. Pri ĝi parolis ĉarme sur la monto Jesuo Kristo — li oferis la vivon por ĉi tiu idealo. Ankoraŭ pli frue parolis pri frateco popola la profetoj kaj Buddha... Kie do estas la nova ideo, la nova sento? Eble ideo malnova — sed neniam realigita, neniam plene komprenita... Kaj certe, certege, »nova sento«. La ŝkreinto de l' Esperanto pravis. La penso, ke la homoj povas sin reciproke kompreni en komuna lingvo internacia aldonis novan forton al la ideo, ke ili, kvankam diversnaciaj, povas sin reciproke ami. Tiu penso realigita en la Kongresoj Esperantaj — veraj festoj de kunfrateco! — ricevis novan animon de la potenca spiro de Esperanto, fariĝis nova, revivigita evangelio por entuziasmoj-esperantistoj, kavaliroj de verda stelo, kiuj fiere kaj kuraĝe prenis sur siajn ŝultrojn la taskon de enkorpiĝo de l' ideo Krista — homfrateco. Eble ili prenis tro memfide, infane — arogante?... — ne gravas!

Interesa kaj grava estas por la estonto, ke ĉi tiu ŝajne simpla ideo-sento: »homa kunfrateco« rejuniĝis, printempe verdiĝis, vestiĝis per mil novaj vortoj, esprimoj, bildoj, vizioj, fortegaj korbatoj en la poezio Esperanta; kaj kiel tiu miraklo estiĝis, tion povas kompreni nur tiu, kiu trastudos la verkojn de la Esperantaj poetoj, milkolore kaj miltone disvolvantaj ĉi unu penso-senton kaj inter ili unu el la plej elokventaj kaj elsupre inspiritaj, Fez-on, la aŭtoron de ĉi tiu juro sub titolo »Ni juras«.

Je l' tomo de Majstro kaj voko mistera
Milehe al ni kiu kuras,
Je nia destin' apostola, surtera,
Je l' cindroj praavaj

— Ni juras

Malpacon, malamon el koroj forigi,
En unu kuniĝi grandrondo,
Santfajron de l' amo, konkord' ekflamigi
Laŭ tempo praava, pramondo.

Kaj per la buŝo de poeto Fez ripetas esperantistoj: »ni juras« — por milehe vekvokan aŭdigi signalon, tra l' mond' en malpaco dronanta, kaj alte starigi la juridealon:

— Ideo kaj lingv' Esperanta!

Ni tiel vastiĝis — laŭ bezono de la temo — pri la poezio de Fez, ke jam ne restas al ni konvena loko por priparoli lian prozon. Do ni trasaltu la pli grandan poemon en naiva stilo de Fr. Coppée kun lia kompata larmeto — la eble iom tro longan riman rakonton pri la bonkora Heleno, anĝelo de malriĉaj infanoj kaj pri bonfaristo doktoro Juljano, iam ankaŭ malriĉulo, poste ŝia savinto kaj feliĉa edzo; ni trasaltu ankaŭ la teatraĵojn, eble elvokitajn per la bezono de kuranta minuto kaj inter ili la komedieton pri la sesdekjara Grumblulo, kiu estis junigita nek de Voronov nek de Steinach, sed de doktoro C., instruisto de Esperanto. Kaj ni turnu nin al la noveloj. Oni devas substreki ĉie la klaran, perfektan stilon, inspiritan de la modelo de Ludoviko Zamenhof, sed jam riĉigantan per novaj, ĉiam konformaj al la fundamento, originale pripensitaj vortoj kunmetitaj, precize respondantaj al novaj ideoj. Oni devas substreki ankaŭ la kreskantan tonon de humoro, kies fajbretoj jam montriĝis en la poezio, ĉe maldolĉa, satira rideto.

Fez ne timas disvolvi en noveloj simplajn temojn, preskaŭ fabelajn. Sub la moto de sia poezio:

Kian valoron havas la okulo,
Se blinda, surda estas nia kor' —

li skribas pri du fratoj. Riĉ kaj Malriĉ — (vi dirus, motivo el fabelo araba de Mil kaj unu noktoj) — pri blindulino, kiu savas per sia zorgemo la malsanan onklon — riĉulon, al kiu returniĝas kun la sano ankaŭ la boneco kora, mizerikordo al malriĉuloj. Ni insiste substrekas en la verkaro de Fez la motivon: kompato por homoj malfeliĉaj kaj malriĉaj. La sorto de tiuj homoj lin dumvive

turmentis kaj li plialtigis la devon de helpo flanke de la homoj pli feliĉaj per kaprico sorta!

Bele skribas nia aŭtoro pri la Amo »post longaj jaroj de l' terura milito« revenanta hejmen — kaj en kia stato: »ĉifonita, laca, maljuniginta, griziginta, pala — tute nerekonoble«. Sed la »malfeliĉa standardisto«, portanta sur la brusto verdan steleton — reviviĝas en nova stato; ree flirtas verda standardo; vokas forta voĉo; disŝirigis la nebulo de l' densa mallumo: »iom post iom rekonas standardisto la homojn kaj homoj lin rekonadi komencas«.

En alia publicista artikolo Fez postulas de la delegitoj de UEA, ke ili faru ekzamenon — en sola punkto: oni devas senpripense, sincere, senruze, frate premi la manon de aliulo sen diferenco de politika, religia, nacia kredo. Ni rekonas en tio la aŭtoron, kiu en gaja rakonto pri »aventuroj de rusa kampanaro en Germanujo« je la demando: ĉu vi estas katoliko, luterano, mahometano aŭ cigano« skribas en hospitala alvenokarto: »Mi estas poeto«.

La kompatema koro de Fez amas la florojn. Li estas preskaŭ ofendita, kiam, malsana, kuŝanta en lito, li ricevas de virino freŝan rozon. La rozo povus ankoraŭ flori, vivi en ĝardeno; nun ĝi velkas ĉe lia lito. Kaj li donas voĉojn al la floroj; permesas al ili plendi pri la krueleco homa. Li skribas fabelon en stilo de Andersen, fantazian, por infanoj — kaj aldonas al la melankolia rakonto de floroj sian *postscriptum*: »En la nomo de l' ofendataj kaj sendependaj floroj mi turnas min al ĉiuj bonkoraj infanoj aŭ ties parencoj...« Kortuŝanta protesto!

Blinduloj kaj senhejmaj orfoj estas plej proksimaj al lia mola koro. Interesa estas lia rakonto pri »rigardo kiun mi ne povas forgesi« — ĝi estis rigardo de hungara knabo en stacidomo de Budapeŝt. En lia rigardo Fez legis plendon, sed ne kuragiĝis doni al la knabo, eble ne almozulo, la monon. Kaj poste li vidis ofte tiun rigardon en rememoro — kaj sentis dum jaroj »kvazaŭ riproĉon de neplenumita devo«. Kial? Fez klarigas: »Kia plendo pendigis sur viaj lipoj, ho, malfeliĉa knabo? Kion vi volis diri?« La aŭtoron kaj la knabon dividis nekomprenataj reciproke fremdaj lingvoj. Sed Fez finas: »kvankam vi ne eldiris ĝin, mi divenas, mi komprenas vin«. Senhejma malriĉa orfeto estis ofendita de iu... Li estis kiel ĉevoja planteto. Kaj la aŭtoro elvokas: »Neniu rajtas ĝin piedpremi!«

Ke li estis rajtigita informi nin pri tio, kion li sciis elproksime kaj faris interesa kaj kolorplena en »kelkaj rememoroj pri miaj gepatroj kaj Ludoviko«, en »70-a datreveno: kiam naskiĝis la majstro«, en »Miaj rememoroj: Kial mi fariĝis esperantisto« — tio estas memkomprenebla. Sed mi ne rakontos pri tio. Mi ĝenerale ne parolos plu. Mi ja skribis sufiĉe... Kaj mi skribis entute ne por tio, ke vi legu miajn skribaĉojn, sed por tiu celo, ke vi mem tralogu la »Plenan Verkaron de D-ro Felikso Zamenhof«. Tiam mia celo estos atingita... kaj mi havos, kiel aŭtoro de ĉi tiu artikoleto, ian meriton!

Leo Belmont

LA ROCHEFOUCAULD: MAKSIMOJ, esperantigitaj de G. Waringhien, broŝurita volumo de 112 paĝoj, formato 14×23. Librejo Felix Alcan, Parizo, 108. Boulevard Saint-Germain.

La Rochefoucauld estas franca verkisto kaj moralisto. Ankaŭ en liaj memuaroj montriĝas lia pesimism-inklina forta observ-kapablo, kaj la pensemo kaj analizemo, kiuj estas ĉe li ofte malhelpoj de ago. Li partoprenis en la politikaj movadoj de sia jarcento (la 17-a), sed plie el amikeco, amo kaj honesto ol kondukate de difinitaj individuaj celoj.

Liajn spertojn, observojn, pensojn li filtris en siajn Maksimojn: en la nun recenzatan libron. La fama moto de la Maksimoj: »Niaj virtoj estas plejofte nur maskitaj malvirtoj« esprimas koncize la cent-kaj centfoje variitan ĉefpenson de la tuta verko. La homo estas sklavo de vanto, envio, egoismo, gloramo, sed tion ĉiu volas kaŝi unuavice antaŭ si mem. Ne tiom antaŭ la mondo, kiom antaŭ ni

mem ni ludas komedion eternan por konservi nian memestimon servante niajn proprajn interesojn kaj pasiojn. La Rochefoucauld estas unu el la unuaj kaj plej grandaj malkovrantoj de la senkonsciaj mensogoj de l' homo. La Maksimoj donas riĉan materialon eĉ al la modernaj psikologoj.

Certe, ĉi tiu verko apartenas al la eternaj. Estis tre feliĉa elekto, ke s-ro Waringhien tradukis ĝin en Esperanton. Pro tio, kaj pro la bela traduko, ni ŝuldas al li rekonon kaj koran dankon.

A. K.

Literatura Mondo faris al mi tre flatan honoron, petante ke mi faru ian recenzon pri la verko de nia eminenta samideano, profesoro G. Waringhien. De pluraj jaroj mi ekzameas en la nomo de la Akademio (Sekcio de Kontrolo), la novajn verkojn aperantajn en nia literaturo; sed tiam miaj kritikoj neniel tuŝas al la enhavo de la libro, sed nur al la formo, al la stilo. Mia tasko nome konsistas nur en tio, ke mi atentu, ĉu la lingvo estas korekte konforma al la Zamenhofaj principoj. Tial miaj rimarkoj ĝis nun rilatis precipe al la gramatiko, kaj, pro kutimo, hodiaŭ mi faros la samon; mian taskon cetere tre faciligas la arango mem de la verko, kies franca teksto kuŝas maldekstre, fronte al la traduko, kiu troviĝas dekstre sur la antaŭa flanko de ĉiu paĝo.

Maksimo 1. »kiujn hazardo«, mi preferus: *LA hazardo*.

Kaj 2. »estas plej granda el«, mi prefere dirus: *LA plej granda*. Cetere tra la tuta verko oni konstataŭ ian heziton eĉ la uzado de la artikolo kaj de la determinaj vortoj *tiu, ia, iu kaj unu*. La tradukinto ŝanceliĝas inter la koncizo kaj la klareco.

7. »sed vere ili estas«; mi dirus *pli vere*.

10. »la starigo de alia«; mi dirus: *de iu alia*.

11. »malaŭdaco«; kial ne diri *timemo*, ĉar ni jam havas tro multe da *malvortoj*.

24. »kaj, krom granda vantemo«; mi ripetus *ke* antaŭ krom.

33. »La orgojlo«; ĉu ĉi tiu nova malbela vorto estas vere necesa, apud *malhumilo, fiereco, fanfarono, vanto, malmodeŝto* k. a.?

37. »kulpis«; laŭ la teksto: *kulpas*.

46. »nur ia gusto« estas tre bona anstataŭ *nur gusto*.

46. »oni ne devas pli diskuti«; mi dirus: *oni DEVAS NE pli diskuti*, laŭ la paragrafo 219. de la *Plena Gramatiko*.

54. anstataŭ »senigi je«, mi preferus *senigi EL* aŭ *DE*.

54. anstataŭ »oblikva vojo«, *chemin détourné*, oni dirus pli ĝuste, *malrekta, kurba, dekliniĝa*.

55. »respektatestojn«; la tradukinto evitas la vorton *homagio* de Wüster kaj eĉ la pli simplan *omago* de la *Plena Vortaro*.

62. »tiu, kian«; pro la klareco, mi ripetus *sincereco* post *tiu*.

65. *prudento* en la komuna lingvo havas la sencon de racio en filozofio; kaj la franca vorto *prudence* tradukiĝas kutime per *singardo* pli ofte ol *per prudento*.

73. »malofte eblas trovi tiajn«, mi prefere dirus: *sed malofte oni trovas tiajn*.

80. »sprito«; la traduko de la franca vorto *esprit* ne estas ĉiam facila: jen *sprito*, jen *spirito*, jen *subtilo* (258.), jen *inteligento* (290).

82. »pasajo«; ĉi tiu vorto, kvankam uzita de Zamenhof, ne ofte renkontiĝas; oni preferas *okaziĝo, okazajo, okazintaĵo, fariĝo, evento*.

85. post *ricevi* mi aldonus *de ili*.

97. »la amplekso da klareco de la sprito«; ĉi tie anstataŭ *da* mi preferus *de*, laŭ la paragrafo 261. Rim. c. de la *Plena Gramatiko*.

98. »aŭdacas«; prefere: *kuragas*.

100. Anstataŭ *gracieco*, kial ne uzi *galanteco*, kies radiko *galanta* troviĝas en la *Plena Vortaro*?

111. »korestrinon«, tre bone eltrovita vorto.

115. mi ripetus *estas* antaŭ *malfacile*.

115. »sen ke« tie ĉi estas aprobinda.

125. »*ĉe iu loko*«; la uzo de *iu* ĉi tie estas aprobinda, anstataŭ *unu*.

144. »*kaŝa*« anstataŭ *kaŝita* apartenas al la nova skolo, kiu deziras l'adjektivon senpere de la verbo.

147. »*malmultaj*«; mi aldonus *homoj*.

150. »la donatajn laŭdojn«; mi prefere dirus: *la laŭdojn AL NI donatajn*.

152. La uzo de *fremda* en tiu senco estas tre bona kaj tre oportuna: Ne doloras frapo sur *fremda* kapo.

160. »*ĝi* oni ne devas rigardi«; kredeble preseraro: *ĝin*.

163. »*dum ties kaŝitaj motivoj*...«; mi prefere dirus: *kies kaŝitaj motivoj tamen estas tre saĝaj*.

164. anstataŭ »*inda JE*«, mi preferas *inda POR*, *inda PRI*, *inda AL*.

169. »malpenemo«?? Eble ni bezonus en iaj kazoj la vorton *pigra*, kvankam ni havas *mallaborema*, *dormema*, *apatia*, *senenergia*, k. a.

182. Ankaŭ mi preferas »*kuracajo*« al *kuracilo*; *ilo* estas pli ĝuste ia aparato aŭ instrumento.

190. Mi dirus: *Nur grandanimaj homoj rajtas havi grandajn malperfektojn*.

200. »*se* ne akompanus vanto«; pli klare: *se GIN ne akompanus vanto*.

201. post *en si mem*, antaŭ *per kio*, mi metus *ion* aŭ *tion*.

205. Bone; ankaŭ mi dirus *sia* kaj ne *ilia*; »la amo al *sia* trankvilo« = *la virinoj amas sian trankvilon*.

207. »*kun liaj aĝo kaj situacio*«; ĉi tiun parolturton mi ne ŝatas, kvankam ĝi estas ofte uzata; mi prefere ripetus *kun lia: proporciaj kun lia aĝo kaj kun lia situacio*.

212. »Plej multaj juĝas homojn«; mi preferus: *la plej multaj homoj juĝas la aliajn nur*...

212. »*laŭ iliaj furoro, aŭ situacio*«; prefere: *laŭ ilia FAMO, aŭ laŭ ilia situacio*.

220. »*vantemo, hontemo*«; *vanto kaj honto* sufiĉas.

221. »*perdi vivon*«; kial ne *LA vivon*?

222. »*konebligas*«; ĉu *konigas* ne sufiĉas?

226. »*iela maldankemo*«; *iela* = *ia speco de*.

231. »*saĝi*« (*esti saĝa*), ankaŭ apartenas al la nova skolo.

239. »*sekreti*«, same kiel *prudenta kaj domaji*, estas perfida; ĝi tute ne signifas *garder le secret*; ĝi signifas preskaŭ la malon: *confier un secret*; Vidu la *Proverbaron*: N-ro 457.*

256. »En ĉiuj profesioj, ĉiu afektas«; post ĉiu, pro la klareco, mi aldonus *homo*.

262. »*oferi*« = *foroferi*.

263. »*donemo*« = *donacemo*.

273. post »*kelkaj*« mi aldonus *personoj* aŭ *homoj*.

276. »*fortetajn pasiojn*«, aŭ simple *etajn*.

288. tie ĉi troviĝas »*kuraciloj*«, anstataŭ *kuracajoj*.

306. »*sendankaj*« = *sendankuloj* aŭ *sendankaj homoj*.

310. »*kelke malsaĝa*« = *iomete malsaĝa*, estas aprobinda.

312. »*la geamantoj ne enuigas*«; *enuas* sufiĉas.

337. Post »*kiaj*« mi metus *ilin* aŭ *da ili*, pro la klareco.

344. anstataŭ »*plej multe*«, mi preferus *la plej multo*.

365. anstataŭ »*ne ĉiam*«, mi dirus *neniam*.

371. »Preskaŭ ĉiam kulpas la amanto, se ĝi...« Ĉi tiun »*ĝi*«, anstataŭ *li*, oni ne povas akcepti; se oni volas nepre ne indiki la sekson, oni povas en ĉi tiu frazo uzi la pluralon kaj la pronomon *ili*, tial ke *iŝi* ne ekzistas.

378. Kial forigi »*sed*« antaŭ *konduton*?

392. Mi dirus laŭ la teksto: *ĝin pacience toleri, kiam ĝi estas malbona*. Ni ne devas tro foroferi la klarecon por la koncizo.

* Ni kredas, malgraŭ la Z-a ekzemplo, ke *sekreti* signifas pli logike *gard* ol *konfidi* sekreton. Tion pruvas cetere ankaŭ la Z-a *sekretema* (= diskreta), kies senco estas *ema sekreti*, t. e. *gard* sekreton. (Red.)

398. Ni kredigas«, anstataŭ ni *persvadas*, estas tre bona en ĉi tiu frazo.

401. »*la belaj*«? la *belaj kio*? ĉu *viroj*, ĉu *virinoj*? ĉu *aferoj*? Mi dirus laŭ la teksto: *la belaj personoj*.

424. »*obstinemaj*«; ĉu *obstinaj* ne estus sufiĉa?

443. »*svingas nin*«; *svingi* (germane *schwingen*) ne taŭgas; mi preferus *persekuti*, *eksciti* aŭ eĉ *agiti*.

448. Post »*ĝibaj*«, pro la klareco, mi nepre esprimus *apiriloj*: *la ĝibaj spiritoj*.

461. Mi dirus *per* aŭ *SUB puno de morto*; ni evitu plej eble la prepozicion *je*, kaj konservu *ĝin*, pro kutimo, por precizigi la lokon aŭ la tempon: »*li staris je kvar metroj for de mi; mi forveturos je la sepa (horo) kaj duono*.«

497. »*Nek bela, se ne juna*« estas tro konciza; mi dirus *nek esti bela, se ŝi ne estas juna*.

504. »*ol la de ili elektita*«; *la* ne determinas sufiĉe; mi preferus *tiu*.

504. p. 97. »*kien oni ne povas*«; mi dirus *povas*, tial ke *on ne saurail* estas francismo.

504. p. 99. »*subestis tiu diferenco*«; mi tre ŝatas ĉi tiun novan esprimon *subesti*.

504. p. 99. »*pri alio*«; *alio* (ali-o) per si mem estas pli korekta ol *ali-u*, *ali-am*, *ali-es*, k. c., tamen ĝi ne povas signifi *io alia*, ne pli ol *util-o* kaj *varm-o* signifas *io utila kaj io varma*.

Kaj nun la leganto facile konstato, ke ĉi tiuj miaj bagatelaj rimarkoj neniel tuŝas malvalorige la bonegan, tre utilan laboron de nia juna eminenta samideano.

H. Boucon

✓ LA JUNA VIVO. 1934—1935. (Kunligita jarkolekto de gazeto por la junularo.) West-Grafdijk (N. H.) Nederlando. 196. paĝoj. Prezo: sv. fr. 1.50. Bona papero, multaj desegnaĵoj.

Kun karesa mano mi prenas tiun ĉi simplan libron por ĝin prezenti al vi: Oni povas ĝoji, ke aperas tia gazeto por junularo, precipe inter 12—16 jaroj. Oni jam kelkfoje provis eldoni tian junularan gazeton, sed eble neniu plenumis tiel bone kaj regule sian devon. La kunligita jarkolekto de julio 1934 ĝis majo 1935 estas valora, kaj ĉiam aktuala libro tiel por komencantoj, kiel por progresantoj; taŭga ankaŭ por plenaĝuloj, por grupoj, kunvenoj. Oni trovas en ili 20 lecionojn de la gramatiko kun bildoj iom laŭ la metodoj modernaj, interesajn kaj vere taŭgajn; krome mallongaj kaj longaj historioj, rakontoj, anekdotoj, ŝercoj, enigmoj, infan- kaj societludoj kaj kantetoj kun muziknotoj abundas, kolektitaj el diversaj landoj, sed precipe el Nederlando. Certo kelkaj rakontoj kaj bildoj estas prenita el similaj nederlandaj eldonoj. La lasta kajero estas tute dediĉita al la *mondpaco*. Nur anoncetoj de korespondemuloj multe mankas. La lingvo kaj stilo — konsidere ke temas pri gazeto — estas laŭdirde bona. Mi trovis nur malmultajn neplacajojn. Ekzemple: »*laŭ l' rand*« la apostrofita uzo de »*la*« post »*laŭ*« certe ne estas konvena. — Post »*kvazaŭ necesus kondiĉa*« tempo, do ne »*ŝajnis kvazaŭ mi tirisilin*«, sed »*tirus*«. Ce alvoko, ordono taŭgas la imperativo: do anstataŭ »*Estas tempo, ke Helen ion lernas*« plibone: *lernu*«. Grava eraro estas: »... *viroj falis de la ĉevaloj kaj restis kuŝi*...«, ĝuste estas: »*restis kuŝantaj*«. Ce akuzativo oni ne povas forlasi per apostrofo la finon, do en poemo, kanto: »*zumis ĝian glor*« estas nepre malbona, necesas »*gloron*« kaj — alimaniere oni devas aranĝi la poemon. Kion signifas »*refi la velojn*«? — Post »*esperi*« ne necesas imperativo »*Mi esperas, ke la gvidantoj rakontu al ni*« (anstataŭ »*rakontos*«); »*mi esperas, ke sekvu*« (anstataŭ »*sekvos*«) estas netaŭgaj. En la frazo »*Cu interesa tio?*« mankas »*estas*«. En la frazo »*Sed tio povas nur piede*« mankas: »*esti farata, okazi*«, aŭ simple: *Sed tion vi povas*... »*La patrino demandis al mi*« anstataŭ »*de mi*« kaj »*Mendis al li kaptilon*« anstataŭ »*de li*« certe ne montras bonan uzon de »*al*«! Tamen tiuj eraretoj nenion forprenas el la taŭgeco de la libro. Ekzemple verketoj de Berta Sutt-

ner, Lagerlöf, Peter Rosegger, kanteto el Riga: »Junularo formu rondon« (senriproĉa teksto) montras la valoran enhavon. Laŭ la surpreso kelkaj numeroj aperis en 5000 ekzempleroj. Mi deziras dekobligon, pli multan kontakton kun la junularo el diversaj landoj kaj por tia konstante uzebla verko nepre necesan — *enhavliston!* Espereble ĉio realigos kaj nia movado floros tie, kie ĝi precipe devus ĉe la junularo. P. B.

ROLF NORDENSTRENG: LA HOMAJ RASOJ DE LA MONDO. (Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm, 212 p. kun multaj ilustraĵoj. Prezo: Kr. sv. 3.25 broŝ.; 4.75 bind. + afr.).

La reflektoro de la publika intereso nuntempe ofte radias al la rasproblemo, sed al la publiko ĝenerale la temo estas tiom nebulita kaj kovrita de superstiĉoj, ke ni devas ĝoje saluti verkon, kiu objektivite, science, kaj samtempe por ĉiu interese, klarigas la problemojn. Kaj la verko de Nordenstreng estas ĝuste tia, do nepre inda por esti tradukita en naciajn lingvojn. Eble estas kelkaj partoj, kiuj ŝajnas esti tre kuraĝaj, sed la kuraĝo neniam estis difekto; speciale ne, se ĝin bridas la absolute scienca konvinkigo, kiu kunigas al la dezirinda objektiveco.

Laŭ Nordenstreng la ras-scienca estas multe pli grava problemo, ol la plimulto de la homoj kredas, kaj la *scienco* prijuĝo de tiu ĉi problemsfero havas netakseblan valoron el la vidpunkto de la internacia, interhoma ordo. Sed se tiu ĉi scienco pleniĝas per superstiĉoj, se faktoj estas de ĝi troigitaj, se aliaj faktoj estas preterlasitaj, entute se tiu ĉi scienco ĉesas esti scienco, tiam el la medikamento fariĝas simpla kaj mortiga veneno. La rasbiologio estas juna scienco kaj havas multe da farotaĵoj. Oni devas esti do singardema, ĉar ekzistas ankoraŭ multe da ne klarigitaj faktoroj. Ni estas ĉe la komenco de l' komenco, kion Nordenstreng ne hontas konfesi kaj ĝuste pro tio estas tute rajte, ke li rekomendas singardemon kontraŭ la tromemfidaj profetoj de la nova scienco. Tiuj profetoj jam ĉion scias laŭ sia aserto, sed efektive ili estas, kiuj pleniĝas la sciencan per superstiĉo. La aŭtoro skermas per la glavo de la scienco kontraŭ tiuj superstiĉoj kaj temperamente argumentas kontraŭ la modaj teorioj. Estas ege interese ekz. tiu parto, kie li asertas, ke la demando: kiu homraso estas la plej bona, estas absolute nescienca, senpripensa, neĝusta kaj eventuale eĉ ne bonintenca. Ĉe la bestspecoj oni neniam demandas, kiu ĉevalo, kiu hundo estas la plej bona, sed, kiu ĉevalo estas la plej taŭga por rajdo, kiu por ŝarĝtransporto, kiu hundo estas la plej bona domgardanto, kiu la plej taŭga por ĉaso. Kiam oni faras la demandon pri homrasoj, oni devas adapti la saman logikon kaj diri: Kiu homraso estas la plej taŭga por iu loko kaj celo. La teorioj, kiuj estas la apogoj de la nuna germana sistemo, per kelkaj, mallongaj vortoj estas eligitaj el la rondo de la scienco en la libro de Nordenstreng.

Post la konciza difino de la diversaj konceptoj, la aŭtoro konstatas, ke la sola raskrea forto estas la kruciĝo, ĉar laŭ li la mutacio, t. e. la subita ŝanĝiĝo en la raso, ne povas krei rason kaj ties esploro nepre forigos la hazardon el ĝiaj ingrediencoj. Oni diras, ke la kruciĝoj estas danĝeraj, tiu danĝero efektive ekzistas, sed ankaŭ la ne-miksiĝo havas specialajn danĝerojn kaj ni ne forgesu, ke mem la vivo havas danĝerojn...

Temperamente batalas la aŭtoro kontraŭ la teorio de Darwin, kiu laŭ li ankaŭ havas multe da superstiĉoj en sia fundo, ĝia ĉefa esenco ja estas la sinodoro de la plej perfekta estaĵo de la tero, per alia vorto la homo. Laŭ Nordenstreng la darvina teorio ne estas taŭga por solvi tiujn problemojn, kiuj kreiĝis dum la evoluo de la scienco.

Post la ĝenerala parto, Nordenstreng konstruas sistemon, konigante la diversajn tipojn, subtipojn kaj iliajn ĉefajn trajtojn.

La esperantista publiko certe altetaksos tiun ĉi verkon, kiu cetere estis verkita en la ideologio de Esperanto,

kun la finkonkludo, ke la rasoj devas trovi la manieron de la plej intensa kaj amika kunago.

La eksteraĵo de la libro estas inda al la aliaj eldonaĵoj de la Sveda Eldonejo. La ilustraĵoj estas belaj kaj bone elektitaj. Prof. Migliorini verkis antaŭparolon al la libro.

F. Szilágyi.

WILHELM WINGEN: KIEL ARANGI KURSOJN KAJ GRUPVESPEROJN? (Heroldo de Esperanto, Rotterdam, 48 p.)

La libreto konsistas el la jenaj ĉapitroj: Pri la metodo, Konsilioj, sufiĉe ĝeneralaj, pri la instruado, ĝeneralaj direktivoj por la kursestro, kursoj por komencantoj, la kursestro, perfektigaj kursoj, grupvesperoj.

Utila libreto.

✓ SUB LA SIGNO DE L' ESPERO. NOVELETOJ KAJ RAKONTOJ EL LA ESPERANTISTA VIVO. (Heroldo de Esperanto, Rotterdam, 63 p.)

La libro estas kolekto de noveletoj, alvenintaj al konkurso de Heroldo pri la esp-ista vivo. La redakcio mem recenzas la volumeton en la antaŭrimarkigo, dirante, ke: »La noveletoj ĝenerale ne pretendas specialan literaturan valoron: kelkaj estas eĉ iom naivaj. Tamen kiel tutaj ili prezentas beletan bukedon da skizoj pri la pensoj, deziroj, sopiroj, ĝojoj kaj seniluziigoj de nia samideanaro en diversaj landoj kaj kontinentoj.«

✓ LA MULTEKOLORA LIBRO. (Heroldo de Esp. Köln, 126 p. Prezo: Germ. mk. 1.05; sendk. 0.15.)

Estis bonaŭca ideo elekti artikolojn el la malnovaj numeroj de Heroldo. La elekto estas ĝenerale bonsukcesa kaj escepte kelkajn, la artikoloj, noveloj ktp. meritas la eternigon.

En la aro de la plej diversaj lernolibroj, kies nombro, ni devas konfesi, estas iomete troa, la Multekolora libro estas unu el la plej bonaj.

F. Szilágyi.

✓ RICHARD MEYE: LA LONGA VOJO. (Romano. Heroldo de Esp., Köln 139 p. Prezo: Germ. mk. broŝ. 2.—; bind. 3.40; ekster Germ. kaj Svisujo broŝ. 1.50; bind. 2.25.)

La longa vojo estas la ŝoseo, pri kiu la verkisto diras, ke ĝi estas peniga, sed belega. Strangajn beloĵn ĝi havas. Ilin oni ne povas vidi; oni povas nur travivi. Io nepriskribebla regadas sur la longa vojo.

La libro rakontas pri vagabondoj, pri la vagabondemo, kaj entute ĝi restas ia nereala rakonto, ĉar tio, pri kio la aŭtoro asertas, ke ĝi ne estas priskribebla, ankaŭ restas tia kaj finfine ni ne estas sufiĉe konvinkitaj. La verkisto vivas en ia tranca atmosfero, kiu restas al ni fremda, kvankam ne malinteresa. Ni preskaŭ havas la senton, ke estus bone transpreni la trancon de la aŭtoro, sed vane. La vortoj estas belaj, sed ne ekvivas en ni, la figuroj estas tiom senkorpaj, ke ni havas nenian imagon pri ili. Sed estas interese kaj esperige el la vidpunkto de la venontaj verkoj de la aŭtoro, ke entute tamen restas io necerta en ni post la lego de la romano, ni ne estas kontentaj, sed ni havas pli bonan opinion pri la verkisto, ol pri la verko.

Mi ne povas pli koncize kaj pli komprenige klarigi mian opinion, ol per la hungara ŝercdemando: La mondon ĝi trapektas, tamen kokino ĝin transpaŝas. Nu, kio estas tio. La respondo estas: la rad-postsigno. La romano de Meye prezentas nur la abstraktan parton de tiu ĉi problemo: la mondon ĝi trapektas, sed Meye forgesas pli-proksimigi al ni la ne sufiĉe motivitan abstraktaĵon per la dua parto, per la dika, sed kompreniga realo: tamen kokino ĝin povas transpaŝi...

Sed espereble la verko ne estis la lasta voĉo de la aŭtoro, kiu meritas la severan kritikon, ĉar li havas talenton.

F. Szilágyi.

MOZAIKO. LEGOLIBRETO POR KOMENCANTOJ KAJ PROGRESINTOJ. (Heroldo de Esp. Rotterdam, 52 p. Lerte redaktita legolibreto.

FERENC SZILAGYI: DR. SZILAGYI'S KURS I ESPERANTO. Stokholm. Förlagsföreningen Esperanto u. p. a. 1935.

Tiu ĉi belaspekta libro estas eldonita de la Sveda Eldona Societo kaj tio mem signifas unuarangan ekster-ajon, tre belan presteknikon kaj krome — fidon de la eldonistoj al eksterlanda aŭtoro, (kiu cetere faris ofte laŭdatan laboron dum kelkaj jaroj en Svedlando).

La plej karakteriza trajto de la metodo estas la uzado de bildoj. Kvankam tiu ĉi maniero ne estas nova, ĉiuokaze la maniero de ties uzado ŝajnas esti diferenca de la ĝisnunaj bildmetodoj. La bildoj neniam estas vanaj ornamoj, sed ĉiam klarigaj kaj ĉefe ili unuavice klarigas *sentojn kaj movojn*, verbojn do, duavice adjektivojn kaj nur la tria vico restas al la substantivoj, kiujn la komencanto pli facile povas anstataŭigi, ol la aliajn. Bonŝance la aŭtoro havis unuarangajn kunlaborantojn, la karikaturna genio de Oscar Jacobsson (Adamson-serioj) kaj la talento de la aliaj desegnistoj servas bonege al la celo, kiun la aŭtoro bonhumore deziras atingi.

La lernolibro estas dediĉita por svedoj, sed jam la unua rigardo konvinkas nin pri tio, ke ĝi proponas sin por alilingvaj variantoj, ĉar la nacilingva teksto estas tute minimuma, disigita de la esperanta teksto kaj la pedagogia konstruo ŝajnas esti absolute internacia.

Entute: la lernolibron mi legis kun granda plezuro kaj ĝoje mi spertis, ke el la vidpunkto de la metodo kaj aplikado oni volonte pravigas la aŭtoron: la libro estas plenigita per ideoj, sprito kaj pedagogia servo. Por ĉiuj, kiuj gvidas kursojn kaj deziras bonegan rezulton, mi rekomendas tiun ĉi verkon varmkore.

Jozefo Mihalik.

Indicatorul reprezentantilor de Comert din Bucuresti de Dr Victor Scărlătescu. ADRESLIBRO DE LA KOMERCAJ REPRESENTANTOJ EN BUKARESTO, RUMANUJO, 1935. 150 paĝa kvarlingva eldono de komerca kaj industria ĉambro en Bukaresto. Valora dokumento pro komerca uzo de la lingvo. Antaŭparoloj, varlistoj kaj klarigoj ankaŭ en Esperanto. En la esperanta teksto multloke mankas la interpunkcioj (komoj, streketoj). Cetere bonega kaj zorga eldono.

Ni petas ĉiujn amikojn admoni la nomitojn al resendado de nia propra libro, kion ili ne faris post ses alvokoj.

Teodor Čejka, Bystrice pod Hostýnem
Dr. S. Mersiĉ, Dobrovice
A. Salbabová, Ivančice
K. Scharfenbergerová, Jaroměř, Klouzkov 119
A. Radó, Lučenec, Deák Ferenc u. 4
J. Dubný, Orlová 223
J. Demth, Polaun
J. Hrabáček, Zampach
S. Slezák, Střeh
L. Ridarowski, Sečovice
V. Havránek, Uh. Brod
J. Müller, Upice
B. Kratochvíl, Tábor Kozolehy
István Pető, Nové Zámky, Tekovská lud. banka
Dro Leopold Pospíšil, Olomouc, Mozartova 22
Rafael Bartal, Šamorín
Karel Loveček, Holešov na Moravě

Recenzotaj libroj

M. SYGNARSKI: LECIONOJ DE MONDOLINGVO ESPERANTO. Eldonis Scienc. Esp. Rondo. Bydgoszcz. 22.5×14.5 cm. 108 paĝa.

JARLIBRO 1935. Eldonis Universala Esperanto Asocio, Genève, I, Tour de l'Île, Svislando. 16.5×11.5 cm. 80 paĝa.

PETR DEN: KIEL FARIGI FACILE KREANTO. Tradukis Moraviaj Esperanto Pioniroj, eldonis Moraviaj Esperanto Pioniroj, Olomouc, Riegrova 17. — 19×13.5 cm. 230 paĝa. Nur bindita Kč. 26.—

HIROKAZU KAJI: JAPANUJO HODIAU. Eldonis Jamato, Tokio, Japanujo. 19.5×13.5 cm. 109 paĝa. Prezo: svfr. 1.60 bindita, inkluzive sendkostoj.

DELFI DALMAU: »DIDAKTA« ILUSTRITA LERNOLIBRO DE ESPERANTO. Eldonis Delfi Dalmau, Barcelona, (Apart. 5081.) 24×17 cm. 24 paĝa. Prezo: broŝ. 1.— angla ŝilingo.

UPTON SINCLAIR: PETROLO vol. I. Tradukis: William Bailey. Eldonis: The Esperanto Publishing Co. Ltd. London W. C. 1. 142, High Holborn. 19×12.5 cm. 306 paĝa. Prezo bind. 3/6, afranko —/6.

EL VERDAVALO revuo Nr. 1, 2, 3. Eldonis Verda-
valo-Eldonejo, P. O. Box 149, Sandakan B. N. Borneo 22×14.5 cm. po 16 paĝoj. Prezo afrankite 2 respond-
kuponoj.

INTERNACIONALA ELEKTROTEKNIKA VORTARO. Eldonis Elektroteknika internacionala Komisiono 28, Viktoria street Westminster London S. W. 1. 29.5×21 cm. 64 paĝa. Prezo 1/—.

N. van HICHTUM: KUDLAGO LA MALGRADA ESKIMO. Tradukis: S. D. Mannoury. Eldonis: Eld. Soc. Esperanto, Stockholm I. Formato 12.5×18.5, cm. 40 paĝa. Prezo broŝ. 0.75 svisaj kronoj.

HELPSERVO INTERNACIA. Eldonis: Sekretariejo de la Libervola Civila Helpservo Internacia, 6, Klaraweg, Bern, Svislando, Formato 20×14.5 cm. 16 paĝa. Broŝ.

JUBILEUMBOEK 1911—1936. de la FEDERACIO DE LABORISTAJ ESPERANTISTOJ EN LA REGIONO DE LA NEDERLANDA LINGVO. Formato: 24×16 cm. 160 paĝa. Prezo 0.50 centoj.

L. SINHA: HINDO RIGARDAS SVEDLANDON. Eldonis: ELD. SOC. ESPERANTO, Stockholm I. Formato: 21×14 cm. 200 paĝa. Prezo: broŝ. 3.75 svedaj kronoj, bind. 5.— svedaj kronoj.

M. MÜLLER: REMBRANDT LA MAGGIISTO. Eldonis: Holanda Eldonejo »Esperanto«, Amsterdam. Formato: 23×15, cm. 160 paĝa. Prezo: 2.25 ned. Guld. kaj 0.25 Sendkostoj.

I. G. Mieremet: CU MI DORMAS »LIBERA« DE SANDETRUJAJ TERRADIOJ? Tradukis: M. E. Giltay. Eldonis la tradukisto, Nederlando, Voorburg, Parkweg 99. Formato 20.5×13.5 cm., 15 paĝa. Prezo 0.40 sv. fr.

C. C. COWLING d. B. E. A.: PRI LA IAMAJ TASMANIANOJ. Eldonis: la aŭtoro, HOBART, Christ College, Tasmania. Formato: 22×14 cm., 12 paĝa. Prezo 9 pencoj anglaj.

Al kriza drako
Surpriza hako:
AELA!

LINGVO * LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo, Budapeŝt IX. Mes-
ter-utca 53. V. 5. Hungarujo.
Aparte aĉetebla. Unu numero
kostas 0.20 sv. fr. aŭ egalvaloron.
Tri numeroj kune ekspedataj
kostas nur 0.30 svisaj frankoj
aŭ proksimuman egalvaloron.

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

Aperas kvaronjare • Nro 2.1936

La literatura hazardo

— F. Szilágyi —

La hazardo estas la patrino de la historio. Stoneto ekiras ie supre sur la montopinto kaj baldaŭ lavango ruliĝas al homa vivo kaj ofte al la homa historio. Se la korsika advokato, Buonaparte, estus restinta fraŭlo, kiu scias, kia estus nun la geografia karto de Eŭropo.

Sed ni eble preterlasu la esploron de tiuj misteraj fortoj, kiuj formas la vivon, kaj ni preteru ankaŭ la diskutojn pri la efektiva ekzisto aŭ neekzisto de la hazardo, (en tiu senco, ke ĉio estas difinita: do hazardo ne ekzistas). En la vidpunkto de ĉiutagulo estas ja egale, kiel oni nomas la fenomenon, la esenco estas, ke ni havas koncepton sub la nomo de la hazardo kaj nun tio sufiĉas.

La hazardo estas grava plektanto de la vera vivo kaj egale grava faktoro de la literaturo. Estas tuta kategorio de la literaturo (en ĝenerala senco), kiu vivas nur el la implikaĵoj de la hazardo, ni pensu nur pri la farsoj, pri la diversaj zigzagoj kaj erarludoj de tiu ĉi literatura speco. En ĝi la hazardo ricevas ekskluzivan potencon. Komprenible, dependas de la verkisto, kiel li uzas tiun ĉi efekt-ingrediencon kaj kian profundon li povas al ĝi doni. Efektive, dependas de la verkisto, ĉu la hazardo donas senperspektivan, mallertan desegnon, aŭ plenan iluzion kaj kompletan literaturan ĝuon. La servo de la hazardo povas esti nur momenta ekfunkciigo de la rid-, aŭ plormuskoloj, sed povas esti ankaŭ tute meditiga kaj malefemera. Vi tuj komprenos, kion mi volas diri, se vi pensas pri la unua granda filmo de Charley Chaplin, pri la OROFEBRO. Vi certe rememoras tiun ĉi filmon, kies scenejo estas la neĝkovrita norda regiono de Alasko. Rememoru nur tiun scenon el la filmo, kiam la stranga, somervesta figuro de Chaplin iras sur montvojo, kiu apenaŭ estas pli larĝa ol li; sed li fajfas kaj elegante turnas sian kanbastoneton en la frosto, dum sube malsate oscedas profunda abismo. Sendube tiu ĉi konduto estas simpatia al ni, do despli ni ektimas, kiam malantaŭ Chaplin ni ekvidas grandegan urson, kiu rapide trovas post nian heroon. Kio okazos nun? La vojeto estas tute mallarĝa kaj estas antaŭvideble, ke la urso puŝos lin en la abismon. Tamen, ne, ĉar unu paŝon antaŭ la katastrofo, la urso eniras groton, kiun la rokoj kaŝis antaŭ la rigardanto, kaj kiam ni tuj poste revidas la urson sur la montvojo, ĝi jam elvenis ĉe la alia flanko kaj trovas jam antaŭ Chaplin, kiu absolute ne scias pri la danĝero, kiu lin minacas. Kun la sama flegmo li iras sur la mallarĝa vojeto super la abismoj de la eventualaĵoj. Nu, tiu ĉi sceno estas konstruita sur la bazo de la hazardo, sed vi ja sentas, ke ĝi estas ĉi tie iom pli multa ol nura teknikaĵo; ĝi estas jam filozofio kaj — literaturo.

Sed nun ni rigardu kelkajn ekzemplojn pri tio, kiel

aperas tiu ĉi grava literatura faktoro ĉe esperantistaj verkistoj. Mi ne volas verki sisteman studon pri tiu ĉi temo (finfine mi volas verki artikolon kaj ne libron), kaj tial mi ne komencas la pritraktadon ĉe niaj plej fruaj verkistoj kaj eĉ ne ĉe Bulhuus, kiu uzas tion ĉi faktoron tiom abunde, ke ties analizo mem pretendus la tutan amplekson de mia artikolo.

Mi elektis nur kvin verkistojn, sen tio ke mi volus ilin distingi per tiu ĉi elekto. Krome, ĉi-okaze mi rezignas pri ĉia kritiko: mi simple nur analizas, al kia verkista kvalito respondas la diversaj specoj de la hazardo.

Ni povas komenci la pritraktadon per *Jean Forge*. Eble ni prenu lian lastan romanon »Mr. Tot aĉetas mil okulojn«, en kiu, kiel vi certe scias, temas pri milionulo, kies riĉo jam ne povas doni plu plezurojn kaj kies spleno proksimigas lin jam al memmortigo. La homoj ja havas maskon kaj neniam li povos vidi la veran homon. Malriĉa kaj ruza inventisto havas eltrovon: aparaton, kiu ebligas vidi ĉion en ĉiu loko, kiu estas kontaktigita al la centro de televizilo. Sed li ne havas monon por konstrui la aparaton. Li do faras planon: la riĉegulo aĉetu hotelon kaj oni provizu ĝin per televizia aparato, per kiu li povos vidi ĉiujn okazaĵojn de la hotelo, la homoj do, laŭ lia deziro, aperos senmaskaj. Kaj la ruzulo fine, kun la helpo de hazarde trovita homo, (kiu estas absoluta kopio de la riĉegulo, cetera senmorala fripono) kaj helpo de same nemorala virino, kiu tamen fine akiras nian simpatian, nu jes, tiu ruzulo intencas ege ruze murdi la riĉulon, kiu tute blinde direktas siajn paŝojn al la neevitebla pereco. Kaj tio okazus, sed...

Antaŭ nelonge apud Budapeŝt okazis aŭtokonkurso. Siblis la aŭtomobiloj kaj granda publiko staradis rando de la ŝoseo. Kaj ĉe iu punkto la homoj subite ĉesis priatenti la virtuozojn de la rapido, ĉar iu rimarkis, ke virtuozo de la malrapido, raŭpo rampadas trans la alian flankon de la ŝoseo. Malfeliĉa raŭpo. Ĝia katastrofo estis neevitebla. La radoj de la rapidaj aŭtoj preskaŭ ĉiusekunde traplugis ĉiun linion de la vojo kaj eĉ unu punkto ne restis virga de la aŭtoradoj; kaj tamen kio okazis? La raŭpo nenion sciis pri ĉio ĉi, sentime kaj flegme rampis al la alia flanko kaj — atingis ĝin inter la vivukriadoj de la publiko. Bonvola mano metis la triumfan raŭpon sur arbuston, por ke ĝi ripozu tie post la malfacila vojo.

Tiu ĉi raŭpo estas bonŝanculo, sed mr. Tot, la naiva milionulo estas minimume tiom bonŝanca kiel ĝi: li savigas, ĝuste pro la ekzisto de la similulo, kiam ni ne povas plu fidi je lia saviĝo.

Forge havas nur unu celon, doni distron al la

leganto. La temo estas aventurromana kaj nur iomete ekbriletas en ĝi iom da mondkoncepto. Sed la ellaboro estas tute literatura kun solide organizita fundamento. Kaj tiu fundamento estas la hazardo. La artifikon de la verkisto ni ne povas rekonii dum la legado, kaj ni estas ege kontentaj, malgraŭ tio, ke ĉio estis neverŝajna, — sed tre lerte verŝajngita. Fantastaj hazardaĵoj aperas ĉi tie, kiuj celas nur la amuzon de la leganto; sed la traboj ne estas videblaj, ĉar la rakonta talento de la verkisto lerte kaŝis ilin.

Julio Baghy estas tute alispeca verkisto. Por li la rakonto estas ne nur rakonto, sed tezo. Li estas pastro, kiu diras: hodiaŭ mi predikos pri io kaj jen la ekzemplo. Li estas moralisto, individuo esence optimista kaj samtempe pesimista. Se ni rememoras la »Viktimojn«, ni povas rimarki, ke la ĉefheroo, *Johano Bardy* estas idealisto kaj optimisto, kaj ni vidas lian kompletigon en la plene pesimista figuro de Doŝky. La idealismo de Bardy estas ne ĉiutaga kaj estas tiu de la elektitoj, sed mi ne rememoras, ke Baghy speciale motivus tiun ĉi idealismon. Sed la pesimismo de Doŝky estas plene motivita per la hazardo kaj eĉ ne per ĉiutaga hazardo, sed per romantika, skua okazaĵo. Kial? Ĉar la interna eno de Baghy diktas, ke la pesimismon oni devas motivi, sed la optimismon ne. Mem la menciita epizodo estas la jena. Doŝky estas virinmalamanto, ĉar li estis juna pastro, kiam hazarde kaj nerimarkite li prenis konfeson de sia patrino. Pri ŝi li eksciis, ke ŝi estas malĉastulino ktp. Post tiam li forkuras kaj la favoro de la hazardo permesas al li roli sub la nomo de mortinta amiko. Tiu hazardo jam ne estas hazardo por la hazardo, sed projekcio de mondkoncepto kaj de pasia verkistindividuo. Kaj ankoraŭ io. Ĉe Forge ni vidas, ke la hazardo okupas la tutan spacon de la romano, kiu okazas kvazaŭ en la atmosfero de la hazardo. La hazardo de Julio Baghy ne povas esti tia, ĉar ĝi ne estas hazardo por si; ĝia amplekso estas multe malpli granda kaj ĝi rilatas nur detalojn de la rakonto.

La tria, pri kiu ni intencas diri kelke da vortoj, estas *Raymond Schwartz*. Schwartz uzas ankaŭ forman hazardon, super la kutimo de la poetoj. Temas pri liaj poemoj, kie li tiom ludas pri la hazarda formo de la vortoj ke ekz. la koincido de la vorto »harakiri« (t. e. la japana memmortigo) kaj la vorto »har-akiri« (t. e. akiri haron) estas okazo al li por sprita ŝerca poemo.

Sed, krom tio, la hazardo havas gravan rolon ankaŭ en la romano »Annie kaj Montmartre«. La rakonto ĉi tie simpliĝas. Annie alvenas Parizon kaj — granda malfeliĉo, sed tre ĉiutaga hazardo — ŝi perdas ĉe la stacidomo la fianĉon. Parizo estas granda urbo, Annie estas malgranda kaj la hazardkaŭzita malfeliĉo ŝin englutas. Sia korpo estas hontigita, ŝia animo estas tretita kaj tiel fluas plu la malgaja rakonto, kies senco — lumanta el la ŝajne objektiva rakonto — estas ke ne estas ordo en la mondo kaj estus bone prizorgi pli zorgeme la senkulpajn, helpbezonaĵajn simplajn bonulojn, kiuj estas transdonitaj al senrespondaj maliculoj. Ni vidas, ke laŭ la generala rigardo de la aferoj preskaŭ nenio okazas: knabino perdas la vojon kaj la mondo daŭrigas sian vojon. La hazardo ĉe Schwartz ne ŝanĝas la homojn. Ĉio estas jam de pli frue determinita en ili, kaj, preskaŭ mi povus diri, pri ili.

La kvara verkisto estu *Stellan Engholm*. Se ni analizas ekzemple lian unuan rakonton »Al Torento«, ni vidas denove alian uzon de la hazardo. Mem la rakonto estas eĉ pli simpla, ol tiu de Schwartz. Junulo

vivas en apudurba loko. Li vidas la aliajn junulojn, kiuj laboras en la urbeto kaj estas pli bonŝancaj, ĉar ili perlaboras tiom, ke ili vestas sin pli bone ol li kaj havas monon eĉ por amuzoj. Ankaŭ li do sekvas ilian ekzemplon, eklaboras en Torento kaj foje sabatvespere, en la dancejo li ekvidas knabinon, kiu tre ekplaĉas al li. Ŝi estas modesta, tamen tuj li rimarkas ŝin, — jen hazarda renkonto — kaj li eĉ akompanas hejmen la knabinon. Poste klariĝas, ke la junulino estas malfeliĉulino kaj portas sub sia koro infanon de viro, kiu ŝin kun sia bonintenco, sincero kaj helpemo ĉar la ulo, kiun la konfeso ege skuas. Sed poste, kiam la vivo jam kutimigas lin al la rezignacio, dankeme li akceptas ŝin kun sia bonintenco, sincero kaj helpemo ĉar la vivo povas doni nur relativan feliĉon. En la rakonto estas ankaŭ programo. Aperas la virina problemoj kaj kune kun ĝi la sociaj problemoj.

La instrua maniero de Engholm estas tute senpera. Jen tute mallaŭta, ĉiutaga historio; tamen, rigardu, eĉ en la plej ĉiutaga okazaĵo, kiomfoje oni devas revizii sian sintenon. Responde al tiu ĉi mallaŭta, senpoza, sed tre alloga instru-maniero, ankaŭ la hazardo estas tia. Junulo ekvidas en la dancejo junulinon, kiu ekplaĉas al li. La tuta hazardo estas tiel senpretenda, tiel ne frapanta, ke ni preskaŭ ne rimarkas, ke temas pri hazardo. La hazardo ĉi tie iĝis multe malpli grava faktoro ol ĉe la aliaj, ĝi jam ne estas fundamento sed simple ŝraŭbo.

Unu el lastaj romanoj de la Esp-a literaturo estas la »Tur-strato 4.« de *Weinhengst*. Jen verkisto, en kies romano ne la homfiguroj havas la ĉefan rolon, sed la krizo, la senlaboreco, kies efiko povas esti aŭ senmoraligo aŭ memmortigo. La romano havas tute karakterizan tendencon. Ĝi ne predikas rekte, sed la intenco de la aŭtoro estas ne miskomprenbla. Estas interese, kiel akre konturiĝas ĉi tie la rolo de la hazardo. Denove junulo kaj junulino amas unu la alian. Du familioj, du medioj en la atmosfero de la senlaboreco. La knabino malfrue alvenas hejmen. Obtuzaj familiaj scenoj sekvas, la patro estas furioze ebria; — ne, li ne estas kulpulo, sed viktimo de la milito. Lin forportas la polico, por ke la sekureco de la familio estu gardata. Sed en la ĉelo li resobriĝas, vidas la malesperan situacion kaj mortigas sin. Kaj fine la samon faras la du geamantoj, kiuj vidas, ke bonaj ili ne povas resti kaj feliĉaj same ne. La lasta sono de tiu ĉi melankolia simfonio estas la siblo de la gaso, kiu plenigas la aeron super la kadavroj de la juna paro. — La tendenco estas la motoro de la romano. Sed ankaŭ la hazardo havas gravan rolon. La hazardo de *Weinhengst* ekire ne estas eksterordinara, sed li prezentas al ni, kiel ĝi vastiĝas ĝis la granda de furioza lavango. Ĉi tie ni vidas evoluon kaj kunigon de diversaj hazardoj, kiuj fluas rekte kaj nekontraŭstareble en la maron de la homa mistrakto. La renkontigo de la hazardaj atomoj ĉi tie ne estas tiom ĉiutaga, kiel ĉe Engholm, ĝi estas pli proksima al tiu de Baghy. Ĝi nutras sin el du fontoj. La unua estas la verkista individuo de *Weinhengst*, la dua: la terparto, kie *Weinhengst* verkas sian romanon kaj kiu donis scenejon al la romano. En Mezeŭropo estas ja tre malhelaj la konturoj kaj ege timigaj la kontrastoj. La sama tendenco, kiu dolore aperas en la rakonto de Engholm, ĉe *Weinhengst* estas nigra funebro kaj plena indigno. Kaj al tiaj sentoj, kiel ni jam vidis ĉe Baghy, la senpretenda hazardo ne povas konveni. Tamen, *Weinhengst* ne volas esti romantika, kaj tial li evitas komence la troajn kontrastojn: tial li ekiras el la senpretenda okazaĵo, ke la junulino iomete pli malfrue

Pri la Plena Gramatiko

La artikolo de sinjoro *Inglada* estas tiel ampleksa, ke ni longe hezitis ĝin publikigi. Fine, tamen ni decidigis. Sed pro la granda amplekso ni devis fari arangon, pro kiu ni petas pardonon de la eminenta aŭtoro.

Nome, la respondo de s-ro Kalocsay al tiu longa artikolo iĝis same tre longa. Publikigi ankaŭ tiun respondon estus tute neeble al ni. Tial ni redonis al s-ro Kalocsay lian respondon kun la peto, ke li ĝin mallongigu. S-ro Kalocsay respondis, ke li povas mallongigi nur tiamaniere, se li povas fari siajn respondojn en formo de piednotoj.

Ni petas do la eminentan aŭtoron, ke li ne rigardu ofenda tiun arangon; ĝi estas trudita de neceso.

Ni rimarkas tie ĉi, ke la piednotoj signitaj per *steleto* (*) apartenas al s-ro *Inglada*, dum la piednotoj signitaj per ciferoj (1—83) entenas la respondojn de s-ro Kalocsay. Ĉi lastaj estas signitaj ankaŭ per (K). *Lingvo Libro*.

RIMARKOJ PRI LA PARTO II: »VORTFARADO«

Traleĝinte dufoje la parton »II. Vortfarado« de »Plena Gramatiko« (paĝ. 22a—135a)*) mi trovis erarojn kaj malĝustajn regulojn en ĝi kaj per privata letero adresita al nia kara Prezidanto mi esprimis kelkajn rimarkojn pri tiuj eraroj kaj malĝustajtoj.

S-ro. Rollet de l' Isle, plej aminde bonvolis min honorigi per komiso, ke mi prezentu al la Akademio ĉiujn rimarkojn de mi faritajn koncerne la erarajn aŭ malĝustajn punktojn, kiujn mi trovis en mia esplora traĝado de »Vortfarado«.

Ĉar mi bedaŭrinde ne havas multe da libera tempo, mi devis dum ro tagoj dediĉi nur du horojn ĉiutage al tiu ĉi tasko, kaj kompreneble oni tuj komprenos, ke ĉiujn miajn rimarkojn mi skribis per unu fojo, ne dediĉante al ili la necesan tempon por fari metode ordigitan laboron kun regula plano kaj disvolvigo, sed nur simple elmentante ideojn, tiel same, kiel ili trafis mian menson, t. e. sen ordo kaj kunligo.

Tial, do, mi devas peti ĉiujn miajn kolegojn pri bonvola indulgo al mia modesta verketo, per kiu mi kontentigis klarigi kelkajn ĉefregulojn kaj principojn de la esperanta vortfarado kaj konvinki pri gravaj malĝustajtoj kaj eraroj, kiujn mi kredis trovi en parto II de »Plena gramatiko de Esperanto«.

*

Antaŭ ol klarigi la ĝeneralajn regulojn pri la esperanta vortfarado, estas necese insisti pri la difino de la gramatikaj kategorioj kaj la regula maniero ilin signi en Esperanto.

Kiel ĉiuj scias la finaĵoj *-o*, *-a*, *-i*, *-e* formas la 4 grandajn gramatikajn kategoriojn de vortoj, t. e. respektive la substantivon, adjektivon, verbon (infinitivon) kaj adverbon.

*) Por mallongigo mi signos tiun verkon per P. G.

Ni ne okupigos pri la finaĵoj: *-j* (pluralo), *-n* (akuzativo aŭ rekta komplemento), kaj la konjugaciaj (*-as*, *-is*, *-os*, k. c.), ĉar ili ne interesas al vortkunmetoj.

Kion esprimas la substantivo (*-o*)? *Kio estas* aŭ *ekzistas*, ĉu konkrete aŭ reale (*viro*, *besto*, *floro*, *ŝtono*, *tablo*, *ĉapelo*, k. c), ĉu abstrakte aŭ ideale (*scienco*, *poezio*, *morto*, *blanko*, *homeco*, k. c). Oni povas ankaŭ difini, ke substantivo esprimas *tion*, *pri kio oni diras ion*.¹⁾

Kion esprimas la adjektivo (*-a*)? *Cion*, *kio rilatas al substantivo*: t. e. *kvaliton* aŭ *rilaton pri ĝi*. Ekz. *kvalitaj adjektivoj*: *blua*, *granda*, *bela*, *dolĉa*, k. c.; *rilataj*: *doma*, *urba*, *konstrua*, *infana*, *baldaŭa*, k. c.

Kion esprimas verbo? Per finaĵo *-i*, *agon* aŭ *staton*; per finaĵoj *-as*, *-is*, ... plie, *modon*, *tempon* kaj *personon*, kaj per finaĵoj participaj *-ant*, *-int*, *-ont*, *-at*, *-it*, *-ot*, plie, ĉu la ago estas aktiva (farata) aŭ pasiva*) (ricevata de iu aŭ io). Oni povas ankaŭ difini, ke verbo estas *tio*, *kion oni diras pri substantivo*.

Kion esprimas adverbo (*-e*)? *Cion*, *kio rilatas al verbo* (aŭ al adjektivo aŭ alia adverbo). La diferenco inter la samklasaj gramatikaj kategorioj: adjektivo kaj adverbo, konsistas el tio, ke la unua rilatiĝas al substantivo kaj la dua al alispeca vorto: verbo (plej ofte), adjektivo aŭ adverbo. Kion do esprimas ĝenerale la adverbo? *Ĉu ĉirkonstancon de la ago aŭ stato esprimata de la verbo*, t. e., *lokon*, *tempon*, *manieron*, *instrumenton*, *kvanton*, k. c.

La opinio de Antido, ke la adverba finiĝo *-e* nur montras manieron, estas erara. En la frazo: li legas *nokte*, *nokte* signifas *dum-nokto* aŭ *en-nokto*, t. e. montras tempon. Estas absurde klarigi *nokte* dirante: *laŭ noktita maniero*, ĉar la maniero legadi estas sama, ĉu en nokto, ĉu en tago. En la frazo: li skribas *hejme*, *hejme* = *en hejmo*, esprimas lokon. En: ŝi kantas *majstre*, la adverbo signifas *laŭ majstra maniero*; en: li febre ekscitiĝis, *febre* signifas *pro-febro* (kaŭzo), en: li skribis *krajone*, instrumenton, *per-krajono*; en: ŝi multe ŝuldas, — kvanton, k. c.

En multaj adverboj estas necese atenti la signifon de la radiko aŭ de la kunteksto por scii, ĉu la finaĵo *-e*, montras lokon, tempon, manieron k. c. Ekzemple, *Parize*

¹⁾ Ĉi tiu difino estas erara. Tio, pri kio oni diras ion, estas subjekto (funkcio), dum substantivo estas *speco* de vorto, sendepende de ties funkcio en la frazo. Ekzemple: en la frazo: *Antaŭ du tagoj Petro batis Paŭlon per vipo ĉe stratangulo* — oni diras ion pri *Petro*, tamen ne nur *Petro* estas substantivo, sed ankaŭ *tagoj*, *Paŭlo*, *vipo*, *stratangulo*. La aŭtoro konfuzas vortspecon kun vortfunkcio. La sekvoj de tiu ĉi eraro montriĝas en lia tuta pritraktado. (K.)

*) En P. G. oni kutimas diri pri verboj, ke la ago estas farata aŭ *suferata*. Tiu ĉi lasta esprimo ŝajnas malĝusta, ĉar ekz. en la frazoj: li estas *nomata* ministro aŭ *amata* de bela knabino, la ricevata ago estas ĝojiga kaj ne *suferiga*.

alvenas hejmen. Sed tiu ĉi ŝajne sensignifa okazo kuntiras la aliajn, jam pli romantikajn hazardojn.

Romantika, mi diris. Sed ni, aŭ tiuj, kiuj vivas en relative trankvilaj mondpartoj, ja ne forgesu, ke en la repacigotaj Eŭropo kaj Azio tia »romantiko« estas plena realismo.

Jen do, la hazardo havas rolon ĉe ĉiu verkisto. Sed kiel diference ili ĝin uzas! Ĉe Forge ĝi estas fundamento; ĉe Baghy ĝi servas por projekciado de pasia animo; ĉe Schwartz ĝi nur ekirigas la okazajojn, kiuj

poste ruliĝas per si mem; ĉe Engholm ĝi estas tute malgrava ŝraŭbo facile anstataŭigebla; ĉe Weinhengst ĝi estas ŝtoneto ekiriganta lavangon.

La hazardo do, kiel materialo de verkisto, povas respreguli sufiĉe multe, ĝuste per tio, kiamaniere ĝin uzas la verkisto. Por li la hazardo ja ne estas hazardo, li mem ĝin kreas kaj laŭvole ĝin uzas. Tamen, ne tute laŭvole! Al li ja diktas lia verkista individueco. Kaj ĉi tiun individuecon mi intencis iom lumigi ŝtele per la spegulo de la hazardo.

montras lokon en: li loĝas *Parize* (en *Parizo*) kaj manieron en: Si salutas *Parize* (laŭ *Pariza modo* aŭ *maniero*).

La substantivoj, adjektivoj, verboj kaj adverboj povas konsisti:

a) el simpla radiko kaj finaĵo (*domo, bela, kanti, subite*); b) el unu kunmetita vorto t. e., el unu vorto konsistanta el radikoj, afiksoj kaj finaĵo: *sendependeco, porĉiama, senfadenigi, malhelblue*; c) el pluraj vortoj inter kiuj povas stari verbo kun tempa finaĵo (*-as, -is, ...*) kaj kun ĝiaj komplementoj.

Ekzemploj de substantivoj: *kiu-tuj-venos*, estas mia patro = *Tujvenonto* estas mia patro; *ke-li-estas-honestaviro* mi jam scias (tie ĉi: *ke-li-estas-honestaviro* havas saman gramatikan rolon, kiel substantivo *tion* en: *tion* mi jam scias). Kompreneble substantivo povas montri la nomon de vorto aŭ ideo mem kaj tiamaniere ĉio povas substantivigi. Ekz.: *Promenadi* estas bela okupo (*promenadi*, gramatike egalvaloras *promenado*). Li skribis »*vendus*« per grandaj literoj (»*vendus*« = vorton »*vendus*«). Pli valoras »*mi ricevas cent frankojn*«, ol »*mi ricevos tricent*«. La du frazoj estas ĉi tie substantivoj, ĉar la senco *gramatika* estas: pli valoras *ĉi-tio*, ol *tio*.²⁾

Ekzemploj de adjektivoj: *domo por-konstrui* = *konstruota* domo, kapo *senharoj* = *senhara* kapo; virino, *kiu-venos-morgaŭ* = *morgaŭvenonta* virino, afero, *pri-kiu-ni-disputos* = *pridisputota* afero, virino *de-nigraj-okuloj* = *nigrokula* virino, k. c.

Ekzemploj de verboj: li *povis-kredi*, ili *devos-forveturi*, k. c.

Ekzemploj de adverboj: *en-domo* = *dome*; li ploris *kun-granda-ekscito* = li ploris *grandekscite*; li esprimis *per-ĝusta-diro* (*ĝustadire*); ĝi aspektis, *kiel-brilanta-oro* (= *orbile*); *ĉar-li-frue-venis*, li povis multe skribi = (*frueninte*, li...)

Pri la vortoj konsistantaj nur el radiko kaj finaĵo (*domo, bela, kanti, rekte*) ne ekzistas kunmeta aŭ vortfara demando. Sufiĉas klarigi la sencan de la finaĵo algluita al substantiva, adjektiva, verba aŭ adverba radiko.

El la malsimplaj kazoj b) kaj c), ni esploros unue la duan, nome kiam temas pri plurvorta amaso, ĉar el ĝi oni facile pasas al b), tio estas al unuvorta kunmetaĵo.

Ni pritraktos samtempe la plurvortajn adjektivojn kaj adverbojn, kiuj havas inter si grandan analogecon.

Por ricevi plurvortajn adjektivojn kaj adverbojn oni plej ofte kunigas aron da vortoj, regatan de antaŭmetita prepozicio.

Ekz.: virino *sen-helpo* (senhelpa), resti *sen-helpo* (senhelpe); virino *kun-nigraj-okuloj* (nigrokula); disputo *sur-strato* (strata aŭ surstrata), disputi *sur-strate* (surstrate); disputo aŭ disputi *pri-tiom-da-sengravaj-aferoj*; virino *kun-ago-de-tridek-jaroj* (tridekjara aŭ tridekjaraĝa), loĝi

²⁾ Jen montriĝas la sekvoj de la eraro menciita en la noto ¹⁾. »*Kiu tuj venos*« ne estas substantivo, sed prepozicio. Tiu prepozicio povas havi la funkcion de la subjekto (en la frazo citita de la aŭtoro), sed ankaŭ la funkcion de epitetito (*La homo, kiu tuj venos, estas...*) kaj eĉ la funkcion de predikativo (*Mia patro estas tiu, kiu tuj venos*). Same, la vortoj »*promenadi*«, »*vendus*«, »*mi ricevas cent frankojn*« ne estas substantivoj, sed subjektoj aŭ objektoj. Oni povas maksimume diri, ke ili havas tiajn funkciojn, en kiaj ordinare rolas substantivoj. Ili estas pli malpli maloftaj esceptoj, el kiuj oni ne povas tiri regulojn.

Oni ne forgesu la Fundamentan regolon: *La substantivoj havas la finiĝon -o*. Tio, ke aliaj vortspecoj aŭ tutaj prepozicioj povas havi funkciojn plenumatajn ordinare de substantivoj, apartenas al la instruo pri vortfunkcioj, t. e. al la sintakso. En la Vortfarado, kie temas pri konstruo de apartaj vortoj unuopaj, sendepende de ties funkcio en la frazo, ne havas lokon tiaj konsideroj. (K.)

tridek-jare: esprimo aŭ esprimi *per-*(aŭ) *laŭ-ĝusta diro* (*ĝustadira* esprimo, esprimi *ĝustadire*), k. c.

Kiel oni vidas, la vortamaso povas esti tute identa ĉe la adjektivo kaj adverbo (parolado *per bela voĉo*, paroli *per bela voĉo*); la diferenco estas nur, ke la unua rilatiĝas al substantivo kaj la dua al verbo.

Plej ofte oni formas simplajn adjektivojn pere de la prepozicio *de* (posedo, aparteno, rilato) aŭ *el* (materialo) kaj substantivo.

Ekz.: *konstruo-de-domo* same valoras, kiel *doma konstruo*;³⁾ profesoro *de-muziko* = *muzika profesoro*, *amo-de-patrino* = *patrina amo*; libro *de-Petro* = *Petra libro*; virino *de-blauaj-okuloj* = *bluokula*; *ringo-el-oro* = *ora ringo*; akvo *el-fonto* = *fonta akvo*, *saluto el-koro* = *kora saluto*; miksaĵo *el-vino-kaj-oleo* = *vinolea miksaĵo*, k. c.

Kompreneble tiaj kunligoj de prepozicioj *de* kaj *el* kaj substantivo estas ankaŭ adverboj, se nur ili rilatiĝas al verbo. Ekz. *saluti elkoro* (*kore*); *pendi de-balkono*; *flui el-fonto*, k. c.

En P. G. oni asertas, ke prepozicio ĉiam regas substantivon.⁴⁾ Tio ĉi estas malĝusta. Prepozicion sekvas plej ofte substantivo, sed ankaŭ aliaj vortoj. Ekz. prepozicio kun infinitivo: *veni por pritrakti, anstataŭ manĝi, antaŭ (ol) fali* k. c. Prepozicio kun adverbo: *de longe, antaŭ longe, post longe, de tiām, antaŭ kiam, antaŭ hieraŭ, post morgaŭ el interne, el sube* k. c. Prepozicio kun alia prepozicio: *el sub la lito, de post kiam, el inter la arboj, de post hieraŭ*, k. c. Prepozicio kun konjunkcio: *malgraŭ, ke li venis; por ke li venku*, k. c.

Multajn adjektivojn plurvortajn oni ricevas per frazo komenciĝanta per *kiu, kies...* kaj entenanta verbon kun ĝiaj komplementoj. Ekz. La virino, *kiu-hodiaŭ-venis* min saluti = la virino *hodiaŭveninta...*; la profesoro, *kies-belan-traktaton-mi-tradukis*, estas Ruso k. c. *Kiom-bela-kaj-fruktodona laborado estas perdita*, k. c.

La esprimoj *kiu...-as, kiu...-is, ... kiun oni...-as*, k. c. estas samvalore tradukeblaj per la participaj adjektivoj *...-anta, -inta...-ata*, k. c. Ekz.: La knabino, *kiu-venas* de Parizo... = la knabino *venanta* de Parizo; La libro, *kiun-oni-ĉiulingven-tradukos...* = la libro *ĉiulingven-tradukota...*

La esprimoj, *kiu...-as, ... kiun oni...-as, ...* povas escepte⁵⁾ pro forigo de apudvorto fariĝi substantivoj. Ekz. *Kiu-hodiaŭ-venkas*, eble morgaŭ pereos = *Hodiaŭa-venkanto*, eble pereos morgaŭ. *Kiu-estas-amata*, feliĉe vivadas = *amato* feliĉe vivadas, k. c.

Por formi plurvortajn adverbojn oni uzas ankaŭ frazojn komenciĝantajn per diversaj konjunkcioj; se oni

³⁾ »Konstruo de domo« ne egalas al »doma konstruo«, ĉar la objekta genitivo ne povas esti adjektive esprimita, krom ĉe la posedaj pronomoj (*ĝia uzo*). Se oni instruas idioton, tio estas *instruo de idioto*, sed ne *idiotaj instruoj*.

Same ne povas esti adjektive esprimita la DA-supplemento (*korbo da fruktoj*). Aliflanke, adjektivradikaj adjektivoj (*bela, bona*) ne povas esti esprimitaj per prepozicio plus substantivo. Oni do devas distingi inter adjektivo kaj suplemento (*bela kaj de belo*) kaj ne konfuzi ilin, kiel la aŭtoro faras, eĉ se ili multfoje estas anstataŭigeblaj unu per la alia. (K.)

⁴⁾ Tio estas, vere, momenta penseraro anstataŭ »prepozicio ne povas stari antaŭ adjektivo«. Oni komparu la paragrafojn 314, 319, 375, kie la uzo de prepozicio antaŭ ne-substantivo estas vaste pritraktita. Cetere, la ŝanĝo de la erara frazo, je la nun korektita, ĝusta konstato, neniom senvalidigas la tieajn pritraktadojn. (K.)

⁵⁾ Kial escepte? Supre ni montris, ke ĉiu KIU-prepozicio povas egale funkcii kiel subjekto, objekto aŭ epitetito. (K.)

volas esprimi manieron: *kiel*; *kaŭzon*: *pro tio ke, tial ke, ĉar*; *tempon*: *antaŭ kiam, dum, post kiam*, k. c. Ankaŭ oni povas uzi gerundiojn.

Ekzemple: *Li mortis, kiel-decas* (dece); *kiel-mortas-heroo* (heroo), *Pro tio, ke li ne venis, ni ne povis aranĝi la aferon = pro-lia-neveno*, ni ne povis... *Car-li-falis-de-la-kvina etaĝo*, li mortis = *falinte-de la-kvina-etaĝo*, li mortis. *Malgraŭ-ke-li-ne-volis*, li devis cedi = *malgraŭ-sia-volo*, aŭ *malgraŭvole*, aŭ *malgraŭsivole*, li devis cedi, k. c.

Post tia rapida skizo pri la plurvortaj substantivoj, adjektivoj, k. c. ni povas eldiri gravan kaj larĝuzan regulon pri la kunmetitaj (unuvoortaj) substantivoj, adjektivoj, k. c., kiujn la genio de Esperanto formas plej ofte kaj ŝate. Jen la regulo:

Ĉiufoje, kiam ni renkontigas kun plurvorta substantivo, adjektivo k. c. komenciĝanta per prepozicio, konjunkcio, aŭ vorteto (kiel, ke, kiu, kies, kiom...) Esperanto plej ŝatas kuntiri ĉiujn elementojn de la plurvorta komplekso, por formi el ĝi nur unuvortan kunmetaĵon. Por tio oni konservas la saman ordon de la vortoj de la komplekso, oni forigas ĉion, kio klareco kaj komprenebleco ne postulas, tio estas, artikolojn, interelementajn finaĵojn, pluralon, akuzativon k. c., eĉ kelkfoje la prepozicion mem, kiu regas post si ĉiujn elementojn, kaj fine al la kunmetita rezultanta vorto oni alĝuas finaĵon -o, -a, -i, -e, laŭ ĝia rolo substantiva, adjektiva, verba aŭ adverba.

Komprenoble, ne ĉiam⁶⁾ oni povas fari el kiu ajn plurvorta komplekso ekvivalentan unuvortan kunmetaĵon, sed al genio de Esperanto plej plaĉas formi — *kiam eble* — tian kunmeton kaj la afero plej ofte sukcesas, se la komplekso konsistas nur el du aŭ tri vortoj (kelkfoje eĉ kvar).

La ekzemplojn, kiujn milope liveras Esperanto, ni devas zorge elekti pro ilia troabundeco, en la celo prezenti rimarkindajn tipojn.

Ni unue prezentu plej simplan kazon: prepozicion kun substantivo. *Ce brusto*, povas plej simple transformi en unu vortajon:

La infano ŝatas *ĉebruston* (subst.); *ĉebrusta* restado (adj.), *ĉebrusti* (verbo), *ĉebruste* resti.

Per sama procedo el *bona farto* oni eltiras: *bonfarto*, *bonfarta*, *bonfarti*, *bonfarte*; el *bela sono*: *belsono*, *belsona*, *belsoni*, *belsone*; el *cent jaroj* oni formas *centjaro*, *centjara*, *centjare*; el *multaj jaroj* oni ricevas *multjaro*, *multjara*, *multjare*; el *du sakoj*: *dusako*, *dusaka*, *dusake*; el *mil folioj*: *milfolio*, *milfolia*, *milfolie*; el *tri mastoj* oni formas *trimast(ul)o*, *trimasta*, *trimaste*; el *kvar piedoj*: *kvarpied(ul)o* (besto), *kvarpiedo* (kvarpieda objekto), *kvarpieda besto*, *marŝi kvarpiede*, k. c.⁷⁾

⁶⁾ La tasko de gramatikisto estas ĝuste tio, ke li montru, kiam oni povas kaj kiam oni ne povas. (K.)

⁷⁾ Se ni esploras la ekzemplojn de la aŭtoro, tuj ni vidas, ke la adjektivaj, adverbaj kaj verbaj formoj estas vere tute regulaj, sed la o-formoj, havantaj ĉefelementon radike substantivan (*centjaro*, *trimasto*) havas konstruon *esceptan*, ne aplikeblan *ĝenerale*. Ekzemple, oni diras *centjaro*, sed oni ne diras *centhomo*, *centdomo*, *centlibro*; oni diras *trimasto*, sed oni ne diras *tritablo*, *tristudento*; oni diras *dusako*, sed oni ne diras *dubirdo*. Ties kaŭzo estas, ke ili havas strukturon tro komplikitan por ĝenerala uzo. *Trimasto*, ekz-e, ne estas simple *tri-masto*, sed (tri mastoj)-o: (*ŝip*)-o de tri mastoj. Kaj oni povas konstati la tendencon en la lingvouzo, ke ju pli komplika estas ia vortkonstruo, des pli escepta estas ties uzado.

Nu, la aŭtoro tute ne konfesas la komplikecon de tiaj konstruoj, li volas ilin rigardi simplaj kunmetoj de adjektivo kun substantivo. Kaj el *esceptaj* vortoj li volas tiri ĝeneralan kunmet-regulon. Li do volas rekomendi per tio la suprajn formojn (*dubirdo* ktp.), kiuj evidente neniam estis uzataj. Male, nia sistemo klare montras, kiaj

Inter la jusdonitaj ekzemploj krom tiuj komenciĝantaj per prepozicio aŭ determinilo (numeralo), ni enmetis la duradikajn esprimojn *bonfarto*, *belsono*, (ankaŭ *bonokazo* *belskribado* k. c.), ĉar ili estas nur imito kaj plua apliko de la kunmetada ĝenerala regulo, kiun ni per ekzemploj konfirmas.

La prepozicio *sen* liveras ankaŭ multege da kunmetaĵoj. *Sen-haroj* = senhara, ekz. *senhara* hapo; *senpretendo* aŭ *senpretendoj* permesas eltiri: *senpretendo*, *senpretenda*, *senpretende*; *sen-fortoj*: *senforto*, *senforta*, *senforte*; *sen-diro*: *sendiro*, *sendira*, *sendire*, k. c.

Estas strange, kiel oni pretendas en P. G., aserti, ke tiaj kunmetaĵoj estas kontraŭregulaj, kaj ke la logikaj formoj estas: *fortsena* anstataŭ *senforta*, *pretendseno* anstataŭ *senpretendo*, *dirsene* anstataŭ *sendire*. Eble tiaj strangaj kunmetoj, kiel *fortsena*, *pretendseno*, *dirsene* k. c. estas plej logikaj, sed ĝis nun la Esperantistoj ne ilin uzis: la logiko de filozofoj ne estas la logiko de popolo, kiu uzas lingvon, kaj tial tiuj strangaj, eble eĉ ridigaj formoj, *fortsena* k. c. ne havas ŝancon ekradikiĝi.⁸⁾

Ankaŭ ni trovas erare pretendi, ke *sen* povas havi pluraligan efikon sur la sekvantan substantivon. Kiel ni jam diris, en unuvorta kunmetaĵo oni forigas finaĵojn de la elementoj, tiel do, la pluralon ankaŭ, ĉar la finaĵo de la vorto rezultanta devas esti nur kaj nepre -o, -a, -i, -e laŭ la gramatika rolo de la ricevita kunmetaĵo. Ekz. en *senhara kapo*, *senhara* signifas *sen-haroj* (pluralo), en la figura esprimo: *senkora* virino, *senkora* valoras *sen-koro* (ĉar la senco helpas klarigante, ke virino nur povas havi unu koron).⁹⁾

Prepozicio *inter* postulas pluralon, ekz. vojo *inter-montoj*, babilado *inter-du-aktoj* k. c. sed se ni volas formi unuvortan kunmetaĵon, la finaĵo -j de *montoj*, *aktoj* k. c. devas malaperi: *intermonta* vojo, *interakta* babilado (*du* estas superflua kaj malaperas) k. c. La substantivo *inter-monto* signifas *kio-estas-inter-montoj* (tereno, spaco...), *interakto* = *kio-estas-inter-(du) aktoj* (tempo, muziko), k. c.¹⁰⁾

El *kontraŭ-flanko*, oni same kunmetas: *kontraŭflanko* (kio estas kontraŭ flanko), *kontraŭflanka*, *kontraŭflanki*, *kontraŭflanke*.

El *post domo*, *post venko* k. c. oni tiras: *postdomo*, *postdoma*, *postdome*: *postvenko* (kio estas post venko, kio sekvas venkon) *postvenka*, *postvenki*, *postvenke*, k. c.¹¹⁾

El *por vivi* oni eltiras: *porvivo* (*kio* estas por vivi, rimedoj, necesoj).

Kiam la senco de la prepozicio estas facile divenebla, oni ellasas ĝin. Ekz. el demando *pri-nutro* oni povas kun-

formoj estas ĝenerale uzeblaj, sed aliflanke ĝi klarigas ankaŭ la strukturon de la supraj esceptaj formoj, motivante ilian esceptecon per la komplikeco de ilia strukturo. Kio do estas preferinda? Cu nia VER, aŭ la senVEReco de l' aŭtoro? (K.)

⁸⁾ Tio estas miskompreno. En pluraj ĉapitroj ni pledas ĝuste por tiuj ĉi formoj (vd. parag. 31—35). Estas konate, ke oni atakis ilin kiel gramatike nelogikajn; ni klarigas kaj pravigas ilin per la inversa vortefiko. Mi tute ne komprenas, kiel oni povas rigardi defendanton atako.

Pri *fortsena* ni diras nur, ke ĉesigante la inversecon de la elementoj, ni ricevas tiun ĉi formon. Sed nenie ni rekomendas ĝin, male. (K.)

⁹⁾ Nenie ni parolas pri la pluraliga efiko de SEN. (K.)

¹⁰⁾ La aŭtoro venas al la sama rezulto kiel ni: *intermonto* estas *kio estas inter montoj* -o *inter montoj* (ĉar *kio estas* estas -o) (*inter montoj*)-o (K.)

¹¹⁾ Mi neniam legis la vortojn *postdomo*, *postvenko*. (K.)

meti: *prinutra* demando, aŭ mallongige: *nutra* demando; same oni povas diri: *nutra* manĝaĵo anstataŭ *nutranta* aŭ *pornutra* manĝaĵo; *ama* koro anstataŭ *amanta* aŭ *amema*, sed *ama* letero anstataŭ *priama* letero, kaj ne *amema*, ĉar letero ne povas ami, nek havi inklinon ami.

Kiam la prepozicio montras instrumenton, oni povas plej ofte ellasi ĝin. Ekz. el: li desegnis *per-krajono* oni povas kunmeti: li desegnis *perkrajone* aŭ simple *krajone*; li atingis tion *per-voĉdono* (*pervoĉdone* aŭ simple *voĉdone*) k. c.

Kiam la substantivo sekvanta la prepozicion montras per sia signifo la saman rilaton, oni povas ellasi la prepozicion. Ekz. *nokto*, *dimanĉo* signifas tempon, do, sufiĉas diri *nokte* aŭ *dimanĉe* anstataŭ *en* aŭ *dum nokto*, *en* aŭ *dum dimanĉo*. *Strato*, *hejmo*... montras lokon, do sufiĉas diri *strate* aŭ *hejme* anstataŭ *en* aŭ *sur strato*, *en hejmo*, k. c.

En Esperanto estas kutime uzi infinitivon nur post prepozicioj *anstataŭ*, *antaŭ(ol)* kaj *por*. Nenio en *Fundamento* kontraŭstaras al uzo de infinitivoj post aliaj prepozicioj, kiel okazas en aliaj lingvoj. Ĉe bonaj aŭtoroj oni trovas, tamen, uzo de *sen* kun infinitivo, kio estas prava: *sen diri* ekz. estas pli oportuna, ol *ne dirante* aŭ *ne dirinte*.

Same okazas pri uzado de prepozicio antaŭ *ke*. Oni kutime uzas *malgraŭ ke* kaj *por ke* kaj oni ne diras *post ke*, *sen ke*, *kontraŭ ke*, k. c. Oni anstataŭas per pezaj esprimoj, *post kiam*, *sen tio*, *ke*, *kontraŭ tio ke*, k. c. Tamen neniam regulo el *Fundamento* donas privilegion al prepozicioj *malgraŭ* kaj *por*. Rimarku la kontraston: oni povas diri: *malgraŭ ke li venas*, li... kaj ne: *malgraŭ veni*, li...

Mi kredas ke la Akademio povus esplori la aferon kaj forigi tiajn arbitraĵojn en la uzado de prepozicioj.¹²⁾

Se estas certe, ke la prepozicioj, kiel apartaj vortoj, ne povas iri antaŭ infinitivo, en kunmetaĵoj nenio malhelpas kunligi ambaŭ. Ekzemple: oni ne povas diri *duvorte al paroli*, *kontraŭ diri*, *ĉirkaŭ preni*, k. c. sed oni rajtas unuvorte: *alparoli*, *kontraŭdiri*, *ĉirkaŭpreni*, k. c.

Tion ĉi oni povas pravigi per *tio*, ke la lingvoj amas mallongigon kaj tiel obeas al la ĝenerala leĝo, fari ĉion kun plej malgranda peno aŭ laboro. Tiamaniere la esprimojn: *paroli al iu(j)*, *trakti pri io*, *diri kontraŭ iu(j)* aŭ *io* k. c. se la komplementoj *iu(j)*, *io* de la prepozicio estas ellaseblaj, oni povas kuntiri per *alparoli*, *pritrakti*, *kontraŭdiri*, k. c.

Tia mallongiga inklinado klarigas ankaŭ, ke la esprimoj: *li estis ĉe kunsido*, *li traktis pri demando*, *li kuris post iu*, k. c. kuntiriĝas en la jenajn: *Li ĉeestis kunsidon*, *li pritraktis demandon*, *li postkuris iun* k. c., kaj la akuzativon: *kunsidon*, *demandon*, *iun*, k. c. oni povas pravigi per *tio*, ke en Esperanto nur la nominativo povas finiĝi per *-o*, *-oj*, la ceteraj kazoj postulas prepozicion antaŭ si aŭ finaĵon *-n*. En la kuntiritaj esprimoj: *li ĉeestis kunsidon*,... la finaĵo *-n* de *kunsidon* ne montras rektan komplementon, (ĉar la verboj ne estas transitivaj), sed nur la akuzativon, kiu anstataŭas eljetitan prepozicion.

La sama tendenco klarigas, ke la esprimoj: *akiri per flato*, *per milito*, *per ludo*, *per laboro* kaj similaj kuntiriĝas en: *perflati*, *permiliti*, *perludi*, *perlabori*, k. c. ellasante *akiri*, ĉar la senco helpas diveni pri ĝia ellaso. Saman klarigon postulas *elflato*, *elpeti* (monon), k. c. Oni povas citi multajn tiaspecajn kunmetaĵojn. En »La Revizoro« (paĝo 44-a) Dro. Zamenhof uzas la frazon: »Kaj

de mi li la malnoblulo, *elpoentis* hieraŭ cent rublojn« Tie ĉi la signifo de *elpoenti* estas: »gajni (kartludante) poenton post poento ĝis cent rubloj«: *elpoenti*, do, estas tre streĉita kuntiriĝo.

Estas plej ĝenerala regulo en Esperanto ne uzi sola la prepozicion. Ekz. se oni demandas: *ĉu vi restis ekster la domo?* oni ne povas respondi (kiel en aliaj lingvoj): *mi restis ekster*, estas necese diri: *mi restis ekstere*. En la antaŭa frazo *ekster-la-domo*, estas adverbo, ĉar ĝi entute rilatiĝas al verbo *restis*. En la respondo, se oni eljetas *la-domo* restas nur la prepozicio *ekster* kaj por transformi ĝin en adverbon oni aldonas al ĝi finaĵon *-e*. Do, en Esperanto, oni ne povas uzi simple la prepozicion sen ĝia regita komplemento: tial, do, oni ne povas diri, *ili venis kun*, *ili manĝis ekster*, *ili batalis kontraŭ*, k. c. sed: *ili venis kune*, *ili manĝis ekstere*, *ili batalis kontraŭe*, k. c. Diri ekzemple: *ili venis kunaj*, *ili manĝis eksteraj*, *ili batalis kontraŭaj*, k. c. estas malprava uzado, ĉar ĝi kontraŭstaras al la esenco de la gramatikaj leĝoj, kaj al la difino mem de la adverbo.

En P. G. (paĝoj 108-a kaj 109-a) oni pretendas, ke la prepozicioj povas funkcii apud verbo, a) kiel *adverba adjekto*: *preteriri* = iri *pretere* kaj b) kiel *predikata adjektivo*: *kunveni* = veni *kunaj*. Laŭ mia opinio estas granda eraro akcepti la kazon b). Ni esploru la esprimon *kunveni*. Se kelkaj amikoj iras kune promenante kaj neniam apartigante unu de la aliaj ili iras aŭ venas en kafejon por kune trinki kafon, ni esprimos la agon, ke ili kune eniras en kafejon, dirante: *ili kunvenas* (aŭ *kune venas*) en kafejon, ĉar tie ĉi oni celas esprimi la tutan kunagadon antaŭ ol trafi kafejon. Se ĉiu el ili venas aparte el sia hejmo kaj trafas la kafejon ne samtempe, sed unu post alia, kiam ili kune sidas ĉe sama tablo kaj babilante trinkos kafon, ni povos diri: *ili kunsidas* (aŭ *kune sidas*) en kafejo; se oni uzas *veni*, oni diros: *ili kunvenis en kafejon*; se oni opinias, ke la verbo *veni* nur montras la tempon post kiam ili eniris en kafejon, tiam la esprimo *ili kunvenis* aŭ *kune venis*, estas ĝusta; tamen, se per *veni* oni nur aludas la momenton mem, kiam oni enpaŝas en kafejon aŭ oni eksidas ĉe tablo, por ekzakte uzi *kunveni*, estas necese akcepti, ke la pordo de la kafejo estas sufiĉe larĝa por ke ĉiuj amikoj, ili ja povas esti dek, eniru samtempe, kiel soldatoj marŝantaj laŭvice. Se per la esprimo *ili kunvenas*, oni volas signifi ke *post veno* ili estas *kune* (ne *kunaj*), estas evidente, ke la esprimo *kunveni* = *kune veni*, tute samĝuste trafas kiel la malĝusta *veni kunaj*, ĉar la senco de la verbo ne estas la *veno mem*, sed tio, kio okazas post la veno, kaj se post veno estas kuneco, oni povas diri *kunveni*, aŭ *kune veni*.¹³⁾

¹³⁾ Tio estas evidente erara. Adverbo karakterizas la agon, montrante ties manieron aŭ cirkonstanceton. La rezulton de la ago oni esprimas per predikata adjektivo. *Mi faris la taskon facile* signifas, ke la faro de la tasko estis facila por mi. *Mi faris la taskon facila* signifas, ke mi, faris (por la lernanto) la taskon tiel, ke ĝi estu facila. Tute same, *ili venis kune* signifas, ke ilia veno estis kuna (samtempa). *Ili venis kunaj* laŭ la analogio de »Mi faris la taskon facila« povas signifi, ke ili venis tiel, ke ili estu kunaj.

Estas vere, ke oni neniam uzas tiajn esprimojn. Sed ties kaŭzo estas, ke multe pli simple estas diri: *ili kunvenis*. La formon *ili venis kunaj* la P. G. ja ne rekomendas por ĉiutaga uzo, ĝi uzas ĝin nur kiel analizon, por montri, ke la prefiksoido *kun-* ĉi-okaze montras la rezulton de la ago (ne ĝian manieron). Kaj la rezulton oni povas esprimi per predikata adjektivo. El teoria vidpunkto tio estas tre oportuna, ĉar tiamaniere la strukturon de *kunveni* oni povas klarigi analoge al *kunigi* (iĝi kunaj). Cetere, ni klare diras, ke ĉi tiu teoria plivastigo de la senco de l'predikata adjektivo egalvaloras al *-en* (kunen). (K.)

¹²⁾ Mi kredas, ke ne. Forigi la »arbitraĵojn« signifus permesi la uzon de infinitivo post ĉiuj prepozicioj. Nu, mi estas certa, ke neniam oni diros en bona Esperanto: *Li nur malfacile sin detenis de diri insulton.* (K.)

Tiaj streĉitaj subtilaĵoj ne povas enŝoviĝi en la gramatikajn ĝeneralajn leĝojn pri la vortfarado. La aŭtoroj de P. G. donas listojn el multaj verboj por kiuj la apudmetita prepozicio plenumas — ili tion kredas — la du funkciojn a) kaj b). Bedaŭrinde oni trovas en la donitaj ekzemploj la saman malpravon konfuzon kaj subtilecon, kiun ni montris por *kunveni*. Ni citu nur kelkajn ekzemplojn.

alparoli (paroli *ale*), *albati* (bati *ale*), *almezuri* (mezuri *ale*) kaj: *alesti* (esti *ala*), *alfali* (fali *ala*), *aliri* (iri *ala*), *alveni* (veni *ala*).

Krom la strangaj esprimoj *ale*, *ala*, kiuj tiel malplaĉe sonas al bonaj Esperantistoj, ni ne komprenas la diferencon inter ambaŭ specoj de vortoj. Laŭ nia opinio. *alparoli* (paroli *al*), *albati* (bati *al*), *alesti* (esti *al*), *alfali* (fali *al*)*, *aliri* (iri *al*), *alveni* (veni *al*).

La prepozicio *al* devas havi ĉiam la saman signifon, ĉu uzita aparte aŭ kunmetate. Ĉar ĝin oni ne povas uzi sola, oni aldonu *-e* (*ale*) por formi adverbon.

Aliaj ekzemploj. Laŭ P. G. *antaŭi* (esti *antaŭa*), mi ne komprenas, ĉar ĝi tute samrajte povas signifi *esti antaŭe*; *antaŭmeti* oni tradukas en P. G. *meti antaŭa* kaj miaopinie, pro la montrita almovado, ĝi devas signifi *meti antaŭen*; samkiale, *apudmeti*, tradukita en P. G. per *meti apuda* devas signifi: *meti apuden*.¹⁴⁾

Mi povus daŭrigi citante preskaŭ ĉiujn similajn ekzemplojn el P. G. sed sufiĉas diri, ke miaopinie ĉiuj estas same malpravaj, esceptante la verbojn finiĝantajn per *-igi* aŭ *-iĝi*, ĉar tiam la senco estas, ekzemple: *senplumigi* aŭ *senplumiĝi*, *igi* aŭ *iĝi senpluma* (aŭ *senplumoj*), ĉar la finaĵoj *-igi* kaj *-iĝi* alĝuiĝas al ĉio, kio antaŭas, konsiderata kiel komplekso aŭ tutaj. Ekz. *nekomprenebligi* = *igi nekomprenebla*, *senvaliĝi* = *igi senvala*, k. c.

Ni priiraktu nun la kunmeton de du radikoj por difini ĝian senco kaj la rolon de la elementoj. Se laŭ la proponita nomigo de Saussure (Principes logiques de la formation des mots) ni konsideras la disigitan molekulon: *konstruo-de-domo* kaj kunmetas ĝin en: *dom'konstruo*, la ordo de la elementoj inversiĝas kaj en lasta loko stariĝas *konstruo* t. e. la ĉefideo aŭ determinota elemento, dum la determinanta stariĝas antaŭe aŭ unualoke. Ĉar ni havas jam kunmeton *domkonstrui* kun signifo plene difinita *konstrui-de-domo*, ni povas uzi ĝin, kiel ĉiam, substantive, adjektive, verbe aŭ adverbe. Ekzemploj:

La *domkonstruo* (subst.) estas nun plej interesa demando.

La *domkonstrua* demando (adj.) estas nun plej interese.

Domkonstrui estas plej interese.

Li riĉiĝis *domkonstrue*.¹⁵⁾

*) Tie ĉi oni povas uzi la ankoraŭ pli strangan: *alen*!!!, ĉar oni esprimas almovon.

¹⁴⁾ Se Z. diris: »La naturo *elmetis nin nudaj* kaj *mizeraj sur la bordojn de ĉi tiu granda mondo*« kiel oni ne povus diri (almenaŭ en klariga analizo): *li metis la segon apuda al la tablo*?

Mi kredas, ke la aplikita de ni analiza uzo de la predikata adjektivo estas tute natura ĉe ĉiuj transitivaj verboj. Nur ĉe la netransitivaj (veni, fali, iri) ĝi estas nekutima, sed ankaŭ tie ĝi estas perceptebla per iom da streĉo de la gramatika pensado. Por plifaciligi tion, oni devas nur transitivigi la verbon. Se »ili venis kunaj« estas stranga, »ili venigis sin kunaj« estas jam tute akceptebla kaj natura. (K.)

¹⁵⁾ La aŭtoro diras la samon kiel ni.

Ni rigardu la vorton *domkonstruo*. Ĝi havas substantivan ĉefelementon. La analizo, laŭ VER. I., do estas konstruo de domo

Kion signifas *domkonstruo*? *Konstruo de-domo* aŭ *doma konstruo*.¹⁶⁾ Kiel ni jam sufiĉe klarigis *de-domo* estas adjektivo, ĉar ĝi rilatas al substantivo *domo*. Laŭ la sistemo uzita en la zoologia kaj botanika nomigado oni povus analoge diri, ke en la esprimo *domkonstruo* = *konstruo de-domo* = *doma konstruo*, *konstruo* montras la genron kaj *de-domo* = *doma* la specon t. e. ke en la esprimo *domkonstruo* = *doma konstruo*, ni volas esprimi, ke el ĉiuj *konstruoj* ni difinas la *doman*, aŭ tiun kies speco estas *doma*. En tiu ĉi rezonado ĉio estas sendependenda de tio, ke *konstruo* signifas la agon mem konstrui (*konstruado*) aŭ la rezulton de la ago (*konstruaĵo*). Por la unua ideo ni havas *domkonstruado* = *doma konstruado* kaj por la dua: *domkonstruaĵo*, ĉar *konstruaĵo* povas esti teatra, hospitala, punta, voja, k. c.

Kion signifas *domkonstrua*, *domkonstrui* kaj *domkonstrue*? Ili respektive signifas: *dome konstrua*,¹⁷⁾ *dome konstrui*, *dome konstrue*, ĉar vorto kiu apudrilatiĝas al adjektivo *konstrua*, al verbo *konstrui*, aŭ al adverbo *konstrue* estas esence adverbo. La ĝeneralajn gramatikajn leĝojn ne povas kontraŭdiri la reguloj de vortkunmetado.

Ni faru aliajn kunmetaĵojn; *bonven*: el ĝi eliras: *bonveno* = *bona veno*; *bonvena* = *bone vena*, *bonveni* = *bone veni* kaj *bonvene* = *bone vene*; *bonokaz'* donas *bonokazo* = *bona okazo*, *bonokaza* = *bone okaza*, *bonokazi* = *bone okazi*, *bonokaze* = *bone okaze*;¹⁸⁾ *multdir'*, liveras: *multdiro* = *multa diro*, *multdiri* = *multe dira*, *multdiri* = *multe diri*, *multdire* = *multe diri*; *prembros'* donas: *prembroso* = *prema broso*, *prembrosa* = *preme brosa*, *prembrosi* = *preme brosi*, *prembrose* = *preme brose*; *helblu'* liveras *helbluo* = *hela bluo*, *helblua* = *hele blua*, *helblui* = *hele blui*, *helblue* = *hele blue*; *citronflav'*, donas *citronflavo* = *citrona flavo*, *citronflava* = *citrona flavi*, *citronflave* = *citrona flave*; *ruzfripon'* liveras *ruzfripono* = *ruza fripono*,¹⁹⁾ *ruzfripona* = *ruze fripona*, *ruzfriponi* = *ruze friponi*, *ruzfripone* = *ruze fripone*, *jusedz'* donas: *jusedzo* = *jusa edzo*, *jusedza* = *juse edza*, *jusedzi* = *juse edzi*, *jusedze* = *juse edze* (en tiuj ĉi esprimoj oni povas anstataŭi *juse* per *jus*, ĉar *jus* ne estas

Havante tiun kunmetitan vorton, ni povas ĝin pluformi finaje. Ĉe tiu pluformado la elementoj de tiu vorto konservas sian karakteron, kaj la komplekso *domkonstruo* kondutas kvazaŭ radikvorto.

Domkonstrua: (domkonstruo)-a: rilata al domkonstruo

domkonstrue: (domkonstruo)-e: karak'erizate de... aŭ ^{per} domkonstruo

domkonstrui: (domkonstrue)-e-i: funkcii (-i) per (-e) domkonstruo

La lasta analizo estas iom komplikita: apudestas tri finaĵoj (o-e-i); la i-finaĵo ne rilatas pleonasme al la antaŭa verba radikoj, sed proprafunkcie al la tuta komplekso *domkonstruo* (pseudopleonasmeco). Tial oni de diras kutime: »mi domkonstruis«, sed »mi konstruis domon«. La komplekeco ankaŭ ĉi tie estas malhelpo por ĝenerala kaj kutima uzado (vd. mian noton ?). (K.)

¹⁶⁾ Ne. Vd. mian noton ?). (K.)

¹⁷⁾ Ne. *Domkonstrua* estas (dom-konstruo)-a: rilata al domkonstruo. *Idiot-instrua* ne estas *idiote instrua*. La ĝeneralajn gramatikajn leĝojn ne kontraŭdiras la reguloj de vortkunmeto, sed — ili estas aliaj. (K.)

¹⁸⁾ Ĉu la aŭtoro ne vidas, ke *bone okaze* havas nenian senco? *Bonokaze* signifas *inter la cirkonstancoj de bona okazo*. Nu, *inter la cirkonstancoj de* povas esti esprimita per la e-finaĵo, do la analizo de *bonokaze* estas:

(bona okazo)-e. (K.)

¹⁹⁾ Mi neniam uzus la vorton *ruzfripono*, des malpli mi ĝin prezentus kiel modelon de vortfarado. Kian Esperanton ni havus, se oni skribus, laŭ tiu ĉi modelo: *Li diligentaĵoj ŝuite faris siajn malfaciltaskojn en la varm-egĉambro*. (K.)

ĝenerala radiko, sed adverbo mem sen finaĵo, kaj tial ĝi ne postulas pleonasman finaĵon -e; tamen en *jusedzo* = *jusa edzo*, ĉar *jusa* estas adjektivo de *edzo*; oni same formus: *jusveno*, *jusvena*, *jusveni*, *jusvene*, k. c.

Intence ni multigis la ekzemplojn por montri la ĝeneralan regulon de kunmetado kaj pruvi, ke ĝi obeas al ĝeneralaj gramatikaj difinoj laŭ kiuj per finaĵo -o, oni signas, *kio estas*, per -a, *kio rilatiĝas al substantivo* kaj per -e, *kio rilatiĝas al verbo* (plej ofte) aŭ *al adjektivo aŭ alia adverbo*: kiam ni havas kunmetitan ideon, kiel *domkonstru'*, *bonven'*, *bonfid'*, *prembros'*, *helblu'*, k. c. el ĝi oni eltiras, kiel el simpla radiko, substantivon per finaĵo -o, adjektivon per -a, k. c.

En tiu ĉi kunmeta procedo estas tute indiferenta, la gramatika karaktero de la elementoj, tio estas ĉu la unua aŭ dua estas laŭ memsignifo substantiva, adjektiva, k. c. En la jusemontritaj ekzemploj ni faris kunmetaĵojn kombinante ĉiaspecajn radikojn, ĉiam per sama procedo kaj kun sama rezultato. Se ni komparas la tri kunmetaĵojn: *domkonstruo* = *konstruo de domo*, *dompordo* = *pordo de domo*, kaj *domutilo* = *utilo de domo*, la rezultato estas ĉiam sama malgraŭ, ke al radiko *dom'* oni algluas unue radikon verban (*konstru'*), due substantivan (*pord'*) kaj fine adjektivan (*util'*). Oni ankaŭ povas aldoni alia-speciajn radikojn: ekz. prepoziciajn: *domantaŭo* = *antaŭo de domo*, tute same kiel *domfasado* = *fasado de domo*, *domĉirkaŭo* = *ĉirkaŭo de domo*; adverbajn: *domsupro* = *supro de domo*, k. c.

Bedaŭrinde la aŭtoroj de P. G. miskomprenis la esencon de vortkunmetado kaj pretendas, ke en duradika kunmetaĵo la gramatika naturo de la lasta radiko influas sur tiun de la unua.²⁰ Laŭ mia opinio tiu ĉi aserto estas plej grava eraro. Ekzemple en la kunmetaĵoj: *dompordo*, *domutilo*, *domkonstruo*, la dua radiko tute same efikas sur la unuan, malgraŭ, ke ĝi estas substantiva en *pordo*, adjektiva en *utilo* kaj verba en *konstruo*.

La Aŭtoroj de P. G. asertas (paĝo 35-a), ke esplorante la esperantan lingvouzon (kial ne lingvuzon?) oni povas eltiri la jenajn regulojn (ni konsideru nun la unuan):

»1. Substantiva ĉefelemento substantivigas la antaŭan flankelementon«.

Ni montru, ke tiu regulo estas malvera, ĉar laŭ ĝenerala gramatika leĝo, *substantivo ĉiam faras adjektivon el ĉio, kion ĝi (subst.) rilatiĝas al si*.²¹

Ni analizu kelkajn ekzemplojn. *Homkoro* signifas *koro-de-homo* aŭ *homa koro*, ĉar ni jam plej ripete pruvis,

²⁰) Tio estas simpla miskompreno. Nenie ni diras tion. Kiam oni komencas analizon de vorto, oni konsideras nur la vortan karakteron de la ĉefelemento, ne la radikan. Laŭ nia sistemo, *dompordo*, *domutilo*, *domkonstruo*, ĉiuj tri havas substantivan ĉefelementon. En parag. 19. troviĝas por substantiva ĉefelemento la ekzemploj *martelbato*, *leter-skribo*, kvankam radike tiuj ĉefelementoj estas verbaj. Vd. ankoraŭ sub parag. 41. la ekzemplojn *corpvarmo*, *ĉielbluo*, kiuj havas, laŭ ni, substantivan ĉefelementon, kvankam *varm* kaj *blu* estas adjektivaj radikoj. Ĉe o-finaĵa vorto oni ĉiam supozas, komencante la analizon, ke tiu o-finaĵo apartenas rekte al la lasta elemento, farante el ĝi substantivan vorton. (K.)

²¹) Tiu ĉi regulo estas malĝusta, ĉar ĝi ne validas ĝenerale. Oni povas nur diri, ke la rilato, kiu ekzistas inter la du elementoj de vortkunmeto, povas esti ofte (ne ĉiam) esprimita per la adjektivo de la flankelemento. Ni konstatas tion en parag. 19. Samloke ni difinas ankaŭ tion, kiam oni povas adjektive esprimi tiun rilaton kaj kiam ne. Adjektiva analizo estas ebla, kiam la flankelemento povas esti esprimita ankaŭ per prepozicio plus substantivo (*homkoro* — *homa koro* — *koro de homo*). Se tio ne estas ebla, la vortkunmeto estas aŭ malbona (*mai-*

ke de-homo estas adjektivo; se en *homkoro* la substantivo *koro* postulus antaŭ si alian substantivon, tiam la signifo de *homkoro* estus *homo-koro*, t. e. afero, kiu estus samtempe *homo* kaj *koro*, kio estas absurda.

En *homkoro* la signifo estas *koro de-homo*. Ĉu la aŭtoroj de P. G. ne konscias, ke se *homo* estas substantivo, *homo* kun antaŭmetita prepozicio *de*, tio estas, *de-homo* estas adjektivo?

En *orĉeno* = *ĉeno el-oro* kaj *ŝtonponto* = *ponto el-ŝtono*, sendube *oro* kaj *ŝtono* estas substantivoj, sed la esprimoj: *el-oro* kaj *el-ŝtono* estas adjektivoj. La pruvo, ke ili estas adjektivoj, estas ke oni povas plej ĝuste diri: *ora ĉeno* kaj *ŝtona ponto*.

La esprimo *skribmaŝino* signifas maŝino *por-skribi*. La Aŭtoroj estas tiel obseditaj per la ideo, ke substantivo ĉiam regas antaŭ si substantivon, ke ili tradukas maŝino *por-skribi*: ambaŭokaze la rezulto estas sama, ĉar duvorto, konsistanta el prepozicio kaj substantivo aŭ infinitivo, kaj kiu rilatas al substantivo estas ĉiam adjektivo: do, *skribmaŝino* = *maŝino por-skribo* aŭ *por-skribi* aŭ *skriba maŝino*. Kio estas *skriba maŝino*? El ĉiaj maŝinoj, tia kiu estas karakterizita per ideo *skrib'*, destinita *skribi* (ĉar radiko *skrib'* estas verbo), tio estas maŝino, kies speco

faciltasko, *varmegĉambro*), aŭ escepta (ni listigas tiajn esceptojn en parag. 145.)

Laŭ la regulo de s-ro Inglada estas tute nature, se oni ĉiam kunfandas la substantivon kun ties adjektiva epiteto. Oni do povus, laŭ s-ro Inglada, verki tutan libron, en kiu ne estus eĉ sola memstara a-finaĵa adjektivo, sed ĉiu estus kungluita kun la substantivo al kiu ĝi rilatas. Ĉu tio do estas valida kaj aprobinda regulo?

Male, nia regulo: »Substantiva ĉefelemento substantivigas sian flankelementon« donas regulon ĝenerale validan, rompitan nur de malmultaj esceptoj facile listigeblaj.

Oni devas nur *kompreni* tiun regulon. Kion ĝi signifas? Simple tion, ke la flankelemento alprenas la finaĵon -o, evidente aŭ latente: *belkulto* estas *belo-kulto*, *varm-energio* estas *varmo-energio*, *dormĉambro* estas *dorma-ĉambro*. La lasta ekzemplo klare montras, ke, kiam oni konservas la finaĵon tiaokaze, oni uzas -o, kaj oni ne diras *dorma-ĉambro* aŭ *dormi-ĉambro*.

En tiaj vort-kunmetoj do (krom kelkaj esceptoj supre menciitaj) apudestas ĉiam du substantivoj. Estas indiferece, ĉu la ĉefelemento kaj la flankelemento estas radike-substantivaj aŭ nesubstantivaj kaj same estas indiferece, ĉu la substantiveco de la flankelemento estas markita per la o-finaĵo (kiel en *dorma-ĉambro*) aŭ restas latentata (kiel en *varm-energio*). En la *kunmetoj mem* apudestas du substantivoj — jen kion diras la unua vort-efika regulo. Nek pli, nek malpli.

Inter tiuj du substantivoj (rimarku: *du substantivoj!*) ekzistas ia rilato. Tiun rilaton oni povas esprimi eĉ la analizo per prepozicioj aŭ — kelkfoje — per la *rilata* -a-finaĵo. Sed, ĉar tiu rilato ekzistas ĉiam *inter du substantivoj*, la substantiveco de ambaŭ elementoj devas esti certigita eĉ la analizo. Se oni uzas prepozicion, ekzistas neniam embaraso: la prepozicio ja interligas du substantivojn: *hom-kapo* (kapo de homo), *belkulto* (kulto de belo). Sed se oni uzas eĉ la analizo la a-finaĵon, la afero ne estas tiel simpla. Nome, la a-finaĵo nur post substantivaj radikoj lasas konservi la substantivecon de la flankelemento, dum post adjektivaj radikoj ĝi estas pleonasma, do se al adjektivradika flankelemento oni kroĉas la a-finaĵon, ties substantiveco perdiĝas: oni ricevas puran adjektivon. La vorton *hom-kapo* do oni povas analizi *homa kapo*, ĉar *hom* estas radike substantiva, do la substantiveco de la flankelemento restas markita. Sed la vorton *belkulto* oni ne povas analizi *bela kulto*, ĉar *bel* estas adjektiva, do en *bela* nenio markas la substantivecon. La malĝustecon de tia analizo klare montras la senco: *belkulto* estas *kulto de belo* (kulto dediĉata al belo), dum *bela kulto* estas *kulto bela* (kulto farata per belaj ceremonioj). (K.)

estas la skriba. Kio estus samklarige *maŝinskribo*? *Skribo per-maŝino maŝina skribo*, skribo karakterizita per ideo *maŝin'*, *skribo* kies speco estas la *maŝina*.

Laŭ la simpla teorio, kiun ni prezentas, la vortkunmeto estas regita de simplaj leĝoj:²²⁾ estas indiferece, ĉu la naturo mem de la kunmetitaj elementoj estas substantiva, adjektiva aŭ verba; ne estas rekta efiko (de maldekstre dekstren) en unuj okazoj kaj inversa en aliaj; la gramatika karaktero de la radikoj ankaŭ ne influas interelemente: ne estas necese distingi kuntenajn kaj disfalajn flankelementojn; ne estas necese apliki malsamajn regulojn al samspecaj kunmetoj: *domkonstruo* estas same laŭregula kiel *bonfarto* = *bona farto*, ĝusta traduko kaj ne la rezultanta de P. G. *farto de bono*²³⁾ (kvazaŭ *bono* povus esti malsana!); ne estas necese distingi diversajn specojn de afiksoj, radikoj, k. c. nur ĉar ili ne volas humile obedi al arbitraj reguloj, kiujn oni elpensis por ili; la gramatikaj finaĵoj *-o*, *-a*, *-i*, *-e* ĉiam plenumas sian naturan rolon kaj ili ne bezonas esti aŭ ne proprafunkciaj (kial ne *proprefunkciaj*?) k. c. tio estas, per nia teorio malaperas ĉiuj subtilaj malpravaj komplikaj prezentitaj en P. G. kaj la esperanta vortfarado fariĝas simpla kaj natura afero, kiel ĉiam estis, ĉar ĉiuj Esperantistoj senpene kaj senkonscie sukcesis fari la kunmetaĵojn, kaj se ili devus atenti ĉiujn distingojn kaj klarigojn de P. G. ili rompūs al si la kapon kaj ne trafus tiajn simplajn esprimojn, kiaj estas *bonfarta* klarigita en P. G. (bone farti) *-o -a* (!!),²⁴⁾ *senmova*: (sen movo) *-o -a*, *senutila* = (sen util)-eco kaj por elvoki la ideon *ĉambro* ili devus ĝin tiri el *ĉambreĵaĵo* (!).

Ĝis nun ĉiuj simplaj Esperantistoj, trafitaj de la ideo *ĉambro*, ĝin esprimis tuj, senpense kaj senkonscie simple

²²⁾ La leĝoj estas simplaj, sed ĉu utilas ilia simpleco, se ili ne estas validaj? (K.)

²³⁾ Nenie ni analizas ĉi tiun vorton tiamaniere. Ni okupiĝu iom pri ĝi.

Kial oni diras ofte *bonfarto*, sed neniam oni diras *bonpano*?

Ni analizu tiujn vortojn.

Bonpano, laŭ VER. I. estus *pano de bono*. Tio evidente ne donas la deziratan senceon. Ni rigardu alian analizon, laŭ parag. 41. 3.: (*bona pano*)-o: *-o de bona pano*. Tio estas sensencaĵo. La deziratan senceon donus nur la adjektiva analizo: *bona pano*. Sed tio estas kontraŭregula. Tial do, oni ne uzas tiun kunmeton, oni diras simple: *bona pano*.

Bonfarto laŭ VER. I. estus *farto de bono*. Tio estas sensenca. La nesukceso de la unuagrada analizo montras, ke la o-finaĵo estas ĉefelemento, do rilatas ne al la lasta elemento (*fart*), sed al ambaŭ elementoj (*bon-fart*) kune. Ni provu

(*bon fart*)-o

Se du elementojn kunkroĉas finaĵo, inter la elementoj povas validi la sintaksaj leĝoj. Ĉar *fart* estas verba radikoj, *bon* rilatas al ĝi adverbe. La kompleta analizo do estos:

(*bone farti*)-o tio estas (*stat*)-o *bone farti*

Ĉe la duagrada analizo do ni ricevis senchavan rezulton, sekve la vorto *bonfarto* estas bone kunmetita.

Estas vere, ke ŝajnas pli simple analizi ĝin *bona farto*: tiel ni havus la saman senceon. Sed — jen estas grava diferenco — se ni povus ĝin analizi nur tiamaniere, la vorto estus same malbona kiel *bonpano*.

Por nia analizmetodo do ni havas fidindan rimedon por ekscii, kiu kunmeto estas ĝusta kaj kiu ne. La lingvuzo, sub la influo de naciaj lingvoj, trarompis kelkfoje (ne ofte) tiujn regulojn. Sed per nia analizmetodo ni rekonas tiujn formojn kiel esceptojn neimiteblajn *generale*. (K.)

²⁴⁾ Se la vorton *bonfarto* ni jam analizis

(*bone farti*)-o

tute ne estas granda komplikeco alroĉi la a-finaĵon:

dirante: *ĉambro*, sed post tralernado de P. G. ili devus sekvi la vojon *ĉambr-aj-o*. Mirinda nova simpleco!²⁵⁾

Ĝis nun kiam nia menso estis trafata de la ideo *manko-de-utilo*, ni tuj diris plej simple: *senutila*. Bedaŭrinde tia mirinda simpleco kaj tujeco de vortkunmeto jam ne ekzistas: ni devas sekvi la vojon: (*sen util*)-eco) a!!

Por plene rifuti la malpravajn teoriojn de P. G., laŭ kiu, en duradika kunmetaĵo ĉefelementa substantivo substantivigas la flankelementon, ni ekzamenu la kunmeton de adjektiva radikoj kun substantiva. En nia teorio laŭ kiu la substantiva ĉefelemento postulas antaŭ si adjektivan flankelementon, la pritraktata demando ne povas esti pli simpla kaj *bonfarto* signifas *bona farto*. Sed, laŭ la P. G., ĉar antaŭ la finsubstantivo devas ekzisti alia substantivo, grava konflikto estiĝas, kiam radikoj adjektiva, kiel *bon'*, *bel'*, *varm'*, k. c. aŭ verba kuragaĵo kunmetiĝi kun *posta* substantiva radikoj. Laŭ tia teorio *bonfarto* devus signifi *farto-de-bono* kaj ĉar tia traduko ŝajnas plej stranga, la aŭtoroj de P. G. preferas konkludi, ke la ĉiumomente uzata *bonfarto* estas vorto kontraŭregule kunmetita!²⁶⁾

Samkaŭze devus esti eljetitaj la kontraŭregulaj kunmetaĵoj: *rektangulo* = *rekta angulo* kaj ne *angulo de rekto*, *rektlinio* = *rekta linio* kaj ne *linio de rekto*, *multangulo*, *triangulo*, *kvarangulo* k. c., tiom multaj vortoj komenciĝantaj per *plen'*: *plenmano* (da) = *plena mano* da (ĉar *mano de pleno*!...) *plenbuŝo*, *plenluno*, *plenkulero*..., *novluno*, *diverskoloro*, *grandanimo*, *facilanimo*, *flavruĝo*, *helverdo*, *malhelbluo*, *erarlumo*, *ĉashundo*, *ĉefanĝelo* (ne signifus *ĉefa anĝelo*, *unuaranga*... sed *anĝelo de ĉefoj!*), *ĉefepiskopo*, *ĉefministro*, *grandlitero*, *klinlitero*, *pagletero*, k. c. p. Ho kiom da ribelemaj vortoj!²⁷⁾

Ni analizu kelkajn kunmetaĵojn prezentitajn en P. G.: *lumradio*, *varmenenergio*, *belkulto*. En la unua, la signifo estas *radio de lumo*, kiu egalvaloras al *luma radio*, kiel ni jam pruvis. Tie ĉi ekzistas ia konflikto, ĉar *lum'* estas verba radikoj, sed ni demandas: se anstataŭ difini la radikojn *lum'* per la verbo *lumi*, D-ro Zamenhof estus difininta ĝin per la substantivo *lumo*, ĉu la aliaj vortoj el ĝi eltiritaj: *lumi*, *luma*, *lume*, ne signifus tute same, kiel la nunaj *lumo*, *luma*, *lume* eltiritaj el *lumi*?²⁸⁾ Ĉu tio povas

(bone farti)-o-a

t. e. karakterizita de (-a) la stato (-o) *bone farti*.

Cetero, kiam la aŭtoro plendas pri la komplikeco de niaj formoj, li forgesas, ke nia vortfarado ne estas lernolibro, sed teoria analizo de la Esperanta vortkonstruo. Ĝi do ne servas por ĉiutaga uzo. Sed per ĝi oni povas fiksi certajn tipojn de kunmeto, kaj la simpla esperantisto povas facile imiti tiujn tipojn, senkonscie pri ilia pli malpli komplikita strukturo. Ekzemple: se ni scias, ke *bonfarta* estas regula, estas facile fari analogie: *facilkura*, *profundpensa*, *belskriba*, *bonokaza* ktp. Male, se ni rekonis la kunmeton *plenmano* kiel kontraŭregulan escepton, la simpla esperantisto scios, ke oni ne povas diri *plenĉambro*, *plenvortaro*, *plenpoŝo*, ĉar el escepto oni ne povas tiri regolon. Tiom ne, ke eĉ la vorto *malplenmano* estas neniam uzata. (K.)

²⁵⁾ Malprava ironio. Per tiu vorto ni volis montri nur la funkcion de la principo »Necese kaj Sufiĉo«. Oni devas legi la tutan paragrafon. (K.)

²⁶⁾ Ni asertas ĝuste la malon. Vd. mian noton ²³⁾ (K.)

²⁷⁾ La ekzemploj en tiu ĉi alineo parte apartenas al la esceptoj (vd. mian noton ²³⁾), parte estas tute regulaj laŭ nia sistemo. Bedaŭrinde la aŭtoro studis nian libron tro supraj, ĉar alie li ne miskomprenus ĉiupaĝe aferojn klare esprimitajn, kaj ne atribuos tiomfoje al ni ĝuste la *malon* de tio, kion ni diris. (K.)

²⁸⁾ Jes ja. Ankaŭ laŭ nia sistemo ili havas la saman signifon, ĉar la a-finaĵo, kiel adjektiva ĉefelemento, substantivigas la antaŭan elementon, se tiu ne estas radikoj substantiva; do *luma* estas *lumo-a*. Tial la verbo-adjektivoj (*lum-a*) kaj la substantivo-adjektivoj (*hom-a*) kondu-

havi eĉ plej malgrandan influon sur la kunmeton *lum-radio* kaj similaj? Ni pritraktos poste radikojn, kiel *bros'*, *martel'* k. c. kiuj ŝajnas ribelemaj.

Ni analizu la sekvantan ekzemplon: *varmenergio*. Eble estas preferinde pritrakti paralele tri samspecajn kunmetaĵojn: *sunradio*, *varmradio* kaj *lumradio*: la signifo estas tute sama: *radio de suno*, *radio de varmo* kaj *radio de lumo*. Ĉar de kun substantivo egalvaloras al adjektivo, tiuj signifoj estas: *suna*, *varma* kaj *luma radio*.

Ni pritraktis kunmeton de radiko *radi'* kun aliaj tri: *sun'* (subst.), *varm'* (adj.) kaj *lum'* (verbo). Sed la malfacilaĵo, laŭ P. G., estiĝas nur ĉe la dua: *varmradio*, kiu devas signifi *radio de varmo*.²⁹⁾

Ni esploru pli funde la sencon de *varm'*. Ĝi signifas kvaliton: por pliprecizigi ĝin ni supozu ekz. ke varma objekto estas tiu, kies temperaturo superas 30 gradojn (Se vi volas alian limon 40 aŭ 50, tio estas indiferenta). Kion nun signifas la substantivo *varmo*? Ĝi havas du apartajn sencojn: a) la kvalito de aĵo, kies temperaturo superas 30 gradojn; b) energio, aŭ speciala formo de la energio, tiel nomita de la fizikistoj. Do, se al la adjektivo *varma* ni donas nur la sencan a) tio estas: kun-temperaturo-superanta-30 gradojn, ni ne rajtas doni al *varmo* alian signifon krom la a) (la temperaturan). En tia okazo: *varmradio* = *radio de varmo* nur signifos *varma radio* (radio kun ia temperaturo). Se ni akceptas, ke *varmo* signifas ian energion, kiu elsendas iajn radiojn, tiam tiuj radioj estos *varmaj*, ĉar *varma* nun signifos *de-energio nomita varmo*, ne de temperaturo (*pliol-30-grada*).

Se ni supozas, ke *varmo* povas signifi *energion* (specialan formon de la energio, en kiun emas degradiĝi la ceteraj), tiam la esprimo *varm-energio* signifos ĝuste tiun energion, kiu estas la *varma* (tiu de *varmo*). Kaj eĉ *varm-energio* estus esprimo analoga al *urbo Romo*. Tie ĉi estiĝus apudmeto aŭ apozicio, kiel ĉe *reĝo-profeto*, *surda-muta*, kaj ceteraj.³⁰⁾

Pri la tria ekz. *belkulto*, se ĝi devas signifi *kulto pri-belo*, oni tuj ekvidas, ke *pri-belo* estas adjektivo,³¹⁾ kaj ke *belkulto* estas ĝuste la kulto de speco *bela*, t. e. *la bela*. Tio ĉi montriĝos pli klare kiam ni poste pritraktos la sencan precizan de *belo* kaj *beleco*.

Ankaŭ sur paĝo 37-a de P. G. oni reinsistas dirante: »En kelkaj vortoj la adjektiveco de la flankelemento estas nur ŝajna. Ekzemple, *libertempo* ne estas *libera tempo* sed *tempo de libero*«.

La Aŭtoroj ne estas konsekvencaj pri sia teorio: en *varmenergio* *varma* estas adjektiva radiko: tamen en *libertempo* *liber'* estas nur *ŝajne* adjektiva. Ili ne volas konfesi, ke *libertempo* signifas *libera tempo*, ĉar tiel tiu vorto estus ankaŭ kontraŭ iliaj kunmetaĵ reguloj.³²⁾

Sed, se studento ekz. parolas pri sia *libertempo*, kion li volas esprimi, se ne la somerajn epokon, kiam li ne devas studi lecionojn, ĉeesti kursojn k. c. kaj ne havante devigan

tas ĉe la vartformado tute egale. Jen estas la utilo de la regulo »*verbo-adjektivo estas ĉiam verbo-substantivo-adjektivo*«, kiun la aŭtoro sube tiel ironie primokas. Vd. mian noton ⁵⁵⁾. (K.)

²⁹⁾ Jes.

³⁰⁾ Ĝi tiu, iom konfuza rezonado tute ne povas refuti, ke estas evidenta diferenco inter la sencoj de *malutila kompenso* kaj *kompenso de malutilo*; *volupta amo* kaj *amo de volupto*; *bela kulto* kaj *kulto de belo*; *kulpa mallaŭdo* kaj *mallaŭdo de kulpo*; *sana konsilanto* kaj *konsilanto de sano*, kaj ke *malutilkompenso*, *voluptamo*, *belkulto*, *kulpmallaŭdo*, *sankonsilanto* signifas ĉiam la duan el la respektivaj du supraj esprimoj. (K.)

³¹⁾ Ne. *Pri belo* ne estas adjektivo, ĉar la adjektivo *bela* neniam povas havi la sencan *pri belo*. (K.)

³²⁾ Miskompreno. En *varm-energio* la adjektiva radiko *varm* iĝas substantiva vorto per la vortefiko de *ener-*

okupadon, li estas ĉe *libera tempo* aŭ li havas ĉiam *liberan tempon*? Ĉu la esprimo *tempo de libero* ne aplikigas pli ĝuste ekz. al epoko kiam popolo post ĉeso de despota regado ĝuas liberecon, kaj kredas sin en *tempo de libero*?

Se oni argumentas, ke *libera tempo* estas malĝusta esprimo, ĉar tempo pasas kaj pasas ĉiam kaj ne povas konsideriĝi libera aŭ sklava, tio ĉi estas eble plej logika, sed la simplaj Esperantistoj kutimas diri: Hodiaŭ mi havas aŭ ne havas *tempon liberan*, t. e. *libera por tiu, kiu parolas*, ĉar per si mem la tempo ne estas libera, nek mallibera, nek bona, nek malbona... ĝi nur estas tempo.

Ĝuste la vortkunmeto *libertempo* sufiĉe bone adaptiĝas al laŭvorta traduko *libera tempo*: tio ĉi ne ĉiam okazas, ĉar la signifo de vortkunmeto ne povas esprimiĝi plej ekzakte laŭ matematika formulo, kiel plej bone determinita funkcio el ĝiaj vortelementoj. Ekz.: ĉu *librotenisto* estas iu ĝendarmo, kiu speciale tenas aŭ gardas librojn, kaj ilin protektas? Ĉu *ventroparolisto* estas tiu, kies voĉo estiĝas en ventro? ĉu *erarlumo* signifas *lumo de eraro*?³³⁾ ĉu *plenlumo* aŭ *novluno* iĝas kredi, ke luno estas astro kiu povas pleniĝi aŭ fariĝi nova? En ĉiuj vortkunmetoj oni ne devas plej rigide sin teni al laŭvorta signifo, oni devas ofte ŝanĝi ĝin iomete kaj atenti sugestojn pri la rezulta senco, kiu estiĝas ĉe la kunfandiĝo de diversaj radikoj.

Jen du gravaj leĝodonistoj de la vortfarado: la senco kaj la kunteksto! Multfoje la apudeco de unu radiko elvokas per ĝia signifo ŝanĝon en alian kaj la vortkunmeto akiras ian neatenditan kaj delikatan nuanciĝon de signifo.³⁴⁾

Ekz. sufikso *-ist* signifas: *kiu speciale okupiĝas pri*... Se oni volas pliprecizigi la signifon de *ist-vorto*, estas necese atenti la intiman signifon de la radiko al kiu *-ist* algluiĝas. Ekz. *fiŝisto* povas signifi kaptisto, vendisto, bredisto... de fiŝoj, eĉ faristo, se oni faras fiŝojn (metalajn aŭ lignajn objektojn kun fiŝa eksterajo) por infanludo, sed *malsanulisto* ne povas signifi kaptiston, nek vendiston, nek brediston de malsanuloj; *libristo* povas signifi presiston aŭ eldoniston de libroj; tamen estas absurde pretendi, ke *dentisto* povas signifi presiston aŭ eldoniston de dentoj ktp.³⁵⁾

La signifo de *Parize* estas en *Parizo*, se oni diras: *li loĝas Parize* aŭ laŭ *Pariza modo*, se oni diras: *li salutas Parize*. Nur per tiuj ĉi ekzemploj oni klare vidas, ke la senco kaj la kunteksto fine decidis pri la definitiva signifo de la kunmetaĵo. Tiel, do, estus plej interese atenti la sencan kaj kuntekstan, kiam oni esploras la vortfaradon: sed tio ĉi koncernas pli rekte leksikologion aŭ vortaron, ol gramatikon.

Eĉ la aŭtoroj de P. G. kreas la senutilan kaj komplikan klasigon de prefiksoidoj kaj veraj prefiksoj. Ili por tio nur atentigas bagatelajn punktojn, ĉu la prefiksoj konservas la gramatikan naturon de la radiko al kiu ili algluiĝas, tio estas, ili miskomprenas konfuza la gramatikan rolon de finaĵoj *-o*, *-a*, *-i*, *-e* kun la funda senco de la radikoj.³⁶⁾

gio. Liber estas adjektiva radiko, sed en *libertempo* ĝi iĝas substantiva vorto (libero-tempo). Oni povas ĝin analizi ankaŭ *libera tempo*, sed se oni povus ĝin analizi nur tiamaniere, ĝi estus neregula kunmeto. Kp. mian noton 23. (K.)

³³⁾ Jes, ĝi estas *lumo de eraro*, sed la senco estas tre libere fiksita de lingva konvencio. *Erarè lumo* estas same nekonservanta laŭsence. (K.)

³⁴⁾ Tion ni ne neas. (K.)

³⁵⁾ Kompreneble. (K.)

³⁶⁾ Tion ni faris baze de la 11-a regulo de la Fundamenta gramatiko: »la gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj.« (K.)

Cu estas grave, ekz. ke prefikso *-ist*, (kiun la aŭtoroj de P. G. kredas substantiva), konservas la substantivan karakteron de radiko *astronomi* en *astronomiisto* kaj ne konservas tiun de verbo *vend* en *vendisto*? Cu pro tio ŝanĝiĝas la speciala nuanco de sufikso *-ist* en kunmetaĵo, aŭ la meĥanismo de la kunmetaĵo de vortoj?³⁷⁾

Se por difini ian radikon, ekz. *am*, oni elektis en *Universala Vortaro* la verbon *ami*, anstataŭ la substantivo *amo*, ĉu nur tio ŝanĝos la signifon de la ceteraj vortoj *ama* kaj *ame*, kaj ankaŭ la regulojn de vortfarado?³⁸⁾

Cu ne okazas plej ofte, ke en multaj radikoj estas tute indiferente elektitaj por difino, ĉu la substantivo, ĉu la verbo? Cu ne okazis tio pri *flor*, unue difinita per verbo *flori* kaj poste per substantivo *floro* (objekto kaj ne ago)?³⁹⁾

Cu nur pro tio, ke al D-ro Zamenhof estis pli oportune difini radikon, ĉu verbe, ĉu substantive, ĉar la naciaj tradukoj (franca, angla, germana...) unuafoje rekomendis verbon, aliffoje substantivon, ĉu nur pro tio, devas ŝanĝiĝi la reguloj de vortfarado kaj la eltiro de la senco rezultanta? Tiel, do, supraĵaj konsideroj devas superregi la esencajn kaj fundajn, kiu rilatiĝas al la senco de la vortoj?

Se ni formas la kunmetaĵon *domkonstru* tute ne difinante ĝian gramatikan (ne esencan) rolon, ĉu ne estas plej facile eltiri la plenan familian serion: *domkonstruo*, *domkonstrua*, *domkonstrui*, *domkonstrue*? Cu la senco de tiuj ĉi vortoj ne estas plej klare kaj precize difinita? Cu por ricevi la kunmetaĵojn *domkonstruo*, *domkonstrua*, k. c. oni devas eĉ plej malmulte atenti, ĉu la unua radiko estas substantiva, ĉu la dua verba? Cu se ili havus alian gramatikan karakteron oni farus alimaniere la kunmeton kaj oni ricevus alimaniere la sencan?

Jen arbitra, malnatura kaj senutila konsidero, tiu, kiu koncernas la gramatikan karakteron de la radikoj por konkludi pri la leĝoj de vortfarado kaj pri ricevo de la rezultanta senco.⁴⁰⁾

Por montri, ke estas necese atenti la gramatikan karakteron de la radikoj, oni konsideras kelkajn kiel *bros*, *martel* k. c. kaj el la fakto, ke ili estas difine substantivaj oni volas eltiri ĝeneralajn konkludojn pri la senco de ĝiaj kunmetaĵoj kaj eĉ pri la ricevo de simplaj vortoj rezultantaj de la algluo de finaĵo *-o*, *-a*, *-i* kaj *-e*.

Ni montru, ke tia opinio estas falsa. Por tio ni unue konstata, konsiderante ekz. la radikon *bros*, ke la esenco de radiko estas esenca, kaj ankaŭ fundamentaj, la finaĵoj estas *substantivo*, sed *nur en tio* (jen la funda kialo), ke pro memradika difino signifas *instrumenton* aŭ *ilon*.⁴¹⁾

³⁷⁾ Ne. Ĝuste tio estas la avantaĝo, ke ĝi ne ŝanĝiĝas. (K.)

³⁸⁾ Ne. Vidu mian noton 28. (K.)

³⁹⁾ En multaj radikoj estas indiferente, sed en multaj ne. Ekzemple: se *flor* estas verba radiko, *floro* signas unuavice agon, kaj la objekton signas *floraĵo*. Se ĝi estas substantiva, *floro* signas objekton kaj la agon signas *florado*. (K.)

⁴⁰⁾ Ni jam montris (noto 15), ke en *domkonstru* la aŭtoro kaj ni plene konsentas, escepte ke ni ne konfuzas adjektivon kun DE-komplemento. Ni mem diras, en la parag. 14. de la P. G., ke la radik-kategorio ofte estas indiferenta ĉe la vortformado. Do oni ne povas nin refuti per ekzemploj, en kiuj la indiferenteco ĉeestas. Se la aŭtoro pli funde esploras nian sistemon, li trovos, ke parto de niaj reguloj servas ĝuste por la klarigo kaj motivado de tiu indiferenteco. (K.)

⁴¹⁾ Tio estus ĝusta, se ĉiuj substantivaj radikoj signus instrumentojn. Sed la aŭtoro povas trovi en la parag. 27.

Bros per difino mem signifas instrumenton. Por formi verbon oni aldonas *-i* kaj ricevas *brosi*. Kion signifas *brosi*? Agi per broso, uzi la instrumenton *bros*. Cu por eltiri el radiko substantiva *bros* la verbon *brosi* ekzistas baro aŭ malhelpo? Tute ne. La konflikto estiĝas, kiam oni volas esprimi la agon *brosi*, t. e. la agon uzi la ilon nomitan *bros*. Cu oni povus akcepti, ke la vorto *bros*, kiu difine signifas la instrumenton por *brosi*, signifas samtempe la agon mem *brosi*? Tute ne, sed tio okazas, ne ĉar *bros* estas substantivo, sed nur ĉar ĝi signifas ilon, kiun oni ne devas konfuzi kun ĝia uzo aŭ ago. Kiel do oni esprimos la agon *brosi*? Plej simple: ĉu uzante la prefikson *ad*, se oni akceptas, ke ĝi povas signifi agon kaj formante »*brosado*«, aŭ simple dirante: *brosago* aŭ *brosuzo*, se oni akceptas, ke *ad* nur signifas daŭron aŭ ripeton de la ago.⁴²⁾

Kaj atentu, ke en tiu ĉi lasta okazo, oni anstataŭas *ad* per *ag* (aŭ *uz*) t. e. ke oni anstataŭas unu silabon *ad* per alia, *ag*, eĉ nur unu literon *d* per *g*. Cu la eltiro de la substantiva esprimo: ago...-i, ago *brosi* tiel simpla, ĉu per *ad*, ĉu per *ag*, estas ia ĝrava kaj esenca fakto, kiu devas plej profunde ŝanĝi la ĝeneralajn leĝojn de la vortfarado? Kaj kial? Nur pro radikoj: *bros*, *martel* k. c. kiuj estas en tia granda amaso, ke oni povas kalkuli ilin per la fingroj de unu aŭ ambaŭ manoj?⁴³⁾

Jen terura komplikaĵo, kiu estas plej senutila. Tamen la aŭtoroj de P. G. kredante, ke la gramatika karaktero de radiko estas esenca, kaj ankaŭ fundamentaj, la finaĵojn *-o*, *-a*, *-i*, *-e*, ĉiufloje kiam unu el tiuj finaĵoj algluiĝas al radiko ne gramatike samnatura, apartigas la finaĵojn kaj faras el ĝi ĉefelementon, levante ĝin al radika kategorio.⁴⁴⁾ Kaj jen familio da samklasaj vortoj, eltiritaj per sama procedo, havantaj identan signifon, estas malsame klasigitaj, nur pro tio, ke oni donas al ili maldaŭran neesencan rolon gramatikan, ĉu substantivan, ĉu adjektivan k. c.

Ekz. *domkonstrui* estas klasigata diversmaniere, ol *domkonstruo*, *domkonstrua* kaj *domkonstrue*, nur pro tio, ke *-i* signas verbon, kiel *konstru* kaj finaĵo *-i* ne estas ĉefelemento en *domkonstrui*, dum *-o*, *-a*, *-e* ja estas en aliaj vortoj.

Kaj tamen kiel simple rezultas analizi *domkonstruo*, *domkonstrua*, *domkonstrui* kaj *domkonstrue*, eltirante ilin el kunmetita ideo *domkonstru* kaj nur atentante la gramatikan rolon, kiun oni atribuas al ili per finaĵoj *-o*, *-a*, *-i*, *-e*?⁴⁵⁾

Tiamaniere la klasigo de tiaj kunmetaĵoj (*domkonstruo*, *domkonstrua* k. c.) estas plej simpla kaj natura, atingebla de simplaj Esperantistoj, t. e. de mezinstruitaj homoj, nur por kiuj D-ro Zamenhof kreis Esperanton, ne por filozofoj, logikistoj, subtilistoj... kiuj por klarigi tiajn simplajn kunmetaĵojn, kiel *domkonstruo*, *senforta*, k. c. bezonas krei tiajn pseŭdosciencajn⁴⁶⁾ esprimojn: finaĵaj ĉefelementoj, flankelementoj, ĉu kuntenaj, ĉu disfalaj, rekta vortefiko (de dekstre maldekstren), sufiksoj, kiuj ne estas veraj sufiksoj (sufiksoidoj), vortoj, kiuj estas

de P. G. 70 tiajn radikojn de ne-instrumenta signifo: korpopartojn, objektojn, materialojn, profesiulojn ktp. Per »substantivo« ni donis nur komunan nomon al ĉiuj ĉi radikoj. (K.)

⁴²⁾ Jes, ni konsentas. (K.)

⁴³⁾ Vd. mian noton 41. (K.)

⁴⁴⁾ Vd. mian noton 36. (K.)

⁴⁵⁾ Ree *domkonstru*! Vd. mian noton 40. (K.)

⁴⁶⁾ Kial pseŭdosciencaj? Cu ili ne estas bone difinitaj terminoj por efektive ekzistantaj funkcioj? (K.)

kontraŭregulaj (*senforta*)* klarigoj tiel strangaj kaj nekompreneblaj kiel: *beleco* = *belo eco* = *belo, kiu estas eco*, *belulo* = *belo ulo*, *belo kiu estas ulo* (paĝo 38-a) ktp.

Tiu supra konsidero pri gramatika rolo klasigis en P. G. la sufikson *ist* inter la substantivajn. Mi kredas superflue klarigi gramatike la sufikson, ĉar ekz. per *-ist* oni povas eltiri nesubstantivajn vortojn.⁴⁸⁾ Ekz. *vendista*, *vendiste*, k. c. kaj se oni atentis la veran signifon de *-ist*, ĝi estas pli nuancita verbe, ol substantive. La sufikso *-ist* plej taŭge algluiĝas al verbosencaj radikoj. Ekz. *vendisto*, *kolektisto*, *pentristo*, *portisto*, k. c. signifas: kiu speciale aŭ profesie *vendas, kolektas, pentras, portas* k. c.

Se oni aldonas ĝin al objekto aŭ estaĵo, oni devas plenigi la sencon per almeto de ĝia ago. Ekz. *libristo* (oni devas pensi pri *librovendisto, libroeldonisto, libropresisto* k. c.); *ŝuisto, seĝisto, ĉapelisto*, k. c. (faristo aŭ vendisto de ŝuoj, seĝoj, ĉapeloj, k. c.), *malsanulisto* (flegisto de malsanuloj) ktp.

Kompreneble se la senco de la radiko estas intime ligita al ideo de okupiĝo (ekz. se temas pri scienco, arto, profesio, k. c.) tiam la *ist*-vorto ne bezonas pluan difinon. Ekz. *botanikisto, fizikisto, artisto*, k. c.

Kiel ni vidas la intiman sencon de *-ist* ne estas substantiva, sed partecipa (devenanta de verbo).⁴⁹⁾ *Ist* signifas *speciala aŭ profesia...-anto, kiu speciale aŭ profesie...-as*. Tamen, ĉu *-ist* estas substantiva aŭ partecipa aŭ verba, jen flanko demando, kiu ne esence trafas la problemon de vortfarado.*)

Malgraŭ, ke la aŭtoroj de P. G. pretendas, ke substantiva radiko substantivigas la flankelementon, la fakto, ke ĝi adjektivigas ĝin estas tiel evidenta, ke ili kelkfoje submetiĝas al tiu ĉi lasta. En la fino de paĝo 39-a, kiam ili klarigas, ke la *-a* finaĵo estas duspeca: a) *-rilata, -apartena* kaj b) *-kvalita*, ili donas klarigajn ekzemplojn, kiuj konfirmas nian teorion. Ili diras, ke *muzika noto* = *muziknoto, kotona industrio* = *industrio de kotono* (kio egalvaloras al *kotonindustrio*), *reĝa palaco* = *reĝpalaco*, *ŝtona ponto* = *ponto el ŝtono* = aŭ *ŝtonponto, ora ĉeno* = *ĉeno el oro* = *orĉeno*, k. t. p. Tiel, do, la klarigo de P. G. pri *-a* finaĵo algluita al substantivaj radikoj plene kontraŭdiras la regulon de *kunmetado, kiun ili mallonge signas VER. 1.50)*

Same malprava estas la dua regulo VER. 2 (paĝo 35-a): *»Adjektiva ĉefelemento substantivigas la antaŭan flankelementon«*.

Kaj ili aldonas: *»se la flankelemento ne estas radike substantiva ĝi fariĝas tia per la vortefiko de la adjektiva ĉefelemento«*.

Tiu ĉi regulo estas plej malprava, ĉar kiel ni jam sufiĉe pruvis, *ĉio kio rilatiĝas al adjektivo estas adverbo pro difiĝo mem*. Sekve: *herbriĉa* = *riĉa per* aŭ *pri herbo*.

* Malfeliĉa plej simpla kunmetaĵo *senforta*! Vi devas cedi vian lokon al *fortsena*, kiam la superEsperanto regos, kaj ĉiuj simplaj Esperantistoj estos frenezigintaj.⁴⁷⁾

* Ni ne povis kompreni la sencon de *sagisto* (isto de saĝo!) paĝ. 85-a.

⁴⁷⁾ Kiel forte min vundus tiu ĉi ironio, se efektive mi estus kondamninta la formon *senforta*, se efektive mi ne estus pruvinta ĝian regulecon, se efektive mi estus proponinta la formon *fortsena*. (K.)

⁴⁸⁾ Estas jam preskaŭ tede ripeti, ke substantiveco de *radiko* tute ne signifas, ke el ĝi oni ne povas eltiri nesubstantivajn vortojn. (K.)

⁴⁹⁾ Se *ist* estas partecipa, ĝi devus konduki kiel la partecipoj. Sed ĝi ne kondukas tiel. *Suista filino* estas *filino de ŝuisto*, dum *amanta filino* ne estas *filino de amanto*. (K.)

⁵⁰⁾ Plena miskompreno. Vd. mian noton ²¹⁾. (K.)

egalvaloras al *herbe riĉa; belriĉa* = *bele riĉa; ĝustdira* = *ĝuste dira*, k. c.⁵¹⁾

Konsente kun tiu ĉi teorio la aŭtoroj de P. G. aldonas (paĝo 39-a): *»Kelkfoje la flankelemento estas adverbo, sed tiaokaze temas nur pri kunscribo de du vortoj en unu vorton. Ekz.: ore-purpura, komune-homa, dolĉe-acida. En tiaj vortoj oni ĉiam konservas la -e finaĵon de la flankelemento kaj uzas divid-strekon«*.

Tiu aserto estas malprava, ĉar oni povas kun sama senco, diri *orpurpura, komunhoma* kaj *dolĉe-acida*, kiel oni diras *altmerita* = alte merita, *samcela* = same cela, *helblua* = hele blua, k. c. Plie, se en la cititaj ekzemploj ore-purpura, komune-homa kaj dolĉe-acida, temas nur pri kunscribo de du vortoj en unu vorton, kiel asertas la aŭtoroj de P. G., ambaŭ vortoj estus samspecaj (adjektivaj) kaj oni skribus kun divid-streko: ora-purpura, komuna-homa kaj dolĉa-acida, kiel oni skribas same: surda-muta, doktoro-profesoro, vole-nevole, pli-malpli, k. c.

Sed ne estas tia la okazo: en ore-purpura *ore* rilatiĝas adverbe al purpura, same kiel *multe* rilatiĝas al *kosta* en *multekosta*. Ĉu la aŭtoroj de P. G. eljetos, kiel kontraŭregulan, tiun vorton de Dro. Zamenhof uzitan jam de li en teksto tiel elementa, kiel *»Ekzercaro«* (§ 15, La feino) kie oni legas: *»... ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono«* Ĉu tie ĉi *multekosta* nur estas kunscribo de du vortoj en unu? Ne, tute ne, se ĝi estus nur simpla kunscribo ambaŭ ideoj *mult'* kaj *kosta*, rilatiĝas al *ŝtono*, kaj tiu ĉi estanta nur unu, ne povas esti *multa*. Ne: *multekosta* signifas *kio-multe-kostas* kaj *multe* estas same adverbo, ĉu rilatigante al verbo *kostas*, aŭ al adjektivo *kosta*.⁵²⁾

Ĉu la Zamenhofs esprimis: *»El ĉio supredirita vi komprenos, ke...«* (Fundamenta Krestomatio, paĝ. 307-a

⁵¹⁾ Ni rigardu tri kurmetojn: *miraklo-simila, grandanima, helverda*.

Laŭ VER. II. *miraklo-simila fenomeno* estas *fenomeno simila je miraklo*. Evidente ĝi ne estas *mirakle simila fenomeno*, ĉar tio havas tute alian sencon.

Grandanima ne estas *grande anima*: tio estus sencecaĵo. Sed ankaŭ VER. II. ne donas senchavan rezulton, ĉar *anima je granda* nenion signifas. La fiasco de la unuagrada analizo montras, ke oni devas uzi analizon dua-gradan, memstarigante la finaĵon kaj interrilatigante la antaŭajn elementojn unue laŭ VER. I.

(*grandanimo*)-a = (animo de granda)-a
Ree sencecaĵo. Oni do devas provi interrilatigon laŭ sintaksaj leĝoj (disfalaj flankelementoj):

(*granda animo*)-a
tio jam havas sencon: *karakterizita de (a-finaĵo) granda animo*.

Kion tio signifas? Tion, ke la radiko *grand* rilatas adjektive al la vorto *animo*, kaj la finaĵo *-a* rilatas al tiuj ambaŭ vortoj kune, esprimante, ke tiu *granda animo* estas ies kvalito. Mi kredas, ke tio ne estas tiel tre komplikita, kaj, eĉ se ĝi estus, ĝi estas ja tiel kaj ne alie.

Nun ni rigardu la vorton *helverda*. Estas vere, ke ĝi estas *hele verda*. Sed same ĝi estas ankaŭ (*hela verdo*)-a, t. e.: *karakterizita de (a-finaĵo) hela verdo*. Kaj estas pli oportune ĝin analizi tiamaniere, ĉar tiel oni ne devas apliki du unugradajn analizojn. La ŝajna komplikeco ĉi tie estas plisimpligo. (K.)

⁵²⁾ *Multekosta* signifas *karakterizita de tio, ke ĝi multe costas*. Nun, ni esprimu ĉi tion per finaĵoj. *»Karakterizita de«* estas *-a*; *»tio«* estas *-o*; *ke ĝi multe costas* estas esprimebla senpersone *per multe kosti*. Nun ni skribu ĉion ĉi skeme:

(-a)-(-o)-(multe kosti)

aŭ inversante laŭ la ĝusta vic-ordo:

(multe kosti)-o-a

La vorto do estas bone kunmetita. *Multe* estas adverbo, ĉar *mult* laŭ la analizo devas adverbe rilati al *kosti*.

REVUO DE REVUOJ

El ĉiuj esperantaĵoj, kiujn mi lastatempe legis, plej gaje kaj kvazaŭ re-ekesperante mi legis la sciigon de *Scienca Gazeto*, laŭ kiu la parolado de la balbutantoj pliboniĝas, kiam ili iras manpiede — laŭ la spertoj akiritaj ĉe la universitato de Michigan. Imagu, se ni aplikos tiun ĉi metodon en la grupvesperoj, eventuale eĉ dum kongresoj, kiel flue tiam parolos niaj samideanoj Esperanton! Kaj, kiel ni legis en la sveda *Espero*, ni povos baldaŭ malfermi ankaŭ kvarpiedajn modernajn daŭrigajn kursojn...

Car mi ne volas flankenmeti nun la belan revuon de la svedoj, mi tuj ĉitas belan frazon el la »Pensetoj de simplulo«, de *Ede*, aperintan en la aprila numero de la *Espero*:

»La nuna epoko bezonas malvarmajn kapojn, eminentulo diris. Lia kapo estis el glacio. Sed pli ol malvarmajn kapojn ni hodiaŭ bezonas varmajn korojn.«

Tamen, bedaŭre oni devas konstati, ke la tre estiminda Nestoro de la sveda movado donas al la tre ĝentila letero de Kalocsay respondon, kies tonon karakterizas la jena frazkomenco: »Tiu aroganta cinikaĵo estas adekvata moto de la Budapesta skolo, kies animo estas s-ro Kalocsay...« ktp. Ege ni bedaŭras, ke ĝuste la supremenciita grandmeritulo lasis galopi sian ĉevalon tiel malproksimen, ĉar la ekzemplo estas infekta. Poste oni ne povas jam miri, legante la vortojn de konata Niagazetano, kiujn ni eĉ citi ne volas, — aŭ ni ne povas miri, kiam oni en Nederlando krude kaj tro energie atakas mortintojn — kaj vivantojn, kvankam ni »bezonus malvarmajn kapojn kaj varmajn korojn.« Oni ne miskomprenu, ni ne parolas pri la esenco de la aferoj, sed pri tiuj formoj, kiujn ĉiu homo kaj esperantisto *devegas* estimi.

Inter tiaj cirkonstancoj la optimismaj versoj de nia brava Teo Jung efikas tute anakronisme:

Milmil kapoj pensas progreson,
Milmil manoj semas esperon,
Milmil brakoj kreas prosperon,
Milmil koroj kredas sukceson.

(Sed dankon al la ĉielo, ke ni havas tamen ankaŭ tiajn trubadurojn.)

Sed nun ni returnu niajn okulojn de la sopiroj al la realo. Interesajn indikojn mi vidis en la lasta numero de *Cehoslovaka Bulteno* el la pasinta jaro pri kelkaj esp. bibliotekoj de Cehoslovakujo. Laŭ tio la Esp. Klubo de Praha havas 1350 Esp. librojn kaj tri grupoj havas pli ol 400 librojn. Estus ja interese gvidi tiajn statistikojn kaj konvinkiĝi, kiel status la bibliotekaj aferoj en la aliaj landoj. Tamen prefere ni ne faru! Mi timas, ke ni malgajiĝus...

Ni povas tuj noti kelkajn pluajn informojn pri la movado, legitajn lastatempe: En Estonio la bilanco de la novaliĝoj kaj perdoj montras iom da perdo koncerne

la an-nombron de la landa societo. En Nederlando LEEN konservis sian pozicion, eĉ plimultiĝis ĝiaj sekcioj; la tiea argentinjuba movado daŭre kreskas; (pri tio aliloke), kontentige kreskas ankaŭ la sveda neŭtrala movado, kies membraro atingas baldaŭ la nombron 3000. (Kvankam eĉ en tiuj landoj estas granda amaso, kiu parte post ia kursoj jam forlasas la movadon, parte neniam apartenas al la organizo, malgraŭ ke ĝi restas esperantisto.)

Cetere ni plezure konstatas, ke en la malgaja tempo de la krizo, kiam oni preskaŭ neniigis la germanan movadon, kiam *Heroldo* devis el Germanujo translokiĝi al Rotterdam, estas landoj, kie la movado marŝas antaŭen. Nun Danujo estas unu el tiuj landoj kaj volonte ni peras la peton de *Dansk Esperanto-Blad*, ke oni el eksterlando postulu Esperanton en la danan radion.

Car temas pri la movado ni tuj mencias la saĝan artikolon de *Helmi Dresden* en la *Informoj de EAE* (marto, 1936), kiu logike pledas por la kongresoj de niaj kongresoj. La nunaj kongresoj ĝenerale ne havas la bazon de seriozeco, kaj ni devas klopodi, ke niaj U. K. »efektive estu kongresoj stimulantaj siajn partoprenantojn al celkonscia, serioza laborado por la progresigo de la E.-movado tutmonda.« (Kompreneble, la aŭtorino ne volas ekstermi la amuzan parton de la programo. Tamen, ni ne nur dancu, sed ankaŭ kongresu!) Prave!

La samon diras la okaza poemo de *H. Adamson*, dediĉita al la Haapsalu-a grupo. La poemeto estas tre bela kaj altiĝas super la nivelon de la aktualaj poemoj:

»Ne parolu nur per lango
pri la verdular-lavango,
sed per la tuta korsango,
per la fajro de l' »agem'«
elektrizu verdan draton —
plivigliĝu la movadon,
varbu ĉies, ĉies ŝaton
por ĝi, kvazaŭ por vi mem!«

Prave! (Trovebla samloke.)

Multe da inko fluas nuntempe pri la »*Gazeta Demando*«. Tamen ni nun preterlasas la resumon de tiu ĉi pritraktado, ĉar ni ja atendas la finrezulton de la afero. (Temas pri tio, ke *Heroldo de Esp.* estu oficialigita kaj *Esperanto* malaperu.)

Mi trovis interesan artikolon en *Pola Esperantisto* (aprilo), kiu ankaŭ tre simpatie eksonigas la allogan tonon de la optimismo. La titolo de la artikolo estas »Iom da pacienco... kaj parteto ĝia parolas tiel:

»... mi povas doni nur unu konsilon: Samideanoj! Iom da pacienco kaj spirita ekvilibro! Lasu jam enpace viajn saĝajn konsilojn kaj rimedojn, ĉesu jam ludadi je senfina verkado de artikoloj, kiuj viaopinie estas la en-

kaj 309-a) ankaŭ estas eljetinda? Ĉu ne estas samklasaj kunmetaĵoj: *nelonga, plejgranda, plifrua, trosincera* k. c. eĉ kiuj plej videble starigas pura adverbo *ne, plej, pli, tro*, k. c. antaŭ adjektiva radikoj. Ĉu ne same pri *longedaŭra, mallongedaŭra*, k. c. ?

Kiel oni analizas en P. G. tiaspecajn kunmetaĵojn, kiel *herbriĉa, varmplena, prespreta, disimila, sangavida*? Per prepozicio *je*!! Atentu bone: prepozicio *je*, kies ĝustan senco oni ne difinas, (lasante, ke la senco aŭ kunteksto propramove helpu), devas klarigi la rilaton inter *herb'* kaj *riĉ*, *varm'* kaj *plen'*,... kaj inter la du radikoj de kunmetaĵo, se la lasta estas adjektivo. Belega difino de rilato ĉiam per prepozicio *je*, kiu estas sendifina!⁵³ Kom-

⁵³ *Je* signifas nur, ke adjektivo kaj substantivo estas ligitaj per prepozicio. *Je* estas diverse anstataŭigebla, laŭ la senco. La samon faras cetere ankaŭ la aŭtoro, kiam la finaĵon -a li anstataŭigas jen per DE: *homa mano*, jen per POR: *skriba maŝino*. (K.)

preneble oni ne povas konsenti kun tia stranga analizo. *Herbriĉa* signifas *herbe riĉa* aŭ *riĉa per* aŭ *pri herboj*; *varmplena* estas *varme plena* aŭ *plena de varmo*. Pri *prespreta* aŭ *servpreta* estas plej simple disigi la kunmeton: *preta presi* (aŭ *por presi*), *preta servi* (aŭ *por servi*) kaj *por-presi* aŭ *por-servi* estas adverboj, ĉar ili rilatas al adjektivo *preta*. En la unua kunmetaĵo *prespreta*, se oni parolas pri presisto la senco estas *preta presi* aŭ *por presi*, kaj se oni parolas pri libro: *preta presiĝi* aŭ *por-presiĝi*: kompreneble oni povus diri en tiu ĉi lasta okazo, *presiĝpreta*. La kaŭzo uzi *prespreta*, se la senco aperas klare, estas kiel oni diras en Hamleto (F. K. pag. 418-a) »afero simpla de ekonomio«. Tiel same oni povas analizi la ceterajn kunmetaĵojn: *disimila, sangavida*, k. c.⁵⁴

(Daŭrigota.)

Vicente Inglada

⁵⁴ Ne, ilin oni povas analizi nur laŭ VER. II. (tipo: *miraklo-simila*; vd. mian noton ⁵¹). (K.)

korpigo de vera saĝeco kaj sola rimedo de l'savo por la agonianta Granda Ideo... sed armiĝinte je pacienco plenigu viajn dezertajn korojn per kredo kaj konvinko pri venko de nia movado.« Sendube valoraj vortoj kaj volonte ni ripetis ilin.

Sed se oni trafoliumas la *Suplementon* al la jarlibro de UEA el 1935. oni ne povas tute vuali sin per la rozkolora nebulo de la optimismo. La nombro de la delegitoj preskaŭ ĉie malkreskis, eĉ, en kelkaj landoj, kiel Ĉeĥoslovakujo, katastrofe. La pluso tie estas ĉ. 20 kaj la ĉesintaj delegitecoj nombras ĉ. 100. Pri Germanujo ni ne parolas. UEA montras plivastigon koncerne la nombron de la delegitaro en Belgujo, Brazilo, iomete en Danujo, en Indohinujo, fortan kreskon en Japanujo (kie la bilanco montras gajnon de 28 lokoj), iometan kreskon en Nederlando kaj Portugalujo. Se ni ne kalkulas la ne gravajn ŝanĝojn ni povas raportii pri efektiva malkresko en Aŭstrio, Britlando, Bulgarujo, (kie UEA nur perdis lokojn), Ĉeĥoslovakujo; (ne tro multe) en Francujo, Germanujo, Italujo, Polujo, Svedujo kaj Usono. Ĉiokaze ni esperas multe dank' al la translokiĝo de UEA en Anglujon kaj s-ro Goldsmith, la nova direktoro meritas nian plenan fidon, sed oni ja devas esti preskaŭ pli ol homo en la nuna malfacila situacio.

Jes, oni ja bezonas esti homo eĉ dum la plej batalplena tempo de la krizo. La ĉinoj havas proverbon, kiun mi legis en la februara numero de *«Esperanto»*: «Estas prefere esti hundo en paca tempo, ol homo dum milito.»

Fine mi volas noti en nian matrikulon la naskigon de la simpatia *Portugala Esperantisto* (jarabono: 7 fr. frankoj. Redakcio kaj adm.: Rua Jardim do Regedor 5. Lisbono) kaj la reaperon de la *Internacia Veterinara Revuo*, aperanta en Rahovo a/D., Bulgarujo. Ankaŭ la due menciita revuo ŝajnas esti tre utila al fakuloj. Espereble troviĝas multe da tiaj en nia movado, ĉar se ne, ankaŭ tiu ĉi serioze redaktita revueto estas kondamnita je morto. Kaj estus vere domaĝe!

Ankaŭ en Aŭstrio naskiĝis nova Federacio kaj ties Bultenon (Wien, 19. Geistingerg. 1. 6/16.) ni trafoliumis kun intereso. Ŝajnas al ni, ke la nova organizo akceptis ĉefe la taskon konservi tiujn, kiuj pro ia kaŭzo ne volas aniĝi en la paralela asocio. Kiel Hans Truska diras en sia artikolo en la unua n-ro: »La nuna epoko estas malfavora por idealoj. Laŭ mia opinio la misio de la nunaj esp-istoj estas konservi energie la nunan teritorion de Esperanto...« Espereble, tiu ĉi dualismo ne estos malfavora al la Viena kongreso.

Danke ni mencias la belan *«Verdan Revuon»*, kiu donis lokon al parte historia artikolo pri *«Literatura Mondo»*. Kaj la afablan ŝerceton de *«Tempo»* pri la malsano de niaj redaktoroj.

En *Heroldo de Esp.* (24-a de majo) ni legis artikolon de Carl Franzmann, kiu, trarigardante la recenzojn en la Esp.-gazetoj, kun granda mirego konstatis, ke verŝajne la tuta Esp.-literaturo konsistas el — morte malgajaj libroj. Li pledas, ke la Esp.-literaturo estu vigla! Esp.-literaturo estu moderna! Ankaŭ la vipo de akra sarkasmo ne devas manki al la Esp.-literaturo. S-ro Franzmann verŝajne verkas sub pseŭdonimo, lia vera nomo estas Rip van Winkle, kiu nun — pro la varieco — ekdormis en la estanta epoko kaj revekiĝis en la pasinta. Ĉu ni penadu pri la rememorigo de la multnombraj verkoj, kiuj sukcese vekas la ridemon de ĉiu, nur s-ro Rip ne legis ilin; ĉu ni komencu registri la nomojn, aŭ ni kontentiĝu simple per tio, ke ni rekomendu la koncernan titolvorton de nia Enciklopedio, kie s-ro Rip povos konatiĝi kun nekonataj nomoj de Merchant ĝis Raymond Schwartz.

La *Praktiko* restas fidela al siaj tradicioj kaj la komencanto ricevas per ĝi utilan apogilon. Estas bedaŭrinde tamen, ke inter tiuj tradicioj ankaŭ la kontraŭfundamenta uzo de *unu* estas retrovebla.

La neŭtraleco, t. e. la problemo de la neŭtraleco obsedas la esp-istajn spiritojn kaj ĝenerale kaj aktuale. En la dua n-ro de *Internacia Pedagogia Revuo* ni legis interpreton pri tio: »la Instruista Asocio laboras por dis-

vastigi inter la tutmonda ĝeinstruistaro la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu *ne enrudante sin en la internan vivon de la popoloj*, donos — la eblon de paciga lingvo en la tutmonda lernejo.

Ivo Rotkvič en la *Suda Stelo* (aprilo) tre interese analizas la maltrankvilon de la samideanoj kaj konkludas jene:

»Al mi ŝajnas, ke la ideologioj ne devas esti nur reflektaj. La ideologioj povas esti ankaŭ memstaraj faktoroj por la kreado de la sociaj formoj. Per sia aktiveco ligitaj al la ekzistanta socia materio, ili ne ĉiam devas esti nur produkto de la momenta ekonomio, ĉar la socia al mi ne ŝajnas ĉiam identa al la ekonomia. Tial mi kredas, kontraŭ la aserto de Jaan Anceel, ke ne ĉiuj ideologioj, por havi hodiaŭ valoron kaj aktualecon, devas esti ligitaj nur al la nunaj ekonomiaj faktoj — do, ili ne ĉiam devas esti nur klasaj ideologioj laŭ malvasta kaj ofte eĉ erara kompreno, ili povas esti ankaŭ superklasaj, superklasaj kaj superkontinentaj. Eĉ super-jarmilaj!

Al tiaj, laŭ mi, apartenas la interna ideo de Zamenhof. Ĝi, laŭ sia fundamento, estas superklasa, superrasa kaj superjarmila. Tial ni, ĝiaj adeptoj, kredas ĝin tiom aktuala, kiom aktuala ĝi estis ĉe sia naskiĝo. Indiferente, ĉu ĝian esencon oni nomos kun filozofema grumblo: humaneco aŭ frateco aŭ socia justeco — ĝi estis kaj ĉiam restos sopiro por la etika renaskiĝo de la homaro. Kaj tiu sopiro donos al ĝi eternan valoron kaj eternan aktualecon.«

*

Kaj aktuale oni timas pro la divido de la UEA sferoj inter diversaj lokoj, pri kio atestas la jena citaĵo el la artikolo de *Helmi Dresen (Informoj, majo)* kaj ankaŭ en ĝi aperas la problemo de la neŭtraleco jene:

»Sur la bazo de miaj spertoj kaj observoj dum mia pli ol 20-jara aktiva partopreno en la Esp.-movado mi opinias, ke sukceso de ĉia komuna entrepreno tre dependas de forta, bone organizita centro — kial do estu dispecigita UEA, se ĝenerale oni ĉie aspiras al centrigo? Oni imagu nur: la oficejo en Londono, la biblioteko en Vieno (ĉu la oficejo ne bezonas la bibliotekon? por kio do UEA tiokaze fondis ĝin?), du pliaj centroj en Parizo kaj Stokholmo! Simpla ano eĉ ne scios, kun kiu li devas interrilati — mi antaŭvidas konstantan transsendadon de leteroj de unu centro al alia — perdo de tempo kaj mono. Aŭ ĉu eble la komitato deziras, ke la centro estu nur oficejo, kancelario, dum ĉia krea laboro devus okazi ekster ĝi? Ĉu vere do ne estas eble trovi inter la esperantistoj kapablan s-anon, havantan iniciaton rilate al plej raciaj ebloj de disvastigado de Esp. kaj povante samtempe doni kancelariajn direktivojn al spertaj oficistoj? Kaj tia direktoro devus labori en oficejo, kiu troviĝu nepre en la centre situita neŭtrala Svislando, ĉar ŝajnas per nenio pravigebla la decido transporti ĝin al Londono, konata pro la multekosteco de siaj vivkondiĉoj. Ja estas pli ol strange, se efektive oni elektis Londonon pro tio, ke la novelektita direktoro loĝas tie, sed kion alian do povas signifi jena frazo en *«Brit. Esp.»*, majo: »Anstataŭ devigi Mahometon iri al la monto, oni venigos la monton al Mahometo?« ...

Fine ni devas diri kelkajn vortojn pri la *«Suda Kruceto»* (Aŭstralio), kiu estas, efektive, unu el la plej originalaj Esp.-aj gazetoj. Jam sub la titolo ni trovas indikojn pri »kvar vortetoj«: DE, DI, DA, JE, uzataj nove aŭ novsence »por faciligi la laborojn«. Nu, ŝajne, tiuj vortoj ne tro faciligas la laboron de la redaktoro (Sinjoro J. E. di »K«), ĉar konstante li devas respondi al protestaj leteroj. Sed oni devas konfesi, ke tiujn respondojn li faras energie kaj sprite. Entute, pri la anemio kaj malvigleco de la gazeto oni ne povas plendi. Se la diktatorojn oni povus neniigi per sprito, ili jam delonge ne ekzistus dank' al la akra plumo de Sinjoro J. E. di »K«.

Kun bedaŭro kaj funebro ni notas la morton de alia viglulo: *«Pirato»*, kies piratestro devis sin retiri al la pli senaventura burĝa laboro. Domaĝe, domaĝe! *Fersil.*

R E C E N Z O J

Ciujn librojn, recenzitajn kaj recenzatajn en tiu ĉi rubriko liveras al vi plej rapide, por la originalaj prezoj la eldonejo de »Literatura Mondo«.

✓ EDMOND PRIVAT: INTERPOPOLA KONDUTO, eldonis: Literatura Mondo, Budapeŝt Mester ucca 53., 154 paĝa, formato 19,5×13,5. Prezo: broŝ. 1.80, bind. 2.60, lukse bind 3.50.

La libro de Dro Privat estas Esperanta traduko de la sam-aŭtora verko, kiu aperis franclingve en 1931. Kiel li konfesas en la antaŭparolo, ĝi estas serio de observoj kaj impresoj, pli ol filozofia sistemado. Tial oni sentas kelkan malfacilon ĝin resumante.

La temo estas klara: la batalo inter la tradiciaj fortoj de la naciismo kaj la naskiĝantaj aspiroj al internaciismo. Tion la aŭtoro studis precipe sur la psikologia kampo, preterlasante la ekonomikan, juran kaj politikan flankojn de la demando. Li esploras unue la formadon de la »nacia animo«, la bazon de la valorjuĝoj, kiuj radikale malsamas laŭ tio, ĉu ili rilatas al la naciaj aŭ al la ekster-naciaj aferoj, la nacian vanitecon, kiu devenas de tia juĝmetodo kaj la starigon de deviga nacia vero, ne diskutebla nek pridubebla. Sed kontraŭ tiu vero ribelas jen individuoj, jen societoj, jen klasoj: kaj Dro Privat montras la konfliktojn inter la militrezistantoj kaj la naciistoj, inter la eklezioj kaj la ŝtato, inter la laboristaro kaj la registaroj. Tiuj internaj ribeloj kaj kontraŭstaroj utilas por progresigi la homaron al pli pacaj rilatoj inter la nacioj: ĉar nacioj, blinde kredantaj ĉiu al sia nepra vero, povas interrilati nur per milito.

La dua parto de la libro studas do la animstatojn, kiujn produktis la diversaj kontraŭmilitaj procedoj provitaj de la homaro; unue la senperforta rezisto (en Polujo, Hindujo); due la sistemo de la Ligo de Nacioj. Sed ambaŭ ŝajnas nesukcesaj: la unua, ĉar ĝi postulas, ke ĉiuj homoj estu herooj aŭ martiroj; la dua, ĉar mankas interna mistiko, kiu vivigus la Ligon kaj entuziasmigus por ĝi la homojn. Je tiu momento prezentas sin Esperanto kaj la fama Interna Ideo, kiu, laŭ la verkinto, estus multe helpinta al la Ligo de Nacioj, se ĝi estus ĝin adoptinta kaj favorinta.

En la lasta ĉapitro Dro Privat esploras la eblojn de la estonteco: la naciismoj nepre devos ŝanĝiĝi aŭ kunfandiĝi en pli ampleksajn sentojn, por ke la diversaj nacioj povu vivi unu apud la aliaj: »Aŭ evoluos patriotismo al ara moralo... aŭ ĝin anstataŭos alia formo de kolektiva sento, pli favora al paco. Versajne ambaŭ emoj apude kreskos, kaj iom post iom ili kuniĝos.«

Oni ne serĉu en ĉi tiu verko alion, ol kion la aŭtoro volis meti en ĝin: klarvidan analizon de la nun kunpuŝiĝantaj fortoj, kaj provon distingi la direkton de la evoluo. Kio plej akre frapas la leganton, tio estas la senpartieco de la verkinto, lia serena, larĝspirita sintenado antaŭ la hodiaŭa kaoso. Kaj tion oni ne povas tro laŭdi.

Kelkajn bedaŭrojn mi sentis, legante ĉi tiun rimarkindan studon. Ekzemple, la religiaj originoj de la naciismo, kaj ĝia nun konstituiganta kulto, ritaro (la marŝoj, paroladoj, flam-ekbruligoj ĉe la altaro de la Nekonata Soldato ktp.) povus esti pli draste montritaj. Pri tiu punkto oni trovos bonan analizon en la libro de E. Lanti, *Naciismo*, kiun referenci eble estintus utile, precipe en la franca eldono de ĉi tiu libro. Aliflanke, la ĝenerala konstruo ne estas tre klara, kaj plurfoje oni demandas sin, kien nin kondukas la aŭtoro. Manko de enhav-tabelo pligravigas tiun malfacilon.

La stilo estas bonega kaj brila, kiel nature ĉe homo, kiu, jam infane, mirinde estris Esperanton. Li alpropigis ĝin al si tiamaniere, kaj li trudis al ĝi tre rekoneblan personecon. Abundas la mallongaj, ofte senverabaj frazoj. Lingvo tre klara kaj rapidmova. Tamen oni povas rimarki kuriozan fenomenon: dum, en tiaj originalaj verkoj, la stilo de Dro Privat estas pura kaj sennacia, en ĉi tiu, kiun li tradukis el franca originalo, restas kelkaj riproĉindaj

francismoj. Nenio pli ol tia fakto pruvas la neceson de longa ekzercigo al la malfacila arto de la tradukado. Ĝi entenas pli da domoj, ol kiom suspektas la originalaj verkantoj.

Jen kelkaj el miaj notoj:

pg 5. »La XX-a jarcento estos jam vidinta (= jam vidis) du fortajn...«

8. »multaj en sia koro miris tiom ami... (= miris, ke ili tiom amas)«

22. »mezuri la kulpon kaj la domaĝon (= difekton)«

24. »la plej basaj personaj ecoj de anonimuloj projektigas (= projekciigas) sur paperon...«

50. »jam de longe enkorpiĝis la kutimo supermeti la patrujon super ilian (= sian) moralan juĝkampon.«

70. »la demokratio estas regado, kiu donas... al la popoloj la iluzion pri ilia (= sia) mastreco.«

118. (noto) »En Eŭropo la sento pri sendangereco estas pli forta ĉe malgrandaj ŝtatoj... ol ĉe la plej grandaj, mem (= eĉ!) superarmitaj.«

119. »nur al propra bonfido (= sincereco) kredas ĉiu.«

121. »Neniu regno... Lia (= ĝia) rajto restas entuta...«

122. (noto). »Belgujo ne batalis nur pro si mem« (tio signifas, ke Belgujo tute ne batalis, dum la signifo devas esti: Belgujo batalis, ne nur pro si mem...)

Eble al la sama instinkta influo de la franca, oni devas aljuĝi la konstantan kaj eraran uzadon de *ignori* kun la signifo de *nescii*, dum ĝi signifas: ne voli scii, intence nescii. Kelkaj neologismoj: *basa* (pg. 11, 24 = malnobla), *refleksoj* (pg. 14 = instinktaj removoj), *alies*, *katekismo*; kaj pluraj derivaĵoj kun la neologisma kaj neutila sufikso *al*: *brutala* (= bruta), *federala* (= federa), *mentaleco* (= menso). Pri kelkaj vortoj, mi preferus pli simplan formon: *raciismo* anstataŭ *racionalismo*, *Budao* anstataŭ *Budho*; sed tiu estas nur persona gusto. Tamen *soveto*, *Sovet-Unio*, *Sovetio* estas tiel vaste uzataj nun, ke formo kiel *sovjeto* ŝajnas barbara. Fine, mi pensas, ke nur preseraro povas klarigi la lastan frazon de la 4-a paĝo: »tiu neniam povis forlasi temon konstante sin trudinta (= trudintan) al observemo.«

G. Waringhien.

AXEL MUNTHE: ROMANO DE SAN MICHELE, tradukis Jenny Weleminsky. Eldonis Literatura Mondo Budapeŝt IX., Mester ucca 53. Formato 20×13,5 cm. 512 paĝa. Prezo: broŝ 5.40 svfr., bind.. 6.40 svfr., lukse bindita 7.40 svfr., plus 10% sendkostoj.

En la antaŭparolo de la 12-a angla eldono, la aŭtoro protestas kontraŭ la kritikistoj, kiuj nomis lian verkon aŭtobiografio. »Tro multon mi preterlasis por ke mia verko estu tiel titolita, li diras proksimume: mi pli ofte parolis pri la aliaj ol pri mi mem«. Tamen estus malfacile kontesti, ke tiu ĉi libro entenas multan parton de aŭtobiografio.

Oni devas antaŭ ĉio klarigi, ke San Michele estas la nomo de kapeleto, konstruita sur la supraĵo de Anacapri, inter la ruinoj de la palaco de Tiberio; Anacapri mem estas malgranda vilaĝeto alte super la urbeto Capri, kaj ĝi komuniĝas kun tiu loko per longa krutvojo de 777 ŝtupoj. Dro Munthe, tien vojaĝinta dum juneco, eksentus fortegan amon por tiu pejzaĝo: li rakontas, ke, en ia vizio, li imagis sin posedanto de tiu montosupro, restariganto de la imperiaj ruinoj kaj trankvila ĝuanto de tiu admirinda restadejo, inter simpluloj kaj bestoj. Kiam li redescendis de Anacapri, li faris la decidon, ke li foriras nur por gajni la monon necesan, kaj tuj kiam li ĝin akirus, li revenos al tiu paradizaja. Post praktikado tre suk-

TONO

»Li impertinentas.« »Li impertinentas paroli...« »Li mensogas...« »Honesto eldonisto, se li jam uzurpas al si ion »deklari«, devas... ne impertinente mensogi.« »Gi estas liaflanke senhonta kalumnio.« »Li pretendis virbove sabri...« »... per mensogoj kaj gangsteraj metodoj opinias trudi sian »eminentecon.«

Ci tiun bukedon de parfumaj esprimoj mi kompilis el artikoleto de sinjoro S. Grenkamp. Temperamente, ĉu ne?

Ekzemploj ĉiam havis al mi grandan altiran forton. Leginte ĉi tiujn fortikajn frazojn, mi sentis grandan tenton

»sabri virbove«

aŭ almenaŭ »bovine« (ĉar mi estas fraŭlino). Sed kiel fari tion? Tuj mi pridemandis mian amikon, kiu estas bovbredisto, sed li (tia senspertulo!) diris, ke li neniam vidis virbovon sabri. Li diris, ke laŭ lia scio okazas tre malofte, ke virbovo portas sabron. Mi diris, ke li impertinente mensogas. Li diris, ke tio estas senhonta kalumnio. Tiel plezure ni konversaciis. Kaj la spirito de sinjoro Grenkamp ŝvebis super ni.

Plifortiginte per tiu trejnado, mi opiniis, ke mi faros etan plezuron al sinjoro Grenkamp. Li certe ĝojos pri tio, se mi, laŭ lia instruo, talente kaj temperamente diros pri li mian profundan konvinkigon. Do mi bone akiris la literojn de mia skribmaŝino, kaj skribis

ke li
ke li
ke li
ke li
ke li

Sed poste mi ĉion forstrekis.

cesa de medicino en Parizo unue, poste en Romo, li efektivas sian revon: sed vel la tro kruda lumo de la itala ĉielo vundas liajn okulojn, kaj, duonblinda, li devas forlasi San Michele kaj rifuĝi en ian ermitejon, en malnovan, kadukan turon apud Materita, kie li skribas siajn memoraĵojn.

Se tiel facile estas resumi la kanvason de la libro, la kaŭzo estas, ĉar ne en tio kuŝas la esenca parto. La vera enhavo de la verko estas la memoraĵoj de la aŭtoro pri siaj amikoj, siaj klientoj, siaj aventuroj, memoraĵoj iom belarangitaj — ne por ŝajni pli sentimentalaĵ aŭ flataj, sed pro sincera amo de la fantazio, pro inklino al poezio de la mistero; kaj tiel ĉi tiu »vivo de kuracisto« fariĝas speco de eposa legendo, en kiu la mildaj pentraĵoj (la panoramo de Anacapri, la Lapona arbarego) alternas kun scenoj humuraj (la nervmalsanulinoj en Romo, la rakonto pri la kadavr-akompananto) aŭ tragikaj, kiaj la pesto en Napoli aŭ la tertremo en Messina. Ĉio tio estas fabelita kun korsimpleco, senafekteco, kun malamara ironio, kiu trafas tiom lin mem kiel la aliajn homojn — kaj, pli ol ĉio, kun ia sento pri la vivo, ia amo al la vivo sub ĉiuj ĝiaj formoj, ankoraŭ plifortigita de la tro ofta kaj preciza vidadado de la morto.

La aŭtoro, kiu estas disĉiplo de la fama Charcot, kaj praktikis kiel kuracisto por nervaj malsanoj, konfesas, ke li posedas ian neklarigeblan influon sur la malsanulojn kaj eĉ sur la bestojn, ian hipnotan povon. Iom el tiu sorĉo restis en la rakonto, ĝi magie efikas al la leganto, kaj veran misteran allogon oni sentas, sekvante la malrapidan labiladon, plenan de spritaj rimarkoj kaj meditigaj vizioj.

Mi ne povas ĉi tie skizi la detalojn de tiuj aventuroj; ĉiuj estas interesplenaj, amuzaj aŭ emociaj, neniu estas malnobla aŭ banala. En unu loko de la libro, Axel Munthe rediras humurajn de sia amiko, Dro Norstrom: »li ĉiam kutimis diri, ke mi havas du diversajn cerbojn, alterne laborantaj en mia kapo, la bone evoluintan cerbon de frenezulo kaj la neevoluintan cerbon de speco de geni-

Kial?

Ĉar mi estas tre impresigema fraŭlino. Kaj en la sama numero de »Nia Gazeto«, kie sinjoro Grenkamp pafadis siajn kotkuglojn, mi legis belan artikolon sub la titolo:

NI ESTU ĜENTILAJ!

Inter aliaj mi legis tie: »Montru..., ke vi estas trankvila, ĝentila, pardonema, kvankam via kontraŭulo penadas tiri vin per sia malbona eduko al sia propra nivelo.«

Kaj — mi diras sincere — precipe tiu vorto »nivelo« min timigis.

Do mi faras nur unu rimarkon: Estus tre bone, se sinjoro Grenkamp legus sian propran gazeton kaj tirus el ĝi kelkan edifon.

M. Alice Pk.

Respondo al s-ro A. F. Vi diras, ke sinjoro Grenkamp estas tamen pioniro: li faris esplorvojaĝon en la urbkanaloj, kaj de tie alportis novan stilon por la Esperanta gazetaro. Nu, tio estas sprita, sed tamen erara. Eĉ tie ĉi s-ro Grenkamp ne estas pioniro: li nur imitas s-ron Major, la karmemoran redaktoron de la karmemora Oomoto. Sola diferenco distingas ilin. S-ro Major, kiam li estis vulgara, sciis, ke li estas tia. S-ro Grenkamp, kiam li estas vulgara, opinias, ke li estas sprita.

Kion skribis pri li G. Maura?

Gren-malriĉa mia kampo,
kaj re ulte mi rikoltas
en tiu de aliaj.

Jen triversoj ne-vulgaraj, sed spritaj, kaj — ĉefe — trafaj.

Via sincere:

Alice

ulo.« Por nia feliĉo, nur la dua funkciis dum la verkado de ĉi tiu libro.

Oni komprenas do la grandan servon, kiun faris al Esperanto la tradukintino, Jenny Weleminsky, kaj la eldonisto: ili riĉigis nian bibliotekon per verko, kiu ne pasos, kiel la ordinaraĵ efemeraj distraĵoj, sed estas verko de alta inspiro, de granda art-valoru kaj de vastega intereso. La traduko estas surprize bela, ĝusta, kaj tiuj, kiuj jam legis la romanon en nacia lingvo, miros, ke ŝi povis redoni tiel draste en la nia la varian kaj kompleksan rakonton. La ĉefa apartaĵo de sia stilo estas la koncizo: ŝi uzas ekzemple tre aŭdace la infinitivon, sen prepozicio: ĉu li estus tiel kruela lasi (= ke li lasos); ŝi insistis vidi (= por vidi) ktp. aŭ en simpla formo anstataŭ kompleksa: mi eĉ memoris vidi (esti vidinta) ktp. Tio donas al la frazo ne malplaĉan facilmovon. Mi ankoraŭ ne konis S-inon Weleminsky: ŝi estas bonega esperantistino.

G. Waringhien.

DU NOVELOJ (de Jiri Sumin kaj Razena Svobodová). Tradukis: M. Jandlová, T. Mrázková, M. Ziková. Eldonis: Moraviaj Esperanto-Pioniroj. Olomouc. CSR. 82 paĝoj. 13×18 cm. Prezo: kĉ. 13.— afranke.

Ambaŭ noveloj postlasas tre fortan impreson. En la unua regas la atmosfero de mizero: ni vidas du infanojn, knabon kaj knabinon, kiuj ŝteladas karbon el stacidomo. Kiel la knabino respektas la knabon, gvidanton kaj patronon, kiel ŝi perdas sian ĉastecon ĉe rifuĝo, kiel ŝia animo koruptiĝas per la tentoj de mono: ĉio ĉi estas pentrita kun profunda kono de la infana animo, per akraj linioj sur la malhela fono de la brutiga mizero. La dua novelo estas kvazaŭ fabelo pri ĉarme facilanima estaĵo: Marička, la danculino, trafirlitas antaŭ ni en papilia senzorgeco, ĝis fine ŝi defalas murdita de virsopiro, kiun ŝi, per sia ritmo-flugigata animo, eĉ ne komprenas: »La arbaristo jam malsatis mian ĝojon. Tial ŝi mortigis min.«

La traduko montras la samajn kvalitojn kaj difektojn, kiel la aliaj laboroj de la samaj tradukintinoj. Sendube, ĝi estas bone legebla, facila, ne ĝenas, ofte eĉ helpas

la efekto de la originalo. Sed ankoraŭ pli valora ĝi estus, se kelkaj malperfektaĵoj estus elsarkitaj.

Ekzemple: *jus* estas uzata en la senco: *guste nun, pluen* devus esti *plue* aŭ simple *plu*; *plena da* (ofte anstataŭ *plena de*; *tia vivo ne estas plu suferbla* anstataŭ *tolerebla* aŭ *elportebla*; *mi iras je karbo* anstataŭ *por karbo*; *alta, korpulenta, la vizaĝon ruĝan de frosto* anstataŭ *kun vizaĝo*; *tion oni nomas dankesprimon* (!) anstataŭ *dankesprimon*; *kion interesas min la signaloj* anstataŭ *kiom interesas*; *bonvenis la princon* anstataŭ *bonvenigis*; *tion alkitimiĝis* anstataŭ *al tio kutimiĝis* (iĝi-verboj ne povas havi rektan komplementon); *ĉu ŝi dormis, ĉu ne, kiu scias...* anstataŭ *ĉu ŝi dormis, aŭ ne*. Krome, oni retrovas en la traduko la nezamenhofan uzon de *ŝati*, kiu disvastiĝis pro ia eraro en la Esperanta literaturo. Mi ne scias kial, multaj kredas, ke *ami* estas uzebla nur pri personoj, alie oni devas uzi *ŝati*. Tia regulo neniel estas motivebla. Oni diru trankvile: *ŝi amis arbarojn*; *ŝi amis rigardi* ktp. Kaj se temas pri deziro, oni uzu: *mi volus, mi dezirus*.

Ankoraŭ ion. La tradukintoj ankaŭ en tiu ĉi libro uzas la apostrofon por dividi elementojn de vortkunmeto: *bel'aspekta, help'arbaristo, past'rulilo* ktp. Ĉu ne estas pli nature kaj simple uzi, laŭ ĝenerala kutimo, la dividstrekon (*bel-aspekta, help-arbaristo, past-rulilo*)? La apostrofo en Esperanto ja signalas la mankantan o-finajon post radikoj, do ĝi sentigas plie *finon* de vorto ol kunapartenon de elementoj. Grabowski uzis la apostrofon kun dividstreketo, se la unua elemento estas substantiva (*past-rulilo*) kaj nur dividstrekon, se ĝi estas adjektiva (*bel-aspekta*). Sed ankaŭ tia distingo ŝajnas tute superflua, kvankam ĝi estas multe pli logika ol la ĉiama apostrofo de la tradukintoj.

Resume: du »fortaj« noveloj en ĝenerale bela traduko. A. K.

L. SINHA: HINDO RIGARDAS SVEDLANDON. (Eld. Societo Esp. Stockholm, 200 p. Formato 21×14 cm. Prezo: broŝ. 3.75 sv. kronoj, bind. 5.— sv. kronoj.)

Sinha vidas bone kaj li estas konsciencia verkisto; lia verko estas zorge, oni povus diri, ideale farita gvidlibro pri Svedlando. La aŭtoro videble ne celis verki nur vojaĝ-priskribon, sed akuratan pritrakton de tiu lando, kiu en multaj rilatoj rajte estas admirata en la tuta mondo. Se ni prijuĝas la verkon de Sinha el tiu ĉi vidpunkto, ni povas konstati, ke lia celkonscia laboro donacis al nia literaturo gravan geografian verkon. Estas interese, ke hindo verkis tiun ĉi konfidindan verkon pri Svedujo. Komprenoble ne nur indikoj troviĝas en la libro kaj en kelkaj ĉapitroj, kiel ekz. tiu pri Gotlando, inundas la rakontemo de la aŭtoro; se ĉiu ĉapitro estus ornamita per similaj lirikaj juveloj kaj ĉiuj estus same ampleksaj, la libro estus multe pli vasta, sed eĉ tiam ĝi ne iĝus teda, ĉar la stilo de Sinha estas klara, noble simpla kaj — maloftaĵo — apenaŭ, aŭ tute ne diferencas de la eŭrop-internacia stilo. La temo kaj la aŭtoro bonŝance renkontis unu la alian kaj ni povas aldoni ke la eldonejo estis la tria bonŝanca partoprenanto de tiu renkonto; la ekstero de la libro kaj la ilustraĵoj bone reprezentas la kulturon de tiu lando, kiu estas pritraktata en la libro.

Por kompletigi nian recenzon, ni citas subjektivan parteton el la libro. (— domaĝe, tiaspecaĵoj malofte troviĝas en la verko), kiu estas tiel ĉarma kaj senpera, ke ni jam anticipe volas doni al la legonto. Temas pri lingvaj malfacilaĵoj kaj pri tio, ke foje, dimanĉe Sinha havis nur unu cigaredon, sed alumeton. — eĉ ne unu. Kaj dimanĉe oni ja ne povas aĉeti. Li daŭrigas jene: »... mi zorge konservis la cigaredon... kaj post la tagmanĝo mi elprenis mian cigaredon el la skatolo, sed mankis al mi alumeto kaj rigardante ĉirkaŭen mi iris al sinjoro, kiu pumpis sian biciklo-tubon. Mi montris mian cigaredon kaj angle petis lian alumetujon, sed kion li faris? Li klinis sian kapon kaj digne prenis mian cigaredon el miaj fingroj. Ekregis min sento de amuzo kaj mi premis lian manon kaj dankis lin pro tio, ke li solvis la problemon de la alumeto.«

Lingvan neperfektaĵojn — mencindan — ni ne trovis, kiel estas supozeble jam el la supre diritaj.

F. Szilágyi.

KONKURSO POR LA LEGINTOJ DE LA ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO

1. Kiun el la prozaĵo aŭ poemoj de la libro vi trovas la plej bona?

2. Argumentu per kelkaj vortoj vian juĝon.

La respondojn sendu al la suba adreso. Ĝi konfirmos ĉiun ricevitajn respondojn per sendo de gvidfolio el CSR.

Inter la respondintoj ni disdonos du premiojn po 100.— kĉ. Unu premio estos lotumita inter tiuj, kiuj voĉdonis por la verko, ricevinta la plej grandan nombron de voĉoj.

Duan premion ricevos tiu, kies valorjuĝon ni trovas plej trafa.

La juĝantaro konsistas el Frant Slavik, honora ofic-ejestro, Jos. Friedrich, kasisto de EAC kaj Julia Supichová, esp. verkistino.

La respondoj estu senditaj al ni ĝis la 31-a de oktobro 1936.

La rezulto aperos en LL., en Bulteno de EAC kaj en aliaj gazetoj.

Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko
PRAHA XIX. Uralské 447.

REMBRANDT, LA MAGISTRO de M. Muller. (Biografio de Rembrandt Harmensz van Rijn.) 160 paĝoj. 100 ilustraĵoj. Luksa papero. Tolbindaĵo. Holanda eldonejo »Esperanto«, Amsterdam. Printempo, 1936. Formato 23×15. Prezo: 2.25 ned. Guld. kaj 0.25 sendkostoj.

Estas tre ĝojiga fakto, ke ankaŭ en la Esperanta literaturo komencas aperadi bele eldonitaj, ilustritaj art-historiaj libroj, konigante al la tuta mondo aŭ mondofanartiston kaj lian verkadon, aŭ certan artan skolon, aŭ la arton de iu lando, epoko. Mi mencias nur la belan Dürerlibron kaj la eldonaĵojn de »Literatura Mondo« pri la moderna arto, pri la malnova hungara pentroarto kaj la tre valorajn Hekler-librojn. Nun sekvas ilin inde en la vico tre bele eldonita kaj tre riĉe ilustrita libro pri la plej granda nederlanda pentristo, Rembrandt, verkita de M. Muller.

Li donas koncizan enkondukan resumon pri la signifo kaj vivo de Rembrandt, ĝin sekvas detala biografio kaj ankaŭ kronologia konigo pri la estiĝo de liaj verkoj (ciferoj indikas en la teksto la preparolitajn bildojn, kiuj troviĝas en la dua parto de la libro); li priskribas lian artan evoluon kaj la medion, en kiu li vivis kaj laboris. Ni vidas reviviĝi la tiutempan Amsterdam, la riĉan komercurban, kiu jam tiam estis mondurbo; la faman judan kvartalon, la mondon de la gildoj, societoj, unuigoj, lian amikan kaj familian vivon ktp. La vivo bolis tie, kaj la junan, ambician artiston magnetis altiris tiu pulsanta vivo.

»Blanko... kaj nigro, Lumo... kaj mallumo« jen la devizo de la libro kaj efektive en ĝi respeguligas Rembrandt, kiu estis eble la plej granda virtuozo de la lumkaj kolorefikoj, vera magistro, kiu donacis tiom da valoraj aĵoj al la homaro. Li pentris ja pli ol 600 bildojn, kiuj estas nun dise en la tuta mondo!

Kaj ne nur por lia verkadmaniero konvenas ĉi tiu trafa devizo, sed ĝi karakterizas ankaŭ lian privatan vivon, en kiu same alternis lumo kaj mallumo. Jes, Rembrandt sukcesis fari jam frue en sia vivo mirindan karieron, li fariĝis fama pentristo, oni bone pagis lin, li eĉ fariĝis riĉulo, domposedanto, vivis lukse, havis belan edzinon, lernantojn, gajan amikan rondon, li estis vere la reĝo de l' vivo. Sed poste forlasis lin la feliĉo, venis la batoj de la sorto, la subita morto de la amata edzino Saskia, lia anima krizo, nova verkadmaniero, kiu naskiĝis el lia profunda doloro kaj kiun oni jam ne komprenis. La aĉetantoj forrestis, se li kuraĝis pentri laŭ sia propra fantazio kaj imagoj, li devis lukti forte kun la vivo, kun financa bankroto. Sed la vivbataloj ne forprenis lian verkemon, lin hardis la miskomprenoj kaj malriĉeco, li persistis, lia arto pliprofundigis konstante. Li kuraĝis iri sian vojon, kiu kondukis ĉiam pli alten, kaj vere li atingis la plej altan supron, kiun artisto povas atingi. Li pentris

diligente ĝis la fino de sia vivo. Iom post iom li komprenis, ke nur la spirito valoras ion; tion klare respegulas liaj lastaj bildoj. La biografio kaj la analizo de la bildoj estas skribitaj tre lerte, kaj plene taŭgas popularigi la arton de Rembrandt en la plej vastaj rondoj.

Parvus Piscis

EL TRAGEDIOJ DE SHAKESPEARE. Kompilis *Mijalce Sihej*. 100-paĝa.

EL SLAVA LITERATURO. Kompilis *F. Ossaka*. 74-paĝa.

EL FRANCA LITERATURO. Kompilis *N. Kawasaki*. 66-paĝa.

Ciujn tri eldonis: Japana Esperanto-Instituto. Tokio, Hongoo-Motomaĉi. Formato: 18×11 cm. Prezo: po 0.90 sv. fr. plus 10%.

Lerte kunmetitaj tre »miniaturaj« antologioj, kiuj donas ne tiom koncepton pri la supre nomitaj literaturoj, kiom apetitigan gustumon. Certe, la elekto montras bonan guston. Komencantaj japanoj certe ĝojos pri la zorgeme faritaj klarigoj.

Por enkonduko en la Esp-an tradukliteraturon la libretoj nepre servas bone; ili estas utilaj libretoj. *A. K.*

¶ *N. VAN HICHTUM*: KUDLAGO, LA MALGRANDA ESKIMO. (El la nederlanda: *S. D. Mannoury*. Eldona Societo Esp. Stockholm. 39 p. Prezo: Sv. kr. 0.75.)

Tre inteligente verkita infanromano, aŭ romaneto pri eskimo-knabo, Kudlago, kiu akiras simpatian al si kaj al ĉiuj eskimoj. Kaj ni ne forgesu la interesplenajn rakontojn, en kiuj la frostlanda knabo tiel brave kondukis, ke — dume li instruis tre multe al ni pri Eskimujo. Kvankam la subskribinto jam delonge havas longan pantalonon kaj seriozan sintenon, tamen li devas konfesi, ke ankaŭ al li, (kaj al la eterna infano sin kaŝanta en la homa animo) ege plaĉis la romaneto. Etaj kaj plenaĝaj infanoj legu ĝin.

La traduko estas tre bona.

F. Szilágyi

¶ FACILAJ ESPERANTAJ LEGAĴOJ. Kompilitaj de *Prof. G. Waringhien*, prezidanto de F. E. I. Eldonis: Paris, Esp-ista Centra Librejo 11. Rue de Sevres (6-e). 1935. 96-paĝa. 17.5×11.5 cm. Prezo: 5 fr. fr. plus 30% por sendo.

Bonega legolibreto enhavanta anekdotojn, kantotekstojn por infanoj, pli grandaj infanoj, tre grandaj infanoj, poste artikolojn instruajn kaj fine, en la dua parto, tekstojn de Zamenhof, Kabe, Leono Zamenhof, Sam. Meyer, M. J. Evrot. Tre lerta estas la gradigo de la tekstoj: la komencanta leganto povas iri preskaŭ senrimarke de facilaj al pli kaj pli malfacilaj tekstoj.

La interesaj kaj amuzaj anekdotoj kaj belaj kantotekstoj faras la libron leginda ankaŭ por progresanto.

Valora artikoleto (de *Waringhien*) estas: La signifo de la Verkaro de Zamenhof.

La libreto estas zorge eldonita kaj presita, bone broŝurita. *A. K.*

¶ *BERNO*. SVISLANDO. TRAFIKA KONTORO DE LA URBO BERNO. 12 paĝa bele foto-ilustrita faldprospekto pri la svisa ĉefurbo kaj ĉirkaŭaĵo. La nunaj aranĝoj, por malkare restadi en Svisujo, donas okazon al vizito antaŭ kaj post la Viena kongreso. Certe, unu el la plej allogaj montarregionoj de la tero. Petu la senpagan prospekton de Oficiala Kontoro por Trafiko, Bundesgasse 18, Bern. Svislando. Ĝi nun enkondukis Esperanton kaj deziras daŭrigi.

HUNGARA GENERALA KREDITBANKO — Magyar Altalános Hitelbank Budapest V., József-tér 3—4. Entrepreno de UEA.

4 paĝa luksa kantonprospekto surhavante la lokojn kun la filioj sur planoj de Hungarujo kaj Budapeŝto. La banko estas unu el la plej grandaj de Hungarujo kaj jam kelkofje eldonis prospektojn. Nun ĝi proponas siajn serv-

✓ **Rainer Maria Rilke** — **Leteroj al juna poeto**

»Leteroj al juna poeto« nomiĝas la volumeto, sed mi preferus nomi ĝin »Leteroj al juna homo«. Jam pro tio, ke, laŭ mi, estas tre malĝuste pozicii la homojn, kiuj emas kaj kapablas esprimi siajn emociojn, siajn ĝojojn kaj malĝojojn verse, kvazaŭ aparte de la ceteraj homoj. Estas vero: ilia menso eble kapablas percepti multon, kio por la ceteraj perdiĝas en la taga bruoj, kaj ili kapablas vesti tion en formon, kiu videblas ankaŭ por la neaŭdintoj. Sed ja same la sismologo registras foran tertremojn kaj anoncas pri ĝi la nenion sentintajn. Kaj se la klaŭne dekorita kaj sentimente-sirope pepanta, nebulkapa »poeto«-tipo de hieraŭ metis tiun vorton inter citilojn, la poeto de morgaŭ, la klarvoĉa, senafekta interpretanto de ĉio, kio estas en kaj ĉirkaŭ la homoj, ne kio nur en malsanaj cerboj fantomas, devas esti antaŭ ĉio homo, normala homo. Ne — »poeto«.

Tio — nur preterire. Sed eĉ pli la ŝanĝon en la titolo postulas la enhavo de l' verko. Ja preskaŭ ĉiu juna homo bezonus tiajn amikajn konsilojn. Kiom da tragiko estus ŝparita al multaj, se en sia kriza horo ili ricevus tian komprenoplenan kaj konvinkan leteron, kiu instruas danke akcepti eĉ la pezajn horojn, el kiuj ja tiom da novo ĉerpeblas; ne eviti, sed serĉi la malfacilon, sole per kiu ni kreskas; ne demandadi la aliajn pri la ĝusteco de sia vojo, sed fosi en si mem, en la plejprofundoj de sia animo; kaj ne ĵetigadi senpacience, ĉar vere ĉio estas: ĝisgravedi kaj nur poste naski.

Eĉ se troviĝas lokoj, kiujn ne eblas aprobi (ekz. pri la kritiko), ili preterfluas nerimarkite — pro la lule muzika, vere surprize bela lingvaĵo, kiu igas la legon de l' libreto ĝuo per si mem (estas nur dolore, ke la majstra mano de Kalocsay, evidente, ne tuŝis ankaŭ la almetitan soneton).

Estus vere bedaŭrinde, se, pro la erariga titolo, la libreton ne legus iu, kiu ĝin devus legi.

Kaj — kiu ja ne devus legi tiajn librojn?

N. Kurzens

ojn al tiuj, kiuj okaze de la Kongreso en Vieno vizitos Hungarujon, ebligante ŝanĝon de la mono jam antaŭ la vojaĝo, je tre favora kurzo. Aperis ankaŭ esperanta cirkulertero en la banko.

AUSTRIO. LA AUSTRIAJ FEDERACIAJ LANDOJ KAJ ILIAJ ĈEFAJ VIDINDAĴOJ. Eldoninto Österreichische Verkehrswerbung, Wien. I. Nibelungengasse 4. 28 paĝa tre serioza kaj belilustrita fotokajero pri la nunjara kongreslando kun plano de Aŭstrio. Gvidilo tra la liglandoj, kuraĉlokoj, banejoj, lagoj. Klarigoj pri trafiko, sportoj, rabatoj. La bela virino sur la kovrilo, la belegaj pejzaĝoj interne allogos certe klopodi al vizito de la kongreslando, al kiu invitas la *Ministerio por Komercio kaj Trafiko* de Aŭstrio en tiu ĉi bela kajero. Montru ĝin ĉie, kiel dokumenton de oficiala uzo de Esperanto.

P. B.

¶ DUTCHREGIONAL CONFERENCE OF THE NEW EDUCATION FELLOWSHIP, Utrecht. 12 grandform. paĝa anglalingva ilustrita prospekto de la internacia pedagogia konferenco por nova amika edukado, okazinta en Utrecht, Nederlando 14—20. Aprilo. En la programo estas indikita la parolado de Prof. J. Glück el Berlino pri Esperanto, pri kies granda sukceso certe vi jam ricevis informojn!

Scii kaj koni

Al S-ro F. B. Vi estas prava, ĉi tiuj du vortoj ofte estas erare intermiksataj, kaj ne estas facile ilin distingi por tiuj, kies nacia lingvo faras samajn intermiksojn. Mi do klopodos klarigi la uzadon de tiuj du vortoj.

Scii signifas:

1. havi plene, senmanke en spirita posedo: scii lingvon^z; scii sian lecionon^z; neniu scias ĉion^z;

2. esti kapabla por io: scii skribi, legi, naĝi, elokventi^z; silenti^z; ekspluati situacion^z. En tiu senco scii estas uzata plejparte kun infinitivo.

RIM. I. Tiasence Z. ofte uzis: scipovi aŭ povosci. Sed tio ŝajnas preskaŭ ĉiam superflua, ĉar la simpli scii kun infinitivo neniam povas naski konfuzon; ĝi ja ne povas havi alian sencon.

Koni signifas:

1. memori, ke oni jam aŭdis, vidis, legis ion: mi konas lian nomon^z (mi jam aŭdis aŭ legis ĝin).

RIM. II. Mi scias lian nomon signifas, ke lia nomo estas en mia spirita posedo, mi povas ĝin diri al demandanto.

2. havi, el propra sperto, klaran ideon

a) pri io aŭ pri ies enhavo, uzado: koni la mondon, vojon, la homan koron, la matematikon; libron (esti orientita pri ĝia enhavo); la kompason, instrumenton (esti orientita pri ilia uzado);

b) pri iu aŭ pri ies verkoj: ni reciproke nin konas, klarigon ne bezonas^z; ekkonu vin mem; bone konu viajn ŝafojn^z; koni la klasikajn aŭtorojn.

RIM. III. El b) sekvas la metafora uzo de koni: esti kun iu en pli malpli intima interrilato: mi konas lin proksime^z; mi ne volas plu koni vin^z; koni (sekse) virinon^z.

3. ne koni ofte signifas: ne scii, ke io ekzistas: ŝlosilo uzata ruston ne konas^z; tiu industrio ne konas senlaborecon^z.

RIM. IV. Scii, ke io ekzistas, estas pli ĝuste esprimbla per

scii pri: mi scias pri tiu libro (mi scias, ke ĝi ekzistas).

Nun du reguletoj:

Antaŭ KE-propozicio estas uzebla nur SCII: mi scias, ke li estas malriĉa. Same antaŭ dependaj demandoj kaj antaŭ infinitivo: mi ne scias, kiu li estas; mi ne scias kion fari.

Ĉe nomoj de personoj, bestoj, senvivaj objektoj estas uzebla nur KONI: mi konas lin, tiun katon, tiun domon. Tiu ĉi regulo tamen allasas du esceptojn: 1. se temas pri la enhavo de io: mi scias la leteron parkere; 2. kelkfoje oni uzas scii anstataŭ scii pri (vd. RIM. IV): mi scias vojon, kiu kondukas tien (mi scias pri vojo); mi scias vendejon, kie oni ricevas pli malkare.

Je la fino, ni vidu trioblan ekzemplon:

Mi scias pri tiu poemo de Heine: mi scias, ke la poemo ekzistas, sed mi ne legis ĝin.

Mi konas tiun poemon de Heine: mi legis ĝin, scias ĝian enhavon, sed ne povus ĝin diri parkere.

Mi scias tiun poemon de Heine: mi povas ĝin laŭvorte reciti. (-y.)

INTERNACIA FOIRO DE BUDAPEST. EN MAJO VENU AL BUDAPEST! Kolora, moderne presita kvarpaĝa prospekto, sur kies kovrilo nacikostuma hungarino staras super la bordoj de la Danubo invitante al la ĉefurbo de Hungarujo. Reklamfolioj, glumarkoj kaj malgranda afiŝo montras la daŭran uzadon de Esperanto ĉe la Foiro de Budapeŝt. Kaj se iu ne povas viziti dum Majo Budapeŝton, en Aŭgusto estos bona okazo dum la antaŭkaj postkongresaj aranĝoj, pro la kelkhora distanco al Vieno. (Foirofoceja adreso: Budapeŝt, V., Alkotmány-u. 8.)

PROGRAM FOR 8 DAGES KURSUS MED ESPERANTO-UNDERVISNING. Danlingva programo (kial por eksterlando ne en Esperanto?) por la somera popolĉeflerneja kurso 31. Juli 7. Aŭgusto 1936. en Ry laŭ Csehmetoda instruado, gvidota de sro. Weide por komencantoj kaj progresantoj. Adreso: Johannes Terkelsen, Rz Højskole, Ry, Danlando.

AFISO KAJ INVITILLO DE LA 9-A JUGOSLAVA KONGRESO. Prospekto pri Ljubljana kun ĉirkaŭaĵo, bele ilustrita. La kongreso okazis en la belega urbo Ljubljana la 30. Majo—2. Junio dum pentekosto. La jugoslavaj, precipe la slovenaj esperantistoj serioze laboras. La radiostacio de Ljubljana disaŭdigas la kongreskunsidon. La pejzaĝo estas belega, montarregiono allogas vin al bela urbo. Kiu povas, fortigu la jugoslavan movadon per sia ĉeesto havigante agrablajn tagojn, certe neforgeseblan libertempon. Adreso: Esperanto-Klubo Ljubljana, Jugoslavio.

AUSTRIO. SUPRA-AUSTRIO. Arto kaj Kulturo en Brucknerlando. Programo por la aŭstria Brucknerfesto. Linz—St. Florian—Steyr 18—22. julio 1936.

12 paĝa plene ilustrita belega prospekto eldonita de la Supraaŭstria Landa Trafikoficejo, Linz.

AL VIENO DUM CIUJ SEZONOJ. 16 paĝa tre bela foto-prospekto eldonita de Fremdulofocejo de la urbo Wien, VII., Mariahilferstr. 2.

Vi ekkonas el ĝi ne nur la belajn, amuzeblecojn de Vieno, sed la tutjaran ĉefan programon, favorojn dum veturoj, k. t. p. Modela esperantlingva prospekto.

Mgr. fil. B. Strelczyk, PROBLEM JEZYKA ESPERANTO, Warszawa, 1935. Esperantska Spółdzielnia Wydawnicza, Warszawa, Al. Jerozolimskie 101.

Tre interese verkita propagandilo 16-paĝa, redaktita kun verve de ĵurnalisto. Ĉefe ĝi kontraŭbatalas la en Polujo iom disvastiĝintan porlatinan tendencon de la intelektaj, precipe filologaj sferoj. En Polujo propagandas la latinan lingvon fama filologo prof. Zielinski, kaj kelkaj intelektuloj, precipe prof. de astronomia instituto Banachiewicz, tial la verketo de Strelczyk estas tre salutinda. L. Dreher.

CU MI DORMAS LIBERA DE SANDETRUJAJTERRADIOJ? El la nederlanda: M. E. Giltay. Eld. de la trad. Parkweg 99, Voorburg, Nederl. 16 pĝ. 13x20. Prezo: 0.40 sv. fr. 2 ekz. por 3 respondkuponoj.

Interesa traktado pri tio, ke ĉe grandaj mineral-kaj

akvovejnoj la tero elsendas radiojn, kiuj malbone influas la sanstaton kaj kaŭzas eĉ kanceron. Per multaj ekzemploj (koloro ilustritaj) montras la libro, ke per alia starigo de lito oni povas ĉesigi gravajn malbonfartojn, liberigante la malsanulon el la influo de la traradiata loko. La libro ŝajnas konvika, sed, kiel ni scias, la scienco ankoraŭ ne eldiris la lastan vorton en tiu ĉi afero. Ĉiukaze estas inde konatiĝi kun tiu ĉi teorio, en kiu povas kaŝiĝi grava kerno. A. K.

✓ **JUBILEUMBOEK, 1911—1936.** (Uitgave der Fed. van Arbeiders-esperantisten in het gebied van de Nederlandse taal. 160 p. Prezo: 50 ned. cent.)

Impona holandlingva raporto pri la kvaronjarcento de la nederlandaj laboristaj Esp-istoj. (La federacio bonege prosperas, ĝi havas 4000 membrojn, kaj eĉ en 1935. ĝi atingis gravan kreskon.)

✓ **PRI LA IAMAJ TASMANIANOJ** de C. C. Cowling. Prezo 9 pencoj. 12 paĝa kajero ricevebla eĉ la aŭtoro: Christ College, Hobart, Tasmanio. Presita en Aŭstralio. Mallonga, sed tre interesa skizo pri la iamaj indiĝenoj de Tasmanio, pri kiuj, eĉ en la angla lingvo, tre malmulte estas eldonita; do la kajero certe estas grava por etnografioj. Malhonora paĝo de la kulturhistorio estas la eluzo kaj malaperigo de tiu ĉi popolo per la blankula subpremo. La lasta indiĝeno mortis en 1876. La malapero estas domaĝa ankaŭ el kulturhistoria vidpunkto, ĉar eĉ tiu popolo oni povas ankoraŭ studi la vivon de la gentoj de paleolita epoko, uzantaj nur ŝtonajn kaj lignajn ilojn. Ni povas bedaŭri ilin, ĉar ili ne estis kanibaloj, sed simplaj kaj amikiĝemaj homoj. La teksto estas flua kaj senerara. Interesiĝantoj ĝin legu.

✓ **EL VERDAVALO.** *Kajeroj 1. 2. 3.* Eld. de »Verdavalu-Eldonejo«. P. O. Box 149. Sandakan, B. N. Borneo. Malgranda gazetforma informado pri la vivo de biunulo, ĉasisto, indiĝeno, filatelisto kaj — UEA. delegito en Borneo, por anstataŭ per letero, kontaktiĝi kun la malproksimaj esperantistoj. Tre interesaj rakontoj — parte aperintaj en »Heroldo de Esperanto« — bona, ĝuiga stilo. Certe preskaŭ ĉion skribas la malnova esperantisto R. F. Vaughan. Jen kelkaj ĉapitroj: Miaj tigroj. La sorĉarto. Prikundaj anekdotoj. Pri elefantoj, krokodiloj. La redaktejono disigas de la presejo 1200 mejloj kaj eĉ la presejo neniu scias Esperanton, la kompostistoj estas azianoj. Interese estas, ke el granda distanco venas eŭropanoj al sdo. Vaughan por aŭdi ion pri Esperanto kaj eĉ ĉiu datreveno esperantista, 15-a de Decembro kaj aliaj, se venas ia sciigo pri nova sukceso, sur la gramofono eksonas la disko de la »Espero« »inspira kaj ĝojiga« por la plantisto, kiu vivas »en domo kun verda stelo sur la pordo.« La »El Verdavalu« kostas du resp. kup. (Havbla ankaŭ eĉ la eldonejo de »Literatura Mondo«). P. B.

✓ **LIBERVOLA CIVILA HELPSERVO INTERNACIA.** 16 p. kajero eldonita de la Sekretariejo de la Libervola Civila Helpservo Internacia, 6. Klaraweg. Bern. Svislando. Prezu unu resp. kup.

La devizo de la helpservo estas »Ne nur vortoj, sed agoj« kaj ĝi kunigas diversnaciajn homojn el ambaŭ seksoj, kiuj senpage kaj ofere, volonte iras, por montri veran homan solidarecon, tien, kie pro ia katastrofo necesa estas la helpo. De 1920 en 23 lokoj en 5 landoj montris la partoprenantoj el 34 landoj, ke »Paco venas inter la homoj kaj inter la nacioj.« La ilustraĵoj montras la laboron kaj kamparan vivon de la helpemuloj. Oni uzis ankaŭ Esperanton kaj ili eklaboris eĉ ruinoj kaŭzita de mondmilito, lavango, terdisfaladoj, superakvoj. Oni ofte spertis la taŭgecon de Esperanto. Unu el la ĉefaj aranĝantoj estas nia samideano Pierre Ceresole, kiu helpis eĉ en Hindujo. Per la laboro ili kreas novan spiriton de bonvolo, paca kunlaboro, frata interkompreno. Oni vokas ĉiujn bonvolajn homojn helpi labore aŭ mone. Akiru la broŝuron, legu ĝin kaj se vi povas, sekvu ĝin! P. B.

✓ **STUDADOJ DE LA CERIZFLORO SUB FENOLOGIA VIDPUNKTO.** De Tacuo Taguchi. Kobe, Japanujo. Decembro 1935. 12 grandform. pĝ. Represo de la paĝoj 85—95 el la »Raportoj de la Imperiestra Marista Observatorio«. Por fakuloj interesa scienca priskribo kun kalkuloj kaj tabeloj pri la fenologioj (geografiaj, meteorologiaj) influoj al la florado de cerizfloro en diversaj partoj de Japanujo. Ĝi aperis originale en Esperanto en la nomitaj »Raportoj« kaj pruvas la seriozan sciancan uzadon de la lingvo daŭre kaj persiste en Japanujo. Se nur la blankaj scienculoj imitus jam la flavajn fratojn!

✓ **LYONA FOIRO.** Oni devas esti kontenta! La foiro de Lyon sendis presitajn en Esperanto: grandan afiŝon 60×100 cm. kvinkoloran, belan prospekton sespaĝan, dukoloran, kun desegnaĵoj kaj fotografajoj, sorbpaperojn, ilustritajn poŝtkartojn kaj 40 paĝan albumeton, eldonitan pri Lyon de la »Sindicat d Initiative« kun germana, franca, angla, hispana, itala kaj esperanta tekstoj. Tiu ĉi senpaga fotoalbumeto mem jam valoras, ke oni petu ĉiujn presajojn de la Foiro de Lyon, Esperanto-Fako, rue Ménéstrier, Francujo kaj oni eĉ disvasagu ilin. Vi povas orienti vin per tiuj presajoj ankaŭ pri la venontjara foiro, kiu certe, kiel kutime, okazos en Marto. P. B.

✓ **»KORNMOD«-SILKEBORG, DANLANDO, INTERNACIA LERNEJO.** 8 pĝ. Ilustrita prospekto pri someraj kursoj universitataj prelegoj en bela »Perlo de Danlando«, kie ofte loĝis Andersen. Cseh-metodan kurson gvidos sro. Weide, prelegos pri diversaj interesaj temoj sroj. prof. Collinson, Privat, Engholm kaj aliaj. Modestaj prezoj. Vere vizitinda, serioza aranĝo por la esperantistaro. Skribu al Stig. B. Skole, lernejestro »Kornmod«, Silkeborg. Danlando.

RECENZOTAJ LIBROJ

✓ **E. LANTI: ĈU SOCIALISMO KONSTRUIGAS EN SOVETIO?** Eldonis: Esperanto, 14 Av. de Corbéra, Paris XX.

NOGAMI-JAEKO: KAIJIN MARU. Traduko de *Osaki-Kazuo.* Japana novelo. Eldonis: Japana Esperanto Instituto. 19×12.5 cm. 80 paĝa.

✓ **INA BOUDIER BAKKER: SURPRIZOJ.** Tradukis: *Tekla Flint.* Eldonis »Isosek« Heerlen, Schinkelstraat 23. 19×13.5 cm. 208 paĝa. Prezo: bind. 2.50 guld.

✓ **MIKAELO GUTTERMANN: NORMIGO (Skizo).** Tradukis: *A. Samojlenko.* Eldonis Ekrelo. 21×15.5 cm. 16 paĝa.

✓ **ESPERANTO SLOSILO BASKA.** Eldonis: Esperanto Grupo de Bilbao. 10.5×7.5 cm. 39 paĝa.

✓ **D. TADIJANOVIC: KANTO AL MIA KORO.** Tradukis: *J. Velebit.* Eldonis la tradukinto. 18×15 cm. 63 paĝa.

✓ **KONGRESLIBRO de la Nederlanda Esperanto Kongreso.** Eldonis: La Loka Kongresa Komitato. 22.5×14.5 cm. 44 paĝa.

✓ **JARLIBRO de Sveda Esperanto-Federacio.** Eldonis: Sveda Esperanto Federacio. Stockholm I. Fack 698. 20×13.5 cm. 72 paĝa.

✓ **NORVEGA KANTARETO.** Tradukis: *Liv. Sandberg.* Eldonis: Norvega Esperantista Ligo. 14×10 cm. 40 paĝa.

✓ **A. L. MALMANCHE: BOTANIKI KLASIFIKO.** Eldono de la aŭtoro: L. Malmanche, Rueil-Malmaison, 101 av., Paul Donner. 31.5×21.5 cm. 92 paĝa. Prezo: 50 francaj frankoj.

P o r e t k v a n t a m o n s u m e t o
P l e n i ĝ a n t a l i b r o b r e t o !
A E L A !

LINGVO * LIBRO

Redakcio kaj Administracio Literatura Mondo, Budapeŝt, IX. Soroksári út 38. V. 6. Hungarujo. Aparte aĉetebla. Unu numero kostas 0.20 sv. fr. aŭ egalvaloron. Tri numeroj kune ekspedataj kostas nur 0.30 sv. fr. aŭ egalvaloron. aŭ proksimuman egalvaloron.

Senpaga suplemento al Literatura Mondo • Senpaga gazeto por anoj de AELA

Aperas kvaronjare • Nro 3.1936

La semajno de la libro

La nun ĉie festata Jubileo de Baghy kaj Kalocsay, same kiel la venontjare solenota Jubileo de Esperanto, ree aktualigas gravan problemon de nia literaturo: kiamaniere disvastigi la Esperantan libron?

Bonegan solvon proponis jam antaŭ longe Julio Baghy, iniciatante la Tagon de la Libro, kaj tre atentindan sugeston faris Kalocsay en sia »Lingvo, Stilo, Formo« pri la kolektiva abono kaj aĉeto. Kaj ankaŭ multaj aliaj aktivuloj prezentis same bonajn ideojn por la grandskala disvastigo de libroj kaj gazetoj. Tamen ni devas konstati, ke nur malgranda parto de la verda familio konscie kaj ofereme subtenas la animon de sia lingvo: la literaturon.

Tro multaj el ni ankoraŭ neglektas sian elementan devon!

Sed ĉu entute eblas ŝanĝi tiun afer-staton? Jes, tute certe! Kaj kontraŭ la rezignacia konkludo de kelkaj pesimistoj mi trankvile kaj firme asertas: la pli granda parto de la esperantistaro povas kaj devas subteni sian literaturon. Ekzistas por tio rimedoj. Statistikoj montras, ke se ĉiu samideano oferus la modestan kontribuon de 2.— sv. fr. aŭ egalvaloron, oni povus per tio ne nur ĉiurilate plibonigi la eldonadon, sed ankaŭ duonigi ties kostojn kompare al la nunaj.

Gissate oni ripetadas, ke nia epoko malfavoras ĉiun kultur-movadon. Sed ĝuste en momento, kiam nia idealo estas plej danĝere minacata, ni devas ĝin ŝirmi kaj savi per fajre obstina energio. Nia movado jam travivis aliajn krizojn, kaj ĉiam levigis en la necesa momento kelkaj oferemaj homoj por kuraĝe savi la situacion. Ni menciuj nur la ekzemplon de Trompeter.

Niaj verkistoj, rezignante pri deca honorario, kaj niaj eldonistoj, ne bankrotinte dank' al akrobata lerteco, jam faris grandajn oferojn kaj decidajn paŝojn. Sed tio ne sufiĉas: oni devas sisteme almiliti la indiferecon de certa publiko. Kaj por tio oni bezonas nur helpemajn manojn kaj entuziasmajn korojn!

Nu, troviĝas en la mondo — ni parolas el propra sperto — amaso da fervoraj kaj bonvolaj junuloj, kiuj bolas de la flama deziro praktike utili al la movado. Ili momente laciĝis de la »koresponda aŭ kolekta manio«; ili ne sukcesis gvidi kurson aŭ trovi lokon en la komitato de sia klubo, aŭ eĉ se tion ili sukcesis, ili tamen ne plene kontentigis sian bezonon de fekunda aktiveco. Antaŭenpuŝi la movadon: jen ilia ambicio. Kaj ĝuste al tiuj junuloj ni deziras nin turni; al ili ni direktas nian alvokon.

Estus ne nur dezirinde, sed eĉ necese, organizi jam en tiu ĉi jaro Semajnon de la Libro, dum kiu pordo-

frapaj helpantoj sisteme vizitadus la esperantistojn de sia urbo, distrikto aŭ regiono, por kolekti mendojn aŭ abonojn. Tiuj bonvolaj kaj servopretaj agentoj povus viziti de 20 ĝis 50 samideanoj. Ili devus nur sufiĉe frue rilati kun la koncernaj eldonejoj, kiuj ilin provizus per la necesa materialo kaj konsentus al ili modestan komision laŭ la vendo. Ne gravas, por kiu eldonejo ili laborus, ĉar nia literatura movado ankoraŭ ne estas sufiĉe forta, por ke ni parolu pri konkurenco. Kiu ajn entrepreno eldonas bonan libron aŭ gazeton, ne konkurenca alian entreprenon, sed male, kontribuas al la komuna bono. La junulojn pretajn eklabori atendas vasta agadkampo, sur kiu la sento de konscie plenumata laboro jam estos granda rekompenco!

Jen simpla ekzemplo. La urbo Genève ne estas tro favora tereno por la disvastigo de esperantaj libroj. Unue, pro grandega nombro de ĉiaj societoj. Prave oni diras, ke genevano ofertas la dekonon de sia salajro kaj la duonon de sia libera tempo por la societoj. Due, pro ĝenerala manko de fervoro ĉe la samideanoj. Trie, pro tio, ke la libroservo de UEA daŭre provizas la lokajn literatur-amantojn. Tial, klopodi vendi esperantajn librojn en Genève ŝajnas al ĉiu saĝa kaj sperta homo impertinenta vetludo. Tamen, junaj kaj neniel spertaj samideanoj sukcesis atingi la jenan rezulton post sistema rond-vizitado de ĉiuj lokaj esperantistoj: 20 abonojn al diversaj gazetoj, 10 libro-mendojn kaj monsumon sufiĉan por oferti al la Publika Biblioteko ekzempleron de la Enciklopedio de Esperanto kaj de la Plena Vortaro. Jen kion oni povas rikolti en urbo, kie »restis nenio plu por fari«. La rezulto valoris la penon. Ĝi servu kiel instigo al multaj libermanaj junuloj!

La sistemo de hejmvizitado prezentas sennombrajn avantaĝojn, kiujn plezure spertos ĉiu, kiu ĝin bonvole provos. Ekzemple, ĉiu aktiva grup-kasisto bone scias, ke la kotizojn oni enkasigas kun senkompare pli granda sukceso vizitante la hejmojn, ol atendante ĉe la klubejo. Kaj estas ĉie konate, ke la propagando de homo al homo estas la plej efika kaj la plej konvinka. Kaj oni persone kontaktigas kun ĉiu unuopa kaj ofte nekonata esperantisto de sia urbo; oni renkontas multajn, kiuj diverskiale plu ne vizitas kunvenojn, sed tamen volonte legos hejme por ne forgesi la lingvon; oni revigligas tiujn, kiuj »restis esperantistoj en la koro«; kaj oni ankaŭ pli intimiĝas kun la kutimuloj de la klubo, ĉar hejme oni povas pli trafe diskuti kaj pli funde tuŝi la temon. Tro ofte, en kunvenoj, oni persvasdas homon aĉeti libron, sed ne konvinkas lin pri la profunda signifnifoj kaj utilo de lia ago.

Kompreneble ekzistas maniero plej trafe almiliti

Pri la Plena Gramatiko

POR LA ZAMENHOFA ESPERANTO II.

En mia artikolo pri la »Plena Gramatiko« (Lingvo-Libro 1936, p. 9—10) troviĝas kelke da preseraroj: p. 9, l. 21. *fermi (formi)*; l. 35. mankas punktokomo post *lando*; l. 52. forigu komon; l. 59. *ni (mi)*; p. 10, l. 18. l. *Krest. (F. Krest.)*; l. 24. *Conturat (Couturat)*.

S-ro Kalocsay skribis: »Mi ne scias, kial S-ro Bailey kondamnas la uzon de adverbo en sensubjektaj propozicioj«. Mi ne kondamnis tiun uzon! Kontraŭe, mi skribis en mia artikolo: »Laŭ Zamenhofs sistemo la elekto de adjektivo aŭ adverbo estas *tute libera*«. Mi nur rimarkis, ke la aŭtoroj de la Plena Gramatiko skribis sur p. 10: »Sajnis oportune kunigi tiun branĉon«, uzante dubescan adverboson tie, kie adjektivo donus sencanon tute klaran. Komparu kun tio la Zamenhofan frazon: »eble ŝajnos stranga, ke ni presas iafoje proponojn«. (Esperantisto 1894, p. 39.)

S-ro de Beaufront kondamnis la uzon de *adjektivo* en tiaj okazoj, kaj bedaŭrinde multaj aliaj aŭtoroj sekvis lian instruon. Skribante pri la Zamenhofs frazo »kvankam la plej bona estus silenti pri ili«, (*Lingvo Internacia* 1896, p. 29, repesita en la Originala Verkaro, p. 425), li nomis ĝin »la sola ekzemplo« kaj diris: »Ĝi estas plumeraro de la doktoro mem, aŭ preseraro de l' kompostistoj«. (*Lingvo Internacia* 1898, p. 100.) Dirante tion, li forte eraris: la frazo *ne* estas plumeraro, nek preseraro, ĝi *ne* estas la sola en sia speco (mi kolektis el la verkoj de Zamenhof 44 aliajn), ĝi estas konforma al la sistemo de Zamenhof, kiu ne volis ligi sin per la katenoj, forĝitaj de s-ro de Beaufront.

Tiel same maljuste s-ro Kalocsay diras, ke mi »ne permesas uzi laŭvole *tiu ĉi* kaj *ĉi tiu*, ne permesas uzi la vorton *kialo*«. Tamen s-ro Kalocsay scias tre bone, ke nek mi nek iu alia havas rajton eldoni malpermesojn. Mi nur konsilas konformecon al la principo, esprimita en la paragrafo, kiun mi citis el la Deklaracio de Boulogne. En la Lingva Respondo 52 (p. 54 en la Plena Kolekto) Zamenhof diris, ke pro belsoneco ordinare estas preferinde starigi la »ĉi« antaŭ la montra vorto. En sia praktiko li uzis ne »kialo«, sed »kaŭzo« kaj »motivo«. Ĉu la aŭtoroj de la Plena Gramatiko sekvas nur la Zamenhofan sistemon? En la § 288. ili nomas »plumeraroj« la frazojn (mi kolektis dek-tri), en kiuj Zamenhof uzis *si* jen por la unua persono, jen por la dua.

Sur p. 241 de la Plena Gramatiko du Zamenhofaj ekzemploj estas malguste presitaj: ĉe Psalmo XVII. 7 Zamenhof skribis: *Vi, kiu per Via dekstra mano helpas la fidantojn* (vidu en la Hachette eldono): ĉe Cefanja III. 8 li skribis: *atendu Min, diras la Eternulo, ĝis Mi siatempe levigos*. La ŝanĝo *Miatempe*, enkondukita de la Biblia Komitato, aliigas la sencanon; vidu la Zamenhofan difinon de *siatempe*, donitan en la Lingva Respondo 43 (p. 52 de la Plena Kolekto); cetere, ĉi tiu difino ne montras refleksi-van rilaton al la subjekto. Ankaŭ aliloke la citatoj estas malguste presitaj.

Se la aŭtoroj de la Plena Gramatiko efektive lasus netuŝita tion, kion sankciis Zamenhof, ilia verko havus

mian plenan aprobon. Sed ilia procedo estas tute alia. »Neniu scias, kion sankcius Z., se li vivus.« Bone! Sed antaŭ ol elpensi ion laŭ persona opinio aŭ gusto, oni almenaŭ devus ellerni funde la Zamenhofan uzadon de la lingvo. Ĉe tia ellernado eĉ la plej eminenta instruitulo trovus — se memsufiĉeco ne blindigus lin — ke la verkaro de Zamenhof donas multe pli vastan lingvan materialon, multe pli grandan trezoron da vortoj, frazoj, parolturnoj k. t. p., ol li antaŭe eĉ supozis.

Ne mi, sed s-ro Kalocsay miskomprenis la tre precizan leteron al prof. Cart. Ĉi tiu letero koncernas la *signifon*, kiun oni devus meti en vortaron post radiko, por klarigi la sencanon, kiun la radiko ricevas post aldono de gramatika finiĝo. La difino ne estas traduko de la *radiko*, kiu per si mem estas tute ne tradukebla. La *radiko stamp'* en la Universala Vortaro ricevis du Francajn substantivojn, Germanan verbon, kaj du Anglaajn vortojn, kiuj havas ambaŭ sencojn. »Mi intencis doni al la radiko signifon verban« — kompreneble en vortaro. Ĉar, malgraŭ la parada komentario de s-ro Kalocsay, la Antido (de Saussure) teorio estas, ke la radikoj posedas per propra naturo tiajn gramatikajn sencojn; se tio estas vera, kiel oni povus doni al io tion, kion ĝi jam posedas? Ne tiel mallogike pensis Zamenhof.

Estus tro longa afero pritrakti la gratulan leteron al s-ro de Saussure — kiu estis tiel varme aldonita al Esperanto, ke li publikigis projekton de nova lingvo, de li elpensita! — sed legi en ĉi tiu letero aprobon de la teorio estas forgesi la kutiman Zamenhofan esprimmanieron, preterlasi la cirkonstancojn de la Idistaj atakoj, kaj super ĉio malatenti la fakton, ke Zamenhof eĉ la multaj okazoj, kiam li priskribis la strukturon de sia lingvo, kiam li elmontris la metodon, per kiu li alvenis al la radikoj, neniam eĉ aludis tian teorion. La kreinto de la lingvo nenion sciis pri tia fundamenta eco ĝis kelke da jaroj poste, kiam sub la influo de la Idistaj pseŭdoscienlistoj s-ro de Saussure ĝin malkovris!

»Neniu scias, kion sankcius Z., se li vivus«, skribis s-ro Kalocsay kaj aliloke li aldonis: »Ni estas firme konvinkitaj, ke Z. ĝojus pri nia verko.« Akordigi ĉi tiujn asertojn estas preter mia povo.

»Kion sankcius Z. kaj la tradicio, tion ni lasis netuŝita«, skribis s-ro Kalocsay. Sed la »tradicio« en kelkaj okazoj estas fondita sur la pseŭdoreguloj, kreitaj plejparte de s-ro de Beaufront, kopiitaj de aliaj aŭtoroj, kaj tamen ne obeitaj de la kreinto de la lingvo. Sekve ni trovas nin en la jenaj malfeliĉaj cirkonstancoj: se kandidato en lingva ekzameno sekvas fidele la Zamenhofan stilon, li riskas malsukceson, ĉar kredeble la ekzamenisto ne povoscias distingi Esperanton Zamenhofan de Esperanto Beaufronta! Mi certe ne volas postuli, ke la lingvo »restu eterne en la stato, en kiu ĝi estis en la momento de la morto de la Majstro«, sed mi forte deziras, ke ĝi disvolviĝu sur la Zamenhofs bazo, ne sur arbitraj pseŭdoreguloj, eltruditaj de aliaj personoj.

Koncerne la sensubjektajn propoziciojn, la refleksi-vajn pronomojn, kaj eble aliajn punktojn mi liveros al

la publikon. Kaj ankaŭ momento. La plej favora estas eble post sukcesa literatura vespero, kiun aranĝis la loka grupo. Tiam la entuziasmo ŝvebas en la aero kaj la tereno kvazaŭ avidas la semon. La ceteron faros tiuj junuloj, kiuj sendube konas la sekreton malfermi ĉiujn pordojn kaj korojn.

La manieroj povas esti plej diversaj, sed la celo,

kiun ni devas nepre atingi, estas por ĉiuj la sama: prepari la grandiozan triumfon de Esperanto. Kaj por tio oni ne nur laŭde parolu pri niaj libroj, sed oni aĉetu kaj legu ilin.

Junuloj, leviĝu kaj iru! La tasko vin atendas.

Jean Lecoultre

Lingvo-Libro detalajn pruvojn, se la redakcio povos disponi sufiĉan spacon por tio.

S-ro Kalocsay skribis: »ni intencis fari ian supernacian gramatikon, kiu montras la esencajn partojn, la skeleton de la homa Lingvo, ĝenerale.« Nu, se tion ili intencis, kial nomi la verkon »Plena Gramatiko de Esperanto«?

William Bailey

Permesu al mi la ŝatata aŭtoro respondon pri du punktoj.

1) *Gramatika karaktero de la radikoj.* Mi ankoraŭ opinias, ke mi ne miskomprenis la tekston de Z.: »mi volis doni al la radiko signifon verban«. Tio ne povas havi alian sence, ol ke la radiko devas enhavi en si la verban signifon, t. e. la verban karakteron. Se temus nur pri la nacilingva traduko, Z. estus skribinta: »mi volis doni al la radiko tradukon verban«; aŭ: »mi volis doni al la traduko signifon verban«. Sed eĉ se tiu signifo rilatus nur al la traduko, la afero ne sangigus, ĉar, kial al Z. estus grave, ke la traduko estu verba, se ne tial, ke la *radikon mem* li volis fari verba. Se ne tiel estus, li certe estus respondinta, ke ne gravas la diferenco de la gramatikaj karakteroj en la diversaj tradukvortoj; gravas nur ilia senco — la Esp-aj radikoj ja estas senkarakteraj. Sed tion Z. neniam diris.

Estas eble, ke tiun karakteron Z. donis al la radikoj ne plene konscie; t. e. li ne konscis pri ties elementa graveco por la Esp-a vortfarado. Tial li ne formulis mem tiun leĝon. Sed la formuladon de de Saussure li akceptis kun evidenta aprobo; oni vidas el lia letero, ke li ĝoje rekonis sian duonklaritan intencan en la ekzakta formulado de de Saussure. Cetere: rekomendi la libron al ĉiuj, precipe al verkistoj, esperi la oficialigon de la tuta sistemo ne estas banala ĝentileco, sed plena aprobo.

2) *Adverba predikativo.* Mi tre ĝojus, se mi vidus tiujn 4/4 Z-ajn ekzemplojn — certe multaj el ili estas objektaj predikativoj, do regulaj. Sed eĉ se ĉiuj 4/4 estas neregulaj, oni ne povas paroli pri *libera elekto*, maksimume pri ŝanceliĝo de uzado. Kaj — ĉu dank' al Beaufront aŭ ne — la nuna lingvo forlasis tiun ŝanceligon kaj kristaligis firman regulon. Diri hodiaŭ estas *bona, ke...* estas same erare, kiel diri: *iam mi estis tie*, anstataŭ: *iam mi estis*. Pri libera elekto oni povus paroli nur, se ĉe Z. almenaŭ ĉiu kvara aŭ kvina tia predikativo estus adjektiva.

Pri la aliaj punktoj mi ne respondas, ĉar ili ne estas principaj, do havas malmultan gravecon el la vidpunkto de nia gramatika sistemo. *Kalocsay.*

RIMARKOJ PRI LA PARTO II: »VORTFARADO«

(*Daŭrigo*)

La Aŭtoroj de P. G. tro obseditaj de la konvinko, ke gramatika naturo de radiko, estas plej esenca fakto, obstinas klarigi, kio okazas, se al ia radiko oni aldonas finajon ne samspecan kiel ĝia gramatika karaktero, kaj konsideras ĉiujn eblajn kombinaĵojn, kio kompreneble kondukas ilin en senfinan labirinton de eltorditaj kaj ĉiam pli retorditaj argumentoj kaj subtilaĵoj. Ili asertas (paĝo 40-a): »Post *verbaj radikoj* la *-a* finaĵo kiel adjektiva ĉefelemento ĉiam substantivigas la antaŭan radikon kaj al tiu ĉi verbosubstantivo ĝi ligiĝas kun sia senco.

»Do *verbo-adjektivo* estas ĉiam *verbo-substantivo-adjektivo*«. Ĉu oni povas imagi al si pli teruran komplikacion? Ekzemple: se el verba radiko *skrib'* ni simple formas *skriba*, atentu! vi staras antaŭ *verbo-substantivo-adjektivo*. Pardonu, Sroj, aŭtoroj de P. G.: ni nur staras antaŭ simpla adjektivo *skriba*, tute sendanĝera kiel *bela*. Vorto nur povas havi unu gramatikan rolon: do, ĝi estos aŭ substantivo, aŭ adjektivo k. c. sed ne samtempe *verbo*, *substantivo* kaj *adjektivo*. Nur mankas al ĝi esti adverbo, por plenakiri al si la kvar fundamentajn gramatikajn rolojn, kaj se vi opinias, ke la adverba rolo estas pli-malpli

kvazaŭadjektiva, jen vi havas, ke *skriba* estas plej riĉhava vorto.⁵⁵⁾

Ni uzu tian vorton en la esprimo *skriba ago*: ĉu tio ne simple signifas *ago skribi*? Kaj tiel simple ni pasis de verbo *skribi* al adjektivo *skriba*? Ĉu tia terure komplika triunuo *verbo-substantivo-adjektivo* jam malaperis per la unua blovo? Sendube ĝi ne estas tre fortika.

Sed ni elektu alian ekzemplon, ĉar oni povus argumenti, ke estas multa simileco inter *skriba ago* kaj *skribi*. Eble iuj diros, ke ambaŭ estas nur unu sama afero. Ni konsideru *tima homo* = *homo kun-timo* aŭ *timanta*; *nutra manĝaĵo* = *manĝaĵo por-nutri*; *skriba maŝino* = *maŝino por-skribi* aŭ *skribmaŝino*, k. c.; oni vidas ke la analizo estas plej simpla kaj eĉ oni revenas al jam pritrakitaj kunmetaj tipoj, kiel *skribmaŝino*; efektive estas malfacile trovi ian esencan diferencan inter *leterordono* kaj *skribordono*. Se mi skribas leteron por ion ordoni, la rezulto de mia ago estas samtempe *skribordono* = *skriba ordono* kaj *leterordono* = *letera ordono*. Ambaŭ esprimoj estas identaj per signifo kaj kunmeto. Tamen P. G. pretendas, ke la adjektivoj *skriba* kaj *letera* estas malsame analizablaj, ĉar *skrib'* estas verba radiko kaj *leter'* substantiva. *Skriba* estas *skrib-i-o-a!* Oni ne povas imagi ion pli malnaturan kaj komplikajn.

Se la ĉefelemento estas verba, — asertas P. G. (pĝ. 42-a) — la flankelemento fariĝas: a) adverbo: *laŭtleĝi* = *laŭte legi*, b) predikata adjektivo: ekz. *ruĝpentri* (*pentri ruĝa*), *plenŝtopi* (*ŝtopi plena*), *disiri* (*iri disaj*), *kunveni* (*veni kunaj*), k. c.

Pri la unua punkto oni devas konsenti, sed la dua estas malprava: *ruĝpentri* signifas *pentri ruĝe* (per ruĝa koloro, ruĝkoloro), *plenŝtopi* = *ŝtopi plene*, ĝis plene, *disiri* = *iri dise*, *kunveni* = *veni kune* (ni jam sufiĉe klarigis tion) k. c.

Sajnas, ke la aŭtoroj de P. G. miskomprenis la esencan rolon de predikata adjektivo, tio estas, de adjektivo kun verbo, t. e. la diferencan inter esprimoj: *bone trovi* kaj *trivi bona*, *facile kredi* kaj *kredi facila* k. c. Ni rapide klarigos ĝin per simpla ekzemplo.

Se mi skribas facilan ekzercon por dekjara knabo, kiu lernas fremdan lingvon ekz. la francan, mi diros: *mi skribis facilan ekzercon*. Tiu ĉi *facilan* nur rilatiĝas al *ekzercon*: ĝi do estas adjektivo, kiu akordiĝas kaze kaj nombre kun substantivo *ekzercon*; nenia dubo, ke la ekzerco estas facila. Se nun la *facila ekzerco*, kiun mi skribis por la knabo, perdiĝas inter miaj paperoj, mi serĉos ĝin kaj povas okazi: a) ke mi tuj, preskaŭ senpene, ĝin retrovu, mi tiam diros: *mi facile trovis la facilan ekzercon* aŭ b), ke ni retrovu ĝin post longa peniga serĉado. Mi tiam diros: *mi malfacile trovis la facilan ekzercon*. Ambaŭokaze *facile* kaj *malfacile* estas adverboj, kiuj nur rilatas al verbo *trovi*, kaj nur esprimas, ĉu mia trovado estis facila aŭ malfacila. Fine, se la knabo por lerni la

⁵⁵⁾ Tio estas misklarigo. *Verbo-substantivo-adjektivo* ne signifas, ke tiu vorto havas tri gramatikajn rolojn, sed ke ĝi havas laŭvice tri gramatikajn elementojn. Do *skriba* entenas elementon verban (*skrib*), elementon adjektivan (-a) kaj inter ili meze latentan substantivan elementon (-o).

Tion tre facile estas pruvi. La vorto *nutra* signifas aŭ *nutro-kvalita* (*nutra manĝaĵo*), aŭ *nutro-rilata* (*nutra problemo*). *Kvalita* kaj *rilata* estas la du signifoj de la *a*-finaĵo, do oni povas per ĝi anstataŭigi ilin; tiel ni ricevas la formon *nutro-a*: *nutro-o-a*. Ĉar *nutr* estas verbradiko, -o estas substantivo, -a estas adjektivo, la tuta vorto estas do verbo-substantivo-adjektivo.

Nutra ne estas same »sendanĝera« kiel *bela*, ĉar *bela* neniam povas esti *belo-a*, sekve *bela problemo* estas ĉiam nur *problemo bela*, sed neniam *belo-rilata problemo* (*problemo pri belo*). (K.)

facilan ekzercon faras tre penigan laboron, ni rajtos diri: *li trovis malfacila la facilan ekzercon*, malgraŭ ke mi, ĝin verkante, *trovis facila la ekzercon*. Tiu ĉi *facila kaj malfacila* rilatas *samtempe al ekzerco kaj al verbo trovi*. Tiuj ĉi esprimoj signifas: *mi trovis, ke la ekzerco estas facila aŭ malfacila aŭ ke mi atribuas facilecon aŭ malfacilecon al ekzerco, kiu tamen, malgraŭ mia atribuo devas esti nur ĉu facila, ĉu malfacila.*⁵⁶⁾

En la montrita ekzemplo la uzado de adjektivo kun verbo estas prava, sed la esprimoj: *kunveni, disiri* k. c. ne estas samspecaj. Dirante *ili kunvenis, ili disiris*, k. c. oni *nenion atribuas* al verboj *veni, iri*, k. e. kaj oni volas signifi: *ili venis kun (kune), ili iris dis (dise)* k. c. La teorio, ke *ili disiris*, signifas, ke post irado *ili estas disaj*, ne estas prava, ĉar se *dis* gluiĝas al *iri*, estas evidente, ke la senco de *dis* devas nuanci la ideon *iri* kaj ne povas efiki sur tion, kio okazas post la irado, kiam jam ĉesis la ago *iri*. Estas evidente, ke *dis* koncernas *iri*, al kiu ĝi algluiĝas, kaj devas efiki nur *dum iro*. Se popolamaso en placo, minacata de ĝendarmoj, tuj forkuras, ĉiuj homoj *disiras* aŭ *dise iras*, t. e. ĉiu iras laŭ sia flanko; se ili *irus disaj*, tio ĉi signifus, ke ili estas disaj antaŭ forkuro, kaj se ili estas disaj jam antaŭ irado, estus senutile, ke la ĝendarmoj ilin admonu *disiri*.⁵⁶⁾

Mi ne citos, ekzemplon post ekzemplo, ĉiujn miskomprenojn, kiujn oni ofte trovas en P. G. pri predikataj adjektivoj. Sufiĉas diri unu fojon por ĉiam, ke la aŭtoroj trouzas tian miskomprenon kaj multaj esprimoj estas eraraj, kiel tiuj, kiujn ni ĵus kritikis (*kunveni, disiri*, k. c.).

Estas ankaŭ senutile pluesplori la teorion pri adjektivaj kaj verbaj ĉefelementoj, ĉar pri la substantivaj ni jam sufiĉe longe klarigis la aferon kaj multaj konsideroj validas ankaŭ por la unuaj.

La teorio de P. G. pri analizo kaj sintezo de vortoj (paĝoj 56-a al 64-a) estas plej subtile komplika kaj bazita sur malĝustaj principoj. Ni jam montris la malpravecon de la reguloj signitaj per VER. I., VER. II, kaj VER. III. 2.⁵⁷⁾

Pri la meĥanismo de vortfarado ni jam antaŭe montris per diversaj ekzemploj kiel simpla ĝi estas, kaj kiel facile ĝi klariĝas tute sen la konsidero de la vortefiko rekta kaj inversa, sen la enkonduko de flankelementoj kuntenaj kaj disfalaj, aŭ de flankkompleksoj kuntenaj, disfalaj kaj kadraj, k. c.⁵⁷⁾

Ni ankaŭ montris, ke la finaĵoj *-o, -a, -i, -e* estas plej ofte nur gramatikaj kaj estas granda eraro kaj komplikaĵo kredi, ke la gramatika karaktero de la radikoj povas esence influi sur la meĥanisman de vortkunmetado kaj eltiro de la rezultanta senco aŭ signifo.

Analizi *trimasto* per (tri-mastoj) *-ec -ajo* (paĝ. 58-a, kunmetante du kontraŭajn sufiksojn *-ec* kaj *-aj*), *puriga* per (pura igi) *-o, -a, senforta* per (sen forto) *-o -a, ĉirkaŭurba* per (ĉirkaŭ urbo) *-o -a, skriba* per (skribi) *-o -a, letterskribi* per (letterskribo) *-e -i, fruktodoni* per (fruktodono) *-e -i*, k. c. kiam ni klarigis tiujn plej simplajn kunmetaĵojn laŭ rekta plej facila procedo, ŝajnas al ni tro subtala komplikeco, kiu nur konfuzigas kaj malfaciligas la regulojn de Esperanta vortfarado.⁵⁷⁾

Ankaŭ same komplika kaj senutila ni kredas la klasiĝon laŭ prefiksoj kaj prefiksoidoj kaj sufiksoj kaj sufiksoidoj, ĉar la ĉefa distingilo, ke unuj obeas kaj aliaj ne al iaj vortkunmetaj reguloj, kiujn ni pruvis malpravaj, ne estas fundamenta karaktero. Mi ne komprenas ekz. la diferencon inter *-eg, -et* (veraj sufiksoj), kaj *-ec, -aj* (su-

fiksoidoj), kiu pravigas, ke oni ilin klasiĝu en apartajn grupojn. Se *-eg* ekz. ne ŝanĝas la gramatikan naturon de la radikoj, tio ĉi estas bagatela konsidero, ĉar se el *kri'* (verbo), ni eltiras *kriegi*, sendube la verba naturo restas, sed se ni formas *kriego, kriega* kaj *kriege*, ni perdas jam ĝin kaj ricevas substantivon, adjektivon kaj adverbon. Kiam rilaton povas havi tiu sengrava konsidero kun la nuanco de la sufikso kaj la maniero ĝin apliki? Nenia esenca diferenco ekzistas en kunmeto de *knabego* kaj *grandulo*, de *domaĉo* kaj *dometo*; de *misfaro* kaj *malfaro*, k. c.⁵⁸⁾

En la uzo de la sufiksoj oni distingas la flankelementojn kuntenajn kaj disfalajn. Mi kredas superflua tian distingon kaj multfoje malprava. Ekz. en *altmontaro* = aro da altmontoj, oni diras ke *altmonto* ne povas ekzisti kiel aparta vorto; same pri *samideano, samklasano* k. c. Mi ne komprenas, kial oni ne povas formi *samideo, samklaso* k. c. kaj tamen estas korektaj *samidea, samurba*, k. c.⁵⁹⁾

Pri la participoj P. G. diras (paĝo 69-a): »La particip-finaĵoj estas propre finaj-kompleksoj. Ili esprimas verbecon (i) kaj adjektivecon (a). Sed ĉar verba radikoj estas adjektivegbla nur tra substantivigo, ili enhavas meze ankaŭ la substantivan finaĵon latentan. Ilia strukturo do estas I-O-A.«

Tiu ĉi konsidero estas malprava, ĉar ekz. *am'ant'*, montras: agon *am'*, faratan en estanta tempo kaj nenio pli. Aldonante finaĵon *-o (amanto)* ni ricevas substantivon (tiu, kiu amas); per finaĵo *-a* ni ricevas adjektivon: *amanta* (kiu amas), kaj fine per *-e* oni formas: adverbon: *amante* = kiel amanto. Tiel, do, *-ant* ne esprimas adjektivecon, sed nur, ke la ago estas farata kaj en estanta tempo. La adjektivecon montras finaĵo *-a*, kiel la substantivecon *-o*, kaj adverbecon *-e*. Krom tio, la strukturo de participo ne estas *i-o-a*.⁶⁰⁾

En la difino de *-aj* kaj *-ec*, la aŭtoroj de P. G. erarigite de la falsa principo, ke *-eco* kaj *-ajo* nepre devas substantivigi la antaŭan radikon, venas al falsaj konkludoj

⁵⁸⁾ Estas sendube, ke ekzistas esenca diferenco inter *urbano* (ano de urbo) kaj *urbeto* (eta urbo).

Same, ni rigardu la du vortojn *kriegi* kaj *purigi*. En *kriegi* la verba naturo de *krii* restas sensanĝa (ege *krii*), dum en *purigi* la adjektiva naturo de *pura* estas kovrita per la verbo *igi* (*igi pura*).

Nun ni rigardu la vortojn *purega* kaj *puriga*. En *purega* la adjektiveco de *pur* restas sensanĝa (ege *pura*), dum en *puriga* ĝin kovras la verba *igi*, kaj la a-finaĵo ne rilatas plu al la radikoj *pur*, sed al la kunmeto *purigo*.

Aŭ, se ni rigardas o-finaĵan pluformadon, en *kriego* la o-finaĵo rilatas rekte al *kri* (ega *krio*); male, en *purigo* ĝi ne rilatas al *pur*, sed al la tuta kunmeto *purig*.

Ce *eta, ega, aĉa* do la sufikso ne funkcias el la vidpunkto de la pluformado; la antaŭa elemento kaj la finaĵo interkroĉiĝas trans ĝi, kvazaŭ ĝi tute ne ekzistus. Male, ĉe la sufiksoidoj la finaĵo apartenas aŭ al la lasta elemento (kovrilo) aŭ al ambaŭ elementoj kune (*purig-o*). (K.)

⁵⁹⁾ Guste tion komprenigas niaj vortefikaj reguloj. Cetere, ĉu la aŭtoro povas montri eĉ unu zamenhofan uzon de *samideo* aŭ *samklaso*? (K.)

⁶⁰⁾ »Agon faratan en estanta tempo« montras ne *amant'*, sed *amas*.

Kio estas »homo martelanta«? Homo karakterizita de tio, ke li martelas.

karakterizita de egalvaloras al la a-finaĵo
tio egalvaloras al la o-finaĵo

ke li martelas estas senpersone esprimebla per *marteli*.
Martelanta do estas

a-o-marteli

aŭ, se oni metas la a-finaĵon al la fino:

marteli-o-a martel-i-o-a.

Jen do, la strukturo de la participo estas I-O-A. (K.)

⁵⁶⁾ Vd. miajn notojn 13. kaj 14. en la antaŭa numero. (K.)

⁵⁷⁾ Mi kredas, ke tiu montrado ne sukcesis. (K.)

pri la senco de kunmetaĵoj, kiel *beleco*, *belajo*, kiujn ili ne volas traduki per *bela eco* kaj *bela aĵo*, ĉar tia traduko kontraŭstaras al la supredirita principo. Ili ankaŭ ne volas konstati, ke la algluo de *-ec* kaj *-aj*, same efektiviĝas post ĉaspe'aj radikoj. Ekz.: *infoneco*, *infanaĵo*; *beleco*, *velaĵo*; *tolereco*, *toleraĵo*; *nuneco*, *nunaĵo*; *antaŭeco*, *antaŭaĵo*; *kromececo*, *kromaĵo*, k. c.

Ni difinu ĝuste la diferencon inter ambaŭ sufiksoj. Por tio ni elektu adjektivan radikon, kiel *bel'*, kaj precize montru unue la distingon inter *belo* kaj *beleco*. Gramatike konsideritaj la substantivoj, kiel *belo* ne estas abstraktaĵoj, sed genraj: ili ne prezentas observeblajn realaĵojn, sed konceptojn, ideajn estaĵojn, sendependajn de realeco. kaj ĉe kiuj estas efektiviĝitaj la kvalitoj esprimataj de substantivoj kiel *beleco*. *Belo*, ne estas kiel *beleco* io karakteriza kaj kvalifika, sed io substanca kaj esenca. La sola distingiga karaktero ĉe *belo* konsistas en tio, ke *belo* estas absoluta, t. e., ke ĝi montras la kvaliton sendepende de la estaĵoj ĝin havantaj. Kontraŭe *beleco* montras la kvaliton, ĉu kiam ĝi ne atingis ankoraŭ la *nec plus ultra* de la abstraktiĝo aŭ ĉu kiam ĝi estas ree malgeneraligita kaj oni igas ĝin malsupreniri de la supro de absolute por ree aplikigi al objektoj. Alivorte oni uzas *belecon*, kiam temas pri aparta persono aŭ objekto: ĝi esprimas takseblan kvaliton, kiun oni konsideras ĝis ia grado aŭ, ĉiuokaze, tiu kvalito rilate al iaj apartaj cirkonstancoj. *Belo* estas uzita en plej larĝa kaj ĝenerala senco sen rilato al objektoj, personoj aŭ cirkonstancoj, kiaj ajn ili estas. *Belo* ne povas uziĝi kun adjektivoj esprimantaj grandon, kvanton aŭ mezuron: oni povas paroli pri *granda beleco* aŭ *justeco*, sed ne pri *granda belo*, nek pri *granda justo*.

En la lingvoj havantaj neŭtran genron (germana, latina, greka k. c.) substantivoj kiel *belo* respondas al ĝi: la *belo*, do, tradukiĝas per *pulchrum* (lat.), *das Schöne* (germ.), dum *beleco* per *pulchritudo*, *die Schönheit*, k. c.

Ĉar *belo* ne rilatas al ia realaĵo, ĝi esprimas ion nesangeblan esencerestan, eternan, neduban. La *beleco*, la *justeco*, la *vereco* povas ŝanĝiĝi kaj ŝanĝiĝas laŭ la landoj, tempaĵoj k. c., dum la *belo*, *justo*, *vero* restas ĉiam senŝanĝaj. *Belo* estas absoluta, *beleco* rilata. *Belo* estas la *belo* en si mem, la vera *belo*, la *belo-tipo*, idealo, kiun la artistoj penas efektiviĝi. *Belo* ne estas *bela*, ĉar ĝi konformiĝas al *beleco*, sed kontraŭe *beleco*, estas modifo ĉe la objektoj, kiun oni devas konsideri kiel manifestiĝo aŭ apliko de la *belo*. La *belo* estas io malpreciza aŭ vasta, kio aplikiga al tio, kio estas *bela* senescepte: ĝi ne estas iu akirita ideo, sed pli ĝuste iu koncepto per kiu ni prezentas al ni iun kvaliton tia, kia ĝi devas esti, ne kia ĝi efektive estas. La *beleco* estas rilata; oni uzas ĝin parolante pri io, kio havas la gracion, la formon kaj la proporcion, kiujn postulas la modo, la moroj aŭ uzado kiam oni diras pri objekto, ke ĝi estas *bela*. Pascal skribis: »Kiel oni diras *poezion belecon*, oni devus ankaŭ diri *geometrian belecon* kaj *medicinan belecon*«. Tiel, do, povas ekzisti diversaj *belecoj*, sed nur unu *belo*.⁶¹⁾

⁶¹⁾ Cio ĉi estas tre bele esprimita, sed ĝi estas prava nur pri la ideoj »la *belo*« kaj »*beleco*«, sed tute ne pri la element-kompleksoj »*bel-o*« kaj »*bel-ec-o*«.

Nome, *bel-o* nur tiaokaze signifas tiun genran ideon, pri kiu la aŭtoro parolas, se oni *donas al ĝi* tiun signifon. Sed tiu signifo ne sekvas *nepre* el la senco de ĝiaj elementoj.

Bel-o konsistas el la adjektiva radikoj *bel* kaj el la *o*-finaĵo. Estas evidente, ke la *o*-finaĵo, per la simpla-substantivigo de *bel*, povas signifi same la kvaliton *bel* (*bel-eco*), kiel la konkretan manifestiĝon de *bel* (*belajo*), kaj eĉ, kvankam iom aŭdace, la individuan manifestiĝon de *bel* (*belulo*). *Bel-o*, laŭ Panel, estas *resuma* formo. Ke *unuavice* ĝi esprimas tiun »genran« ideon, ties kaŭzo estas

Se ni volas nur klarigi la diferencon inter *amikeco* kaj *amikaĵo*, *afableco* kaj *afablaĵo*, *boneco* kaj *bonaĵo*, *malsateco* kaj *malsataĵo* k. c. ni konstato ke la *eco*-formoj esprimas ĉiujn tiujn kvalitojn aŭ sentojn, kiel unuo, maldiso aŭ tutaĵo, tio estas, kiel emo aŭ inklinado de nia koro senĉesa kaj sensanĝa, kiun oni sentas ĉe si ĝis ia grado, sed tute ne konsiderante la ekpuŝojn aŭ movojn, kiujn ĝi montras eksteren. Kontraŭe la *aĵo*-formoj montras tiujn kvalitojn aŭ sentojn diversaj kaj multoblaj, tio estas, per iliaj efikaĵoj, per iliaj manifestiĝoj en fenomenaj kaj malesenca flanko. La diferenco inter *-eco* kaj *-aĵo* estas la sama, kiu ekzistas inter *esto* kaj *fenomeno*!

La *korboneco*, *kompateco*, *mildeco*, *amindeco*, k. c. estas kvalitoj aŭ emoj intimaj, ĉiamrestaj, esence propraj al la karaktero de tiu, kiu ilin posedas dum *karbonaĵoj*, *kompataĵoj*, *mildaĵoj*, *amindaĵoj*, k. c. nur estas ekpuŝoj, movoj, agoj, trajtoj, manieroj, eksteraj kaj malesencaj signoj, k. c. kiuj anoncas aŭ sciigas pri la ekzisto de *korboneco*, *kompateco*, *mildeco*, *amindeco*, k. c.*)

Tiel, do, *belajo*, *bonaĵo*, *infanaĵo*, *skribaĵo*, k. c. oni povas larĝasence traduki per *io konkreta*, kiu estas *bela*, *bona*, *infana*, *skriba*, k. c. se oni tradukas tiun ĉi *ion* plej libere per trajto, ago, rezulto, movo, signo, maniero, diro, k. c. karakterizita de *beleco*, *boneco*, *infanececo*, *skribeco*, kaj ceteraj.

Tiel, do, kiam P. G. prezentas (paĝ. 78-a) la ekzemplojn: *la beloj de l' regiono min ravis kaj ŝia belo estas eksterordinara*, ĝi ne scias distingi la diferencon inter *belo*, *beleco*, kaj *belajo*. La ĝusteco de la esprimado nepre postulas diri: *la belajoj* de la regiono kaj *ŝia beleco*. *Belo* ne povas plurale uziĝi; *belo* anstataŭ *beleco* estas evitinda.

La esprimo de D-ro Zamenhof »*Mia belo estis juna dano*« ne estas decida, ĉar ĝi apartenas al versaĵo: eble plej indulte oni povas permesi, ke fianĉino ekstrete trograndiĝante sian ŝaton al la amato, diru pri li: *mia belo*, *li estas por mi la belo mem*, ĉar ŝia koro, blindigite de amo, levas la amaton al plej ideala supro; sed plej kredible la esprimo »*mia belo*« en *Hamleto* estas nur ŝuldata al tio, ke la aŭtoro serĉis rimon por *ĉapelo*!

Ankaŭ oni ne povas akcepti, ĉar ili estas malpravaj, tiujn subtilaĵojn, kiujn P. G. prezentas (paĝo 70-a) »La aŭtomato estas sprita aĵo, sed ne spritaĵo«, »Liajn bonaĵojn mi rekomencis per bonaj aĵoj«, (paĝo 73-a): »Analizo per adjektivigo de flankelemento estus erara. *Boneco* ne estas *bona eco*. La unua signifas: *bono kiel kvalito*: la dua *unu bona kvalito*. La diferencon evidentigas la jena ekzemplo: *Li havas multajn bonajn ecojn, sed ne havas bonecon*«.

Unue, se *sprita* oni povas apliki nur al personoj, estas absurde diri, ke objekto, kiel aŭtomato, estas *sprita aĵo*.⁶²⁾ La senco de *spritaĵo* estas diro, esprimo, ago, k. c., kiu estas *sprita*, ĉar ĝi devenas de persono, kiu *sprite* diras, agas, esprimas, kaj ceteraj. Estas evidente, ke pri *ŝtono* aŭ *tablo*, k. c. oni ne povas diri, ke ili estas *spritaĵoj*, ĉar neniu akceptus la esprimojn: *sprita ŝtono*, *sprita tavolo*; due, laŭ nia opinio, *bonaĵo* povas esprimi ion simi-

nur, ke en Esp-o ne ekzistas »genriga« sufikso, dum la aliaj signifoj havas specialan sufiksoidon. Sed precipe helpate de la kunteksto, ĝi povas signifi ankaŭ tiujn ĉi ideojn, ĉar ĝia konsisto ne kontraŭdiras tion. Malpermesi tion signifus malpliigi la flekseblecon de Esperanto. (K.)

*) Tiuj ĉi konsideroj pri distingo inter *-eco* kaj *-aĵo* estas ĉerpitaj el iu nacia vortaro pri sinonimoj: ĉe unuj punktoj laŭvorte, ĉe aliaj libere.

⁶²⁾ Estas strange, ke ĉi tie la aŭtoro estas tiel severa, dum ĉe *libera tempo* li aprobis, ke *libera*, rilatanta propre al persono, estas adjektivo apud la *tempo* de tiu persono. (K.)

lan al *amikaĵo, afablaĵo*, t. e. ago, montró, signo, donaco, konsidero... per kiu ia persono kondukas bone kontraŭ ni; kaj kiu estus *bona aĵo*? Cu *aĵo* devas tie ĉi signifi ion ajn (escepte personon)? Cu tiam la senco de *-aj* estas malsama, laŭ tio se oni uzas ĝin sola (*aĵo*) aŭ en kunmetaĵo? (bonaĵo)?

Jen malhelpo, kiu venas el troretordigo de la senco kaj apliko de arbitraj, malpravaj reguloj. Laŭ nia opinio la celo de sufiksoj estas gluiĝi al radikoj por nuanci ilin per aldonita modifó. Tial, do, la uzo de sufikso, kiel aparta vorto estas malregula kaj evitinda, ĉar ĝi estas tiamaniere eltirita el sia ordinara efiko.

Ekzemple: mi trovas malprave diri: *via ado estas bona* anstataŭ *via ago* (aŭ *stato*) *estas bona*. Estas evidente, ke *-ad* laŭ la radiko al kiu ĝi algluiĝas povas havi diversajn sencojn, kaj el ĉiuj la signifo de la radiko sugestas tiun, kiun ni devas elekti: sed se oni uzas sola *ado*, kion ĝi signifos: ĉu agon, ĉu staton, ĉu daŭron aŭ ripeton de ago?

Cu estus korekte diri: *mi salutis iston*? Kion oni komprenus kiel *isto*? Cu *vendisto, faristo, eltiristo, bredisto, eldonisto*...? Ĉiujn tiujn ĉi sencojn povas havi *-ist* laŭ la radiko al kiu ĝi algluiĝas (ŝuisto, dentisto, fiŝisto, ĵibristo...). Eĉ plej ofte oni devas aldoni al la radiko mem alian, kiel *vend', far', bred', eldon'* k. c., ĉar alie oni ne komprenus la sencon. Kion do signifus sola *isto*?

En *ĝibulo, -ul* montras al ni estaĵon karakterizitan per ĝibo, ekz. viro havanta ĝibon, kaj el kiu oni nur volas montri tiun apartan distingilon: ke li havas ĝibon, nur tion, ĉio cetera estas flanken ellasita, por ke plej elstare aperu nur ĝibeco. Cu *ĝibulo* estas identa al *ĝiboviro*? Tute ne! Kion do signifus: *mi vidis ulon*? Cu *mi vidis viron*? aŭ *beston*? Cu *-ul*, kiu volas apartigi el ĉiuj viroj aŭ bestoj unu karakterizitan per io (radikoj: *ĝib', babil', honest', super* k. c.), kaj nur per tio, povas uziĝi sola? Cu do *ulo* estas viro aŭ besto karakterizita nur per tio, ke ĝi devas esti karakterizita nur per unu io, kiun ĝuste ni ne konas? **Sensencaĵo!**

Estas pli simple diri *viron* kaj ne *ulon*.

Kion ni diris pri *ado, isto, ulo*, tio taŭgas por *eco* kaj *aĵo*. Ni ne uzus solaj *econ* kaj *aĵon*: tamen, ĉar la lingvuzo faras tion, kaj pri lingvo la leĝdonisto estas la popolo aŭ publiko, ni devas respekti tian uzon.⁶³

Ni esploru pli precize la sencon de *eco*.

Se ni konsideras la esprimon *beleco*, ĝi signifas ĉion, kio estas komuna al estaĵoj aŭ objektoj belaj (ekz. al virinoj) kaj nur por plifaciligi la rezonadon ni supozos (kompreneble plej arbitre), ke ĉio komuna al virinoj belaj estas kunesto de elementoj (formo, gracio k. c.) kiujn ni signos per a, b, c: ni, do, skribos:

1-e beleco (de virinoj): kunesto de elementoj a, b, c.

Se ni same faras pri *virteco* (de virinoj) kies karakterizigo estas per aliaj elementoj: m, n, p, q, ni povos skribi:

2-e *virteco* (de virinoj): kunesto de elementoj m, n, p, q.

Sammaniere ni povas daŭrigi per *boneco, humileco, fiereco*, k. c. kaj ni ricevos plenan liston da ĉiuj eblaj *eco*-vortoj (por virinoj): 1-e beleco; 2-e *virteco*; 3-e *boneco*; 4-e *humileco*; 5-e *fiereco*, k. t. p. Cu oni volas diri al mi, kiel oni eltiras el tiu vortotabelo la sencon de *eco*? Ni jam scias, ke *eco* en *beleco* estas la kunesto de elementoj a, b, c; en *virteco* tiu de elementoj m, n, p, q, k. c. sed pri simpla *eco* kio karakterizos ĝian sencon? Cu ni diros ke *-eco* estas kvazaŭ io komuna al *beleco, virteco*, k. c. same kiel en la serio 1, 2, 3, 4, 5, ... ĉiuj elementoj estas numeroj kaj ilia ĝenerala nomo estas *numero*?

⁶³ Se la aŭtoro tamen *respektas* tiun uzadon, kiom taŭgas la tuta supra longega rezonado? (K.)

Nu, eĉ akceptante plej bonvole ĉion tion ĉi supozitan, ni diros: ke *beleco* estas *eco* 1; *virteco*, *eco* 2; *boneco*, *eco* 3 k. c. Cu oni povos rajte diri ekz. kiel pretendas la P. G., ke *virteco* estas *bona eco* aŭ *bela eco*? Ne, tute ne; ĉiuj *eco*j estas malsamaj inter si: ni ilin vice ordigis per numeroj por distingi ilin, unuj de la aliaj; tiel, do, laŭ nia interkonsentita klasigo, *beleco* estas la *eco* numero 1, tio estas la *bela*; *virteco* estas la dua, aŭ la *virta*, *boneco* la tria aŭ la *bona* k. c. *Beleco*, do, egalvaloras al *bela eco*, estas la sola *eco* karakterizita per adjektivo *bela*, tio estas la *bela*. Diri, ke *virteco* estas *bela eco* ŝajnas kontraŭdiraĵo, ĉar la *virteco* estas karakterizita per elementoj m, n, p, q, diferencaj de la a, b, c, kiuj *kunestas* nur en *beleco*. La pruvo estas, ke virino malbela povas esti *virta*: do, la elementoj, kiuj karakterizas virtan virinon (m, n, p, q), neniu rilatan havas kun tiuj de la belaj virinoj aŭ de la beleco (a, b, c)⁶⁴

Diri, do, kiel asertas P. G. (paĝ. 73.), ke *boneco* ne estas *bona eco*, estas plej malprava, ĉar ĝuste *boneco* NUR estas kaj povas esti *bona eco*, la *eco bona*.

Analizi, kiel faras P. G. (paĝ. 78-a):

belajo: belo aĵo, belo kiu estas aĵo

beleco: belo eco, belo kiu estas eco

belulo: belo ulo, belo kiu estas ulo.

estas sence, ĉar ni jam pruvis, ke *belo* ne povas esti *aĵo*, nek *eco*, nek *ulo*.⁶⁵

Tie ĉi la Aŭtoroj kontraŭdiras sian propran teorion: ili kreis la nomon *sufiksoido* por nomi »tiun parton de la sufiksoj, kiuj propre ne estas sufiksoj, ĉar ili funkcias tute same kiel la radikoj«. (Paĝ. 64-a.)

Inter la sufiksoidojn ili klasigas *-aj, -ec* kaj *-ul*. Tiel, do, la vortoj *belajo, beleco, belulo* devas analizigi: *belajo* = aĵo bela, *beleco* = eco bela, *belulo* = ulo bela, tiel same, kiel ekz. *domkonstruo* analizigas *konstruo doma* kaj ne *domo konstruo* = *domo, kiu estas konstruo*, imitante la jus cititan analizon de P. G.: *belajo* = belo aĵo, belo kiu estas aĵo k. c. Sed tiamaniere ili malobeas al sia malprava regulo: substantiva radiko substantivigas la antaŭan.⁶⁶

Mi povus montri ĉiujn malĝustajojn, kiujn oni trovas en la parto II. *Vortfarado* (paĝ. 22-a—135-a) de *Plena Gramatiko*, sed ĉar tio ĉi trolongigus mian raporton, mi devas plej rapide kritiki la ĉefajn erarojn, kiuj ankoraŭ ne estis montritaj. En paĝo 55-a oni rifuzas vortojn tiajn, kiel *vivipovo*.⁶⁷ Mi kredas, ke *vivipovo* kaj *vivopovo* havas malsamajn signifojn: *vivipovo* = povo vivi, *vivopovo* = povo de vivo.

Pri *-ist* mi kredas, ke oni ne povas akcepti la rimarkon III. (paĝ. 86-a).

Ankaŭ oni ne povas diskuti la konsiderojn pri sufikso *-io* (paĝ. 88-a), ĉar la Akademio ĝin forrifuzis.

La konsideroj pri *-ik* kaj *-it* ankaŭ estas superfluaĵ,

⁶⁴ Tiu ĉi rezonado estas vere »skolastika«. Cu ne estas ĝusta tiu ĉi teksto:

— Edzinigu tiun fraŭlinon. Si ne estas bela, sed estas tre *virta*.

— Nu, *virteco* estas bela eco, sed mia fianĉino devas havi ankaŭ belecon. (K.)

⁶⁵ Ni jam montris, ke tiu pruvo baziĝas sur konfuzo inter *ideo* kaj *vorto* (vd. mian noton 61). Cetere, ni kredas, ke nenio estas pli simpla ol nia klarigo, laŭ kiu *belo* estas resuma formo kaj la diversaj sufiksoidoj (*eco, aĵo, ulo*) servas nur por ĝia pliprecizigo. (K.)

⁶⁶ La aŭtoro ne legis aŭ forgesas, ke por substantiva flankelemento de substantivo ni fiksas tri analizojn: la rilatan (DE), la materialan (EL) kaj la apudmetan (*membro-abonanto*). (K.)

⁶⁷ Ni ne rifuzas ilin. (K.)

ĉar ili ne estas oficialaj kaj la dua pli koncernas la tek-
nikan lingvon.

La proponon pri sufikso *-ala* oni ne povas akcepti. La sperto de Ido montras kiel erare estas ĝin enkonduki.⁶⁸ Krom tio la Aŭtoroj kredas, ke ĝi nur estas prepozicio *al*, kiu oni povas uzi en kunmetado. Bedaŭrinde ili ne rimarkis, ke la prepozicioj en kunmetaĵoj staras *ĉe unua loko*, *ne ĉe la lasta*: tiel, do, *varm'ala*, *fort'ala* k. c. estas samaj absurdaĵoj,⁶⁹ kiel *fort'sena*, k. c.

Oni ne povas akcepti ankaŭ la pritrakton pri *-enda*, sufikso, kiun la L. K. ĵus forrifuzis. Ĝi estas nenecesa kaj nelogika: ĝi montras la ideon: *Kio devas esti... -ata*. Ĉu la senco aktiva ne estas samrajta?⁷⁰ Ĉu *kiu (aŭ kio) devas esti... -anta* ne devas esprimiĝi kaj por tio alia sufikso?⁷¹

Same pri *-eska*, *-iva*, *-oida*, *-oza*. La komuna lingvo tute ne bezonas ilin.

Alia ĉefa eraro: P. G. diras (paĝo 92-a) »La signifo de *igi* estas: *fari -a*, *fari ke io estu -a*. Analizo: VER. III. 2. Do, la flankelemento estas ĉiam *predikata adjektivo*.

Igi povas ligiĝi al adjektivaj, substantivaj kaj verbaj radikoj, sed la neadjektivajn radikojn ĝi adjektivigas per sia vortefiko.

Tie ĉi ni staras antaŭ tiuj famaj reguloj signitaj per VER. kaj pri kiuj ni jam longe parolis. Por montri, ke la ĵuscitita aserto ne estas certa, sufiĉas konsideri kelkajn verbajn radikojn: ekz. *komprenigi* signifas *igi kompreni*, ne *igi komprena*, *krediĝi* = *igi kredi*, ne *igi kreda*. k. c.⁷¹

Sur paĝo 95-a oni legas ekzemplojn tiel nenaturajn kiel: *li konstruigis per li domon*, *penstrigis per li bildojn*, *li legigis per li la libron*, *glutigis per li la medikamenton* k. c. Mi kredas, ke oni ne devas proponi nek rekomendi tiajn strangajn frazojn, kiam oni povas diri kaj P. G. diras antaŭe: *li igis lin konstrui domon* k. c.

Samajn rimarkojn pri sufikso *-ig*. Ekz. *soldatigi* ne signifas *igi soldata* sed *igi soldato*.⁷²

Pri la uzo de prepozicioj kiel prefiksoidoj ni jam diris antaŭe, ke la kredo, ke ili kun verbo funkcias predikat-adjektive estas plej ofte erara: ni ne montras ĉiujn malĝustajn ekzemplojn, kiuj estas multenombraj.

Sur paĝo 104-a oni asertas: »*Dis* estas tiom analoga al *for*, ke nenio motivas la malpermeson pri ĝia sammaniera memstara uzado: *la globetoj ruliĝis dis en la ĉambro*.« Ne, tute ne: oni povas diri *disruliĝis*, sed ne *ruliĝis dis*, same kiel oni povas diri: *kunveni* kaj ne *veni kun*, ĉar en Esperanto oni ne povas uzi la prepoziciojn solaj kaj tial estas necese ilin adverbigi: *ili venis kune*, *la globetoj ruliĝis dise*. Pri *for* la kazo estas malsama, ĉar *for* estas memstara adverbo, ne prepozicio.⁷³ Tial do, *li foriris* kaj *li iris for* estas same korektaj. Por uzi *for* prepozicie oni aldonas *de*: *for de la urbo*, *for de ĉi tiel*!

Sur paĝo 104-a oni skribas: *ekpafi*, *ekfulmi*. Ĉar *paf* kaj *fulm'* montras sendaŭrajn, subitajn agojn, oni ne povas diri *ekpafi*, sed *ekpafadi*.

⁶⁸ Nia »*ala*« tute ne respondas kun la sama sufikso de Ido. (K.)

⁶⁹ Absurdaj ili ne estas, maksimume nekutimaj. (K.)

⁷⁰ Se la aŭtoro tiel insiste pledas por tiu samrajteco, kial li ne postulas, pro la ekzisto de »*ebla*«, la sufiksoidon »*iva*«. *Ebla* ja estas »*kiu povas esti -ata*«, kaj *iva* estus »*kiu povas esti -anta*«. (K.)

⁷¹ Tio estas la sama. *Igi komprena* estas *igi karakterizita de kompreno*. Vd. la sekvantan noton. (K.)

⁷² Tio estas la sama: *soldata kamarado* estas: *kamarado*, *kiu estas soldato*. Ni vaste motivas en la § 150., kiel grandajn avantaĝojn havas tiu adjektiva analizo. Sed la aŭtoro ŝajne ne legis tion. (K.)

⁷³ Ankaŭ *DIS* ne estas prepozicio. (K.)

Mi ne kredas prava la aserton: ke *sidigi* havas nuancon: *trankvile* kaj *eksidi* — *rapide*.

Oni diras (paĝ. 105-a), ke *foriri* = *iri fora*; ne, tute ne, ĝi signifas: *iri for*.

Paĝ. 108-a. Oni klarigas *ĉef'* kaj *vir'* kiel prefiksoidojn; mi ne komprenas kial: ili estas simplaj radikoj: *ĉefministro* = *ĉefa ministro*, *ĉefaltaro* = *ĉefa altaro*, tute same, kiel: *bonfarto* = *bona farto*, *bonokazo* = *bona okazo*, k. c.

Paĝ. 111-a: *delonge* oni analizas: (de longo)-e; ne, tute ne: plej rekte kaj simple: *delonge* = *de longe*.

Paĝo 112-a: oni diras ke *dum* nur funkcias laŭ la c) (Cx): *dumtaga* = (dum tago)-a. Ne, tute ne: oni povas tute regule formi: *dumzorgi* = *dume zorgi*, *dumdormi* = *dume dormi*, k. c.⁷⁴

Laŭ nia opinio, la aserto (paĝ. 108-a kaj 109-a), ke prepozicio en kunmetaĵo havas 5 funkciojn estas malĝusta kaj tro komplika. Se oni funde esploras la ekzemplojn, kiujn oni prezentas analizante ĉiujn apartajn prepoziciojn, oni trovas, ke tiuj 5 malsamaj funkcioj ne ekzistas.⁷⁵

Ekz. pri *antaŭ* (paĝo 110-a) oni proponas respektive por la kazoj a), b), c) la ekzemplojn: *antaŭaranĝi* (*aranĝi antaŭe*, ĉar kio rilatiĝas al verbo estas adverbo); *antaŭi* (*esti antaŭa*): ne, tute ne: kial ne *esti antaŭe?*; *antaŭtempa* (*antaŭ(ĝusta)tempo*)-(a). Ne: el esprimo *antaŭtempo* oni eltiras simple: *antaŭtempo* (*antaŭa tempo*), kiu estas substantivo, *antaŭtempa* esploro (adjekt.), *antaŭtempe* esplori (adv.). Oni ne povas kompreni tiajn diferencojn montritajn en kazoj a), b), c). Cio nur estas malprava kaj senutila komplikeco!

Paĝ. 115-a: Por *kontraŭ* oni prezentas ekzemplojn pri la 5 kazoj: a) *kontraŭbatali*, *kontraŭrigardi*; b) *kontraŭmeti*; c) *kontraŭflue*; d) *kontraŭveneno* (oni povas uzi: *kontraŭvenene*, *kontraŭveneni*); e) *kontraŭflanke*, *kontraŭsitua*, *kontraŭpozicia*.

Se oni funde esploras tiujn ĉi ekzemplojn, oni ne trovas diferencojn inter ili: *kontraŭbatali* (*batali kontraŭ io aŭ iu*), *kontraŭmeti* (*meti kontraŭ io aŭ iu*); *kontraŭflui* (*flui kontraŭ io aŭ iu*) k. c.

Pri la ekzemploj: *kontraŭflanke*, *kontraŭsitua*, *kontraŭpozicia*, la aŭtoroj aldonas (paĝo 115-a): »*Tie ĉi kontraŭ havas lokan signifon*.« Ne, la loka signifo ne estas ĉe *kontraŭ*, sed ĉe la radikoj: *flank'*, *situ'*, *pozici'*.

Paĝ. 115-a: Oni diras: »*Krom* funkcias preskaŭ ekskluzive kiel vera prefikso.«

Ĉu *kromnomi* ne signifas *krome nomi*, ĉu *kromkalkuli* ne *krome kalkuli* k. c., tute same, kiel *kunnomi* = *nomi kune*, *kunkalkuli* = *kalkuli kune* k. c.?

Mi ne komprenas tiajn subtilajn diferencojn, kiuj nur ekzistas en la imago de la aŭtoroj. Ĉu ili ne konstatas, ke ĉiuj prepozicioj same funkcias, kaj ke tiuj diferencaj kazoj kaj reguloj, nur estas arbitre starigitaj, kaj tial unuj

⁷⁴ Kiu uzis iam tiujn formojn? (K.)

⁷⁵ Facile estas pruvi, ke ili ekzistas:

a) En *interparoli* la prefiksoido *inter* montras la manieron de la ago, montrante ke tiu okazas inter du personoj.

b) En *intermeti* ĝi montras la rezulton de la ago, montrante, ke io, post la ago, troviĝas inter du objektoj.

c) En *interhoma* ĝi rilatas prepozicie al la substantivo *homo* (*homoj*), ĉar la senco estas: kiu estas *inter homoj*.

d) En *interferdeko* ĝi rilatas same al la substantivo *ferdek* (*ferdekoj*), memstarigante la o-finaĵon: (*inter ferdekoj*)-o, ĉar la senco estas: (*spac*)-o *inter* (*du*) *ferdekoj*.

e) Fine en *intervojo* ĝi postulas adjektivan analizon: *intera vojo* (*vojo inter du regionoj*). Tie ĉi ĝi estas *vera prefikso*.

Ĉu tiuj kvin funkcioj ne estas sufiĉe diferencaj por esti pritrakitaj? (K.)

prepozicioj obeas ilin kaj aliaj ne? Ĉu tio ne sugestias al ili, ke tiuj principoj estas falsaj?⁷⁶⁾

Sur la paĝo 108-a oni legas: »Tial la verboj havantaj prepozician prefiksoidon de predikata adjektiva signifo, estas rigardeblaj kiel esprimantaj finitan, do, rilate, antaŭtempan agon. En tempaj subprepozicioj ilia simpla preterito povas signifi antaŭtempecon: »*Kiam oni alportis la bieron, li verŝis al si* (Z.)« Mi ne konsentas kun tia opinio: en la citita frazo la antaŭtempecon montras la kombino *kiam...-is*. La senco estas tute sama se oni diras kun simpla verbo: *kiam oni portis* (*prezentis, liveris*) *la bieron, li verŝis al si*.⁷⁷⁾

Mi ne daŭrigos pri tiu ĉi temo, ĉar ĝi estas sufiĉe rebatita.

Pri sufikso *ifi* mi ne okupigos, ĉar ĝi ne estas oficiala, nek necesa en komuna lingvuzo.

Pri prefikso *mal-* mi devas protesti kontraŭ la propono de la Aŭtoroj de P. G. enkonduki novajn radikojn kiel: *morozo* (malafabla), *basa* (malalta), *dorsaŭ* (malantaŭ), *turpa* (malbela), *sinistra* (maldekstra) k. c.

La motivoj de tia propono estas plej malpravaj. La aŭtoroj de P. G. diras, ke la uzado de *mal* havas diversajn malavantaĝojn.

1. Kelkfoje ĝi donas tro longajn vortojn.

Oni ne komprenas, kiel ili proponas ekz. *sinistra* anstataŭ *maldekstra*, *vigili* anstataŭ *maldormi*, *humida* anstataŭ *malseka*, *obstaklo* anstataŭ *malhelpo* k. c. ĉar ili estas samlongaj.⁷⁸⁾ Krom tio *malhelpo* ekz. sonas pli bele ol *obstaklo*: al tio, oni povas aldoni, ke pro sama kaŭzo ni devus eljeti radikojn, kiel *melankoli'*, *filozof'*, *astro-nomi'* k. c., kiuj estas internaciaj, kaj ĉiuj lingvoj plej plaĉe uzas ilin malgraŭ ilia longeco. Guste la riĉeco kaj diverseco de elementoj devas postuli por perfekta lingvo, ke ĝi enhavu ĉiaspecajn elementojn (mallongajn: *bel'*, *kur'*, *kon'* k. c.; mezlongajn: *akir'*, *donac'*, *muzik'*, k. c. kaj longajn: *filozofi'*, *melankoli'*, *arbitraci'*, *apelaci'*, *parlament'*, *advokat'*, k. c.) Do, se iu mal-vorto estas longa, des pli bone, ĝi helpas restarigi ekvilibron kontraŭ tiom da unusilabaj radikoj: *sat'*, *ĝoj'*, *bel'*, *pen'*, *mir'*, *met'* kaj ceteraj.⁷⁹⁾

La aŭtoroj aldonas: »mal-vorto ne povas havi tian esprimvaloron, kiel radikvorto.«

Humile mi konfesas, ke mi ne komprenas kial *mal-frua* ne havas tian saman esprimvaloron ol *tarda*. Ĉu tial ni devas forjeti ĉiujn kunmetaĵojn, kiuj enhavas prefik-

⁷⁶⁾ Ne. Ke ne ĉiuj prepozicioj-prefiksoidoj havas ĉiujn eblajn funkciojn, ties kaŭzo estas nur, ke la lingvo ne bezonas tion: mankas la esprimota ideo. (K.)

⁷⁷⁾ Ne. Tiu ĉi frazo povas signifi: *dum la portado de la biero li verŝis al si*. (K.)

⁷⁸⁾ *Humida* kaj *obstaklo* estas proponitaj de Grabowski. La longeco estas nur unu el la malavantaĝoj, do se la nova radiko estas samlonga, tio evidente ne povas esti nepra kontraŭargumento. Kial ne citis la aŭtoro la vortojn: *maldiligenta*, *malrapida*, *malkuraĝa*, *malgracia* ktp. (K.)

⁷⁹⁾ Tiu ĉi argumento tute ne estas konvinka. Esperanto sendube estas »longa« lingvo, ĉar ĉiuj adjektivoj kaj verboj estas en ĝi almenaŭ dusilabaj (eĉ la helpverboj!) kaj ankaŭ la substantivoj fariĝas unusilabaj nur per apostrofado, al kiu la bonsoneco starigas sufiĉe striktajn limojn. En la tradukpoezio, se oni tradukas en la originala formo, tio estas grava malhelpo. Do ŝajnas tute ne senmotiva la klopodo mallongigi almenaŭ tie, kie estas eble, t. e. pli-multigi la unusilabajn radikojn. Per tio la proporcio de longaj kaj mallongaj vortoj tute ne ŝanĝiĝos tiom, ke la »ekvilibro« endangeriĝos. La vasta apliko de sufiksoj ja sufiĉe garantias la ekziston de trisilabaj vortoj. (K.)

sojn aŭ sufiksojn: *bofrato*, *geamikoj*, *pianisto*, *bravulo*, k. c. ĉar ili havas malriĉan esprimvaloron.⁸⁰⁾

Kaj la aŭtoroj aldonas: »en la komuna lingvo tiuj malavantaĝoj estas malpravaj sed en la poezio aldonigas ankoraŭ la neceso de rimvortoj, kiujn la uzo de *mal* evidente malpliigas«. Ni jam trafis la ĉefan celon! La uzado de *mal-* malhelpas al mallertaj poetoj⁸¹⁾, kiuj ne sukcesas trovi rimojn. Sed jen ankoraŭ erara opinio: se mi uzas *forto* kaj *malforto*, mi havas du rimojn por *porto*, *korto*, *morto*, *sorto*, *vorto*, *risorto*, k. c. sed se anstataŭ *malforto* mi uzas *feblo*, ĝi nur estas rimoj por *eblo*, *meblo*... kaj al mia menso ne venas (eble ĉar mi ne estas lerta poeto) aliaj rimvortoj: tiel, do, uzante, *malforto* ni trovas multe pli da rimoj, ol uzante *feblo*.⁸²⁾

Uzante *dorsaŭ* anstataŭ *malantaŭ*, ni devas konfesi, ke oni ne trovas rimojn: sed uzante *poste*, kiu same signifas,⁸³⁾ ni havas por rimi: *koste*, *froste*, *roste*, k. c. Tiel, do, oni pli favoras poetojn per *poste*, ol per *dorsaŭ*.

Sed ĉu la celo de lingvo internacia ne estas, ke ĝi fariĝu ilo de plejgranda amaso da homoj, por kio ĝi devas esti simpla, logika, facila, komprenebla, fleksebla, k. c. aŭ ĉu ĝi devas taŭgi ĉefe por kelkaj mirindaj poetoj, kiuj ŝatas tiajn eltorditajn kaj komplikajn esprimojn, kiuj ĝuste ĉar ili ne estas komprenitaj de la simplaj homoj, estas taksataj plej delikate kaj sublime poeziaj?²⁾

Se la aŭtoroj de P. G. kredas, ke la poezio de Esperanto nur dependas de tiaj bagatelaj demandoj, kiel la pli aŭ malpli granda nombro da malvortoj, ili eraras plej multe.

Mi esperas, ke la aŭtoroj de P. G. opinias, ke la germana lingvo estas plej taŭga kaj produktiva sublimajn versverkojn (*Faŭsto* de Goethe, *Wallenstein* de Schiller, k. c.): tamen la germana lingvo posedas milojn da vortoj, kiu komenciĝas per prefikso *un-* (pli-malpli analoga al esperanta *mal-*), ekz. *Glück*, *Unglück*; *gleich*, *ungleich*; *Art*, *Unart*; *artig*, *unartig*; *belebt*, *unbelebt*; *bemerkt*, *unbemerkt*, k. c. Ĉu Goethe, Schiller... trovis, ke tiuj un-vortoj ne havas tian esprimvaloron, kiel la vortoj sen *un-*? Ĉu la geniaj germanaj poetoj pro tia malhelpo (un-vortoj) ne trovis sufiĉajn rimojn?

Same okazas en angla lingvo, kie ekzistas ankaŭ multego da vortoj, komenciĝantaj per *un-*: ekz. *to bind* (ligi), *to unbind* (malligi), *un-certain* (mal-preciza), *un-chastity* (mal-ĉasteco), *to un-clasp* (mal-kroĉi), *to un-cover* (mal-(mal-kovri), *to un-do* (malfari)... Ĉu Milton, Shakespeare... ne povis elpensi versajn ĉefverkojn pro tia abundo de un-vortoj, ekvivalentaj al niaj mal-vortoj?

Ni pasu al franca lingvo. Kiom da *des-*vortoj ĝi havas, samspecaj, kiel niaj esperantaj mal-vortoj! Ekz. *des-serrer* = mal-streĉi, *des-accord* = mal-akordo, mal-konsento, *désabonner*(se) = mal-aboni, *dés-accoupler* = mal-parigi, *dés-accoutumer* = mal-kutimigi, *dés-approuver* = mal-aprobi, *des-celler* = mal-sigeli, *dés-espérance* = mal-esperado, k. c.

Ho malfeliĉaj poetoj: Lamartine, Racine, Victor

⁸⁰⁾ Tio estas argumentado per troigo. Kontraŭargumenti estas tre facile: ni ne proponis, eĉ ne revis proponi radik-anstataŭaĵojn por la cititaj vortoj. Ili ja estas vortoj, en kiuj la radiko konservas sian propran signifon kaj ne volas signi la malon de sia senco. Tial, kompreneble, ilia esprimvaloro estas plena. (K.)

⁸¹⁾ Estas eble, ke mi estas mallerta poeto. Tamen, montru al mi lertan poeton, kiu tradukis tiel multe kiel mi (ĉ. 25.000 versojn) kaj povis kontentigi per la oficiala vortprovizo. Se jes, mi tuj kapitulacas. (K.)

⁸²⁾ Sed se oni bezonas rimon ĝuste por »eblo«? »Ebla« ja estas tre ofte uzbla sufiksoido! (K.)

⁸³⁾ *Poste* estas adverbo, dum *malantaŭ* (*dorsaŭ*) estas prepozicio. (K.)

Hugo... kiel vi devis penegi traserĉante rimojn por viaj majstraj verkoj!⁸⁴⁾

Kion ni diris pri angla, germana, franca lingvoj, ni povas ripeti por latina, hispana, itala... eble por preskaŭ ĉiuj grandaj lingvoj.

Kredu al mi la aŭtoroj de P. G. Esperanto estas perfekta lingvo, plej taŭga por poezio. Kion devas havi Esperantistoj por verki majstrajn verkojn, nur estas tio: *subliman inspiron!* La tago, kiam ni havos Esperantiston kun la genio de iu Goethe, Milton, Racine, Lope de Vega, Dante, k. c. Esperanto naskos majstroverkojn, kiel *Faŭsto*, *Perdita paradizo*, *Atalio*, *Fuenteovejuna*, *Dia komedio*, k. c.

Ĉu pri vortoj komenciĝantaj per *mis-*, kiujn la novaj Esperantistoj tiel ŝatege kreas, ne taŭgas la samaj motivoj, kiuj konsilas forjeti mal-vortojn?

Kiel naivaj estis la ĝisnunaj profesoroj de Esperanto: ili fieris dirante en la kursoj: »Aŭskultu, sinjoroj, kaj konstatu la mirindan simplecon de Esperanto: sufiĉas al vi lerni, ke prefikso *mal-* montras la rektan kontraŭon de la ideo esprimita de la radikulo antaŭ kiu ĝi staras, por eviti al vi parkere lerni multege da vortoj, ne kiel en nia nacia lingvo, kiu estas tiel komplika«.

Nun, kontraŭe, ni fieros dirante: »Atentu, Sinjoroj, Esperanto posedas la radikriĉecon de niaj naciaj lingvoj: unu radikon por ideo *fort'*, alian por la kontraŭa ideo *febl'* k. c.

En »Fundamenta krestomatio« (paĝo 246-a) Dro. Zamenhof diras: »b) mi kreis regulojn por *vortfarado* kaj per tio ĉi mi enportis grandegan ekonomion rilate la nombron de la vortoj ellernotaj, ne sole ne deprenante per tio ĉi de la lingvo ĝian riĉecon, sed kontraŭe farante la lingvon »dank' al la eblo krei el unu vorto multajn aliajn kaj esprimi ĉiujn eblajn nuancojn de la penso- pli riĉa ol la plej riĉaj naturaj lingvoj.«

Kaj li daŭrigas sur sama paĝo: »Ekzemple. 1) La prefikso »mal« signifas rektan kontraŭaĵon de la ideo; sekve sciante la vorton »bona«, ni jam mem povas formi la vorton »malbona«, kaj la ekzistado de aparta vorto por la ideo »malbona« estas jam superflua, alta-malalta, esti-mi-malestimi, k. t. p. Sekve ellerninte unu vorton »mal«, ni jam estas liberigitaj de la lernado de grandega serio da vortoj...«

Tiaj konsideroj ne povas esti pli saĝaj, kaj tial mi kredas, ke la tendenco malaperigi la serion da mal-vortoj estas malutila kaj plej kondamninda!⁸⁵⁾

⁸⁴⁾ La ironio de ĉi tiuj tri alineoj estas malpli trafa ol la aŭtoro opinias. Nome, krom sola escepto, por neniu el la supre cititaj germanaj, anglaj kaj francaj vortoj ni proponas radikvorton novan. La sola escepto estas *unchastity*. Ne kredu tamen, ke pro tiu vorto Shakespeare estus pli malriĉa ol la Esperanta poeto, kiu rajtus uzi krom *malĉasta* ankaŭ la vorton *lasciva*. Ne, tute ne! En la angla lingvo ekzistas ja por la sama koncepto ankaŭ la vortoj *lechery*, *lasciviousness*, *libidinousness*, *lust*, *bawdry* ktp. Tre volonte la Esp-a poeto farus la kompromison, ke en Esp-o ekzistu radikvorto nur por tiuj mal-vortoj, por kiuj ekzistas tia en ĉiuj tri lingvoj (germana, franca, angla). Sed eĉ tion li ne deziras! Kaj, nur se li dezirus multe pli, oni povus rajte ironii pri la malfeliĉaj poetoj Lamartine, Victor Hugo ktp.

Ho, se Esperanto havus tiom da sinonimoj, kiom iu ajn nacia lingvo, eĉ la plej malriĉa!

Mi ne komprenas, kial oni ne komprenas min. Ni volas vortriĉon nur por la poezia lingvo. Poezio estas lukso: en ĝi ne povas regi konsideroj pri simpleco kaj facileco, aŭ almenaŭ ili estas malpli gravaj ol la brilo, pompo, esprimvaloro. Se iu legas poezion en Esperanto, li uzas la lingvon ne por praktikaj bezonoj, sed por lukso: lukso pretendas malsparon. Dante ne estas interpretebla per vortprovizo de hotelpordisto.

Estas devo de la Akademio protekti kaj defendi la spiriton de Esperanto, kiu klare vidigas ĉe la cititaj frazoj de nia Majstro, sed ne helpi al ĝia detruo.⁸⁶⁾

*

Ni devas fini tiun ĉi raporton, kiu sendube trolongigis. Ni kredas esti pruvinte, ke la vortfarado de Esperanto obeas al reguloj multe pli simplaj, ol tiuj prezentitaj en P. G. Ĉar nia intenco ne estas fari traktaton pri esperanta vortfarado, sed nur montri la ĉefajn erarojn de P. G. pri tiu ĉi interesa demando, mi ne insistas plu pri ĝi, kaj nur, pasokaze, sugestios, ke krom la gramatikaj reguloj al kiuj obeas la radikoj en kunmetigo, estas aliaj pli potencaj efikoj, kiuj venas mem el la senco de la kunmetotaj radikoj kaj de la kunteksto.

Bedaŭrinde tiaj influoj ne estas pritraktitaj kaj ili tamen estas eksterordinare rimarkindaj.

La apudesto de radikulo en kunmetaĵo povas ŝanĝi la senco de alia radikulo kaj doni al kunmetaĵo neatenditan signifon: same okazas pri kunteksto, kiu potence influas sur la senco de la apudaj vortoj.

Krom la aludoj jam antaŭe faritaj, ni nur volas citi finan ekzemplon. En kunmetaĵo *ĉevalpovo* la apudesto de *ĉeval'* al *povo* donas al la kunmetaĵo *ĉevalpovo* la senco de unuo de mehanika forto. Estas evidente, ke tia neatendita rezulto estas nur kaŭzita de la radikulo *ĉeval'*, ĉar se oni uzas alian bestan radikon, la kunmetaĵo, ekz. *elefantpovo* nur rekte signifus *povo de elefanto* aŭ *elefanta povo*, sed ne la nomon de alia unuo de forto.

Por la decido de la Akademio pri la P. G. mi petas, ke ĉiuj atente tralegu la *Antaŭparolon* de *Fundamento*. Ĝi montras plej klare, kia estas la kapablo de Lingva Komitato pri enkonduko de novaj radikoj aŭ gramatikaj reguloj.

Laŭ mia opinio la Akademio ne havas povon oficialigi la tekston de *Plena Gramatiko* (en la parto »Vortfarado«, kiun mi esploris), eĉ ĝi ne devas rekomendi la verkon al la atento de la Esperantistoj.

Sendube *Plena Gramatiko* estas grava, ampleksa (mia opinie troampleksa) verko, per kiu la Aŭtoroj montris eksterordinaran kompetentecon kaj liveris riĉan materialon por eltiri el ĝi bonegan esperantan lernolibron. Mi plej admiras kaj konfesas tian grandan valoron.

Bedaŭrinde la Aŭtoroj tiel blinde lasis sin gvidi de eraraj opinioj starigante la ĉefajn regulojn de vortfarado kaj ilin sistematigis tiel arbitre, ke la starigita konstru-

Nu, ĉar la komuna lingvo estas intence vortmalriĉa (kaj tia ĝi devas resti), oni devas krei pli riĉan lingvon por la poezio. Tio estas nur apliko de la principo »Necesoj kaj Sufiĉo«.

Oni povas diri al varboto: Esperanto estas facila lingvo, ktp. Sed, se vi volas legi en ĝi la ĉefverkojn de la mondpoezio, vi devas lerni kelkcent vortojn pli. Mi ne kredas, ke inteligenta homo tion ne trovas tute komprenebla. (K.)

⁸⁵⁾ Tute ne temas pri la malaperigo de la mal-vortoj, sed nur pri la paralela uzado de radikvortoj. Kompreneble, poeto neniam rezignas pri ekzistanta vorto, kaj ĝoje li uzas mal-vorton, se ties uzo estas pli oportuna. Cetere, nek *stulta* malaperigis la vorton *malsaĝa*, nek *kverelo* la vorton *malpaco*, kvankam ĉi tiuj radikvortoj estas jam de longe oficialaj. (K.)

⁸⁶⁾ Sed mem la Majstro uzis neologismojn anstataŭ mal-vortoj: *amara* (maldolĉa), *aŭfleti* (malĝajigi), *efemera* (maldaŭra), *kvereli* (malpaci), *stulta* (malsprita, malsaĝa), *milda* (malsovaĝa), *ŝrumpi* (malŝveli), *falsa* (malvera), *fiaski* (malsukcesi), *strikti* (malvasta), ktp. Uzi kelkajn aliajn do estas nur sekvi lian ekzemplon. Mi neniam povas kompreni, kial *stulta* estus pli rajtigita ol *trista* aŭ *pigra*. (K.)

REVUO DE REVUOJ

En la lastaj monatoj, certe unu el la plej signifaj eventoj el literatura kaj lingva vidpunkto aperis sur la paĝoj de *Aŭstria Esperantisto*, nome la letero de Zamenhof pri la neologismoj. Bedaŭrinde ĝi aperis kun rezervo de kopirajto, do mi ne povas ĝin detale konigi al nia legantaro. Mi trovas tiun rezervon iom stranga: letero de Zamenhof ja devas esti komuna trezoro de la tuta esperantistaro, oni do ne havas moralan rajton malfaciligi ĝian ekkonon al kiel eble plej vasta publiko. Do estu permesate al mi citi almenaŭ jenajn liniojn: »Sekve la estontaj uzantoj de Esperanto havas nenian novan ŝarĝon, ĉar kiu ellernis kelkajn milojn da vortoj de nia lingvo, tiu ja certe ne plendos, se li devos lerni ankoraŭ kelkajn dekojn aŭ eĉ kelkajn centojn da vortoj; en la lingvo estos farita nenia ŝanĝo aŭ rompo; neniu el la jam eldonitaj verkoj perdos sian valoron k. t. p. Kaj tamen kian grandegan gajnon ni havos! Dank' al la malmultaj novaj vortoj kaj formoj nia lingvo fariĝos multe pli eleganta, oportuna kaj flua, ĉar la malnovaj vortoj estos ja ĝuste tiuj, kiuj estas uzataj la plej ofte kaj per sia maloportuneco aŭ longeco faras la paroladon Esperantan neoportuna kaj lama.« Ĉu tio bezonas komenton?

En »*La juna vivo*« mi legis atentostreĉan rakonton titolitan »Peter Pejne«, ĝin tradukis *Vane* (videble pseŭdonimo). La stilo estas laŭdinda, sed tute ne estas laŭdinda tio, ke la nomo de la aŭtoro ne estas menciita. Nu, almenaŭ tiom estus meritinta la kompatinda verkinto!

»*Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio*« apartenas al tiuj landaj gazetoj, kiuj disponas pri sufiĉe multa loko. Sed ĉu ĉiam oni bone eluzas tiun lokon? Eble oni povus iom koncizigi la tro ampleksemajn raportegojn pri tre loksingifaj kunvenoj, grupaj okazintaĵoj kaj doni iom da loko ankaŭ por nia orfa Esp-a literaturo... La literaturo havas voĉon nur en la recenza parto, sed ankaŭ tie ĝi malkontentigas: parte la recenzoj aperas tre malfru-

inte, parte ili estas tro mallongaj. Ĉiam kun intereso mi legas la recenzojn de Hendrik Adamson, sed ili estus multe pli bonaj, se ili estus pli longaj, do pli detalaj. En Estonio estas tiel multe la literaturtalentaj samideanoj, ke estonan Esp-an gazeton oni prenas en la mano kun la sekreta espero, ke ĉiu numero malkovros novan junan stelon sur nia poezia firmamento. Kaj doloras la griza prozo de la raportoj. Eble la severkora redakcio estonte pli mildos kontraŭ la poetoj?

Dum en »*The British Esperantist*« la literaturon reprezentas tiaj artikoloj, kiaj ekzemple »Tra Germanujo kun franca esperantisto«, oni ne povas multe diri pri la angla heroldo de nia movado. Mi povas nur respiciri la iamajn jarkolektojn de »International Language«...

Kvankam havas nenian literaturan valoron, tamen al mi ŝajnas menciinda la skizeto de Alberto Pacheco, en la »*Portugala Esperantisto*«. Tiel naive ĝi admonas kontraŭ klačado, ke la ekzisto mem de tia naiveco en la nunaj tempoj efektive kortuŝas...

En »*Esperantobladet*« mi trovis kelkajn simplajn, sincerajn vortojn de la de tiam bedaŭrinde mortinta H. Bonnevie pri la Plena Gramatiko de Kalocsay—Waringhien. Jen do, la ĝentila stilo tute ne estas nekonata en la fora Skandinavio...

En la aŭgusta numero de »*La revuo orienta*« mi trovis interesajn, belajn bildojn pri japanaj naturpejzaĝoj. Bedaŭrinde la teksto de la revuo nekompreneblas. Sed la esperantan tradukon de parto el la romano Taketori—Monogatari, fare de Masami Igarasi, mi ĝoje ĝuis.

En la januara—juna numero de »*La Paco*« interesis min traduko de Rilke-poemo, fare de K. Kanamatz. Ape- ris de li ankaŭ originalaĵo, kiun volonte mi represizos ĉi tie por nia publiko, kiu versaĵne ne multe legas ĉi tiun atentindan gazeton.

Ofte en noktmeza hor',
dum izola sol',
en la mortsilent',
min penetras ĝis medol',
nigra sent'
de terur'
kurioza,

kiel tra la fend'
de la mur',
ekpenetras frosta vent'
furioza:

Ie
fie

ironie,
en mallum' kaŝite,
inside
mokride
sangavide,
kun mieno aĉa
kun la frunt' grimaca

ajo, eĉ per bonegaj materialoj, ne povas esti rekomendita por la lernado de Esperanto.

La Aŭtoroj forgesis, ke la ĉefa trajto de nia lingvo estas eksterordinara simpleco kaj ili volis fari lernolibron tiel komplikan kaj subtilan, kiel la lernolibroj de naciaj lingvoj.

Ili kredis, ke tiamaniere ili ricevas vere sciencan traktaton, sed miaopinie ili nur sennecese komplikigis kaj igis arbitra la fundan karakteron de lernolibro de Esperanto, kiu en malmultaj paĝoj povas enhavi ĉian bazan klarigon de la gramatikaj kaj vortfaraj reguloj.

Mi estas pesimista pri la rezultatoj, kiujn la »Vortfarado« de P. G. povos doni: mi kredas kontraŭe, ke ĝi ne sole ne helpos al tiuj, kiuj volas lernadi nian lingvon, sed tute kontraŭe fortimigos multajn Esperantistojn... La rezonado estas tiel subtila kaj komplika en multaj paĝoj, ke ĝi rememorigas al ni tiun malutilegan epokon, kiam ankaŭ la troelorditaj subtilaĵoj de S-ro Couturat pri reguloj de derivado kondukis al la naskigo de tiu mirinde perfekta kaj altscience logika lingvo nomita *Ido!*

Malgraŭ tia pseŭdosciencia misperfektiĝo de *Ido*, la sperto montris plej nerifuteble, ke Esperanto malgraŭ sia simpleco estas multe pli supera, ol *Ido*.⁸⁷⁾

⁸⁷⁾ Oni devas iom distingi. *Ido* faris novan derivsistemon, dum ni simple klarigas la Esperantan vortfara-

Estus bedaŭrinde, se trologikeco malbone gvidita povus konduki nin al nova terura situacio! Tial mi modeste opinias, ke la Akademio devas sin teni flanke de tiaj personaj opinioj, kiuj malgraŭ sia eksterordinara kompetenteco kaj plej bona intenco povus per siaj reformaj proponoj krei grandan danĝeron al Esperanto.

Tiel mi plej energie protestas kontraŭ la intenco forigi prefikson *mal-*, rekomendi aliajn sufiksojn *-end-*, *-io* jam forrifuzitajn de la Akademio.

Esprimante tiel malkaŝe mian lojalan priopinion mi estas plej kore ĉagrenita ne povi plej varme kaj senkondiĉe rekomendi la »Vortfaradon« de P. G., eĉ plej volonte rekonante, ke la Aŭtoroj havas unuarangan kompetentecon kaj estas kapablaj per sia talento liveri al ni perfektan traktaton, kiun eble aliafoje ili prezentos al la Esperantista Akademio.

Vicente Inglada

adon en ties ĉiuj detaloj, sen eĉ la plej malgranda ŝanĝo. Ni havas kelkajn proponetojn, sed ili estas nur aldonoj kaj la sistemo mem neniam ŝanĝiĝas, eĉ se oni malakceptas ilin. La logikeco de *Ido* rezultigis rigidecon. Niaj reguloj permesas la plej grandan flekseblecon: la saman flekseblecon, kiun montras la lingvo de la uzado. Kaj tio estas memkomprenebla, ĉar nia fiero estas, ke ni sukcesis trovi la regulojn de tiu ĉi fleksigema lingvuzo. Trovi kaj ne fari! (K.)

kun langklako ŝmaca,
min atendas morto,
malpaca
aŭdaca
senlaca
sovaĝa
malsaĝa
senaĝa

senlima
sentima
senanima...
kaj subite,
kiel fulm' rapide,
min ekkaptas ĉe la kol',
vivan rabas for
de la kor'

per ekfrap',
kaj krude
brute
glute
min ekmanĝas de la kap'
kun sangsprucoj sur la brak',
kun klak' post klak',
en sanga lag'.

En »Pola Esperantisto« presigis artikoleto de »Sen-
nomulo Esperanta«. La artikoleto interalie enhavas la
jenan frazon: »Tute fremda kaj eĉ ekstera por ĝia konscio,
praktika agado okazas tre malofte kaj nur por la »gloro«
en esperantista mondo, legu — por la artikoloj en espe-
rantaj ĵurnaloj«. Post tiu ĉi frazo la redakcio aldonas
interkrampe: »La lasta frazo ne estas komprenebla aŭ —
nur tre malfacile«. Nu, mi rapidas sciigi la afablan redak-
cion, ke mi samopiniis. Sed kial do oni aperigas tiajn?
Almenaŭ, se la redakcio estus fiksinta ian premion por
la sukcesaj solvintoj de la enigmo!

En »Flandra Esperantisto« legeblas interesaj vortoj
de Sankta Aŭgustino, kiuj certe interesos la legantojn de
Lingvo-Libro: »Pri la diverseco de la lingvoj, kiu rompas
la homan societon: Post la urbo venas la mondo, kiun ili
(la filozofoj) laŭorde metas sur la tria rango de la civila
societo, ĉar ili komencas per la familio. Nu, ĉar la mondo
estas pli vasta, ĝi ankaŭ estas plena de danĝeroj. Unue
kaj precipe, la diverseco de la lingvoj je ia maniero igas
unu homon fremda al la alia. Ĉar supoze, ke renkontiĝas
du homoj, kiuj per sama lingvo ne scipovas interparoli,
kaj ke ili estas devigataj resti kune, du mutaj bestoj, eĉ
de malsimila speco, pli facile interkonsentos ol tiuj du
vojaĝantoj, malgraŭ ĉia simileco de la homa naturo;
homo preferos la kompanion de hundo ol tiun de fremdu-
lo.« En la sama numero (septembra) ni povas legi ĉinan
rakonton tradukitan de Jos. Vandersteen.

Kun la titolo »La reveno el la libertempo« legeblas
melankolie humura skizeto en »L' Esperanto« el la plumo
de Iris. Temas pri memstara virino, solece vivanta, kiu
revenas el la ferio kaj kiu atendoplene trarigardas la poŝ-
ton alvenintan dum sia foresto, por forpeli la premon de
la soleca loĝejo. Jen kian poŝton ŝi havis: »La unua letero
estis de la Elektra oficejo kun instigo pagi la konsumitan
energion je kronoj 10:50. — La dua letero estis granda.
Litt. A. Gustaf Vasas Taxeringsdistrikto, mi legis tra la
koverto. Temis pri monsumo, per kiu oni devas pagi la
unuan duonon en Novembro kaj la alian duonon en Ap-
rilo. — La tria letero estis de la Regna Telefon-oficejo
kun la instigo, baldaŭ pagi 20 kronojn. — La kvara estis
memorigo pagi la gason en la valoro de Kronoj 3:75. —
La kvina estis de Asekur-asocio Viktoria de Berlino, ne
forgesi alsendi la premion Kronoj 8.— La poŝtkarto
estis sendita de Kiruna kun salutoj de amiko kaj mi mem
al mi mem, por malhelpi kaj mortigi la solecan senton
ĉe mia reveno al mia kara, malgranda, sola hejmo. —
Oni neniam estas sola kaj tute forgesita, ĝis kiam oni
ricevas leterojn.«

En »Esperanto Triumfonta« (numero 5.) mi legis
viglastilan raporton pri la budapeŝta postkongreso el la
plumo de Arthur Baur.

Kiu volas orellate sperti, kiel maltaŭgas la trouzita
aborta rimo en Esperanto, tiu legu en »Bulgara Espe-
rantisto« (marto—aprilo) poemon de Ljudmil Stojanov
tradukitan de Miti. Mi estas scivola, kiu kapablas ĝui tiajn
»rimparojn«!: strioj-siaj, animojn-senlime, kie-radioj,
fumojn-zumas?

Ke kelkfoje, escepte, ne tro krudaj kaj ĝuste metitaj
tiaj rimoj tamen tolereblas en Esperanta verso, tion
majstre pravas Hilda Dresen en sia Jesenin-traduko aper-
inta en la junia numero de Esperanto. Belega poemo kaj
belega traduko!

Nun permesu, ke mi raportu pri la stato de unu el
la epidemioj lingvaj, nome pri la malfeliĉa »scipovi«. Nu,
ĝi tronas fierace sur la paĝoj de ĉiu Esperanta gazeto kaj
la kompatinda »scii« preskaŭ jam mortis pro ĝi. *Literatura*
Mondo anoncas premion por tiu, kiu sendas al la redakcio

dek frazojn, en kiuj la uzo de scipovi estas neevitebla!
Do scipovistoj, ek al laboro!

Ni ĝoje registras, ke la *Meroldo de Esperanto*, kiu
devis sin kaŝi sub Esperanto Triumfonta, reakiris sian
malnovan nomon, redaktoron, kaj — ni esperas — ĝi
reakiros ankaŭ sian amplekson. Interesa kaj atentostreĉa
legajo estas la tragika raporto pri la lastaj tempoj de la
gazeto en Germanujo, pri la »Grandioza Eraro«, kiel la
redaktoro nomas la faman malpermesan edikton.

Nia Gazeto perdis s-ron Grenkamp. Pro tio fraŭlino
M. Alice Pik nenion verkis por nia nuna numero; ŝi estas
nekonsolebla; ŝi diris, ke ŝi timas, ke ŝi tute perdis sian
rajton de ekzisto. Cetere, la gazeto estas vigla kaj mult-
flanke orientita: interesaj artikoloj popularsciencaj, espe-
rantismaj, lingvaj, bonaj recenzoj — ĉio dezirebla. Sed
nun mi volas okupiĝi nur pri artikoleto de s-ro Era. Ĝi
estas verkita okaze de la prelego de s-ro Kalocsay ĉe la
Viena Somera Universitato.

S-ro Era opinias, ke nia movado malsanas ĝuste pro
tio, ke nia literaturo tro progresas (!). Li rekonas, ke
»literaturo bezonas pli riĉan vortrezoron ol la ĉiutaga
uzado de lingvo«, sed li esprimas sian dubon pri tio: »ĉu
la literaturo estas la celo de Esperanto?« Li opinias, ke
la sola urĝa celo de Esperanto estas ĝia disvastiĝo kaj nur
post la atingo de la celo, t. e. »kiam nia lingvo estos pa-
rolata sur la tuta terglobo« oni rajtos fari literaturon en
Esperanto. Ĝis tiam, laŭ la opinio de s-ro Era, la litera-
turo, kiu portas kun si riĉigon de la vortaro kaj pli riĉan
ellaboron de la gramatiko, povas nur malutili al la propa-
gando de la lingvo. Konklude, s-ro Era diras, ke la talen-
taj literaturistoj, kune kun Kalocsay, pli utilis al Espe-
ranto, se anstataŭ verki por la esperantistoj, »kiuj bezona-
nas nenion«, ili verkus nacilingvaj propagandajn arti-
kolojn.

Nu, jen vere rekta starigo de la problemo! Ties kerno
estas: ĉu en la nuna periodo la literaturo utilas al Espe-
ranto, aŭ kontraŭe. Do: ĉu ni faru jam nun literaturon,
aŭ ĝisatendu la finan triumfon de la lingvo?

Unue ni esploru, kiel okazos tiu fina triumfo? Saj-
nas al mi, ke ekzistas nur du vojoj: unue, se ia internacia
organizajo, kiu disponas pri sufiĉa aŭtoritato kaj potenco,
aŭ ia internacia organo de la registaroj, akceptas Espe-
ranton kiel devigan lingvon por internaciaj rilatoj kaj
devige instruigas ĝin en la ŝtatoj. Due: se okazos nenia
decido el supre, sed la problemon solvos mem la vivo,
t. e. la praktiko: Esperanto iom post iom disvastiĝo tiel,
ke fine ĉiu parolos ĝin.

Ni rigardu la unuan eblon: ni supozu, ke alvenis
la favora momento: la registaroj volas interkonsenti pri
la internacia helplingvo. Ĉu la situacio de Esperanto estos
tre facila? Mi dubas... La ĉefa argumento kontraŭ tiel
nomita artefarita lingvo estos ĝuste tio, ke tia lingvo ne
estas kapabla esprimi ĉiujn nuancojn de la homa sento
kaj penso. Kaj ĉu ne estos nia plej efika kontraŭargu-
mento, se ni mute sed fiere montros la imponan vicon da
tradukitaj ĉefverkoj kaj originalaj libroj, en kiuj triumfe
laŭtigas ĝuste tiu sento kaj penso?

Sed eĉ se la registaroj principe akceptos artefaritan
lingvon, tio ankoraŭ ne signifas nepre la akcepton de
Esperanto. Ekzistas ja ankaŭ aliaj lingvoprojektoj, oni
povas fari eĉ novan projekton, kaj ni devas konfesi, ke ne
estas maleble fari lingvon strukture kaj vortare same bon-
nan kiel Esperanto. Sed Esperanto havas nesupereblan
avantaĝon: *ĝi estas vaste ellaborita per sia literaturo*.
Denove nur la literaturo povos klini la pesilon favore al
Esperanto.

Ni rigardu nun la alian vojon de venko: tiun de la

TRIFOLIO

Norda intervjuo kun **Julio Baghy**, **Jean Forge** kaj **Tiberio Morariu**

I-A SCENO.

Scenejo: sveda teksurbo Boras, ĉe valo de rivereto Viskan (La Flustro...). Tempo: 1936, aŭtuno. Loko internacie fama, ĉar

1. la prezidanto de »Verda Rondo«, nia Emson, edzinigis estonan verdstelulinon;

2. la unua eksterlanda instruisto Cseh-metoda en Boras estis la fama filmforgisto Jean Forge;

3. Tiberio Morariu ĝuste nun kursas tie ĉi jam la 3-an fojon...

Tra la urbo kuras flamsimile: ĉu vi aŭdis? Kion? Ke Baghy venos! Kien? Tien ĉi! Kiam? Jaŭde vespere je la oka, en kafejo »Gardeno«.

Jam je la 7-a kaj duono plenigas la ĉambron pli ol cent samideanoj. Ĉe la piano granda, verdstela flago. Blanktuka, longa kafotablo, riĉe ŝargita de bakajetoj. Floroj.

Telegramo: »Malfruis kontakton en Alvesta. Alvenos post la deka. Baghy.« Konfuziĝo. Nervaj aranĝantoj:

»Kie estas Baghy, Baghy,
Sen li ni ne povas agi!«...

Samindianaro soifegas. Kafon kaj — eksterlandanon. Sava ideo: ĉu vi aŭdis, ke Forge feriumas en Boras. Ĉu vere? Aŭtomobilo. Post 10 minutoj jen vikle interdiskutas svedaj samideanoj: ĉu la malvarmaj okulvitroj de Fethke maskas brunan aŭ nigran okulparon. Sed la belulinoj samopiniis pri lia eta, kisloga liphararo... Kaj fluaĉe dolĉa Esperanto:

— Kiel juna gimnaziano mi konatiĝis kun nia lingvo. Miajn fratinojn samtempe infektis la verda bakterio. La severan aspekton de la patra, kuracista hejmo baldaŭ ŝanĝis esperantista manpresejo. Amasproduktoj por la junularo: kio estas Esperanto? Kiel lerni mondlingvon dum semajno? La solvo de la mondlingva problemo... Rapida kontakto al eksterlando: baldaŭ ni interrilatis kun alilandaj »presejoj« verdaj. Plej profitan interŝanĝon ni havis kun la Esperanto-Centro Rumana. De Bukureŝto

iom-post-ioma disvastiĝo, do venkon per la Esperante parolantaj amasoj. Nu, kiom da tiaj homoj ni trovas, kiuj lernas Esperanton nur pro la nura ideo mem? La plejmulto demandas pri la jam ekzistantaj praktikaj utiloj, kaj ne kontentiĝas per gigantaj ebloj de nebula estonto, kiun li eble eĉ ne ĝisvivos. Kolektado de plej diversaj objektoj, korespondado kun poŝtmarko bildflanke aŭ partopreno en kongresaj amuzadoj, ĉio ĉi nekontesteble enhavas ja iom da altira forto, sed tamen ne povas daŭre kateni homojn, kiuj disponas pri inteligento kaj aspiro al kulturo... Tiaj homoj volas uzi la internacian lingvon por ekkoni fremdajn animojn, landojn, kulturojn. Kaj kio ja estas pli taŭga vojo por tio, ol la studado de la fremda literaturo, en kiu ja respuguliĝas la karaktero de la respektiva popolo? Jen, ree la literaturo donas, jam ĉe la nuna disvastiĝo de Esperanto tre seriozan spiritan donacon al la lingvoscianto, kaj krome la eblon, uzi tiun lingvan instrumenton en ajna kampo intelektula do atingi per ties helpo, ke la intergenta kompreniĝo ne baziĝu sole sur komunaj filatelaj interesoj.

La esperantistoj »bezonas nenion! Ĉu vere? Ĉu ili, fariginte esperantistoj, estas tuj balzamitaj kaj enpakitaj en kestoj, por signifi nur unu numeron inter la konkretaj? Ho ne! Ili ja elrampas el la kestoj kaj impertinente forvagas. La problemoj estas ĝuste, kiel konservi ilin, kiel doni al ili pretendojn kaj kiel kontentigi tiujn. Pli ol varbadon, ni bezonas retenon; pli ol eksteran, ni bezonas

preskaŭ ĉiusemajne venis novaj produktoj signitaj jen de Andreo Cseh, jen de T. Morariu.

— Ni ellaboris batalplanon. La doktoran akceptejon ni aranĝis kiel konstantan ekspozicion. Kiam la »viktimo« enpaŝis, unu el la fratoj tuj alvokis ĝian atenton al la cetere sufiĉe krie elmetita propaganda materialo. Post ioma prikuirado venis la dua frato kun la »genie elpensita, tamen mirinde simpla gramatiko; nur 16 reguloj; Tolstoj ellernis ĝin dum horeto.« Nun jam 99% da hezito devis iĝi fora vaporo. Por ekspedi la lastan procenton de l' dubo, venis la apogeo: fulme malfermiĝis pordo kaj enfalis la tria frato, kun paperfolio enmane. Severiga brovmovo. Superece pika rigardo. Solena voĉo: »Sinjoro, rigardu, rigardu! Leterfolio kun la oficiala stampo de la Ligo de Nacioj en Genevo. (La laŭtleĝanto riverencis, la aŭskultanto aŭtomate sekvis lian geston.) Al la fratoj Fethke (novaj riverencoj). En Esperanto!!!« La bombo efikis. La viktimo svenis. Li ricevis glason da freŝa akvo. Kaj — ŝlosilon de la lingvo Esperanto.

— Ek al novaj bataloj! La benkoj de la gimnazio baldaŭ malaperis sub verda flugfolia maro... Kurso. Miaj kolegoj iĝis lernantoj. Sed ne nur la kolegoj. Ankaŭ la profesoroj. Eĉ la rektoro. Kun kruda venĝemo mi donis malbonan noton en Esp-o al mia profesoro de historio (mi preskaŭ diris: historio, ja estis vera historio tiom turmenti niajn junajn animojn per ĉiama demandado pri datoj kaj lokoj... Sed mi venĝis min per primoko de l' historio en »Saltego...«).

— Korespondada febro. Grandkalibre. Komence mi havis nur 30 korespondantinojn. Sed la grupo kreskis lavange. Mi devigis presigi miajn amleterojn. Kia sieĝo en Vieno (1924)! Mi apenaŭ havis tempon persone interkonigi kun samideanoj Baghy kaj Morariu. Ho, samindianoj! Feliĉe okazis aro da fakkunsidoj. Kaj oficiale mi ĉiam »fakkunsidis« (en parko aŭ arbareto, kor-ĉe-kore, sed tion ne skribu en gazeto!). Aplauĉoj. Mi kaptas la parolinton. Fulmintervjuo:

— Ĉu vi ĉe UFA, en Berlino?

internan propagandon: edukon, pliperfektigon, eblojn uzi la lingvon! Kaj kio estas pli nobla uzo, ol la lego de valora literaturo?

Ni vidis, kiel utilas la literaturo. Nun ni vidu, ĉu ĝi povas malutili. Ĉu estas eble, ke la movado malbonfartas ĝuste pro la literaturo? Oni argumentas per tio, ke la literaturo bezonas pli riĉan lingvon, sed tiu pli riĉa lingvo estas pli malfacila, do malhelpas la propagandon. Sed tiu ĉi argumento estas tre-tre malforta... Unue: la novaj vortoj troviĝas en literaturaĵoj; kiu ne deziras legi literaturon, tiu ne devas ilin lerni. Eĉ se aperus miloj da volumegoj jare, tamen oni povus trankvile bildflanki kaj kongresdanci, konante nur la dekonon de la oficialaj vortoj!... Do kiamaniere povus la literaturo malhelpi la propagandon? Ĉu estas pli malfacile skribi poŝtkarton pro tio, ke la Infero de Dante estas tradukita? Kaj por tiuj, kiuj volas legi literaturon, eĉ kelkcent novaj vortoj ne signifas malfaciligon: pri tio oni nur legu la vortojn de Zamenhof, cititajn en ĉi sama artikolo... Konkludo: la danĝero kaŭze de la literaturo estas nur imagita, ne reala.

Mi kredas, ke la danĝero troviĝas aliloke: en la malzorgo de la varbitoj, en la neglekto de la pluedukado, en la nesufiĉa klopodo pliintensigi la esperantistecon de la »elementaj esperantistoj«. Mallonge, en la devizo: »la esperantistoj bezonas nenion«.

Lali Blond

— Uf, uf! Ne plu. Estas vere, ke mi fondis mian filmkarieron per Esperanta stelo ĉe la fama reĝisoro Karl Grune (la pordisto ne volis enlasi, mi enŝtelis min post lia dorso, poste mi malkovris verdan stelon sur la brusto de Grune kaj la pordego de l' filmĉielo malfermiĝis al mi...). Jam de pli ol jaro mi estas en Varsovio. Film-scenigisto. Ĝi-semajne du el miaj filmoj rulas la kinoj en la pola ĉefurbo. Plenaj domoj... Oni ĵus elektis min en Lokan Kongresan Komitaton. Nova literatura verko? Preta manuskripto. Noveloj. Atendas eldoniston. Ĝis revido en Varsovio!

II-A SCENO.

10-a horo vespere. Morariu finis sian lecionon kaj alkondukas freŝan kursan taĉmenton.

»Kie parolanto Baghy
Kien li do povis vagi...«

Restu tie ĉi. Morariu parolados ĝis la alveno de Baghy.

Deka kaj duono nokte. Murmuro laŭ muro: jen Baghy. Peltego. Nur la naz' de Atanaz pintiĝas potence el la felo. Petola rideto, alliteracio: Samideanoj, senkulpigui! Mi ensidis vagonaron kun surskribo »Fran Boras« kun kredo pri ĝusteco. Post la ekiro de l' trajno mi konvinkiĝis, ke la sveda vorto »fran« ne signifas »al«, sed »de« Boras...

Morariu prologas:

Post atendaĵ' ĝis post kvina
Alvenis momento fina:
Jen vagonar' de Alvesta,
Sed ne Baghy, la festvesta

La verduloj staras, gapas
Sed poeto telegrafas:
Katastrofo en Alvesto,
Mi alvenos post la festo...

Baghy ridas rikane. Poste li mem transprenas la vorton. Kaj ni aŭdas orientan fabelon pri sultano kaj derviŝo. La derviŝo estas Baghy, la sultano: la Esperanta popolo. Alvoko: Sultano, ho ne batu la derviŝon pro ĉiam ripetataj vortoj »aĉetu librojn!«, sed forprenu la ŝarĝon de liaj ŝultroj, pardonu: el miaj kofroj: aĉetu Esperantajn literaturajojn...

Cu Esperanto estas artefarita? Ĝi ja konsistas el naciaj, t. n. vivantaj lingvoj. Vivantaj lingvojn kreis la vivo. Unue estis mimiko, ploro, rido, gestoj. La plej unuaj ekkrioj konsistis el nuraj vokaloj. Nur poste aldoniĝis la konsonantoj. La vortgrupo komencanta kun litero »t« signifis terajn, malsupraĵajn aĵojn, ekzemple: tero, tavolo, tombo, tirano, timo, teruro; tiuj kun »s« pli altajn: suno, spirito, sankta, solena, serena. »K«-n ni renkontas ĉe hejmaj bestoj: kato, koko, kuniklo. »l«-n ĉe sovaĝaj bestoj: leporo, lupino, leopardo. Komence nur infana balbuto. In-fano. La latina »in« ja signifas »mal-« aŭ »ne«. In-fano = neparolanta ano de »fam-ilio«. Lingvoj vivantaj pentras historian evoluon. Kaj malkaŝas al ni, ke la unuaj vortoj estis unusilabaj, ekz. en hungara lingvo: *föld* (ter'), *fű* (herb'), *füst* (fum'). Poste venis dusilabaj: *gyomor* (stomak'). Homaro konsistis el rasoj. Rasoj el popoloj. Popoloj el homoj. Homoj parolas diversmaniere ĉe montoj kaj valoj. Laŭprofesia dividiĝo: terkulturistoj, fiŝkaptistoj ktp. Disfalo en dialektojn. Esp-o kreiĝis el hindoeŭropaj lingvoj. El ok lingvoj kaj kvar lingvofamilioj, t. e. la antikvaj greka kaj latina, la romanaj: itala kaj franca, la germanaj germana kaj angla, kaj la slavaj rusa kaj pola, kune nuraj 970 vortradikoj kaj gramatiketo da 16 reguloj, jen kiam malmulte estis je la dispono de l' unuaj

»DU VIROJ EN BOATO POR NE PAROLI PRI LA HUNDO«

Jen titolo de libro eldonita de Lit. Mondo. Ĝi estas traduko de »Two men in a boat, to say nothing of the Dog«, de Jerome Klapka Jerome. La titolo tiel tradukita sonas strange al anglo konanta la nomon de la verko en sia lingvo. Unuarigarde la linio signifas por mi: Du viroj (kiuj estas) en boato, ne havantaj celon, aŭ intencon, paroli pri la hundo; aŭ, ne por paroli pri la hundo, du homoj (sidas) en boato.

Cu ne simple: »... kaj ankaŭ la hundo«, aŭ »kaj (ne forgesu tion!) la hundo«? Oni povus diri ankaŭ »ne esceptinte la hundon«, sed tiu, kune kune la sekvontaj Zamenhofaj formoj, ŝajnas iom riskaj, pro la eblo, ke iuj povus rigardi la nepersonecan partupon kiel rilatan al la subjekto de la ĉefpropozicio (homoj).

Zamenhof, en la Fabeloj de Andersen, vol. I, p. 55; II, 39: kaj III, 36, skribis:

»Oni povis vidi eĉ la plej malgrandan ŝnuron, ne parolante jam pri la homoj.«

»Vi ja ne pretendos, ke vi estas pli saĝa ol la kato kaj la virino, ne parolante pri mi.«

Zamenhof asertis, ke la uzo de la ablativo absoluta estas »kontraŭ la spirito de nia lingvo«. Tamen li pensis bona, uzi la supraĵn, kiuj ne malmulte diferencas de la malaprobata. Antaŭ ambaŭ supraĵn senrilataj participoj ni povas subkompreni la pronomon »oni« kio igas la formon almenaŭ tre proksima al la ablativo absoluta.

Robo.

*

Efektive, la supraĵn Z-aj formoj estas ne nur tre proksimaj, sed plene identaj al absoluta participo. Sed ĉu estus pli rekomendinde esprimi la titolon de la Jerome-libro per participo? »Tri viroj en boato, ne parolante pri la hundo«, — jen la eblo de la sama miskompreno: ili sidas tie kaj ne parolas pri la hundo. Eĉ, la miskompreno estas pli facila, ĉar pli verŝajne estas, ke oni boatas ne parolante pri la hundo, ol ke oni boatas por ne paroli pri ĝi.

Estas interese, ke Z. trovis bonegan solvon por eviti tiajn absolutajn participojn kaj absolutajn POR: infinitivon kun SE. Ekz-e: *se lin kompari kun la nuna reĝo, li estis Apolono ĉe Satiro; la foso, se preni la plej malmulte, havis almenaŭ 8 futojn da larĝeco*. Bedaŭrinde, li ne persistis ĉe tiu ĉi oportuna kaj neniam dubsenca solvo, eble ĉar li ne estis imitata. Sed ankoraŭ ne estas malfrue imiti lin. Jen: *Tri viroj en boato, se ne paroli pri la hundo* — perfekte unusenca frazo!

Mi konsilas do uzi ĉiam anstataŭ la absoluta participo aŭ absoluta POR ĉi tiun turnon: *se tiel diri...; se paroli sincere...; se ne paroli pri...; se konsideri, ke...; se ne konsideri ke...*

(y)

esp. verkistoj!.. Ne en la lingvo vivas la nacio, sed en sia spirito! Se al svedaj gepatroj elmigrantaj al Botokudujo, naskiĝos infano, ĝi baldaŭ ekparolos botokude. Ni, esperantistoj, havas spiritan fundamenton en la sento de kompreno intergenta. Ekkoni, ami, respekti unu la alian per Esperanto. La batalemo de l' homo estas direktebla. Ni klopodu akceli ĝin kontraŭ malamo, malico, mordanta: la radikojn de l' homa solidareco...

Kaj nun ekdeklamas l' alaŭdo de Siberio. Laŭdoj, aplaŭdoj ne ĉesas. Ni miras pri miraklo. Ni ne nur aŭskultas, sed kunvivas. Silente suferas dum milito. Obstine opozicias.

»Grasventraj ratoj nestas kaj festas en la kelo,
Ho, ve, la haveno en svenocesa teno atendas senplende en deliro
Ho, ve, la haveno en ondotoŝnondronas, ĝin toŝnombro
ombrumas, ftiza spiro...»

Revas, revolucias. La mar' furiozas... Refalas en revojn. Milda melodio de lulkanto lulas nin. Kaj korusas ĝis larmoj: »baju, baju, bajuŝki,

dormu por eterne vi...»

Ni forviŝas la larmojn kaj petas:

»Baghy, Baghy, Baghy, vi,
Restu ĉiam tie ĉi!«

Noktomezo pasis. La eĝestro devigas nin forlasi la kunvenejon. Sed la popolo ne foriĝas antaŭ firma promeso de sia profeto: ĝis revido dimanĉe vespere (la poeto devis cedi al insista peto: reveni al Boras dimanĉe nokte, post parolado en Ulricehamn). Surstrate mi kaptas la verdan vagabondon:

— De kie vi venas?

— De Budapeŝto, tra Polujo, Latvujo, Estonio.

— Ĉu agrabla veturo?

— Ŝipo al Estonio en uragano. Oni elsendis flugmaŝinon por serĉi nin. Gigant-porcia ofero en maraltaron al fiŝ-dietoj, agrabla sento post malpeziga dieta gesto.

— Kien de Svedlando?

— Danlando, Nederlando, Belgujo, kaj-kaj-kaj...

— Kiam hejmen?

— Eble por novjaro, kvankam urĝus jam nun: fileto komencas gimnazion, lia patro devus kunhelpi...

— Nova romano?

— Preskaŭ preta: »Sangita Vivo«...

— Ĝis, amiko!

— Ĝis, frato!

Pala lumo de aŭtuna luno arĝente karesas nordan pinon malhel-verdan, blankŝelan senfolian betulon, ruĝberan vintrecan sorparbon. Sed en niajn korojn Baghy sortis printempon. Printempon dum aŭtuno...

Eho: la tagon poste ni legas fakkritikon de la teatra kritikisto de l' plej grava loka gazeto (en nia urbo aperas 3 taggazetoj) »Boras Tidning«: »Baghy malkaŝis dramatan talenton ekstreme malofte sperteblan eĉ ĉe bonaj profesiaj aktoroj«... Kaj por ne forgesi la prozon inter tiom da poeziaĵoj: dimanĉe Baghy vendis librojn en Ulricehamn kaj Boras kune por ĉ. 200.— svedaj kronoj. Espereble s-ro Bleier ne malkontentos.

III-A SCENO.

Post intervjuo al nia hungara poeto-aktoro kaj pola film-verkisto, la tria, rumana stelo ne povis eviti sian sorton, ankaŭ lin atingis nia intervjuo:

— Kiom feliĉa, kvankam kurioza konstelacio de steloj, komencas ni konversacion kun ko-riĉa aliteracio. Tri steloj brilas samloke.

— Kion vi opinias?

— Baghy, Forge kaj Mor...

Tiberio Morariu modeste protestas:

— Mi ne estas stelo, nur stelulo. Verdstelulo. Simpla instruisto de nia lingvo.

Ni aldonas:

— Kaj propagandisto. Kaj tradukisto de »Niĉjo Mensogulo«, »Nobela Peko« kaj »Sonorilo kaj Kanono« (kiam mi ricevis vian verkon, mi dankis pro la sonorilo kaj resendis la kanonon...). Kial silentas via literatura harpo:

kun via lasta originala melodio mi konatigis en la kristnaska numero de L. M. en 1935. Ĉu vi ne plu verkas, aŭ tradukas?

— La proza parto de la »Rumana Antologio« kuŝas preta en mia skribtablo depost ok jaroj. Sed por la poezia parto ĝis nun mi ne trovis kunlaborantojn. Eble ni sukcesos se vi atentigos per LM samideanojn Beraru, Rabinovici kaj ceterajn pri devoj de esp-aj misiistoj. Cetere, daŭrigas nia intervjuo, mi mem ne povas tiom literaturi, kiom mi dezirus, memoru la vortojn de Strindberg: »Por ellerni la arton de l' vivo, oni devas unue sperti kiom malfacilas ricevi panon komence, kaj poste vidi kiel ĝi iĝas iom post iom la ĉefaĵo de l' vivo. Oni laboras por ricevi panon kaj oni mangas sian panon, ke oni povu perlabori pli da pano!« Kredu al mi, mi havas edzinon kaj infanon kaj mi scias, kion signifas tio.

— Ĉu ĉio ĉiam cito de Strindberg?

— Jes kaj ne. Cetere cito incita, ĉu ne? Aliflanke estas dolĉe por sudlandano havi neston, almenaŭ dum festo, kie esperantista edzino kaj mondlingvon pepanta filineto bonvenigas lin post kursa migrado preskaŭ urso tra frosta Nordo...

— Nu, jen! La familiaj malfrostigiloj tiom katenas vin, ke familia flugis ĉien, sed etiĝas la via. Vi, hejmen-sidanto, jupheroo!

— Ho fendo en via ofendo, repikas replike la intervjuo. Ĉu vi ne vidas en mia mano, kara samideano,



Julio Baghy, Jean Forge kaj Tiberio Morariu en Boras

UPTON SINCLAIR: PETROLO! Romano en du volumoj (306+320 paĝoj). Tradukis: *William Bailey*. Eldonis: The Esperanto Publishing Company Ltd. London. Prezo: po 3 ŝ. 6 p. kun bindo + 6 pence por send-kostoj.

La romanon oni povas nomi iagrade tendenca: la socialista aŭtoro klopodas konvinki la leganton pri la ĝusteco de sia koncepto pri la socio. Ne estas nia tasko ekzameni, kiamaniere li sukcesis tiurilate. Tute sen politiko, ni klopodu rigardi la verkon el pure literatura vidpunkto kaj laŭ pure estetikaj kriterioj.

La unua impresio estas nepra rekono al la epika talento de l' aŭtoro. La verko estas vera romano: ĝi ĉiam tenas vigla la interesigon; la fadeno de l' fabelo neniam perdiĝas en la kelkfoje iom tro detalaj priskriboj de petrolofakaj aŭ klarigoj pri sociaj movadoj. La komenco de l' romano gvidas nin *in medias res* kaj tiun verkistan artifikon la aŭtoro eluzas majstre: ni tuj konatiĝas kun la du ĉefaj rolantoj en situacio karakteriza al ili: la petrolo magnato Ross, kun sia detri-jara filo, rapidegas per aŭtomobilo al grava negoca intertraktado. Tiu aŭto-vojaĝo lasas neforgeseblan impreson, kaj la impeto de tiu rapidego kvazaŭ neniam plu forlasas la leganton, ĝis la lasta paĝo de la libro... Vere amerikaj proporcioj turnadas nian kapon kaj malfalsan amerikan aeron spiras la paĝoj de l' verko. Jam tiu unua sceno konatigas al ni la ĉefajn karakterizajn trajtojn de la du ĉefrolantoj. La patro: triumfa »memfarita« homo, kiu el plej malalta sorto elbatalis por si sian povon kaj la respondan socian rangon; kaj kiu en tiu batalo kompreneble devis uzi ne ĉiam la plej delikatajn armilojn, sed kiun tamen ne fierigas lia triumfo kaj kiu konservas certan bonvolemon al tiuj, kiuj ne povis venki en la vivo. Hardita batalanto estas tiu ĉi maljuna Ross, kiu kun firma mano tenas la direktilon de l' aŭto kaj kun firma decidemo flugas al novaj venkoj. Tamen, la kirasita koro de tiu ĉi moderna heroo havas sian atakeblan punkton: la amon al sia filo, kiu estas la heredonto de la Ross-riĉo kaj en kiu li esperas trovi la daŭrigonton de sia laboro. Sed la filo jam estas knedita el alia materialo: li adoras sian patron kun la entuziasmo,

kun kiu tiaĝaj knaboj kutimas adori la patron rigardatan kiel heroo, li ege interesiĝas pri la laboro de l' patro, sed — kiel ĉiuj knaboj — li estas observema. Lia observemo ampleksas du trajtojn, kiuj distingas lin de la patro: unue, li estas kapabla imagi sin en la situacion, en la internon de aliaj (memoru nur la scenon, kiam li meditas pri la pensoj de sciuro vidata sur la vojo) kaj due, la ĉefa motoro de evoluo de lia pensado kaj etiko estas la serĉo de la vero. Neŝanceligebla, ne devojigebla esplorado de vero, eĉ kontraŭ lia volo, liaj interesoj kaj inklinoj. Kaj ĝuste tiu vero, aŭ tio, kion li kredas tia, disigos lin de la laboro de lia patro... Jen kiel prezentigas la ĉefaj motivoj de la romano jam en tiu ĉi bonega enkonduka sceno, kiel en la Wagner-operoj la uverturo anoncas la gvidmotivojn...

Okaze de la negoca intertraktado, al kiu tiel rapidas la petrolo magnato, ni konatiĝas en trafe konciza sceno kun lia laboro, kun la batalo por la petrolo; kaj la aŭtoro senkompatate prezentas al ni la senmaskigitan mon-avidon, kiu regas la grandajn kaj malgrandajn aventuristojn de l' vivobatalo. La juna Ross ĉe tiu sama okazo konatiĝas kun sia estonta amiko, Paul; kaj tiu konatiĝo decidige influos lian tutan vivon. Nun ni devas noti, ke tiu Paul nur ĉe tiu ĉi unua apero estas vere vivanta figuro; daŭre de la romano li multe rolas kune kun sia fratino, sed ili ambaŭ restas nur teoriaj figuroj: ili servas nur por tio, ke Bunny, la juna Ross, pere de ili konatiĝu kun la vivo de la malriĉuloj kaj poste kun la ideoj de la maldekstra movado laborista. La aŭtoro, kiu tiel feliĉe modelis la figurojn de ambaŭ Ross, maltrafis ĉe Paul: anstataŭ vivanta homo li fariis paperfiguron. Sed ke li potence scias vivi figurojn, tion pruvas, krom la du ĉefaj figuroj, tuta serio da sukcesaj epizodistoj. Ni nomu nur kelkajn: la filinon de Ross, talentan mon-elspezistinon, societan damon, iom senkoran, sed ne tute sensentanta al sia frato; la ĝojigan figuron de la avino, kiu — trafinte malfrue en la riĉon — komencas pentradi en maljuna aĝo, terure malbonajn bildojn kompreneble, sed kies boneca figuro, eĉ se el la nevidebla fono, certe influas la justo-serĉan animon de la nepo; la mondfaman, brilan kino-stelon,

verkon de Knut Hamsun. Mi preparas min por Norvegujo. Por januaro mi estas invitita al la lando de l' fjojdoj... Kaj por printempo al Varsovio.

— Al Varsovio, ĉu pro la Jubilea Kongreso?

— Kompreneble.

— Sed UEA & IEL. Kiel ili interpacigos?

— La respondo en la demando: *iel*. Se nia verdularo ne havas tiom da saĝo, ke ĝi suspendu organizajn disputojn ĉe nia 50-jara soleno, ĝi ne meritas pli da aĝo.

— Ĉu vi opinias, ke ĝi pereos?

— Ĉiu popolo meritas sian reganton, ĉiu homo forĝas sian sorton.

— Ĉu vi havas ian planon por Varsovio?

— Aron da planoj: Somera universitato; oratora fakestro: d-ro Privat; pedagogia gvidanto: pastro Cseh; historia fakestro: Lidja Zamenhof. Esperanto-universitato en la signo de Esperanto! Anonco de literatura konkurso, eble pere de LM, pri plej bona Esp-a teatraĵo simbolanta la vivon de nia Majstro (scenoj): ĉe maturekzameno kantas kolegaro: »malamikete de las nacjes kado, kado«... Zamenhof parolas en Bulonjo: »ne kunvenis rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj«, Honora Legio, kunsido sur Eiffel-turo, militsuferoj, korrompiĝo, agonio vizio: esperanto venkas! Epilogo: esp. en praktiko sursipe, en trajno, en hotelo, festvesta geedziga paro internacia kun verda stelo en butontruo. Infaneto. Familia lingvo: Esperanto. Forge kolektu ĉiujn filmojn faritajn pri antaŭaj kongre-

soj kaj dum solena malfermo ni revuece trapasu ilin, revidu sur l' ekrano... Ni...

— Sufiĉe, pardonu, mi rapidas al radioparolado de profesoro Collinder pri Esperanto.

— Ĉu universitata profesoro prelegas pri nia lingvo?

— Kompreneble, ne forgesu, ke ni estas en Svedlando.

Epilogo

(post kiam mi kaptis la Trifolion per mia kamero por la legantoj de LM):

En Svedlando, supre en la fora Nordo, en akordo loĝas homoj. Ne loĝas ilin kolonioj. Nek havaĝo de najbaro. Supre, norde, korakorde vivas fratoj, skandinavoj. En etaj, belaj, ruĝaj domoj blankfenestraj. Telefono kaj radio ĉiudome. Eĉ en malgranda vilaĝo. Kia saĝo: librobreto, ne municia reto kaptas korojn, flugigas horojn. Selma Lagerlöf, Strindberg, Karlfeldt en societo de Stellan Engholm, Kolomano Kalocsay, Julio Baghy. Ne nur en biblioteko. Vasta koro de nordano large malfermas la pardon de varma, familia nesto al rumano kaj hungaro, al polo kun firma kolo.

— Sufiĉe, vi preskaŭ diris filma kolo de nia pola reĝisoro. Ĉesu! Ke ni ne malfruu la paroladon de nia amerikano, Joroŝo. Kaj ne forgesu morgaŭ pri prelego de islandano: Thorbergur Thordarson...

kun ŝia konstanta brili-volo, sed kiu kapablas je vera pasio, je humila sindono en la granda sed malfeliĉa amo de ŝia vivo; kaj Rahel, la socialdemokratana universitatanino, la postan edzinon de la heroo, kiu tiel nelacigeble agitadas, sed kiu poste tiel virinece retenas sian edzon, kiam tiu volas iri al danĝera kunveno...

Krom la fabelo-plekto kaj karakteriza forto ni povas menciigi ankoraŭ la certmanan konstru-arton, kiu donas al la epizodoj nur tiom da speco, kiom necesas por vigligado, sed kiu neniam perdas la fadenon de la ĉeftemo; kaj la simplan rakonto-stilon, kiu tiel elaste scias redoni la parolmanierojn de la diverstvola rolantaro.

La traduko ĝenerale estas tre bona, kiel oni povas atendi de tia eminenta konanto de la Z-a lingvo, kia estas la tradukinto. Tre facile fluas la frazoj, tre agrabla kaj neniel malhelpata de komplikajoj estas la stilo: oni kredas legi originalon.

Tamen, mi devas noti kelkajn aferojn neĝustajn kaj kelkajn aferojn diskutablajn.

Unue: la tradukinto uzas preteritan tempon en frazoj, kiujn la Plena Gramatika nomas »nerekta parolo libera« (ŝ. 352). El la multaj, mi citos nur unu ekzemplon, por komprenebliĝi pri kio temas: »Kompreneble, Bunny protestis kontraŭ tio. Cu Paul efektive opiniis, ke estas eble decidi...« Ĉi tie oni devus meti »opinion« — ĉar nur la prezenco signas, ke la frazo entenas propre la proteston de Bunny.

Due: estas kelkaj superfluaĵoj -ig: *konsterniga, surpriziga* ktp. kaj aliffoje mankas la necesa -ig: *evolui* anstataŭ *evoluiĝi*. Poste: mi legas: *la rubriko etendiĝis trans la antaŭa paĝo*, kaj mi miras, ĉar se ĝi etendiĝis trans la paĝo, ĝi devis esti presita sur la aeron.

Trie: bone, mi komprenas, ke la tradukinto principe metas ĉiokaze nominativon post PO: li volas obei al la kutimo de Zamenhof malgraŭ ke oni de tiam sendube pruvis, ke la substantivo post PO devas alpreni logike tiun kazon, kiun diktas ĝia sintaksa funkcio. Sed kial li »ostentas« (pardonu la neologismon) per tio tiagrade, ke li metas tiun malfeliĉan PO preskaŭ en ĉiu paĝo, ĉu necese, ĉu ne? Mi kredas, ke en la tuta cetera Esp-a literaturo ne ekzistas tiom da PO, kiom en ĉi tiuj du volumoj. La tradukinto eble volis demonstracii, sed min li nur ĝenis.

Kvare: la tradukinto same demonstracias pri la formoj: *estas bona, ke; estas necesa, ke*... ktp. Estas eble, ke oni povas trovi pri tio kelkajn Z-ajn ekzemplojn, sed — oni devas trovi pene serĉi, dum la regulaj kaj kutimaj e-finajaj formoj estas troveblaj ĉiutage, sen serĉado. Kial do trudi esceptajn nekutimajojn? Per tio oni atingas nenion alian ol ĝenon por la lingva sento de bonaj esperantistoj. La lingvo evoluis laŭ la Z-a kaj fundamenta ekzemplo tiel kaj en tio nenion ŝanĝas, se Z. mem tre sporade ne obeis tiun kutimon. Cetere, mi dubas, ĉu troviĝas eĉ unu »estas necesa, ke...« en la tuta Z-a verkaro. La samo rilatas ankaŭ al *malkaŝemeco, nekredemeco* ktp. La nuna lingvo uzas *malkaŝemo, nekredemo*; kial do uzi arkaikajn formojn, kiam nenio motivas la arkaikecon.

Kvine kaj fine: ankoraŭ kelkaj aferoj: »tio estis la plej abomena afero, kiu povus okazi« — kial kondicionalo? La afero ja vere okazis, kaj post ĉefpropozicia superlativo en Esp-o ne sekvas subpropozicia kondicionalo, kiel en kelkaj lingvoj (vd. Plena Gramatiko, ŝ. 358; kun Z-a ekzemplo). Mi legas: *ili finos tion en malpli ol horo kaj mi scias pri unu tereno*; mi dirus: *en malpli ol unu horo kaj mi scias pri tereno*. Mi legas: »mi estas varmega« (al mi estas varmege). Kial: »ĉiujn la pordojn«? »Vi bezonas kunulinojn por enkonduki vin« — por estas superflua.

Mi trovis: »ĉirkaŭ 60 kilogramojn«. Bone, mi plene aprobas! Sed ĉu la tradukinto ne vidas, ke tute analogia estus la akuzativo ankaŭ post PO?

En iu sia artikolo la tradukinto pledas pri la observo de detaloj, ĉar tiuj faras la perfektecon. Nur por obei lin mi faris la supraĵajn detalojn rimarkojn, tute ne por malgrandigi lian meriton kaj la valoron de lia bela traduko plezure legebla.

John Atkins.

EMBA: MARIA KAJ LA GRUPO. Originala romano. Eldonis: »Literatura Mondo«, Budapeŝt, 1936. Formato: 20x13.5 cm. 172 paĝoj; prezo: broŝ. 0.72, bind. 0.95, luksa 1.30.

Nova originala Esperanta romano, kaj eĉ pri la vivo de la esperantistoj! Kiun ne interesus ĉi tiu verko? La vivo de la esperantistoj estas ja abunda tem-minejo kaj nia literaturo estas tiel malriĉa je tiaspecaj verkoj. Mi konfesas, ke ankaŭ mi mem delonge intencas verki romanon pri la speciala esperantista vivo, — sed la intenco restas intenco. Ofte mi instigas Baghy, ke li verku ian heroan romanon pri la verda mondo, aŭ tute satiran, akran, pikan, bonhumoran. Sed li ĉiam respondas evite. Lia vivo — li diras — estas nedisigebla de la Esp-a movado, ĉar li vivas ĉiam inter esperantistoj; pro tio, li vole-nevole devus en tia romano okupiĝi pri sia propra persono, do ĝi estus preskaŭ aŭtobiografia romano. Mi petis lin foje, ke li verku do sian aŭtobiografion; ja tio estas nun en modo kaj li vere havas skribindajn rememorojn.

— Kara mia — li respondis — bedaŭrinde, mi ne povas verki aŭtobiografion, ĉar mi travivis tiel multe, ke tio sufiĉus por ses. Kaj mia vivo estis tiel varia kaj aventura, ke ĝi — se mi skribus ĝin sincere — certe ŝokus la estimatan publikon kaj precipe miajn karajn amikojn kaj konatojn. Ĝi estus vere verda donkilotajo — li aldonis kun aluda rideto.

Sed ni reiru al »Maria kaj la grupo«.

La kadro de la romano ne estas vasta. Temas pri la vivo de esperantista grupo, kien Petro Baka, la naivulo, foje hazarde eniris. La naiva homo volis lerni Esperante kaj trovis en la grupo dancantan publikon, kiun interesis ĉio krom Esperanto. Sed li ne perdas la kuraĝon, daŭrigas sian ekspedician esploron, kaj fine efektive sukcesas trovi ankaŭ verajn esperantistojn en Esp-a grupo! Maria — kaj la grupo. Granda kontrasto! Maria estas la animo de la grupo, pulmmalsana, palvizaĝa kudristino, kiu pro sia malsano kaj ne bela eksteraĵo devas vivi izolite, sen amo, sen junaj amuzadoj, por la grupo oferas sian kaŝitan vivon kaj vere kun patrina prizorgo arangas ĉion. Si estas la ĉefheroino de ĉi tiu romaneto. Si estas mem la enkorpiĝinta bono, sinofero, helpemo, ĉar la ama pluso devas iel manifestiĝi, — la grupo estas la areno, kie intrigoj, kalumnioj, personaj ambicioj, privataj interesoj, virinrivaladoj ktp. interluktas, kie eĉ la malnovaj esp-istoj estas nur idealaj naivuloj, kiujn superruzas kaj por siaj privataj profitoj eluzas kelkaj egoistaj ruzuloj. Ni vidas la eternan batalon inter kvanto kaj kvalito, inter la bonaj esp-istoj, kiuj faras seriozan porlingvan movadon, kaj inter la granda plimulto, kiuj venas nur por distriĝi, amuziĝi, kiuj faras poramuzan movadon. Temas pri eterna gazeteldono kaj pri kasisto, kiu forkuras kun la mono de la grupo.

Jen, ne tre ideala Esp-a grupo, ĉu ne?

Kion volis la aŭtoro?

Cu li volis montri spegulon al la estimataj samideanoj: jen, vidu, tiaj vi estas, jen vidu, kion vi faris el la bela ideo de Zamenhof? Cu li volis montri al ni, ke eĉ tiel ideala movado, kiel la esperantista, povas esti tre aĉa kelkfoje? Cu li volis skurĝi la konsciencon de la esperantistoj?

Mi ne scias. Certe la romaneto estas pesimista kaj malhela, mankas humoro, satiro. Certe, inter la esperantistoj estas ne nur idealistoj, certe, ankaŭ inter la esperantistoj povas esti egoistoj, karieristoj, ruzuloj, klaĉadoj, envio, jaluzo — eĉ kasisto, kiu forkuras kun la grupa mono, sed, ĝenerale, mi pensas, ne tio karakterizas nian movadon.

Vere, ke ĉie, kie homoj agadas, estas vantoj, ambicioj, envio, trompo kaj trompiĝo, homaj malperfektaĵoj; kaj precipe la grupa vivo estas bona kadro, ĉar ĉi tie nepre montriĝas la karakterizaj ecoj de la grupanoj, kiuj kelkfoje vere ne estas karakteraj.

Kio pleje ravis min, estas la tre bona stilo de la romaneto. Vervaj dialogoj, trafaj esprimoj, klara, elasta stilo.

La poŝto Emba nur foje-foje montriĝas en la roman-

PREZIDENTO — PREZIDANTO

eto, kiam li priskribas per kelkaj frazoj la naturon, la mornan aŭtunan aŭ la akran vintran veteron ĉe la alveno aŭ foriro de la grupanoj. Tiuj kelkaj frazoj estas tre belaj.

La libron, pro la supremenciitaj kaŭzoj — malgraŭ ĝia tre bona kaj facila stilo, — mi apenaŭ povas rekomendi al novaj esp-istoj (ili ja povus seniluziigi pri nia afero). Sed malnovaj, do pli spertaj, pli harditaj samideanoj certe kun utilo ĝin legos.

László Halka

M. ROLLET DE L'ISLE: MALSIMPLAJ FORMOJ DE LA VERBO. Logika Esperanto. Paris, 35. rue du Sommerard, 1936. 24 paĝoj.

La verketo estas tre funda studo pri la malsimplaj verboformoj en Esp-o, pri ĉi tiu multe diskutata demando. La aŭtoro volas ĝin solvi per gramatika logiko. Liaj rezultoj estas bonaj: li ja pravas tion vaste per Z-aj ekzemploj, kiuj tute konformas al la reguloj de li fiksitaj.

Sed aliflanke, oni povas dubi pri tio, ĉu lia teorio vere estas »simpla, facila kaj nekontesteble evidenta«. Mi kredas, ke ĝi tute ne estas facile digestebla de homo ne sufiĉe sperta pri gramatiko kaj — pri matematika logiko. Mi devas konfesi, ke mi mem, kiu sufiĉe multe okupiĝis pri gramatiko kaj ankaŭ pri la aktuala demando mem, devis ne malmulte klopodi, ĝis mi povis ĝin senmanke kompreni.

Se oni serĉas la kaŭzojn de tiu malfacilo de l' teksto, oni trovas ĝin precipe en la konfuzebleco de la terminaro. Ekz-e la aŭtoro distingas *estanton* kaj *nuntempon*, *estinton* kaj *pasinton*, *estonton* kaj *venonton* kaj uzas tiujn sinonimajn parojn de terminoj en diferencaj sencoj: la unuajn el tiuj parelementoj li aplikas por la momento, pri kiu oni parolas, kaj la duajn pri la momento, en kiu oni parolas. Nu, tiuj po du vortoj estas tiel samsignifaj, ke ĉe la lego de la libro oni devas konstante refoliumi al ilia difino, por konstati, kion ili signifas. Laŭ mia opinio la momenton, pri kiu oni parolas, oni devus nomi *aktualo*; la tempo antaŭa al la aktuala povus esti nomata *antaŭaktualo*, kaj la tempo posta: *postaktualo*. Certe, *aktualo* kaj *nuntempo* ne estus tiel konfuzebaj kiel *estanto* kaj *nuntempo*.

Alia malfacilaĵo estas la stranga uzo de *momento*, per kiu la aŭtoro signas pli-malpli longan daŭron, kvankam en Esp-o ĝi signifas nur unu punkton en la tempo. Poste li diras, ke la nuntempaj participoj signas la *efektivigon* de la ago; sed *efektiviĝo* signas ja ion sendaŭran: la momenton, kiam io atingas la staton de efektivigiteco. Oni devus diri *efektiviĝado*, aŭ simple *daŭro*.

La aŭtoro distingas tri specojn de verboj: la subitajn, momentajn kaj la daŭrajn. Nu, unue, *subita* kaj *momenta* estas vortoj samsignifaj, oni do ne povas per ili distingi du diversajn specojn de verboj. Due: la aŭtoro nomas *momentaj* la agojn, kies daŭro povas esti pli-malpli longa, kaj *daŭraj* tiujn, kies daŭro povas esti pli-malpli longa, eĉ senlima. Sed tia distingo simple ne estas farebla: ĉiu ago, kies daŭro estas pli-malpli longa, povas havi ankaŭ daŭron senliman. Ekz-e: laŭ la aŭtoro *skribi* estas momenta ago; sed en la frazo: *en la latina lingvo la sonon »k« antaŭ »a« oni skribas per »c«* — la verbo *skribas* esprimas same senliman agon, kiel se oni dirus: *oni uzas la literon »c«*. La diferenco inter *skribi* kaj *uzi* aŭ *koni* estas alia: la unua havas daŭron kaj ankaŭ rezulton, dum la duaj havas nur daŭron sen posta rezulto. Se oni *ne konas* plu ion, nenio postrestas, sed se oni *ne skribas plu ion*, restas la rezulto de la antaŭa skribo: la skribaĵo. Tial la sola ĝusta divido ŝajnas tiu de Waringhien: verboj de rezulto sen daŭro (*perdi*), verboj de daŭro sen rezulto (*scii*), verboj de daŭro kaj de rezulto (*konstrui*).

La plej granda valoro de la verketo estas la klara konstato de tio, ke en la malsimplaj formoj la verbo *esti* montras per sia tempo la tempon de *stato*, dum la participaj formoj montras per sia tempo, ĉu la *ago* esprimita per la participo verbo estas dumtempa, antaŭtempa aŭ posttempa rilate al tiu stato. Ekz-e en: *la letero estas skribita* temas pri nuntempa *stato* (estas), kiun estigis *skribado* antaŭtempa al tiu *stato* (*skribita*); tiu *stato* do estas la

Mankas en Esperanto vorto por estro de respubliko. En la SAT-vortaro estas donita kiel dua signifo de prezidanto *respublikestro*. Sed tio estas tre nesufiĉe kaj maloportuna. Ni devas zorgi, ke Esperanto evoluu al idealo de lingvo artefarita, kie sinonimoj estas malofta escepto. Mi proponas, ke niaj verkantoj pli ĝeneraligu uzon de prezidanto kiel memstaran radikon. »Progreso«, »Nova Eŭropo«, »Bulteno de Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista«, uzas tiun vorton en la senco »respublikestro« sufiĉe ofte, kvankam la vortaroj ne enhavas ĝin.

En la bonega vortaro de Fulcher-Long (angla-E.) la malfacilaĵo sekvanta el la manko de radikoj prezident' estas tre videbla. La vortaro tradukas:

Presidency (Administration district) gubernio. *Presidency* (Presidentship): prezidanteco. *President*: prezidanto. *Presidential*: prezidanta.

La lasta traduko estas evidente netaŭga. Povas certe temi pri *prezidenta potenco*, *decido*, *rajto* sed prezidanta povas esti ĉu prezidento, ĉu prezidanto, dum li prezidas kunvenon. Tamen pro stranga forgeso ne distingas inter prezidento kaj prezidanto la vortaroj de Bennemann, Grosjean-Maupin, eĉ ne la ĉeĥa-E-vortaro de Filip.

Tamen la uzo de prezidento signifas nenian strangan aĵon en E. Ekzistas jenaj vortoj oficialaj kun pseŭdosufikso -ent-: Sergento (Fund.), studento (Fund.), studi (Fund.), agento (I. ald.), abituriento (IV. ald.), regento (IV. ald.), paciento (I. ald.), kliento (I. ald.) docento (neoficiala vorto, sed tre ofte uzata).

Krom tiuj nomoj de personoj estas oficialigitaj jenaj pseŭdosufiksaj radikoj: kvociento (II. ald.), tangento (II. ald.), inteligenta (II. ald.)

En la Plena Gramatiko de Kalocsay-Waringhien (§. 87) estas kiel pseŭdosufiksoj enlistigitaj sole: *logio*, *grafio*, *-ik-*, *-eska*. Sed *-ento* estas same grava kaj multe pli utila, ĉar ĝi enestas en dek radikoj oficialaj kaj en unu neoficiala (»docento«) tre ofte uzata. Krome jam laŭ la Fundamento estas farata distingo inter *studanto* kaj *studento*. Same utile estas povi distingi inter *prezidanto* de la Esperantista klubo en Liberec kaj inter *prezidento* de respubliko Urugvaja aŭ Usona.

Ankaŭ grava estas la fakto, ke por ĉiuj ceteraj ŝtatestroj ekzistas oficialaj nomoj. Ekzistas: Duko (Fund.), Princo (Fund.), Imperiestro (Fund.), Reĝo (Fund.), Caro (I. ald.).

Mi rekomendas tiun ĉi proponon kaj tiujn ĉi lingvajn faktojn al la konsidero de Esperanto-verkantoj kaj de la Lingvakomitatoj.

Stan. Kamaryt.

rezulto de la ago. En: *la letero esti skribata* temas pri pasinta, iama *stato* (estis), kiun estigis *skribado* samtempa kun tiu stato; tiu stato do estas la *daŭro* de la ago mem. En: *la letero estas skribota* temas pri nuntempa *stato*, kiun estigas *skribado* posttempa al tiu stato; tiu stato do estas la antaŭskribeco: la ekstera devigiteco aŭ la *intenco* de skribado. El tio sekvas, ke *-ita* signas rezulton, *-ata* signas daŭron, *-ota* signas intencan de ago, do tiuj formoj estas tiam uzataj, kiam per la verbo estas esprimenda (kaj esprimebla!) la respektiva senco. Oni do ne povas uzi *-ita* kun verboj de daŭro sen rezulto, ĉar ili ne havas rezulton; kaj oni povas uzi *-ata* ĉe verboj de rezulto sen daŭro nur ĉe ripetado, ĉar sendaŭra ago nur ripetigante povas ampleksi tempodaŭron. (La lastan konkludon faras mi kaj ne aŭtoro; ja li, kiel mi diris, ne akceptis la dividon de Waringhien).

La aŭtoro multe okupiĝas pri la demando de la

preciza aŭ nepreciza kono de l' ag-momento. Sed tiu demando, laŭ mia opinio, estas artefarita en Esp-o. Gravus nur tio, ĉu temas pri rezulto, daŭro aŭ intenco de la ago. Kaj ĝuste la implikiĝo en tiu ĉi demando kondukas la aŭtoron al la eraro, ke la *letero estas skribota* devas esti prefere esprimita per: *la letero estas skribita*. Nu, la du formoj ne estas samsignifaj: la unua esprimas la antaŭskriban staton; tion, ke el la cirkonstancoj nature sekvas la letterskribo; male, la dua certigas, ke la letero iam estos en stato de preteco. Se Petro estas la letterskribonto, Paŭlo povas diri nur: *la letero estas skribota*, ĉar li povas konstati nur la skribdevigajn cirkonstancojn, sed li ne povas certigi la skribitecon de la letero. Petro, siavice, povas uzi ambaŭ frazojn: ankaŭ li povas konstati la eksteran devigon, aŭ la internan (sian intencon), kaj krome li povas ankaŭ certigi la estontan skribitecon de la letero, ĉar tio ja dependas de li.

Bedaŭrinde, mi devas fini mian recenzon, do resume mi diras nur, ke, kvankam ne facila, kaj en kelkaj malmultaj punktoj erareta, la verketo certe estas valora el tiu vidpunkto, ke ĝi donas sciencajn rimedon de solvo por ne tute klarigita problemoj, kaj ke ĝi grave lumigas tiun problemon per la enkonduko de la termino stato. Ni large utiligis tiun akiraĵon en la dua eldono de la Plena Gramatiko, adaptante ĝin al la verbodivido de Waringhien. Niaj finaj rezultoj estas la samaj kiel tiuj de la eminenta aŭtoro, nur vojon ni elektis iom alian, por esti pli facilaj. Por la granda helpo, kiun li donis al ni per sia verketo, ankaŭ tie ĉi mi esprimas al li nian sinceran dankon.

Kalocsay

ROLLET DE L' ISLE: SKRIBADO KAJ PRONONCADO DE LA PERSONAJ KAJ LOKAJ NOMOJ. Logika Esperanto. Paris, 35. Rue du Sommerard, 1936. 24 paĝoj.

Tre interesa propono pri la solvo de nesolvebla problemo: pri la prononcado de propraj nomoj: oni skribu ĉiun fremdan nomon laŭ la origina skribo kaj prononcu laŭ la Esperanta prononco; do ekz-e *Bordeaux* estu prononcata jene: *bord-e-a-uks*.

Nemion oni povas kontraŭdiri. Estas vere, ke la skribo ofte, plej ofte estas pli internacie konata ol la prononco. La aŭtoro do estas plene prava, ĉi tiu solvo estas same bona aŭ malbona, kiel la Esp-a ortografio; do: *bordo*.

Sed neniu el la du proponoj estas efektivebla. La Esp-a ortografio faras la nomojn nerekoncblaj; la Esp-a prononco faras ilin kuriozaj. La aŭtoro mem faras rezervojn: li konsilas uzi la originan prononcon, se oni *scias* ĝin. Sed ĉu ne ĝuste tio estas la solvo, se *ĉiu scias ĝin*, ĉar oni ĝin *sciigas* en parentezo? Oni devus nur interkonsenti pri la transskribo.

Kalocsay

PETRO DEN: KIEL FARIGI KREANTO FACILE KAJ RAPIDE. Eseoĵ. Tradukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto Pioniroj. Olomouc, Riegrova 17. — CSR. 1935. Formato: 19×13.5 cm. 230-paĝa. Nur bindita, Kĉ. 26.—

Nia honorinda aŭtoro volas skribi eseoĵn. Jes! »Eseoĵn, eseoĵn, nu bone — sed pri kio? Kial ne — unufoje — pri la eseoĵ mem?« (9) Ankaŭ la vivo estas eseo, t. e. eksperimento. Eksperimento de la vivo estas kreado, ĉar: »... efektive vivas nur tiu, kiu... scias realigi la fantazon, kiu estas kreanto, kiu kreas.« (11)

Tiel prezentigas la temo de ĉi tiu libro: *kiel farigi kreanto facile kaj rapide?* Titolo sufiĉe enigma! Kio estas la penso de la aŭtoro? Kreadi? Kion? En la antaŭparolo de la Esperanta eldono la aŭtoro asertas: »Ĉi tiu malgranda libreto (230-paĝa!) klopodas iomete kaj neklare fikseti la principojn, laŭ kiuj devus esti direktata tia konscie artefarita mondo, la mondo de pura kreado nemalbonigita de kromaj interesoj, la mondo, en kiu ne ekzistus malpuraj anguloj de nekomprenejo kaj de flankaj intencoj.« (7) Kreado de artefarita mondo? Tamen plejparte oni aŭdas pri la prokreado kaj vivo seksa: favorata temo de la estiminda aŭtoro. Iu en la redaktejo demandis min, pri kia kreado temas en la libro. Demando sufiĉe senkulpa, ĉu ne?! Nu, mi devis iomete »kreadi« la temon, por ne konfesi simple, ke post la ellego mi ne havas tute certan scion pri la efektiva temo. Kaj ankaŭ nun mi ne

povas fari alie, ol simple konstati, ke nia aŭtoro simple ne fiksas la temon. Li parolas ĝenerale, aŭ pli ĝuste, iomete abstrakte. La filozofoj, scienculoj, teoriuloj ne kutimas rigardi siajn objektojn konkrete, sed pli-malpli abstrakte de la konkretaj kondiĉoj. Ankaŭ nia aŭtoro volas tre abstrakte fiksi la regulojn de la kreado, eĉ ne dirante pri kia kreado temas, aŭ al kiaj konkretaj eksperimentoj aplikigas lia teorio de kreado.

Ĉi tiu libro, laŭ la intencoj de la respektinda aŭtoro devus esti la unua lernolibro de la kreado. Nu, mi tamen nur malfacile povas konvinkigi, ke ĉi tiu unua lernolibro enkondukos komencantojn en la misterojn de la kreado. Post la serioza trastudado de la »unua lernolibro« ne nur komencantoj, sed eĉ praktikuloj apenaŭ estos tro klerigitaj pri tio.

Cetere, la libro ne havas la aspekton de lernolibro. Ĝi multe pli estas aro da eseoĵoj, interligitaj ne fikse; ĝi estas kolekto de spritaj ideoj, kiuj eble ŝoketas (kelkfoje ege) religion, politikon, sciencan, naciajn aŭ internaciajn tradiciojn, sed antaŭ ĉio la »moralulojn«. Anstataŭ eksplikadi la internan naturon de la arta kreado, la traktato versigas kun speciala inklino ĉirkaŭ la sekseco. Ofte ŝajnas, ke la aŭtoro skribas nur por havi okazon paroli pri ĝi. Sendube la verkisto estas eleganta, sprita babilulo, tre amanta tiklajn kaj piprajn aludojn, kiuj kelkfoje tuŝas eĉ transpaŝas la limojn de maldeco. Oni povus demandi: kial? Ĉu tio necesas, por ke oni fariĝu facile kaj rapide kreanto? Cetere la verko estas plena de paradoksoj, subtilaĵoj, eĉ sofismoj, religiaj, sciencaj aŭ artaj.

La libron tradukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto Pioniroj, al kiuj ni ŝuldas certe kelke da unuarangaj verkoj. Iu volis supozeble surprizi Esperantujon per libro filozofa, serioza, kiu estu tamen ĝuebla legajo por la granda publiko. Mi ne scias, ĉu ili sukcesis atingi ambaŭ celojn. Mi timas, ke ĉi tiu verko ne estos sufiĉe serioza por la scienca legantaro, kaj, pro sia abstrakteco, ne sufiĉe facila por la granda publiko.

El lingva vidpunkto la stilo de la traduko estas flua, pura kaj ĝuebla. Kelkfoje oni tamen sentas, ke la tradukintoj pene luktas kun la karakterizaĵoj de la originala verko, kiu malfaciligas la simplan klarecon de la traduko. Tiel ekzemple frazoj, kiel: »pli ĝuste dirite, mallonge dirite, pli bone dirite«, tamen ŝokas la oreilon, se ili troviĝas de paŝo al paŝo; ili ja estus bone esprimeblaj laŭ la principo de sufiĉo, per: »pli ĝuste, mallonge, pli bone«. La bela kaj bona stilo, la laŭdinda laboro de la tradukintoj ŝajnas meriti pli reprezentan verkon el la riĉa scienca literaturo ĉeĥoslovaka.

Prof. Dro Francisko Erdey

ILUSTRITA LERNOLIBRO DE ESPERANTO por praktika komenca kurso. Didakta. Verkis Delfi Dalmau Apart. 508r. Barcelona. 26 paĝoj. Prezo: 1 angla ŝilingo. 30 ekz. 1 angla funto. Kun ilustraĵoj.

La 26-paĝa lernolibro (grandformata), ilustrita metodo laŭ Berlitz, certe ne volas konkuri kun nacilingvaj lerniloj destinitaj por izoluloj: por tio ĝi estas tro malfacila, ĉar ne ĉiuj bilderoj (objektoj), numeritaj en la ilustraĵoj, trovas klarigon en la lernotekstoj. Ekz. n-ro 18 de la leciono V- k. a. Mi volas doni kelkajn korektindaĵojn: en lec. I. anstataŭ »kaŝankolora« pli bone estus instrui la veran koloron »bruna«. La bildo de la lec. II. devas nepre anstataŭigi la francan teksteron »je suis votre professeur« per tekstero esperanta: la libreto estas ja tre plaĉe eldonita, kial do ŝpari tie kie la ŝparo alportas malutilon? — En la lec. III. *superjaroj* ekz. 1924, 1928, 1932 ktp., ne devas esti nomataj: la *kvaroblaj* jaroj, ĉar ili tute ne estas »kvaroblaj«, sed unuoblaj, kiaj estas ankaŭ ĉiuj aliaj jaroj! Alie tiuj jaroj konsistis... el po 4 jaroj. — En lec. IV. la aŭtoro metas nin en la jaron 1935, sed en la sama ĉapitro ni sciigas, ke la jaro 1935 estas jam »pasinta« jaro. Ĉu verkado de la kvara leciono daŭris de 23. de junio 1935 ĝis komenco de 1936?... En leciono V. sufiĉas »okjaraj« anst. »okjaragaj«. — Anst. la kulero kaj forko *taŭgas* por manĝi, preferinde oni instruu la ĝustan »servas«, alie tiaj eraroj restas fiksitaj en la kapo de la komencanto ĝis lia malfrua vivaĝo. Ne tre ĝusta estas

ankaŭ la frazo: Cu baldaŭ estos nokte? (lec. VII.) Eble eĉ tia frazo havas ian signifon en Esperanto, sed ŝajne la aŭtoro volis nur la sencon: Cu baldaŭ estos nokto? — En lec. IX. troviĝas eta malgustaĵo logika: »punkto estas ronda«, kvazaŭ punkto povus posedi surfacon. — La leciono IX estas, strange, la plej facila el ĉiuj lecionoj, kvazaŭ la aŭtoro volus en ĝi doni ian libertempan ripozon al siaj kursanoj. — En lec. X la aŭtoro diras, ke »ni eliras el la bovino la lakton.« Cu li forgesis pri la bela Zamenhofa radiko *melk'*? Ĉiukaze, por nia lingva sento »eltiri lakton« anst. *melki* sonas tre, tre primitive. Precipe, ĉar aliaj tekstoj de la lernolibro ne estas tenataj en tia primitiva stilo.

Resume, malgraŭ la diversaj korektindaĵoj, tute bona metoda libro, sed, kiel dirite je la komenco de tiu ĉi kritiko, nur por kursoj kaj nur sub gvidado de pacienca, sperta pedagogo, scianta fruktuzi la eksperimentojn de la fama lingvoinstruisto Berlitz kaj liaj disĉiploj.

L. Dreher.

LEO BELMONT: JAK NAUCZYC SIE ESPERANTA? (Kiel eklerni Esperanton?), eld. »Język Miedzynarodowy«, Varsovio 1936, pĝ. 16. 21×15.5 cm.

Malgranda broŝuro, en kiu la aŭtoro, citante en la komenco du esperantigitajn polajn laboristajn kantojn (entute 32 liniojn), okupiĝas pollingve pri analizo gramatika kaj leksikologia de tiuj 32 linioj.

La broŝuro konsistas do el 32 preskaŭ-lecionoj.

Laŭ la antaŭparolo, la tasko de l' broŝuro estas krei siaspecan *Repetitorion*.

Nu, en certa — kaj tre limigita — grado eble ĝi respondas al tiu tasko.

Mi persone pli trovas ĝin provo, modelo, kiel prilaboradi ekzercojn el ia krestomatia. En ĉiu okazo — sufiĉe originala eldonajo.

Kiel ajn oni volus tamen difini ĉi tiun broŝuron, oni nepre devas konfesi, ke la sistemo estas perfekte prilaborita. La klarigoj tre ĝuste faritaj. Ankaŭ la sprito ne mankas, precipe en la mnemoteknikaj konsiloj.

Preso kaj eldono — tre zorgaj. Preskaŭ nenia eraro. (Sole sur pĝ. 6. linio 13. de malsupre: AR ne estas prefikso, sed sufikso, ne PRZEDrostek, sed PRZYrostek).

Unuvorte, tre utila eldonajo, kaj tre rekomendinda speciale al instruistoj kaj propagandistoj.

Edvardo Wiesinfeld, L. K.


JARLIBRO DE LA ESPERANTO-MOVADO. 1936.

Kun emocio ni prenis tiun ĉi 24-an jarlibron de UEA. Ĝi estas, kiel ĝiaj antaŭuloj, la plej praktika pruvo pri idealismo kaj solidarismo de la esperantistoj, pri la forto de la movado kaj uzebleco tutmonde de la lingvo. Kia sarkasmo, ke ĝuste nun ŝajnas, ke ĝi povos estonte nur pli malamplekse aperi, aŭ en du eldonoj por disiĝintaj asocioj, mokante la idealismon kaj solidarecon!

La jarlibro ja vere estas utila kaj necesa por la esperantisto: adresaro, raporto pri UEA en 1935 (kies prezenton postulis, ŝajne nesciante pri ĝi, kelkaj kongresanoj en Vieno), statistiko, la lastjaraj mortintoj, la listo kaj raportoj de la Akademio kaj L. K., Radio-komisiono, Muzeo, gazetara adresaro, Landaĵ Asocioj, delegita adresaro, kaj valora, necesa novaĵo: raporto resuma pri la movado en la diversaj landoj. Mankas raportoj el kelkaj landoj, mankas adresoj de faksocietoj kaj tiuj societoj, kiujn la estinta UEA ne rekonis oficiale en iuj landoj (sendemokrata, kaj ne solidara sistemo, neinda al esperantistaro!) Se oni scias, ke mankis sufiĉaj monrimedoj kaj tempo por Sro. C. C. Goldsmith pretigi la jarlibron, ni devas gratuli kaj ni rajtas atendi por 1937. pli ampleksan, pli perfektan kaj pli fruan jarlibron, kiu entenas ĉiujn seriozajn kaj idealistajn esperantistojn.

FRANCLANDO DUM PRINTEMPO. 12 paĝa foto-gravura prospekto de la Foiro de Paris 16—Majo—2. Junio 1936. — Senpage ricevebla kun afiŝoj ĉe la Foiro, 23. Rue N. D. des Victoires, Paris (2e). — Tia luksa, vere pariz-arta kajereto, kiu superas la iamajn, por mono venditajn albumetojn pri regionoj. La bildoj parte montras belajn partojn de Francujo, parte la grandiozan foiron.

KELKAJ EL LA LIBROJ APERINTAJ EN AELA-SERIO LASTJARA



Formato: 13×19 cm. 256 pĝ.
Prezo: broŝ. 0'92, bind. 1'20
dolaroj. + 10% sendkostoj.



Formato: 13×19 cm. 154 pĝ.
Prezo: broŝ. 0'60, bind. 0'86
usona dol. + 10% sendkost.



Formato: 23×15 cm. 272 pĝ.
dukolora preso sur glata papero.
Prezo: broŝ. 1'32, bind. 1'60
dolaroj. + 10% sendkost.



Formato: 13'5×20 cm. 212 pĝ.
Prezo: broŝ. 18'0, bind. 2'12
usona dol. + 10% sendkost.



Formato: 11'5×13'5 cm. 104
pĝ. Prezo: broŝ. 0'30, bind
0'50 dol. + 10% sendkost.

LJUBLJANA, ĉefurbo de Drava Banusejo, Jugoslavujo. 12 paĝa bela faldprospekto kun detala plano kolora de la vizitinda slovena urbo. Multaj fotoj, mallonga gvidilo donas valoron al la nova eldono. Kial mankas la adreso de delegito kaj esp. kunvenejo? Modela eldono por ĉiuj tiaspecaj urbprospektoj! P. B.

KLAGENFURT apud la Lago de Wörth. Karintio, Aŭstrio. 4-paĝa prospekto, Städtisches Fremdenverkehrsbüro im Rathaus, Klagenfurt. Bela kolora kovrilo, utilaj informoj pri trafik-interrilatoj, hoteloj, pensionoj.

DEBRECEN—HORTOBAGY. 24 paĝoj. 16 p. nur bildoj. Eldonis: Fremdultrafika Oficejo de Urbo Debrecen, Ferenc József-ut 26/28. Eĉ pri la ĉefurbo Budapeŝt

ne ekzistas tiel bela detala kajero, kiel pri tiu ĉi granda hungara urbo, centro de hungara kalvinana vivo. Precipe valoraj estas la multaj fotoj pri la fama stepo »Hortobágy«, kiuj jam mem indigas akiri la kajeron, kiu enhavas detalan priskribon de la urbo. Domage, ke en ĝi, simile, kiel ankaŭ en la aŭstraj kaj ĉeĥoslovakaj similaj prospektoj, tute mankas la adreso de esperantaj delegito, kunvenejoj.

DEBRECEN—HORTOBÁGY. Simila kajero, sed kun aliaj bildoj, nur 16 paĝoj, el ili 8 paĝoj kun fotoj. Eldonejo la sama.

HUNGARA GENERALA KREDITBANKO. Nova flugfolio de tiu ĉi grava hungara banko, precipe kun utilaj informoj por vizitantoj de Hungarujo. La banko estas de jaroj entr. de UEA. Adreso: Budapeŝt, V., József-tér 2—4.

AŬSTRIO. La aŭstraj federaciaj landoj kaj iliaj ĉefaj vidindaĵoj. 32 paĝoj kun geografia karto.

Eld. Oesterreichische Verkehrswerbung (Ministerio por Komercio kaj Trafiko) Wien I. Niebelungengasse 4. Vere belega prospekto, luksa papero, allogaj foto-bildoj. La kajero gvidas nin tra la bela Aŭstrio kaj donas valorajn informojn por vojaĝantoj. Akiru ĝin kaj montru. Dokumento pri praktika kaj ideala uzo de Esperanto!

KARINTIO. 16. paĝa faldprospekto. Landesamt für Fremdenverkehr in Kärnten, Klagenfurt.

Bonega prospekto kolora kun efika montarplano reliefa. Bela preso, arta eldono. Tentas tuj viziti la regionon!

KLAGENFURT. 8 paĝa prospekto. Städtisches Fremdenverkersbüro. Klagenfurt, Rathaus.

Malgranda, bone aranĝita prospekto, enhavante detalojn pri hoteloj kaj pensionoj.

WELSER VOLKSFEST (Popolfesto en Wels) 30. Aŭg.—6. Sept. 1936. Germanlingva prospekto 6 paĝa, kun programo kaj interesaj bildoj pri la festo kaj aranĝoj. Ĉe la fino kelkaj linioj en Esperanto. Alvoko al la agrikultura ekspozicio en la komerca centro de Supra-Aŭstrio.

INTERNACIA FOIRO MARSEILLE Mediteranea kaj Kolonia Merkato. Koloraj afiŝeto kaj glumarko moderna, montrante kamentubon de oceanŝipo. La foiro okazas inter 19-a sept. kaj 5-a okt. 1936. La afiŝo kaj glumarko estas ĉiujare uzeblaj. Skribu al Foire Internationale, Esperanto-Fako, 7 Quai des Belges, Marseille.

MONDFAMA KURACBANLOKO KARLSBAD, Ĉeĥoslovakujo. 16 paĝa tre bela, ilustrita prospekto pri la konata urbo, kiu staras »6 jarcentojn en la servo de la malsana homaro!« Belaj fotoj kaj bona teksto, ĝojo por la okuloj.

PER AUTOBUSO TRA AŬSTRIO KAJ WIEN. Verkis kaj eldonis Kortega Konsilisto Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstrasse 154. Aŭstrio. 80 paĝa libro kun multaj belaj fotoj gvidante nin tra la tuta bela lando. Oni povas elekti diversajn autobus-vojaĝojn por diversaj prezoj per komfortaj autobusoj. La libro servas por la veturo kiel gvidlibro kun multaj valoraj klarigoj. Simila devus aperi pri ĉiu lando en Esperanto.

OSLO DENE UKE Nr. 40. Konkursa Numero. Eld. Reisetrafikkforening for Oslo og Omegn, Egertorvet. Norveglando.

16-paĝa kajero de la turisma gazeto eldonita de la Fremdultrafika Asocio de Oslo kaj ĉirkaŭaĵo, enhavante konkurson kaj 3 interesajn artikolojn en Esperanto. Kiu volas partopreni la konkurson, publikigante tute aŭ parte la artikolojn en iu nacia gazeto, petu senpagan ekzemplaron. (Ni rekomendas, ke la gazeto favora al Esperanto konigu konstante en Esperanto ankaŭ la aliajn, ĝeneralajn tekstojn kaj informojn (adresoj, konsulejoj, muzeoj, ktp.)

WIEN. Albumo kun 106 bildoj. Eldonejo R. Lechner, Wien, I. Aŭstrio. 96 p. Havebla ĉe Esperanto Muzeo, Wien I., Neue Burg. por 5 resp. kuponoj. Formato: 24.5×16.5 cm. kartonita.

Bela albumo kun kupropresaj bildoj prezentante la plej belajn lokojn de l' estinta kongresurbo, enhavante ĉe la bildoj tekstojn en angla, germana kaj franca lingvoj, sed enkonduke ĉiuj bildoj estas klarigitaj en Esperanto. Espereble ĉe estonta eldono de tiu ĉi bela albumo — komparebla en Esperanto nur al la belaj albumoj pri Parizo de »Patras« — enhavos ĉe la bildoj mem la Esperantan tekston. Tial multaj mendu ĝin! Simila devus ekzisti kun Esperanta teksto pri ĉiuj ĉefurboj.

PROSPEKTON de Libroĉeta Organizaĵo vi trovas ĉi kune. Ni petas vin, bonvolu atente tralegi la prospekton kaj sendube vi rekonos tiujn gravajn avantaĝojn, kiujn la Organizaĵo donas al vi. Agu do en tiu senco.

NI INFORMAS ĈIUN pri nia adresŝanĝo. Nova adreso: Budapeŝt, IX. Soroksári-str. 38—40. V. 6. Se vi hazarde uzis nian malnovan adreson, ne timu pri perdiso, ĉar la poŝto ankaŭ tiujn enmanigas al ni.

AL NIAJ ABONANTOJ. Ni informas la abonantojn de *Lingvo-Libro*, ke en tiu ĉi jaro la revuo aperas nur trifoje. Tamen la amplekso malpliigas nur per ok paĝoj. La tiel ŝparitajn paĝojn ni kompensas per la favorpreza livero de Jubilea Libro pri Baghy—Kalocsay. Ni sendos al vi pri tio apartan informon.

